

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

L'ús de l'Esperanto

Aquest any, del 14 al 17 de maig, tindran lloc a París dues conferències tècniques: la una per a l'ús de l'Esperanto en el comerç i la indústria, sota el patronat oficial i subvencions de la Chambre de Commerce i de la Fira de París. L'altra per a ús de l'Esperanto en la Ciència, sota el patronat de molts membres de l'Acadèmia de Ciències de París — entre ells Charles Richet, el qual ha escrit: "L'Esperanto és un idioma precis com el francès, harmoniós com l'italià, capaç com el grec."

De l'1 al 8 d'agost següent, a Ginebra seran fets en Esperanto els cursos universitaris d'istiu de la Universitat fundada a Brusselles per Otlet i Lafontaine. Entre els professors d'aquests cursos en Esperanto hi ha eminències com Pierre Bovet, director de l'Institut J. J. Rousseau, de Ginebra, la més famosa institució pedagògica del món, i Charles Baudoin, que en aquestes mateixes planes ha estat dit que és un del psicòlegs més avançats. Jo us invito a concórrer als dits cursos universitaris i constaris, tareu que cap altre d'aquesta mena en anglès o francès ha tingut el nombre i diversitat d'inscrits que tindran aquests en Esperanto.

(extret d'un article de «La Publicitat» del dia 14 - 12 - 924).

ATENTU, LEGU, KOMPRENU



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 145 - BARCELONA

La kiso sur la okuloj

Pro abelfluga kis' subita,
okul' kliniĝas kvazaŭ flor';
kaj en okul', pro tim' fermita,
pupilo batas kiel kor'.

Kis' sur okul'... Ho, kia brilo,
de mia kiso sub la varm',
en la de tim' plena pupilo,
kvazaŭ birdet' en iu man'!

Aromas jam estonta ploro
sub la palpebroj en ridet';

kaj kun flugila mov-fervoro
batas pupil' en malkviet'.

Kaj ĉirkaŭ ni la tempo fluas
en faŭk-abismon en mallum'.
Mi ĉe l' okuloj viaj ĝuas,
de viaj vidoj je l' parfum'.

En kaptitec' via pupilo,
kiel alaŭdo en la man',
movadas sin kvazaŭ flugilo
por flugi for kun arda varm'...

GABRIEL ALOMAR
(Baleara poeto)

El la kataluna lingvo tradukis
JAUME GRAU CASAS

La Amo al la Birdoj

Unu el miaj plej fruaj rememoroj el mia infaneco jam rilatas al la birdoj.

Dum tre malvarma vintro pasereto duonmorta pro frosto venis en nian ĉambron. Evidente plaĉis al ĝi la varmo, ĉar ĝi restis kaj fariĝis baldaŭ multnimema, eĉ familiara. Sed, ho ve! mia patrino ĝin mortigis iumatene tute neintence perpiede. Mi ploregis, ploregadis kaj ne volis plu vivi sen mia amata pasereto.

Ĉi tiun etan epizodon mi rememoris, kiam mi legis la supran temon en la konkursoj de la ĉi-jaraj Internaciaj Floraj Ludoj, kaj ĝi ankaŭ iustigis min, skribi kelkajn liniojn.

Mi ne estas ornitologiisto, kiel oni science diras. Mi amas la birdojn, sen ke mi sentas la devon ilin klasifiki laŭ ordoj kaj specoj. Mi amas ilin instinkte.

Okupante min jam kun la ideo partopreni en la konkurso, mi promenis iutage en la kamparo. Brilaj varmaj sunradioj flatis la teron kaj invitis min, eksidi sub ombrodonanta arbo. Tra la delikata foliaro lumetis la blua ĉielo. Kaj je mia granda ĝojo birdo sidis sur malsupra branĉo. Ne miru, ke mi ekkomencis paroli kun ĝi, ĉar ĝi okulumis min tiel saĝe, tiel aminde, ke mi tuj divenis, ke ĝi estas ne ordinara birda estaĵo.

«Vidu birdeto», mi ekdiris, «mi deziras skribi iom pri la amo al vi birdoj. Ĉu vi eble povus iel helpi min?»

Kaj je mia ega surprizo la birdeto respondis klare:

«Ho jes, tre volonte. Mi scias ke vi amas nian genton, kaj mi volas tion rekompenci laŭ mia poveto».

«Koran dankon, bela plumulo», mi diris; la birdeto ridetante korektis: «plumulino».

«Do, dankon, graciulino», mi daŭrigis. Ĉu vi bonvolus aŭdigi kelkion pri la citita temo?»

«La amo al ni birdoj», instrutone ekpensis la birdineto, «havas diversajn motivojn. Mi diros la plej gravajn miaopinio. Estas unuavice nia utileco. Ni, la libere vivantaj, plenumas la gravegan oficon de policistoj de la kamparoj. Kiu povas nombri, kiom da malutilegaj raŭpoj, limakoj, vermoj, skaraboj, muŝoj kaj kuloj ni formanĝas ĉiujare? Neniu! Estas cifero neimageble granda. Sen ni, viaj kampoj, ĝardenoj, arboj kaj herboj pli-malpli frue estus pereigitaj de tiu fi-insektaro. Kaj al la homoj mankus ĉia nutraĵo vegetara. Pripensu la sekvojn! Ĉu do ne estas nature, ke la homoj nin amas?»

Alia utilon alportas al vi la dombirdoj. Ĉu rajte, ĉu malrajte vi homoj tenas kreaĵojn niaspecajn kaptitaj, tiun demandon ni ne esploru. En la daŭro de jarcentoj kaj jarmiloj ili ne plu konscias, ke ili estas malliberuloj de la homo. La ĉiama bredado estingis en ili la fajron de la liberemo. Nun ili estas necesegaj kaj utilegaj al vi. Multaj donas ovojn kaj bongus-

tan viandon, kelkaj molajn plumojn por viaj litoj, aliaj. faras servojn, kiuj jam savis homojn el grandegaj danĝeroj kaj mizero. Mi aludas la leter-kolombojn. Ili ĉiuj estas efektivaj bonfarantoj al la homoj. Ĉu tial ili ne povas postuli amon?

Sed ne sufiĉas. Kiu ornamas la ĉapelojn de viaj edzinoj kaj filinoj per la plej bela ornamaĵo? Ĉu ne estas anoj el nia gento? Struto, ardeo, paradizbirdo — mi nomas nur la plej ĉefajn — donas siajn plumojn por viaj virinoj. Mi povas tion des pli bone kompreni — la birdino iom gemis — ĉar ĉe ni la inoj malhavas tiun kutimon. Ĉe ni la viretoj estas la koketuloj. Ili portas la pli brilan plumveston. Inter la homoj ja ne ekzistas viroj-koketuloj, ŝi iom ironie aldonis. «Do, viaj inoj havas pluan kaŭzon por nin ami.

La lastan, eble plej gravan utilon mi ne povas ne menci. Vi ja konas la familion de la cikonioj kaj tute ne ignoras, kiel netakseble gravaj ili estas rilate al via idaro.» Tiam ŝi iomete honteme ridetis. «Mi ja bone scias, ke vi homoj maturaj, grandaĝaj, kleraj, skeptikaj ne kredas tion. Sed viaj infanoj ĉie amas tiujn birdojn, kiuj ĝentile alportas fratecon aŭ fratinecon.»

«Pardonu, ke mi interrompas», mi diris. «Ĉio de vi citita estas vera kaj ne kontraŭdirebla. Tamen ekzistas homoj sen amo al viaspecaj estaĵoj. Ili asertas, ke vi kelkokaze eĉ domaĝas formangante la semitaĵon aŭ la maturajn grenerojn el la spikoj».

«Jes, parte vi estas prava. La paseroj, tiuj sentaŭguloj ekz. tiel agas kelkfoje. Sed ĉu la kaŭzita domaĝo efektive estas tiel granda? Mi neniam aŭdis ĝis nun, ke la homoj tial ne havis sufiĉe por manĝi. Cetere, ĉar vi parolis pri malutilo, bonvole pripensu ĉu pro tio la homoj havas la rajton nin kapti, rosti kaj manĝi, kiel okazas en kelkaj landoj? Ĉu tio estas justa? Ĉi estas nekomprenebla barbaraĵo! Sed la homoj ja eĉ buĉegis unu la alian plej kruele, kion mi mem vidis antaŭ malmultaj jaroj en diversaj partoj de la tero!»

«Sed por daŭrigi nian temon mi diras, ke ni estas amindaj ankaŭ pro nia aspekto kaj precipe pro nia kantarto. Ĉu ni ne estas gracia gento? Rigardu tiun kinereon, kiel elegante ĝi promenetas tie sur la ŝtonoj de la rivereto. Ĉu estas iel imitebla la koketa vostmoverado? Aŭ vidu la hirundojn, kolombojn kaj mevojn, kun kiu nesuperebla arto ili trafugas la aeron, farante jen bele proporcian spiralon, jen sagorektan linion de multaj metroj. Kaj la grandaj reprezentantoj de mia popolo, aglo, vulturo, akcipitro, kiel majeste ili ŝvebas ofte milojn da metroj alte en la etero. Iufoje ili ŝajnas flugpendi tute senmove, donante al la rigardantoj veran impreson pri birda majesteco.

Alia kaŭzo, pro kiu homoj nin amas, estas la beleco kaj multkoloreco de nia pluma vestaro. Precipe viaj inoj ŝatas tion, kiel mi jam diris. Kaj vere ekzistas kelkaj inter la birdaro, kiuj reprezentas kaj eĉ superas la

pompan ĉielarkon rilate brilkoloron. Kiu ne ŝatas la admiregindaĵn trogonon kaj paradizbirdon? kaj nialande la fieran pavon? Sed ankaŭ la modeste vestitaj plaĉas ĉiam pro la ĉarmo de la delikata pluma vesto.

Sed la ĉefa kaŭzo haviganta al ni la homan amon estas la potenco de nia kantarto. Kompreneble ekzistas bonaj kaj malbonaj kantistoj inter ni. Sed kiam dolĉe, kortuŝe flutas nia kantregino najtingalo dum varma somernokto kaj ŝia voĉo jen tremas, jen jubilas mirige, ĉu iu estaĵo povas ne ami tian artistan birdeton? Aŭ kiam oni frumatene promenas tra vekigaĵanta arbaro kaj multaj birdetoj ĝojkantas kaj sur la kampoj trilas la alaŭdoj, ĉu oni tiam ne sentas profundan emocion?

La plej konvinka pruvo, kiel multe la homoj amas nian kantarton, estas ke ili bredas ekzemple la kanarion pro ĝia kantotalento. Kiom da fojoj ĝi antaŭsorĉis al malfeliĉaj loĝantoj de urbegoj aŭ al homoj katenigitaj pro longdaŭra malsano al lito, per la potenco de sia gorgo kaj lango revojn pri trankvila, paca kamparo, mallaŭte bruetantaj arboj en malvarmetiga venteto, senfina floranta erikejo. Kaj la homo alforĝita al mallarĝaj stratoj, altegaj domoj kaj polvoplenaj laborejoj vidas kaj amas en sia birdeto la korpigon de ĉio tio, kion li estas devigata malhavi.

«Ho, vi estas pravega, kara birdineto», mi interdiris emociite.

«Fine mi ne povas preterlasi mencii, ke la homoj nin birdojn amas ankaŭ el instruaj kaj sciencaj vidpunktoj.

Kio estas pli bela, pli trafa simbolo de la familio, de la hejmo ol ekz. la hirundo? Diligente ĝi konstruas sian neston, ameme ĝi kovas, nutras kaj edukas siajn idojn. Kaj la facilanima pasero estas nesuperebla modelo de optimismo. Senzorge ĝi vivas plenkonvinkite, ke la sekvonta tago donos al ĝi la necesan nutraĵon. Ĝi estas ĉiam gaja, eĉ dum vintro ne perdas la vivkuraĝon.

Al la homoj okupiĝantaj kun la birda mondo, ĝi prezentas interesajn problemojn. Ĉu la longaj migroflugoj, kiujn entreprenas ĉiujare multaj el ni, ne devas mirigi ĉiun pensemulon? Kaj al kiu ŝuldas la homoj la flugmaŝinon, entute la ideon, regi ankaŭ la regnon de la aeroj? Nur al la birdoj! Vi certe scias, ke jam en la antikva greka mitologio estas rakontite pri Dedalo kaj Ikaro, la unuaj flughomoj.

Do, vi vidas, amiko, ke ni birdoj meritas vian amon pro nia utileco, korpale beleco kaj kantarto. Ni meritas ĝin pro la gravaj instigoj, kiujn ni donas al vi laŭ socia, instrua kaj sciencaj vidpunktoj. Rekompence vian amon ni plibeligas la tutan naturon kaj eĉ vian propran vivon.»

Mia birdino-amikino eksilentis. Post kelkaj gajaj pepoj ĝi forflugis, antaŭ ol mi povis sincere danki al ŝi.

Mi ekstaris por iri hejmen, ĉar vesperiĝis. La tuta kamparo estis ornamita de la lastaj sunradioj. Ĉirkaŭ mi en la foliaro de la arboj eksonis multvoĉaj birdokantoj vesperaj.

Kiam mi venis al la rivereto, penetris al mia orelo la dolĉaj flutmelodioj de najtingalo.

Menciita en la Xaj I. F. L.

JOSEPH BERGER

Kanto de vagabondo

Premiita ĉe la I. F. L.

La polv' sur mia plando :
 Jen estas mia lando.
 La lito estas ĉies ter',
 Kovrilo mia la vesper'.
 Birdar' al mi deĵoras
 Per amuzanta ĥor',
 La nuboj min priploras,
 Se tuŝas min dolor'.
 Hej, hola! Kia granda ĝoj'!
 Facila vag' sur landa voj'!

Mi vagas preterfluge,
 Sencele kaj senjuge,
 Kaj al knabino, al amik'
 Neniam ligu min radik'.
 Radiko ja profunde
 Penetras en la ter.
 Kaj ĝi ŝiriĝos vunde.
 Ni ŝparu je sufer'!
 Hej hola, kia granda ĝoj'!
 Ensola vag' sur landa voj'!

En blu' de l' malproksimo
 Sin banas la animo,
 Dum inter prema ĉambra lim'
 La koron kovras ranca ŝim'.
 Filistro - invalido

Do putru en la niĉ'!
 Mi saltas el la sido
 Kriante pro l' feliĉ',
 Se vokas min por granda ĝoj',
 Por nova vag' la landa voj'.

Se lumas sort' se nigras,
 Mi prifajfante migras,
 Kaj kiam kontraŭ la stomak'
 Malsato venas por atak':
 Dum la stomak' eksonas
 Grumblante kun riproĉ',
 Mi fajfe primon donas
 Al ĝia basa voĉ'.
 Hej, hola! Kia granda ĝoj'
 Eĉ la malsat' sur landa voj'!

Kaj se pleniĝis listo
 Kaj venos la Falĉisto,
 Post mi edzino kaj infan'
 Ne ploros orfe kaj sen pan'.
 Mi falas en la neĝo.
 — Adiaŭ bela vag'!
 Kaj la primorta preĝo
 Nur estos korva grak'.
 Anoncos poste hunda boj'
 Kadavron sur la landa voj'.

KOLOMANO DE KALOCSAY



Bulgaraj Popolaj Kutimoj

Premiita ĉe X^a I. F. L.

Belaj popolkutimoj kaj ilin akompanantaj ritoj restis ĉe kelkaj popoloj de la malnova idolana tempo. Kiel tradicioj ili diversigas kaj plidolĉigas la nunan vivon. Jen kelkaj el ili, konservitaj ĉe la bulgaroj.

LA NOVA JARO

Unu el la plej belaj festoj dum la vintro estas la festo Nova Jaro aŭ Surovako, netradukebla vorto, signifanta proksimume : saluton kaj bondeziron per frapado. Ĝi estas festo precipe por la infanoj. Ĉiu el ni gardas en sia animo la belajn memorojn de la infaneco pri tiu festo.

La vesperon antaŭ la nova Jaro estas nomata *budna večer* (laŭvorte : maldorma vespero). En la kamenon de la ĉambro, kie estos renkontata la Nova Jaro, oni metas grandan ŝtipon (*budnik*), kiu brulas kaj bruletas ĝis la mateno. Por la vespermango estas aranĝata la tablo, sur kiun oni metas tufan panon kun bruligita vaksandelo sur ĝi, kompoton, manĝaĵon de porkokapo, kukon kaj fruktojn. Antaŭ ol la vespermango komenciĝas, la plej maljuna persono en la domo metas vivantajn karberojn kaj Smirnan timianon en la incensilon kaj incensas la manĝotablon kaj la tutan domon. Interne en la kuko estas antaŭe metitaj bone ellavitaj argentaĵoj kaj nikelaĵoj, por provi la ŝancon. La kukujo estas metata sur la manĝotablon kaj la kuko estas tranĉata je tiom da pecoj, kiom estas la personoj sidantaj ĉirkaŭ ĝi. Ĉiu prenas la pecon antaŭ si kaj ĝin malfermas por vidi ĉu li gajnas moneron. Kiu gajnas moneron, tiu estos feliĉa kaj riĉa dum la jaro. Grandan feliĉon havos kaj donace ricevas monon tiu, kiu ternas je la 12-a horo nokte.

La infanoj, knaboj pli aĝaj ol ses jaroj, kuŝiĝas frue, ĉar la matenon antaŭ krepuskiĝo ili iros *surovaki*. La *surovak'ilo* estas pretigita jam du tagojn antaŭe. Ĝi estas branĉetohava kornusvergo, ornamita per alligitaj sur ĝi diverskoloraj rubandoj, paperstrioj aŭ ruĝaj kaj bluaj diversdikaj lanfadenoj. Ordinare al la surovakilo oni ligas ankaŭ ormoneron. Frumatenene la patrino vekas la infanojn, vestas ilin en la plej novaj vestoj kaj ilin forsendas por *surovaki* la parencojn kaj konatulojn. La stratoj de la vilaĝo estas plenigataj de vivo — bruparolo, krioj, kantoj. La infanoj marŝas ordinare pogrupo duope aŭ triope. Kiam ili alvenas al la domo, kie ili surovak'os, ili ekfrapas forte sur la eksteran pordon kaj vokas laŭtvoĉe la do-

monastrinon por malfermi al ili. Enirinte, ili komencas surovaki, frapante sur la dorso ĉiun de la familio kaj samtempe dirante :

Súrova, súrova godína,
Vésela godína,
Ĉervéna jábolka v gradína,
Pálna kásta s koprína,
Jívo zdrávo do godína,
Do godína do amína.

Saluton, bondeziron por la novjaro,
Estu gaja la novjaro,
Ruĝa pomo en la ĝardeno,
Plena domo je silko,
Estu vivaj kaj sanaj ĝis la venonta,
Ĝis la venonta jaro kaj por ĉiam.

La surovak' antoj surovak'as ankaŭ tiujn, kiuj ankoraŭ dormas, frapante pli forte, por ilin veki. Post kiam ĉiuj estas surovakitaj, la domomastrino disdonas al la infanoj monerojn, nuksojn, avelojn kaj aliajn sekajn fruktojn. Tiamaniere la infanoj vizitas la vilaĝon ĝis la mateno kiam ili revenas hejmen. Antaŭ ol rehejmiĝi ili ĵetas sian surovakilon ordinare sur la tegmenton de iu domo. La surovakilo ne devas esti kunportata hejmen, ĉar alie estos multaj puloj dum la jaro.

Kontraŭ la Nova Jaro, samkiel dum la tago de 1. Januaro, estas provata la ŝanco per krevado de kornusburĝonoj. Oni kolektas burĝonojn de la surovakilo kaj unu post alia ili estas metataj sur ardantan karberon apud la kameno, antaŭ kio oni dediĉas la burĝonon al iu el la membroj de la familio, al la ŝafaro, al la grenkampo, vinberejo, ktp. Pro la ardo la burĝono varmiĝas, grandiĝas kaj krevas forsaltante de la karbero. Se la burĝono bone krevas kaj forte saltas, tio ĉi signifas feliĉon por tiu, al kiu ĝi estas dediĉita aŭ fruktabundecon de la grenkampo, vinberejo, ktp.

Kvankam la Nova Jaro estas festo por la knaboj, tamen ankaŭ la knabinojn ligas ĝojaj memoroj kun ĝi.

Je Silvestro (de *Sylva* — arbaro kaj estro — reĝo), kontraŭ la Nova Jaro, la knabinoj de la kvartalo kunvenas en iun domon por provi sian ŝancon. Ili prenas kupran kaldroneton, metas sur ĝian fundon tavolon de aveno kaj ĝin plenigas je akvo. Ĉiu knabino estas pretiginta sian ringon, per kiu ŝi provos sian feliĉon dum la nova jaro. Ĉiuj ringoj estas metataj en la kaldroneton kaj oni miksas ilin bone kun la aveno. Post tio ili ekkantas :

Propáren petél
Prez dol bjága;
Carvúl stjága,
Njágo móje.

Brogita koko
Tra valet' kuras;
Ledŝuo premas,
Karulino mia.

La lasta verso estas kiel rekantaĵo en ĉiu strofo. Post la finkanto de ĉiu strofo, kiu signifas iun viran metion, iu knabeto metas la manon en la kaldroneton kaj eltiras unu ringon. Al kiu knabino apartenas la ringo, tiu edziniĝos je tia, kian montras la finkantita strofo : paŝtisto, kaldronisto, ĝardenisto, skribisto, urbano, fremdulo, ktp.

IVAN H. KRESTANOFF

Mono ne feliĉigas

Menciita ĉe Xaj I. F. L.

Estas malnova veraĵo, ke la mono ne feliĉigas. Tamen ĉio dependas de la mono kaj ĉiuj svatas la monon. Sed la historio kaj la sperto pravas ke nur kontenteco kaj kutimiĝo feliĉigas. Ofte oni envias sian najbaron aŭ sian amikon pro iliaj riĉaĵoj aŭ ilia situacio en la societo; sed oni ne pripensas ke ĉiu homo sin adaptas al sia situacio, ke la malriĉulo kutime ne estas pli malfeliĉa ol la riĉulo, kaj ke la riĉulo ne estas pli kontenta ol la malriĉulo. Ni ĉiuj scias, kiom malfeliĉaj ni nin sentas, kiam ni suferas pro iu ajn korpā doloro, kaj ke en tiaj momentoj ni pensas: «Se nur miaj doloroj ĉesus, kiom feliĉa mi estus!» Sed tamen post kiam la doloro nin forlasis, ni estas, post la unua ekĝojo pri la pliboniĝo, neniel pli feliĉaj ol antaŭe. La kutimo ne plu suferi doloron, baldaŭ fariĝas ĉiutagaĵo kaj ĉio estas kiel ĉiam estis. Kiom multaj ja pripensas, kion ili efektivigus se ili posedus multe da mono, sed ili ignoras ke la kapableco de la homo, sentadi feliĉon kaj ĝojon, estas limigita, kaj ke tiu, kiu kutimiĝis elspezadi monon per plena mano, per tio ne povas havigi al si pli da plezuro ol tiu, kiu kutimiĝis ĝuadi nur modestajn plezuretojn. Sinjoro fumanta dikan havancigaron, po unu dolaro, ne sentas pro tio pli grandan ĝuon ol viro, al kiu eĉ plej simpla pipo tiklas la palaton. Feliĉe la vivo estas tia kaj la homo tiel dotita, ke ni preskaŭ ĉiam povas adaptiĝi al nia ĉirkaŭaĵo kaj ke ni eĉ kapablas sentadi nin feliĉaj en la plej modestaj cirkonstancoj. Ĉar la feliĉo ja ne dependas de eksteraĵoj, sed ĝi ekfloras el la interna kontenteco. Kaj kiu ĝustatempe scias agi, tiu eĉ dum plej malhela tago ekkaptas sunradion, kiu varmigas lin kaj heligas lian vivon. Se estas plenumitaj nur la plej urgaj vivbezonoj, se ni nur havas ion por mangi kaj trinki, ion por nin vesti kaj tegmenton super nia kapo, tiam ĉiu el ni povas fariĝi feliĉa. Kiu opinias, ke multe da mono estas kondiĉo de ĉiu plezuro, tiu vere eraras. La riĉulo kutimiĝinta elspezadi la monon per plena mano, pro tio ne sentas plej malgrandan plezuron. Li konstante serĉadas novajn plezuretojn, ĉar li rapide trosatiĝas, kaj tiu ĉi ĉasado al ĉiam pli fortaj sensacioj igas lin nerva kaj malĝoja.

La malriĉulo, kiu devas ŝpari ne nur sian monon, sed ankaŭ siajn plezuretojn, ĝuas konscie kaj prudente. Eĉ homoj suferantaj pro tre peza sorto, kiel ekzemple blinduloj kaj kripluloj, ofte estas tute kontentaj kaj feliĉaj, ĉar ili alkutimiĝis al siaj cirkonstancoj kaj trovas kontentigon en la malmulto al ili restinta. La nombro da malkontentuloj estas multe pli granda inter la riĉuloj ol inter la malriĉuloj, ĉar al ili, kiuj ne posedas riĉaĵojn, la naturo ofte donacas internan ekvilibron kaj feliĉigan kontentemon.

JAKOBO SCHMID

La proksima Kongreso de K. E. F.

21-24 de majo 1925-a. — Palma de Mallorca

Venu, karaj gesamideanoj, venu tien ĉi: insulo Mallorca atendas vin kaj la Palmaj samcelanoj deziregas manpremi la pretermarajn esperantistojn por kunfratigi kun ili dum kelkaj tagoj, en kiuj okazos la solena XII-a. Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio kaj la grandiozaj XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj, kies solenaĵoj estos tre sukcesaj kaj brilaj, laŭ informoj ricevitaj pri nia festaro, kiun honoros, krom niaj katalunaj samideanoj, samideanoj el diversaj landoj. Ni tre esperas, ke kune kun la pioniroj de nia movado neesperantistaj personoj ankaŭ venos viziti nian ĉarman insulon, kiel ĝi estas nomita de fremduloj, kiuj jam vizitis ĝin. Por ĉiuj nia proksima Kongreso estos interesa: post la laborkunsidoj, Floraj Ludoj, oficiala festeno, k. t. p., la kongresanoj dezirantaj ekskursi tra nia bela Mallorca povos fari tion, por kio kaj por detale sciigi la samideanaron pri la prezoj de la ekskursoj, tempo por efektiviĝi ilin, kondiĉoj de loĝado ĉe hoteloj, kosto de la veturo kaj fervoja vojaĝo, kongresa kotizo kaj aliaj sciigoj pri nia venonta Kongreso kaj ĝiaj amuzaĵoj, ni publikigos sur nia presorgano «Kataluna Esperantisto» la decajn informojn kaj notojn.

Decidiĝu, estimataj gekunbatalantoj, ĉeesti nian Kongreson; pretiĝu sukcesigi ĝin; entuziasme iru antaŭen, daŭrigu vian laŭdindan agadon kaj kiel ĉiam pruvu al la tuta mondo ke nia kara Esperanto ne estas mortinta lingvo, ke la kreaĵo de nia Majstro jam estas praktika kaj utila helplingvo por ĉiaj servoj kaj homaj bezonoj; klopodu varbi al nia movado plej grandan nombron da novaj samlingvanoj por la gloro de nia sankta afero kaj por la baldaŭ venko de ni dezirata; faru tion, mi petas, por honori la rememoron de la senmorta kaj neforgesebla D-ro Zamenhof.

Tial, ke dum nia Kongreso okazos la festo nomita Floraj Ludoj, al kiu prezentas literaturaĵojn ĉiulandaj verkistoj, mi altiras la atenton de la samideanoj, kiuj ankoraŭ, pro ilia nelerteco verki versaĵojn aŭ prozaĵojn, ne gajnis premion je la antaŭaj literaturaj konkursoj, kaj de tiuj, kiuj ne kuraĝis prezenti siajn verkaĵojn al la ĝisnunaj okazintaj konkursoj, pri tio, ke ili, sentime decidu partopreni la nomitan literaturan feston, ĉar la listo de premioj por niaj proksimaj Floraj Ludoj estas tre grava kaj pli facile ol antaŭe kredeble, multaj samideanoj estos premiataj pro la multenombraj temoj laŭvolaj. La granda nombro da premioj estas sendube la unua sukceso atingita de la Organiza Komitato, kiu deziregas ke aliĝu kaj ĉeestu nian Kongreson, krom fremdaj samideanoj, la esperantistoj el ĉiuj hispanaj regionoj, kiujn ni tutkoré kaj frate invitas por tiu celo. Atentu, do, nian alvokon, karegaj kamaradoj.

Ĉiuj geesperantistoj venu Insulon Mallorca dum la venonta majo, por honori nian Kongreson!

Ni entuziasme kaj sincere atendas vin. Koran saluton al ĉiuj ĝis kiam estos eble povi ĉirkaŭpremi vin kaj amike premi viajn manojn.

NARCISO BOFILL

Prezidanto de la O. K.

Plena Listo de la Premioj por la XI^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la XI^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ vin salutas kaj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *Ama* verko en prozo

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la versaĵo «La Pastoreta». (Vidu antaŭan numeron)
- II. — Traduko de la prozaĵo «Via Blanquerna». (Vidu antaŭan numeron)

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

(La temo estas laŭvola, se oni ne difinas ĝin)

- I. — Premio de: S-ro Narciso Bofill, inĝeniero, Palma: 100 pesetoj.
- II. — S-ino Maria Fornaris de Bofill, Palma: 50 pesetoj.
- III. — F-ino Amàlia Bofill Fornaris, Palma: 50 Pesetoj.
- IV. — S-ro Antonio Rosselló, Direktoro de Compañía Mallorquina de Electricidad, Palma: 100 pesetoj.
- V. — S-ro José Salom, masonisto, Palma: 50 Pesetoj.
- VI. — S-ro Pedro J. Tous, Fabriko de maŝinoj, Palma: 100 pesetoj.
- VII. — S-ro Miguel C. Oliver, ĵugisto. Palma: 50 pesetoj. Temo: Altaj konsideroj de ordo morala, religia, pedagogia, ekonomia kaj regiona kiuj konsilas la restarigon de la «Normal de Maestras» sub la gvido de la «Religiosas del Real Colegio de la Pureza» de Palma.
- VIII. — S-ro Mariano Jaquotot, Materialoj por konstruaĵoj, Palma: 50 pesetoj.
- IX. — S-ro Jaume M. Granada, Palma: 50 pesetoj.
- X. — Banko «Fomento Agrícola de Mallorca», Palma: 100 pesetoj.
- XI. — Banko «Crédito Balear», Palma: 100 pesetoj.
- XII. — «Fomento del Civismo», Palma: 50 pesetoj.
- XIII. — «Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares», Palma: 50 pesetoj.

- XIV. — «Associació per la Cultura de Mallorca», Palma: 50 pesetoj.
 XV. — «Banco Vitalicio de España», Palma: 50 pesetoj.
 XVI. — «Ferrocaril de Sóller», Palma: 50 pesetoj.
 XVII. — Ruĝa Kruco (Santa Catalina), Palma: pesetoj.
 XIII. — Prezidanto de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj.
 XIX. — Sekretario de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusiljonaj aŭtoroj.
 XX. — Episkopa Moŝto de Mallorca: 100 pesetoj.
 XXI. — Cámara Oficial de la Propiedad Urbana de Palma: 100 pesetoj.
 XXII. — Sociedad General de Tranvías Eléctricos, Palma: 50 pesetoj
 XXIII. — Esperantista Klubo Palma: 100 pesetoj.
 XXIV. — Oficiala Ĉambro de Komercio, Industrio kaj Navigado de Palma: 100 pesetoj.
 XXV. — Fomento de Turismo de Palma: artobjekto pri Palma.
 XXVI. — Asociación de la Prensa de Baleares: 50 Pesetoj.
 XXVII. — S-ro Fernando Ramírez, Sekretario de Delegación de Hacienda de Baleares: 50 pesetoj.
 XXVIII. — S-ro Miguel Guasp, ministestro, de Palma: 50 pesetoj.
 XXIX. — S-ro Antonio Coll, agrikulturisto, de Palma: 50 pesetoj.
 XXX. — Esp. Grupo «Girona Espero», Girona: 50 pesetoj. Temo: Kan-to al la latina maro.
 XXXI. — S-roj Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma: 100 pesetoj.
 XXXII. — S-ro Rafael Blanes, direktoro de «Kompanio de Fervojoj de Mallorca»: 50 pesetoj.
 XXXIII. — «Moŝta Kolegio de Prokuristoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXIV. — «Veloz Sport Balear», Palma: 50 pesetoj.
 XXXV. — «Mallorca Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXVI. — S-ro Bartolomé Font, pastro, Palma: 50 pesetoj.
 XXXVII. — «El Hogar del Porvenir», Palma: 50 pesetoj.
 XXXVIII. — «Moŝta Kolegio de Advokatoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXIX. — «Oficiala Kolegio de Farmaciistoj», Palma: 50 pesetoj.
 XL. — «Oficiala Kolegio de Kuracistoj», Palma: 50 pesetoj.
 XLI. — «Federación Patronal de Mallorca»: 50 pesetoj.
 Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!
 Kolomano de Kaloksay, *prezidanto*. — Jakob Schmid. — Eŭsebo Artigas. — Narcís Bofill. — Fred. Pujulà i Vallès. — S. Alberich Jofrè, *sekretario*.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵoj Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos laŭorde bele binditan ekzempleron

de la verkoj: *Pro Iŝtar*, *Kataluna Antologio*, *La Tragedio de l' Homo*, *Fabiola*. Se la merito de la premiitaj aŭtoroj de la *Tradukitaj Tekstoj I, II*, tion konsilas, oni premios ĝin per unu el la premioj por temo laŭvola.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de a Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Plene *Fundamenta Esperanto* kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anoncitaj.

IV. — La Festo de la XIaj. Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Palma de Mallorca dum la XIIa. Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» Majo 1925.

V. — Sur la manuskriptoj—kiuj devas esti ricevataj antaŭ la 15 de marto 1925 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro S. Alberich Jofrè, str. Bretón de los Herreros, 18, 1.^{er} 1.^a Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por la akcepto de verkoj. Oni konservu kopiou de manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj el la konkursoj.

VIII. — La komitato publikigos la veredikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj, kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj Esperanto-gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.


X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas aliaj efektivaj premioj krom tiuj difinitaj en la nuna alvoko.

LISTO DA VERKOJ RICEVITAJ

1. Un sonnet sans défauts vaut seul un long poème. — 2. En versfaraĵo, formo estas funda. — 3. Versa tradukado estas rekreado. — 4. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Genezo, II, 22. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Genezo, I, 31. — 5. Lingvo sen Poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo. — 6. Finis coronat opus. — 7. Domine, da mihi pacem. — 8. Esperantistino. — 9. Avis rara. — 10. Vivanta strofo.

NOTO. — Una el la premioj por temo laŭvola estos aljuĝata al la plej bona propaganda lernolibro pri Esperanto por katalunlingvanoj.

Preseraroj. En nia lasta numero enŝoviĝis kelkaj preseraroj, kiuj estas korektitaj per la nuna represo.



Katedralo. — Flanka aspekto.


La scenurbo de la XII^a Kongreso de la Kaa Internaciaj F

Palma de Mallorca!.... Nomo kiu elvokas rememorojn pri estintaj glo-
roj en ĉiu spirito kataluna!.... Via gotika katedralo, kies belŝajnaj turpintoj
reflektiĝas en la trankvila akvo de la haveno, diras al ĵus alveninta vizitan-
to ion pri la plej prospera epoko de nia historio.

La reĝa palaco, fortikaĵo Templaris, kastelo Bellver kaj centoj da di-
versaj detaloj, prezentas al ni rememoron pri tiu tempo en kiu Katalunujo
estis unu el la ĉefaj ŝtatoj apud la Mediteranea Maro.

Sed nomante vin, Palma de Mallorca, estas ja kvazaŭ oni nomas vian
tutan insulon, kaj kio plej ĉarma faras vin estas la naturbelaĵoj sidantaj
ĉirkaŭ vi por revigi la maristojn, kiuj alboridiĝas por ripozado.

Kiam neniu homa piedo surpaŝis vian teron, dekojn da jarcentoj an-



Ĝenerala vidaĵo


Kuluna Esperantista Federacio, kaj de la XI^{aj} Mondaj Ludoj

PALMA DE MALLORCA


taŭe, kiam via unua loĝanto ne estis stariginta ankoraŭ la unuan *dolmenon*, jam la naturo ĉizadis en via internaĵo, en la subtera mallumo, la mirindajn loĝejojn de gnomoj kaj feinoj, la senkomparajn grotojn kaj kavernojn Artà kaj Monacor.

Kaj sur via supraĵo la ondegoj modelis viajn abruptajn marbordojn, kaj formigis viaj ĉarmaj valoj parfumitaj de oranĝujoj kaj citronarboj.


Rigardinte vin kaj viajn fratinojn, la ceterajn balearajn insulojn, oritajn de la suno, kronitajn de mara ŝaŭmo elirinta el la ondoj kvazaŭ aro de ravaj sirenoj, la genio - fantazio de nia plej glora poeto, Jacint Verdaguer, enkorpgis la spiritan legendon pri via kreado, indan je la klasika mitologio.



la urbo kaj haveno.



Vidaĵo de «Les Illetes», marbordo apud Palma.



Eksteraĵo de la Kastelo Bellver.

Eksterordinara kunsido de K. E. F.

21^a de Decembro 1924^a

En la granda salono de nia lauleĝa sidejo, ĉe Ateneu Enciclopèdic Popular, okazis je la kyara kaj duono posttagmeze la Eksterordinara Kunveno de nia societo.

Ĉeestis ĝin la Direkta Komitato, multnombraj esperantistoj kaj reprezentantoj speciale delegitaj de la aliĝintaj prupoj: Nova Sento, Paco kaj Amo, Barcelona Stelo el Barcelona, Lumon el Terrassa, Aplec el Sabadell, Frateco el Vendrell; letere aliĝis aŭ proponis ŝanĝojn, kiujn oni legis aŭ pridiskutis, la grupoj Ĝirona Espero el Girona kaj Bela Espero el Manresa.

Nia Prezidanto S-ro Delfi Dalmau unue memorigas ke en tiu-ĉi monato plenumiĝas la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, dato kiu preskaŭ koincidas kun la morto de lia fervora edzino S-ino Klara Silbernik, je kies memoro kaj kiel plej lasta saluto li petas ke ĉiuj ĉeestantoj stariĝu momente kiel signon de respekto.

Tuj poste li legas la proponon de la Direkta Komitato, koncerne la ŝanĝojn farindajn en la regularo de nia K. E. F., kaj jam publikigitaj en la antaŭa numero de nia gazeto.

Sendiskute estas aprokata la Tria regulo: Por bone plenumi la antaŭan paragrafon, K. E. F., eldonos gazeton, kies organizado estos regulata per speciala interna regularo prezentata de la redaktaro kaj antaŭe akceptata de la Direkta Komitato. Abonprezo de la gazeto estas 6 pesetoj po jaro.

Post longa diskutado en kiu partoprenas S-roj Grau, Amades, Torrents, Herp, Claramunt, Alberich, Solà, Dalmau, Comadran kaj aliaj, la paragrafo 4^a de nia regularo estas redaktita jene:

La K. E. F. konsistos el asociaj kaj izolaj membroj; la unuaj estos federaciaĵoj per la grupo al kiu ili apartenas kaj la aliaj laŭ maniero privata.

La diversaj grupoj el kiuj konsistas la K. E. F. kontribuos al ĝia subteno per la monata kotizo de 0'10 ptoj. po membro kaj la individuaj membroj per minimuma kotizaĵo de 3'50 ptoj. po jaro.

Regulo 5.^a — La K. E. F. estos regata de Direkta Komitato, renovigebla ĉiujare, konsistanta el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Vicsekretario, Kalkulisto, Kasisto, Administristo kaj kvar Voĉdonantoj.

Regulo 12.^a — Tiu ĉi Federacio agados se nur du organizitaj grupoj aŭ tridek izolaj membroj ĝin konsistigas. En okazo de disiĝo, post oficiala decido, la mono ekzistanta estos liverata al la kaso de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Esperantistaj Societoj.

Post la aprobo de la ŝanĝoj proponitaj al nia regularo, kies definitiva kaj jam korektita teksto, oni povas vidi kaj legi sur la koverto de nia gazeto, nia Prezidanto eklegis la leterojn intersanĝintajn kun la Prezidanto de Iberia Konfederacio koncerne nian aliĝon al tiu organizaĵo: unuanime

kaj sen ies kontraŭstaro estas aprobita la sinteno de nia Direktanta Komitato kaj oni decidas ne aliĝi materie al la Konfederacio sed alporti al ĝi nian tutan moralan aliĝon kaj helpon ĉiam kiam klopodo estas efektivigota ĉe la Hispana Ŝtato.

Post propono estas elektitaj kiel Voĉdonantoj de nia Komitato, unu kiel anstataŭanto de S-ro Perez, estiĝinta, alia nova konforme al ĵus aprobita regularo, niaj karaj samideanoj S-roj Isidre Torrents kaj Lluís Domènech, ambaŭ el Barcelono.

S-ro D. Dalmau raportas al la ĉeestantaro pri la taskoj jam entreprenitaj por nia proksima Kongreso en Palma de Mallorca, kiu certe estos granda sukceso por la movado en nia lando, kaj oni decidas ke la kunveno montru sian estimon al niaj karaj Mallorca'j samideanoj S-roj Narcís Bofill kaj Joan Barceló.

Post tio ĉi la Prezidanto fermas la kunvenon je la sepa vespere.

La sekretario-raportanto

MARIAN SOLÀ



Novaj perspektivoj.

Unuanime la partoprenintoj en nia eksterordinara ĝenerala kunsido alprenis la plej efikajn decidojn sendanĝerigi la fundamentojn de K. E. F. kaj larĝe malfermi la pordojn de ĉiufanka subteno al ĉiuj enlandaj esperantistoj.

Sur tiu ĉi numero ĉiu leganto trovos la grupanoŝanĝojn akceptitajn. Laŭ ili ĉiu grupo povas aliĝi al K. E. F. pagante tre malaltan kotizon po membro. Tiu malalte fiksita kotizo donos rajton al ĉiu grupano partopreni niajn kongresojn, voĉdoni pere aŭ senpere de komuna reprezentanto kaj, krom tio, kio estas plej grava, finance reguligos nian kason kaj efike akcelos nian movadon, kiu nepre bezonas la helpon de ĉiuj por paŝi rapide antaŭen.

Nia membraro grave kreskos tre kredeble. Nia reprezentanto ĉe la Konstanta Reprezentantaro akiros pli altan reliefon. La katalunaj esperantistoj atingos pli altan personecon en la mondo esperantista kaj fine havos solidan organizaĵon.

La kotizaĵo por izoluloj estas pli alte fiksita en la konvinko ke izoluloj ŝparas la subtenon de grupo kaj sekve povas pli multe elspezi por la ko-

muna organizaĵo, kiu ne dormante sur la akirotaj laŭroj komencos aktivan laboron por plikreskigi la ekzistantajn grupojn kaj laŭpove helpi la stariĝon de novaj en lokoj, kie la movado estas malvigla aŭ kie la afero malvarmiĝis kaj bezonas kunhelpon por antaŭeniri.

Ni estas certaj, ke ĉiuj grupoj sendos sian aliĝon al K. E. F. akceptante la novajn devojn, ke ĉiuj izoluloj tuj sendos ankaŭ sian kotizaĵon kaj fine ke ĉiuj fideluloj fervore laborados por ke en la daŭro de mallonga tempo ĉiuj esperantistoj de Balearaj Insuloj kaj Katalunujo estu en niaj vicoj.

Ĉiuj amikoj senlace laboru por ke la nova jaro estu la plej efika epoko de nia enlanda movado.

La demando pri la Iberia Esperantista Konfederacio estis solvita.

La regulo VIII de la citita Konfederacio diras: «Ĉiu federacio liveros al la Konfederacio ĉiumonate po 0'35 pesetoj por ĉiu konfederaciano». Nia federacio, kiu tiel longan tempon publikigas propran organon kaj internacie havas memstaran personecon, ne povas nek devas forlasi sian tradicion por transdoni al I. E. K. tiel gravan parton de la enspezoj. Tio estus memmortigo. Tio devigus nin al malaperigo de nia gazeto kaj forlaso de niaj entreprenoj.

Tamen, la gvidantoj de I. E. K. povas esti certaj, ke ni kun fervoro helpos ĉiun entreprenon, kiu bezonos komunan laboron.

Klara Zamenhof

Kiom da fojoj la viro povis atingi plej altajn bonojn por la homaro dank' al la fervoro kaj komprenema koro de virino! Klara ZAMENHOF estis por nia majstro la plej lojala helpanto en la tempoj malfacilaj.

Kiam Zamenhof bataladis kontraŭ antaŭjuĝo kaj skeptiko, en la teruraj horoj de malespero kaj doloro li trovis ĉiam en sia kamaradino la plej bonan komprenanton kaj instiganton. Ŝia alta koro kunfandiĝis en la lia kaj ambaŭ bataladis por la bono de l' homaro, kontraŭ mokado kaj indiferento.

Ne plu estas inter ni la heroino de nia movado. La batalantino falis. Ĉirkaŭ ŝi la tutmonda esperantistaro alten levas la standardon kaj kantas

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l'homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron....

Paĝo por Lernantoj
(Pronuncien: Pàĝo por lernàntoi)

Pàgina per a Alumnes

Esperanto, lingvo, Dio, homo, animalo, besto,
Esperanto, llengua, Déu, home, animal, bèstia,
vesto, mano, pano, vino, libro, brako, tablo,
vestit, mà, pa, vi, llibre, braç, taula,
akvo, tero, pomo, frukto, juneco, beleco, mal-
aigua, terra, poma, fruit, juvenesa, bellesa, ve-
juneco, malbeleco, kaj cetere, estas substantivoj,
llesa, lletgesa, et cetera, són substantius,
ĉar ili estas nomoj de personoj, animaloj aŭ
perquè ells, són noms de persones, animals o
aferoj konkretaj aŭ abstraktaj. — La substantivoj
coses, concretes o abstractes. — Els substantius
finiĝas per o, ekzemploj: litro, metro, teatro, afero,
s'acaben amb o, exemples: litre, metre, teatre, cosa,
plumo, papero, kraĵono, inko, telefono, strato, domo,
ploma, paper, llapis, tinta, telèfon, carrer, casa,
patro, frato, filo, filino, fratino, patrino, patreco,
pare, germà, fill, filla, germana, mare, paternitat,
frateco, fileco, teatreco, kaj tiel ĉiuj.
germanor, filialitat, teatralitat, i així tots.

Ĉiuj vortoj en Esperanto havas la fonetikan
Tots els mots en Esperanto tenen l' accent
akcenton en la antaŭlasta silabo. Ĉiu vorto
tònic a la penúltima síl-laba. Tota paraula
havas tiom da silaboj kiom da vokaloj.
té tant de síl-labes quant de vocals.

Bibliografio

Ni recenzas verkojn duope ricevitaĵn

ALBRECHT DÜRER. Vivo kaj verkado de la fama germana pentristo. 28 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj de Hans Kock-München. Eldonita de Sud-germana Esperanto-Eldonejo, Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München, 1924, 48 paĝoj, 23 × 14. Prezo : 1.40 ormark.

Certe la verketo trovos la plaĉon, kiun la eldonintoj esperas de la esperantistaro. Zorge eldonita, korekte verkita, la libro fariĝas trezoro ne nur por esperantistoj sed por ĉiuj artsatantoj. La desegnaĵoj iafaje prezentigas kun eraroj kaj teknikaj malperfektaĵoj sed ĝenerale oni konstatas admirindan delikatecon kaj profundan senton de la fama Dürer.

Plezurege oni rigardas la akvareldesegnaĵojn «Kuniklo» kaj «Granda Herbaĵo» kaj la kuprogravuraĵon «Sankta Hieronimo». La esperantistoj faros al si grandan honoron aĉetante tiun ĉi grandan verketon. — SALJO.

AMAJ POEMOJ de Jaume Grau Casas. Eldonita de la aŭtoro, al kiu oni devas sin turni por aĉeto, str. Claris 72, Barcelona. 1924, 32 paĝoj, 17 × 12. Prezo : 1 peseto.

Ni malavare devas laŭdi nian poeton, ke li mem donis en bela libreto amason da poemoj, originalaj kaj tradukitaj, ĉe kies legado oni sentas la ravan inspiron de la verkinto. Malfacile oni povus diri, kiu poemo supertaras alian, tamen, kiel brila perlo reliefigas kun dolĉa parfumo «Kanto de l' Trobador». El la tradukaĵoj el kataluna lingvo fariĝas aparte citinda la trafa traduko de «Beno de la Mangotablo», kies ritmo dolĉe sonas kun nekomparebla stilo.

Tre varme ni rekomendas al ĉiuj amikoj, ke ili baldaŭ havigu al si la allogan verkon de nia kara Grau. — SALJO.

KEINOTEKOISEN YHTEISKIELEN MAHDOLLISUUKSISTA JA ESPERANTOSTA. Parolado : Pri la eblecoj de artefarita komunlingvo kaj Esperanto, de H. Salokannel. Finnlando, 1924, 16 paĝoj. Prezo : 1 mk.

Broŝureto kun celo propaganda por finnoj. La tekston mi ne povas juĝi ĉar mi ne scipovas finnan lingvon. Tiaj broŝuretoj en nia kataluna lingvo pri aspektoj diversaj de nia afero bone taŭgas por propagando en diversaj rondoĵoj. — SALJO.

TRI LIRIKOJ de Shakespeare, muziko de M. Francis, vortoj tradukitaj de la eldoninto A. J. Ashley, Farnley, apud Huddersfield, Anglujo. 1924, 12 paĝoj. Prezo : afrank. L 0/1/7.

(1) Madrigalo (el «Measure for Measure» ak. 4, sc. 1) havas melodion dolĉan kaj inspiritan en sia trajto melankolika. La akompano bone ordigita kaj samtempe harmonia kompletigas ĝian belecon.

(2) Fidele (el «Cymbeline» ak. 4, sc. 2). La unua motivo estas melo-

dia kun akompano trafa por ĝi. La dua, gaja, estas ŝatinda kaj plena de fortikeco. La *Moderato* kaj *pli malrapide* estas el bela melodio kaj adekvata akompano, kio faras la komponaĵon laŭdinda.

(3) *Carpe Diem* (el «Twelfth Night» ak. 2, sc. 3). Ĝin ornamas en la komenco ludema gracio, kiu poste fariĝas melankolia, ripetigante en la unua taktero kaj finigante per ĝusta *rallentando*.

La vortoj estas ĝuste tradukitaj kaj konservis tra la traduko belan rimon. Mi rekomendas la verkon al ĉiuj muzikamantoj. — JOFRÉ.

SKOTLANDA PEJZAGO. Kolekto de vidaĵoj eldonitaj de Higgle & Co, Rothesay, Skotlando. 50 paĝoj. Prezo: 1 ŝilingo. Estas aldonita 32-paĝa broŝureto «Kondukanto en belega Skotlando». Prezo: 4 spesdekoj.

Belaj vidaĵoj, priskribo de la lando, moroj, historio, karaktero, k. t. p., ĉio en malbela Esperanto kaj multaj eraroj. — SALJO.

PRO IŜTAR, romano el la antikva Babela historio, originale verkita de H. A. Luyken. Kartone bindita volumo, klare kaj korekte presita, kun XXIII ĉapitroj kaj 304 paĝoj, 13 × 19 cm. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. Prezo: 4 germanaj markoj.

Tiu - ĉi romano elspiras delikatan senton religian. «Iŝtar» estas la nomo de diino adorata de idolanoj en la Babela imperio. La temo de la romano estas bataloj inter la fanatika Babela pastraro kaj la sekvantoj de malnova vera kulto al Jehova. Lemuel, la vera heroo de la romano, malkovras ĉiujn intrigojn kaj krimojn de la idolanaj pastroj, kaj penas defendi kontraŭ ili sian amikon Omar, kiu estas fidela al la religio de Jehova sed sentas amon por altranga kaj riĉa virino, Zalmuna, sekreta pastrino sin dediĉinta al Iŝtar. Pro Iŝtar, pro la deziro ke ĉiuj adoru ŝin, okazas multnombraj intrigoj en Betrah kaj en la urbego Babel, kiujn sukcesas venki la veraj kredantoj. Multaj interesaj scenoj okazas en la kortego, partoprenataj de la ĝereĝoj, de la ĉefpastroj, de la tuta popolo. En tiu - ĉi romano, kiun tre agrable oni legas, estas kelkaj figuroj tre bone desegnitaj, kaj ĝenerale ĝia argumento estas tre lerte disvolvita.

Tuj oni rimarkas ke la aŭtoro posedas profundajn historiajn konojn pri la koncerna epoko, ĉar en lia verko troviĝas amaso da tre interesaj detaloj arkeologiaj, lingvaj, pri popolmoroj, kortegaj kutimoj, k. t. p. Kelkaj priskriboj de palacoj kaj temploj meritas, per si solaj, la legadon de tiu dokumentite verkita romano. Ifoje ĝiaj paĝoj havas tiun «epokan guston», kiu havas «Quo vadis?» aŭ «La Faraono».

Ne la malplej interesa parto de «Pro Iŝtar» estas ĝiaj konsideroj filozofiaj aŭ religiaj. La verkinto sukcesas sentigi simpatian al la figuroj defendantaj la simplan malnovan kulton, super la degenerinta kredo je idoloj. La tendenco estas en tiu romano, en kiu oni plendas la religian nefervoron de tiuj, por kiuj estas indiferente ĉu regas Jehova aŭ Baal. Tamen, unu el la romanpersonoj diras, ke tio opiniata de unuj herezo aŭ idolaĵo povas havi por aliaj veran kaj noblan emocion religian. El tiu eklektika vidpunkto

to, ni respektu ĉies religian senton kaj ne volu perforte trudi la nian. La tendenco, aŭ, pli bone la *gusto* de la romano «Pro Iŝtar», ne devas kaŭzi ke iu indiferentulo ne volu legi ĝin. Kiel dirite, ĝi estas multflanke atentinda.

Nun alvenis la *kritika* parto de tiu-ĉi recenzo. La stilo de «Pro Iŝtar» ĝenerale ja estas fundamenta, bona, sed en kelkaj okazoj ne tute interna-cia. Mi sentas en ĝi kelkajn naciismojn kiujn mi ne malŝatus en traduko (ĉar parto de la intereso de traduko estas la reflektiĝo de la spirito de la tradukita lingvo), sed kiujn mi tute kondamnas en romano *originale ver-kita*.

Mi trovas, se ne nekorekta, almenaŭ neeleganta, la uzadon de kelkaj prepozicioj. Ofte la aŭtoro uzas *per* kaj *en*, kie pli bone aspektus *de* kaj *dum*. Anstataŭ «via kuraĝo plenigas min *per* admiro» (p. 108), mi uzus *de*. Mi rezervus *per* por la okazoj similaj al tiu-ĉi: «ili plenigis la matracojn *per* lano». Kelkfoje S-ro Luyken uzas esprimojn, kiel ekzemple: *en la nokto*, kie pli taŭgus *dum*. Anstataŭ «vi superas *per* lerteco ĉiujn komercistojn» (p. 27), mi uzus *en*, aŭ *pri* aŭ eĉ *je*. Ni profitu la okazon por konstati ke la uzado de la prepozicioj estas la plej ŝanceliĝanta afero en Esperanto. Lerni la lingvon estas ja relative facile, sed lerni *literaturan stilon interna-cian* estas malfacilege.

Pli ol «frue en la tago» kaj «frue en la mateno», mi preferus «frumate-ne»; pli ol «en la daŭro de kelke da minutoj» (multfoje uzata), mi ŝatus «dum kelkaj minutoj». — En la frazo «aro da belaj brilantoj en formo de rikoltilo aŭ kvaronluno» (p. 9), estus pli bona la vorto «falĉilo» ĉar nur «falĉilo» havas difinitan formon. — Neŝatinda estas la esprimo «malmemoras» (p. 12). — Anstataŭ «kiuj pli ol sufiĉos por viaj persekutantoj» (p. 112), mi preferus «kiuj estos pli ol sufiĉaj» aŭ «kiuj pli ol necese sufiĉos». — Oftege estas uzata la formo «elveni»: en kelkaj okazoj mi ŝatas la nuancon, sed alportas nenian utilon uzi preskaŭ sisteme «elveni» anstataŭ «aperi». Ĉu eble baldaŭ oni diros «malelveni» en la senco «malaperi»? — En «fari arangojn por dumnokta loĝo» (p. 118), tiu «loĝo» ĝenas la orelojn kaj rompas ĉian tradicion kaj klasikecon. Ĉu en literaturaj verkoj sufiĉas nura gramatika korekteco kaj estas superflue sekvi la leĝojn de ia mistera harmonio? Ĉiam mi aŭdis pri «loĝado»; nur en tiu-ĉi okazo mi vidis «loĝo». — La vorto «noble» ankaŭ tute malplaĉas. Kial nuntempe kelkaj samideanoj deklaris akran militon kontraŭ helkaj snifiksoj? — En «Uzibitum sekrete volas enkonduki en nian regnon, kion li nomas pli liberalan reĝimon» (p. 189), devas esti «liberala reĝimo». — En la sekvanta frazo, aŭ la sintakso ne estas ĝusta, aŭ estas du nekorektaj akuzativoj: «En ŝi mi vidis animbelecon eĉ pli maloftan kaj pli brilan ol eksteran belecon» (p. 193). — Anstataŭ «kelke da minutoj poste Omar veturis» (p. 197), devus esti «kelkajn minutojn poste» aŭ «je kelke da minutoj poste». Mi ne vidas la kialon de obstina uzado de «kelke da» anstataŭ «kelkaj». —

Aliajn malgrandajn malbelaĵojn mi trovis ankoraŭ, esplorinte kun granda atento; sed ili ĉiuj konsistigas nur makuleton en la hela verko re-

cenzita. Mi montris nur la malbonan flankon : en la lingvaĵo de S-ro Luyken estas multaj perfektaj esprimoj, delikataj nuancoj, satindaj parolturnoj kaj eĉ kelkaj fajreroj de originaleco.

La antaŭaj kritikoj, eble iom tro severe faritaj, havas kiel solan celon kontribui al la ĝeneraligo de bona internacia stilo, pri kiu ja ni ĉiuj bezonas pli-malpli perfektigi. Malgraŭ ĉio, la romano «Pro Iŝtar» estas ankaŭ el lingva vidpunkto plene rekomendinda, kaj ĝia aŭtoro, la eminenta kaj laborema samideano S-ro H. A. Luyken, kiu verkis jam kvar romanojn, meritas dankon kaj gratulon de la esperantistaro pro la laŭdinda kaj malfacila tasko verki longajn originalaĵojn.

J. G. C.



Fajreroj

Letero de Ed. Jung. — Amiko nia ricevis ĝin: — Strasburge, la 31. 12. 24. — Karega amiko! — Ĉu vi konas la nordan vintron? — La vetero estas malagrabla, jen suna kaj bela, sed malvarmega, jen varma aŭ almenaŭ varmeta, sed nuba kaj pluva, ankaŭ ofte malvarma kaj malseka samtempe. — La noktoj estas senfinaj, la tagoj mallongegaj. Je la tria kaj duono posttagmeze estas necese eklumigi la lampojn, ofte eĉ pli frue. Tiuj lampoj, kvankam bonaj, lumante dum sepo aŭ oko da horoj, lacigas la okulojn. — La homoj jen laboradas, jen amuziĝas, sed ĉiam pli-malpli malvarmumas. Ĉie tuso, nazkataro, raŭkeco, bronkito, kaj ceteraj - nordaĵoj. — Promenigi la nenjon, la patrino, ofte ankaŭ kuracistoj, malpermesas al la avo. Ili estas pravaj, sed kion faros la maljunulo, ne promenante kun la genepoj? — Li sopiras al lando de suno kaj floroj, al la bela Katalunujo; li sopiras al plantaro meze de l' vintro verdanta baj floranta, al la Blua Maro, al sennuba ĉielo, al riĉegeco je saniga varmo kaj lumo gajiga. — Li sopiras al suno bonfarto, ĝojo. — Kaj reve li forrapidas tra la Frankujo al la suda marbordo, trans la Pirinean montaron al la fama urbo de la Kvina Tutmonda Kongreso. — Katalunaj gesamideanoj! neniam li vidis vin, sed vi ne estos nekonatuloj por li. Li ricevas leterojn el Barcelona, kiuj komencas per la dolĉaj vortoj: karega amiko. Li legis poemojn kaj rakontojn de viaj poetoj: viaj kantoj estas de li aŭditaj, viaj kantoj kaj viaj sopiroj. — Kaj mallaŭte li kantas kun vi kaj kune sopiras, sopiras al ĝojo kaj feliĉo, al la triumfo de pako kaj amo, de ĉiu nobla sento. — Kaj je la lasta noktmezo de la mal-

nova jaro li salutas vin: ĝoju! ĝojegu! Kio estas kaj vera bona kaj nobla ne povas malvenki. Alproksimigos nin ĉiujn la venonta jaro al la glora fincelo. — Koregan bondeziron! koregan manpremon! El la suna lando li reiras en la vintran hejmon, kontraŭ nebulon kaj froston kaj malpacon hardite per samcelana varmo kaj lumo kaj amo. — Via sindona. — E. JUNG.

Esperanto-movado. — Palma de Mallorca. Ĉe la ĉi-tiea loka grupo «Esperantista Klubo Palma» de la oktobra monato S-ro Narciso Bofill klarigas ĉiusemajne tri klasojn pri Esperanto al novaj kaj malnovaj gesamideanoj, membroj de la nomita societo, kies nombro da geanoj pligrandiĝis pro la okazigo en tiu ĉi urbo de la proksima kongreso de K. E. F.

Por premioj la multnombrajn gelernantojn oni aljuĝos al ili, per ekzamenoj, valorajn objektojn arĝentajn, dum la venonta printempo. La nomitaj premioj estas donacitaj de fervora kaj entuziasma samideano el Palma, malnova kaj kuraĝa pioniro de nia movado.

La loka Organiza Komitato de la XII Kongreso de K. E. F. konsistas el S-roj Narciso Bofill, prezidanto, Bartolomé Font, Mariano Jaquotot kaj Juan Soler, kiuj samideanoj estas kore kaj varme gratulitaj, por ilia tasko organizi nian Kongreson, de la Grupo «Esperantista Klubo Palma» kaj de multaj samlingvanoj loĝantaj en insulo Mallorca. La nomita Organiza Komitato ankaŭ ricevis multe da aliĝoj kaj atingis gravan liston de premioj por niaj XI Floraj Ludoj.

Laŭ sciigoj kaj priinformoj, niaj okazontaj Kongreso kaj Floraj Ludoj estos grandiozaj kaj solenegaj.

Lingva komitatano propagandas kontraŭ nia movado. — S-ro Mangada, la internacie konata ploremlulo, predikanto de Homaranismo (sic), havas trabon en la okulo. La trabo estas la sukceso de nia gazeto, Federacio, movado kaj la entuziasmo, kiun niaj Balearaj samideanoj dediĉas al la proksima Kongreso. Por malsukcesigi la Kongreson kaj veki publikan antaŭjuĝon kontraŭ ĝi, li publikigis en kongresurba ĵurnalo artikolon dirante sensencaĵojn kontraŭ la katalunaj esperantistoj kaj invitante la palmanojn rigardi la tutan aferon kun singardemo. Feliĉe nia Kongreso havas energian defendanton, kiu trafe senmaskigis kaj ridindigis la polemikemulon.

Sed ni ne komprenas kial S-ro Mangada ne akceptis la leteron de la prezidanto de K. E. F. aperintan en nia lasta numero, kaj preferis daŭrigi la mallojalan agadon anstataŭ diskuti senpere kun ni forlasante la subfosadon por impliki nin en politikan aferon.

Estas tre bedaŭrinde ke lia malamo al katalunlingvanoj donas frukton kontraŭ Esperanto. Ŝajnas al ni ke membro de la Lingva Komitato devas kompreni la principojn de Esperanto por ne fari per ĝi defendadon de siaj privataj opinioj, kiuj estas kontraŭ la fundamento de Esperantismo.

Katalun-Esperantismo. — Ĝis nun ni ofte legis kaj aŭdis, ke estas en ĉiuj landoj katalunaj artistoj, komercistoj, laboristoj, politikistoj, k. a.-Ni

fiere diru nun estas katalunaj esperantistoj, kiuj bruligas esperantan fajron en tiuj landoj, kiuj marŝas en la malantaŭo de nia movado. Efektive: Kiam nia prezidanto, antaŭ naŭ jaroj, semadis en Bahia Blanca, katalunoj ankaŭ estis jetintaj la unuajn semojn en Buenos Aires, kaj en Rosario de Santa Fe semadis nia samlandano Santiago Gomis. Kaj jen en la novjaraj tagoj de 1925 alvenas al ni du komunikaĵoj de katalunoj kiuj transmare, en latinamerikaj landoj semadas Esperanton senĉese: F-ino A. Vilaró kaj S-ro J. Rocafull en Buenos Aires, S-ro J. Gili Norta en Colombia, S-ro Santiago Gomis en Montevideo, S-ro B. Zannon en Havana. Nia plezuro estas des pli granda ĉar tiu ĉi fajrero fariĝos plene internacia kun la aldono ke ni ĝojis kunvivi en Katalunujo kun la meksika S-no Guerra el Tampico, la ĉeka samideanino A. Hrbáčková el Zlín, kaj S-inoj Zamora el la geografie malproksima orienta Manila, kiuj ĉiuj estis en nia lando dum la ĵus pasinta decembro.

Feliĉa homo. — Antaŭ kelkaj semajnoj en «Institución Ballbé» (Barcelona), S-ro Bernardo Obrador paroladis prilingvoj mortintaj kaj mortontaj, ne forgesante Esperanton. La oratoro inter aliaj eraraj konceptoj pri nia lingvo diris, ke ie li legis pri trupo de aktoroj, kiuj volas entrepreni vojaĝon tra la tuta mondo prezentante per Esperanto la ĉefverkojn el diversaj nacioj. Ni bedaŭras, ke oni ne sendas al ni ĉiujn esperantajn gazetojn kaj ke pro tio ni ne povis sciiĝi pri tiel grava afero ĝustatempe. Sed kio estas eksterordinare epokfaranta estas tio, ke tiu S-ro, responde al la atakoj de diversaj esperantistoj, kiuj forblovis lian kastelon, diris, ke dum la V Kongreso en Barcelona la diversaj naciaj delegitoj devis alpreni francan lingvon ĉar per Esperanto ne estis eble interkompreniĝi. Feliĉa homo, ke li eltrovis la netaŭgecon de Esperanto post 37-jara elprovado.

Reformemuloj Schneeberger, idestro kaj Antido, esperantidestro, interŝanĝis leterojn. La unua bedaŭras, ke la dua ne transiris rekte al ido kaj Antido klarigas, ke se li forlasus la entreprenon, li *rukvenus* ne al ido sed al Esperanto. Ni konsilas al ambaŭ reformistoj *rukveni* definitive al Esperanto kaj ke ili forlasu la *rukon*. Ni estas lacaj je tiom da *rukoj* dupiedaj. Ĉu vi komprenas nin, katalunlingvanoj? Jes, do sufiĉe.

Ĉu flavaj, ruĝaj aŭ senkoloraj? — Iu sin turnis al ni plendante, ke nia Federacio estas neŭtrala kaj ke pro tio li ne povas subteni nin. Alia proteste kriadis, ke niaj Kongresoj pro la diservo kaj ĉeesto de pastroj estas pli taŭgaj por katolikoj, kaj tria, pro artikolo aperinta en unu el niaj lastaj numeroj, argumentis, ke ni fariĝis kontraŭkapitalistoj. Ĉu efektive el ni radias tiom da diverskoloraj nuancoj?

Radiodiletantoj. — La stacioj Hamburg, Leipzig, München, Breslau kaj aliaj disaŭdigas lecionojn pri Esperanto kun sukceso eksterordinara. Ĉu ni ne sukcesus enkonduki tian disaŭdigon en Radio-Barcelona? Helpu, helpu kaj helpu.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Palma de Mallorca. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por aljuĝo de atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingo de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramàtica» (curs mit-jà) de Pompeu Fabra. kaj de la «Ekzercaro» de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de *kapablo* estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de *profesoreco* estas ankaŭ necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bonaj helpaj libroj estas la «Gramàtica Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallés, la vortaro Kabe kaj la «Oficiala Klasika Libro de Esperanto, kolekto de la Akademio, eldonita de Esp. Centra Librejo, 51, Rue Clichy, Paris (9.e).

Propagandaj Markoj de nia proksima Kongreso. — Diverskoloraj estas eldonitaj. Aĉetindaj kaj acetebaj kontraŭ sendo de ptoj. 1'50 aŭ egalvaloro, por 100 markoj, al nia adreso de K. E. F., Carrer Carme, 30-Barcelona.

Imitinda Ekzemplo. — Nia kara samideano Barcelò, el Palma de Mallorca, kiu, bedaŭrinde troviĝas nun en Maroko, mendis ĉiujn necesajn librojn por sia pretigado partopreni la ekzamenojn pri profesoreco dum nia proksima Kongreso en la baleara ĉefurbo.

Nova kurso de Esperanto. — En la Grupo «Barcelona Stelo», kiu ĝojige revigligas, komenciĝis kurso gvidata de nia lerta samideano Eduard Capdevila.

Aliĝoj al la Iberia Konfederacio. — Ĉiuj membroj de K. E. F. kaj abonantoj de K. E., kiuj deziras aniĝi de la Iberia Konfederacio estas petataj fari la pagon al la prezidanto de K. E. F., kiu bonvole transsendos kaj efektigos la aliĝojn. La kotizo al la Iberia Konfederacio kostas 0'35 ptoj. ĉiunmonate t. e., ptoj. 4'20 ĉiujare.

Iberia Kongreso. — Kelkajn tagojn antaŭ nia proksima Kongreso en Palma de Mallorca okazos en Kordovo la nunjara Kongreso de la Iberia Konfederacio. Plezure ni sciigos detalojn en venontaj numerj de nia gazeto.

Averto al nepagintoj. — Dank' al monhelpo de samideanoj Bofill, Bremon, Amades, Gili, Codorniu, Pellicer, Alberich, Solà, Domènec, Serrat, Sales, Dalmau kaj aliaj, nia K. E. F. finis la pasintan jaron sendeficite. La nova organizo de K. E. F. eble permesos, krom aperigo de nia gazeto regule, la eldonon de necesaj verkoj por propagando kaj lernigo de Esperanto. — La nepagintoj bonvolu tuj kvitiĝi kun K. E. F., kaj notu ke ili estos eksigitaj kiel abonantoj kaj federacianoj se antaŭ la 15^a de Februaro ili

ne sendos ŝulditan monon por la nuna jaro kaj antaŭa. Por nefederacianoj la aliĝo al la Palma Kongreso kostos ptoj. 5.

La pagoj por K. E. F. — Por-faciligado de la pagontaj ni pretigis akceptejon de pagoj de jarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ unu dolaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendantaj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Novaj Komitatoj: — Elektita ĉe «Barcelona Stelo»: Prezidanto: S-ro Jaume Grau Casas; Vicprezidanto: S-ro Antoni Durà; Sekretario: S-ro Eduard Capdevila; Vicsekretario: S-ro Jaume Pruna; Kasisto: S-ro Manuel Monró; Kalkulisto: S-ro Manuel Palomeras; Bibliotekisto: S-ro Amadeu Gongga; Voĉdonantoj: S-ro Joan Gili Norta, S-ro Jesús Lorenzo, S-ro Andrés López, S-ro Acraci Blanc. Elektita ĉe «Paco kaj Amo»: Prezidanto: S-ro Josep Roig; Vicprezidanto: S-ro Pere Torres; Sekretario: S-ro César Gallejo; Vicsekretario: S-ro Lluís Domènech; Kasisto: Bohigas Ferrán; Kalkulisto: S-ro Tomàs Alberich; Voĉdonantoj: S-ro Joan Fuster, S-ro Miquel Garró, S-ro Ramon Roig, S-ro Josep Alberich kaj S-ro J. Font.

La Enciclopedia Espasa, kiu enhavas esperantan tradukon de ĉiu vorto, apud franca, angla, itala, germana kaj kataluna tradukoj. Ĝi estas verkego el kiu jam aperis kvardek dumilpaĝaj volumoj kaj estas ankoraŭ aperontaj dek kvin-dudek plu. La ĝis nun aperintaj kostas ĉirkaŭ mil sescent pesetoj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, i «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. estas pli ol duobla, kaj ĝia prezo po ekzemplero estas unu peseto.

Pri nia proksima Kongreso en Palma. — Responde al insista peto de ĉiuj gesamideanoj, kaj por gvido de ilia pretigo, ni diru ke la prezo de ŝipveturo inter Barcelona kaj Palma, iro kaj reveno, estas: en tria klaso, pesetoj 33' —; en dua klaso, 65' — ptoj.; kaj en unua klaso 105' — ptoj. La veturo ordinare okazas kaj daŭras de la 8^a vespere, enŝipiĝo, ĝis la sepa matene. La vaporsipoj estas tre bonaj. — La loĝado kaj manĝado en Palma kostas 30-30,00 malpli ol en Barcelona.

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la milita cenzuro.

Els Metges i l'Esperanto

El Sr. George E. Vincent, President de la «Rockefeller Foundation», diu en el «Belfast Evening Telegraph» que la Ciència és el gran llenguatge internacional — el veritable Esperanto. Els seus resultats vénen a dir el mateix a París i Peking que a Hong-Kong. No hi tenim res a objectar. Però no n'hi ha prou que els resultats més o menys indiquin el mateix. És imprescindible que el metge de París sigui capaç de comunicar els seus descobriments al metge de Peking en una llengua que aquest darrer pugui comprendre. Els fets científics han de vulgaritzar-se amb una sola traducció per a tot el món. El llatí, qui antigament acomplia aquest servei, no és ja recomanable. Adhuc posseeix més d'una sola forma avui dia. Nosaltres ens permetem d'aconsellar al Sr. Vincent que aprengui tot seguit l'Esperanto i s'adhereixi a la «Societat de Metges Esperantistes». Aquesta important organització es reuneix fa unes setmanes a Viena, on totes les qüestions es resolgueren enterament mitjançant l'Esperanto. Es llegiren conferències pel Dr. Austerlitz (Txecoslovàquia) sobre ço que manca en l'educació mèdica; el Dr. Blassberg (Polònia) sobre insulinoteràpia; el Dr. Primmer (Anglaterra), sobre sueroteràpia; i el Dr. Sos (Àustria) sobre pyorrhoea. L'òrgan oficial de la dita Societat conté sempre les últimes notícies de descobriments, etc., extretes de totes les fonts del món i presentades en forma abreujada.

(Nota extreta i traduïda de la revista anglesa «International Language»).

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16 PAĜA GAZETO

OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj Verkaĵoj de Plej bonaj aŭtoroj ĉieaj

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono 6 svisaj frankoj aŭ egalvaloro efektivigebla en Barcelona

Adr.: Carrer Carme, 30. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoton rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston.

ESTATUTS DE LA K. E. F.

ARTICLES REFORMATS

ARTICLE TERCER. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu d'abonament a la revista serà de 6 ptes. l'any.

ARTICLE QUART. — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de la entitat a la qual pertanyen i els altres amb caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota mensual de 0'10 ptes. per cada un dels socis que els integrin i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. l'any pagada per endavant.

ARTICLE CINQUÉ. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any. compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

ARTICLE NOVÉ. — Tots els esperantistes pertanyents a organismes federats, igual que els membres isolats, tindran veu i vot en les assemblees anyals, però llur vot serà delegable a un altre federat lliurant-li, el membrokarto de presentació necessària per a votar en nom propi i d'altres federats.

ARTICLE DOTZÉ. — Aquesta federació podrà actuar mentre compati amb dues col·lectivitats organitzades o bé trenta membres isolats. En cas de dissolució l'actiu serà lliurat a la caixa de la Konstanta Re-presentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

L'Element Artificial en el Llenguatge

Avui constatem en la llengua parlada tota mena de mots i girs introduïts un dia *artificialment* en la llengua escrita, els quals han penetrat talment en aquella que ningú no diria que trenta anys endarrera hi eren completament desconeguts. Sabem, doncs, per una llarga experiència, que el llenguatge parlat està lluny d'ésser impermeable als progressos de la llengua literària...

POMPEU FABRA

Ja sabem els arguments que s'alcen contra l'ús d'una llengua artificial. Però creiem que si es redueix el paper d'aquesta a una missió auxiliar, d'inter-comunicació entre la gent que d'altra manera no s'entendria, els desavantatges de l'artificialitat lingüística queden molt minvats. D'altra banda, és que en les llengües mateixes d'avui, sobre tot quan les usa la gent culta, no hi ha una gran part d'artificialitat? Una gran part de les veus tècniques i científiques són mots artificials. I aquells que no concedeixen a l'esperanto una gran vàlua estètica, ni una sonoritat gaire simpàtica, hauran de reconèixer que en aquest aspecte resulten molt pitjors, per exemple, les monografies de medicina.

No n'hi ha prou, dintre la pròpia terra, amb l'idioma matern? Cal un altre llenguatge per fer-se entendre? Si és així, no ens aturem en solucions intermèdies. Anem cap a la solució total. Per aquest camí es va lògicament cap a l'esperantisme. I nosaltres, que, com el nostre company Nicolau d'Olwer, som devotíssims de la lògica, ens declarem des d'ara esperantistes militants.

ANTONI ROVIRA I VIRGILI

Fajreroj

Propagandaj Markoj de nia proksima Kongreso. — Diverskoloraj estas eldonitaj. Aĉetindaj kaj aĉeteblaj kontraŭ sendo de ptoj. 1'50 aŭ egalvaloro, por 100 markoj, al nia adreso de K. E. F., Carrer Carme, 30-Barcelona.

La pagoj por K. E. F. — Por faciligo ni pretigis akceptejon de pagoj de jarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ egalvaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendataj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, kaj, «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. kostas 50 pesetajn centimojn.

Pri nia proksima Kongreso en Palma. — Responde al insista peto de multaj gesamideanoj, kaj por gvido de ilia pretigo, ni diru ke la prezo de ŝipveturo inter Barcelona kaj Palma, *iro kaj reveno*, estas: en tria klaso, pesetoj 33'—; en dua klaso, 65'— ptoj; kaj en unua klaso 105'— ptoj. La veturo ordinare okazas kaj daŭras de la 8^a vespere, enŝipigo, ĝis la sepa matene. La vaporsipoj estas tre bonaj. — La loĝado kaj manĝado en Palma kostas 20-30 % malpli ol en Barcelona.





KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Al Palma en Majo!

La radiotelefonio per si mem estas sukceso por nia idealo, ĉar Esperantismo celas la interkompreniĝon kaj la interrilatiĝon inter ĉiuj popoloj, kaj la malfacilo pro spaco ankaŭ estas baro kontraŭ la internacia komunikado. Ni do ĝoju ke la fizikistoj venkas la spacajn dum la esperantistoj disputas la lingvajn barojn inter la homoj.

Alproksimiĝas la XII^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, kaj la XI^aj. Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj nunjare okazos en la ĉarma insulo Mallorca, en Majo la tagojn 21 - 24.

Por solenigo de nia Kongreso kuniĝis en la nuna jaro la granda intereso, la universala famo por turismo al la plej bela mediteranea insulo, kaj la gravo de la premiaro por la Floraj Ludoj konkursataj de la tutmonda esperantista verkistaro.

Kleraj samideanoj el diversaj landoj jam sciigis sian intencon veturi al Palma. Dekoj da verkaĵoj por la Floraj Ludoj jam alvenis. La entuziasmo de la balearaj samideanoj pli kaj pli varmigas. La Kataluna gesamideanaro pretiĝas veturi al Palma amase. El ĉiuj iberiaj regionoj venas demandoj pri la Kongreso. Al ĉiuj demandintoj ni ĝoje respondas kun peto ke ĉiuj veturu al Palma kie heroo batalanto kaj fidela samideanaro atendas transmarajn kamaradojn el ĉiuj landoj, nacioj, regionoj, urboj, vilaĝoj, rasoj kaj koloroj, kaj honestaj idealkampoj, akordaj kun la principoj de nia sankta afero.

Ni ankoraŭ devas prezentiĝi amase ĉien, por montri al ĉiuj ke Esperanto postvivis la krizegon, pli ĝuste, eble, la krimegon, de la granda milito. Ni montru ke nia idealo de komuna lingvo plej firme daŭras en nia cerbo, en nia koro, en nia lango kaj en niaj oreloj. Plej ofte ni aŭdigu kaj vidigu ke hieraŭa utopio fariĝis brila fakto, ĝojiga realo, logika afero dank' al genio Zamenhof.

(El parolado en Esperanto, de la Prezidanto de K. E. F., disaŭdigita de la Barcelona Stacio, la 8^{an} de Marto).

EMINENTAJ AMIKOJ DE ESPERANTO

La kataluna verkisto Eugeni d'Ors (Xenius) kaj lia verko "Glosaro"

(Prelego farita ĉe la Barcelona grupo "Paco kaj Amo")

Eugeni d'Ors hele brilas inter ĉiuj modernaj katalunaj verkistoj kaj lia personeco havas la plej grandan reliefon. Lia plej konata verko estas la «Glosaro», tiu riĉega aro da ĉiutagaj «Glosoj» pri aktualaj literaturaj, filozofiaj, artaj, sciencaj, politikaj, k. c., kiun li aperigis sur kataluna ĵurnalo kun la pseŭdonimo «Xenius».

Sed, krom fama verkisto, li ankaŭ estas eminenta filozofo, pedagogo, kvazaŭ majstro de skolo kiu kalkulis inter siaj adeptoj la plej valorajn katalunajn intelektulojn. Dum multaj jaroj li montris sian aktivecon okupante la Direkcion de Popola Instruado de la «Mankomuneco de Katalunujo», partoprenante la taskojn de la «Filozofia Seminario» en Barcelono, gvidante la starigon de la «Popolaj Bibliotekoj», inspirante la katalunan revuon pri pedagogio «Quaderns d'Estudi». Li estas ankaŭ talenta paroladisto kaj tre lerta arta kritikisto.

Limigante tiun-ĉi malgrandan studon je la analizo de lia verkista karaktero, ni prefere konsideros la ecojn de liaj «Glosoj». Ilia valoro iĝas aparte mirinda, se oni atentigas ke ili aperis preskaŭ seninterrompe ĉiutage dum longa tempo, kaj sekve ili eble estis foje verkataj kun tiu neevitebla urĝeco de la laboroj destinitaj aperi sur ĵurnalo. Tiuj glosoj pritraktis la plej diversajn temojn: interesajn anekdotojn el ĉiuj landoj, artajn ekspoziciojn, librojn ĵus aperintajn, novajn ideologiojn, politikajn movadojn, gazetajn artikolojn, teatraĵojn, koncertojn, naciajn okazaĵojn, unuvorte, ĉion pli-malpli aktualan en ĉiuj kampoj. Ankaŭ, de tempo al tempo, la «Glosoj» ne estis komentario al io efektive aktuala, sed ĉiam ili estis bela disvolvo de iu ajn interesa penso de l' aŭtoro.

Sed pri la karaktero de tiaj glosoj plej bone ilustras la jena fragmento de unu el ili, kie la aŭtoro, parolante pri «La amo al la metio», entuziasme parolas pri sia, kaj kvazaŭ sin defendas kontraŭ iu el la kaŝitaj riproĉoj kiujn oni faris al li. Sin turnante konsile al sia fileto, li diras:

«Nu, mi diras al vi, filo, ke la amiko laboranta kiel karikaturisto ne estas morala homo, ĉar li ne estigas spiriton en sia laboro. Ankaŭ ne estas sufiĉe deca la konduto de tiu alia sinjoro, la okulvitrolo, kiu scias rakonti al vi tiel belajn rakontojn kaj kiu venas tetrinki kelkajn dimanĉojn posttagmeze. Tiu-ĉi verkas por ĵurnalo, estas ĵurnalisto. Kaj li ankaŭ parolas pri sia metio kvazaŭ li estus en galeroj: «Neeble estas fari literaturon!.. Ha, la literaturo!.. Mi, kompatindulo, devis forlasi la literaturon!». Jes, kompatinda, sed ne pro tio kion li supozas. Kompatinda,

ĉar li ne scias kunigi sian amon al la literaturo kun la laboro de li farata. Li plendas pro tio ke li devas redakti tiujn mallongajn notojn pri la banalaj okazaĵoj, nomatajn «raportetoj». Sed kiu malhelpas lin redakti bele la raportetojn? Beleco ne signifas ornamon, sed harmonion kaj delikatan adaptiĝon de la afero al sia uzo. Raporteto povas esti tre bela, same kiel lada laboraĵo, gazeta banderolo kaj forkolekto de balaaĵoj, se oni plenumis tion kun zorgo kaj ĝojo pri la rezultato. Se tiu-ĉi amiko redaktus la raportetojn kun ĝojo kaj zorgo pri perfektigo, li aliĝus sian laboron iom post iom kaj li ĝin igus tre alta... Via patro, filo, fieriĝas esti farinta tiel pri humila laboreto al li konfidita. Por komenci labori en verkado sur la ĵurnaloj, estis konfidata al li fako, kiu ĝis tiam estis konsiderita tute negrava. Ĝi celis nur amuzi la leganton de la ĵurnalo, distrante lin el la seriozaj aferoj, per la priskribo — sub la rubriko «Amuza fako», «De tie-ĉi kaj tie», «Scivolemo» aŭ aliaj samspecaj — de la groteskaj strangaj aktualaj, de la faro de stultulo kiu marŝis per la manoj, de la komikaj eksedziĝoj aŭ la sensencaj vetludoj en Usono. Via patro akceptis tiun modestan taskon kun ĝojo. Li klopodis baldaŭ alporti al la metio spiriton kaj amon. Li ne opiniis ĝin sennobla, sed plialtigebla, se nur volo kaj pacienco kuncelus al tio. Li ne hontis pri ĝi, sed male per ĝi li aspiris laŭdigi sin... Spirito kaj amo plenumis baldaŭ la deziratan miraklon. Sekrete, per neperceptebla ŝanĝo, la speco de l' laboro aliĝis. Hodiaŭ ĝi jam estas nereconebla, kiel la sama. Kiuj ne memoras ĝian senbrilan originon, tiuj opinias ĝin nova fako. Hodiaŭ, fileto, la laboro de via patro ĉe la ĵurnaloj estas opiniata de unuj bona, de aliaj malbona, sed de ĉiuj kiel verko de Filozofio, kiu estas la plej alta kaj malfacila el la intelektaj aktivecoj... Sed mi diras al vi ke ĉia metio iĝas Filozofio, iĝas Arto, Poezio, Elpenso, kiam la laboristo al ĝi donas sian vivon, ne permesante ke tiu-ĉi dispartiĝu en du duonojn, unu por la idealo, alia por la ĉiutagaj bezonoj, sed farante el la ĉiutaga bezono kaj el la idealo unu saman aferon, afero kiu samtempe estu devo kaj libero, rutino rigora kaj inspiro renovigata».

La riproĉoj, kiujn oni faris al Eugeni d'Ors, pretendas ke li skribas iom konfuze kaj afekte, *en majstro*, pri temoj ofte tro komplikitaj. Se vere ekzistas ia malklareco en la verko de «Xenius», malklareco ĉiuokaze tre relativa, tio dependas ne de *verkista* mallerteco, sed de tri aferoj: a) rimarkinda aŭtora originaleco; b) konstanta *lingva* pureco; c) eksterordinara kaj nevulgara *tema* alteco, precipe por tiu kiu specife estas leganto de ĵurnalo.

La originaleco de la stilo de Eugeni d'Ors estas tiel granda, ke estas sufiĉe legi nur kvar aŭ kvin liajn pecojn por konstati ĝin. Tiu originaleco reflektas grandegan kaj maloftan kulturon, ĝustan konon pri plej kontraŭaj sciencoj kaj artoj, *universalecon* de spirito observema, delikata, subtila. En lia stilo oni trovas specialan ĉarmon, oni vidas trajtojn nekomunajn, oni rimarkas *formojn* ne antaŭe viditajn, tamen unuavide tute klarajn, se nur oni zorge atentis la *diron* de la aŭtoro, la kurbojn de lia penso,

La afektita lingvaĵo, kiun kelkaj trovis ĉe la «Glosoj», fakte ne obeas al la deziro de la verkinto esprimi sin *science* aŭ tro *solene*: ĝi nur estas logika sekvo de la penso kaj inteligento de Eugeni d'Ors, kiu, posedante profundajn lingvistikajn konojn, ne timis alpreni la unua la plej radikalajn procedojn por purigi la katalunan lingvon de fremdaj influoj kaj redoni al ĝi la genion kiun ĝi havis antaŭ la nacia dekadenco. La frutempa kaj kuraĝa uzado de novaj gramatikaj formoj kaj esprimoj, nun plene akceptitaj, kiun abunde [faris la «Glosanto», estis tio kio igis lin prezentata de kelkaj kiel *strangulo* amanta esprimojn malsimplajn, malglatajn.

La iufoje malfacila komprenebleco de la «Glosoj» devenas de tio, ke ili estis verkataj en la supozo ke la leganto konas en sufiĉa grado la temon priparolatan aŭ havas almenaŭ la kapablon eklevi sin al la necesa nivelo. Temoj pri filozofio aŭ psikologio ja ne povas aspekti tute travideblaj al la unua paro de okuloj. Sed, eĉ por nelertuloj, multaj «Glosoj» estas pli ol sufiĉe klaraj por veki intereson kaj ebligi instruigon.

Ĉiurilate estas admirinda la «Glosara» verko. Ĝi estas valora ne nur pro la boneco de la stilo, pro la profundeco de la pensoj, pro la intereso de la pritraktitaj demandoj, sed ankaŭ, kaj ĉefe, pro la spirito intima, propra, nekonfuzebla, kiu vivas en ĝi. Per malmultaj vortoj la aŭtoro montras plej trafe sian opinion, sian senton, sian pasion, ne vundante tamen tro profunde la kontraŭajn opiniojn, sentojn, pasiojn. Liaj laŭdoj estas fervoraj kaj liaj kritikoj severaj. Eĉ kiam eble oni ne konsentas al liaj asertoj, oni admiras la *manieron* laŭ kiu liaj konvinkoj montriĝas. Lia penso foje apartenas al iu difinita sistemo, spiras evidentan partiecon, sed ĝenerale liaj opinioj estas serenaj, objektivaj, de ĉiuj akcepteblaj.

Vidu kiel delikate li asertas la superecon de Eŭropo aŭ de la Eŭropa kulturo, per la jena mallonga «Gloso» kies vortoj estas plenaj de subtila senco.

DISTANCOJ

Al mia amiko A. B.

Ne estas, estimata amiko amerika, la sama distanco de Eŭropo al Ameriko kiel de Ameriko al Eŭropo. De Ameriko al Eŭropo estas kelkaj dolaroj. De Eŭropo al Ameriko estas manpleno da frankoj.

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi estas gravega, sendube. — De Ameriko al Eŭropo iradas kaprico. De Eŭropo al Ameriko iradas kapitalo. Tial de Ameriko al Eŭropo oni kutime venas kun la iluzio de la bona elspezo. De Eŭropo al Ameriko oni kutime iras kun la deziro de la bona profito.

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi pliigas ankoraŭ la diferencon. — De Eŭropo al Ameriko oni faras ĉiam vojaĝon «iran». De Ameriko al Eŭropo oni faras ĉiam ian vojaĝon «revenan».

Ankoraŭ pli — kaj tio-ĉi jam estas decidiga. — Vojaĝo en Amerikon havas ĉiam ion similan al *esplorado*. Vojaĝo en Eŭropon, ion similan al *pilgrimado*. Dum la unua, nia fantazio, estante sur maro, vidigas al ni en la

malproksimo iun arbaron. Dum la dua, nia fantazio vidigas al ni Romon kaj la kupolojn de Romo.

...Sed, estas same! Romo troviĝos ĉiam, amiko karega, tie kie estos homo kiel vi.

En alia glosa, li lerte parolas pri tio, ke ne nur la vortoj de diversaj lingvoj diferenciĝas, sed ankaŭ la maniero laŭ kiu oni uzas saman vorton en malsamaj lingvoj. Tiun fakton, ke unuavide similaj vortoj de du lingvoj ne ĉiam estas plene ekvivalentaj, ni esperantistoj bone konas.

Jen:

NOMOJ, DIFERENCOJ, NUANCOJ

En angla lingvo la vorto «emfazo», la verbo «emfazi» aŭ «emfazigi» taŭgas por aludi la fakton ke oni vokas la atenton sur unu vorton, sur unu ideon, en aro da vortoj aŭ ideoj. En franca lingvo la sama afero estas nomata «reliefigi» aŭ «meti la akcenton sur...». — Ni katalunoj diras pli mallonge «substreki». (En senco iom malsimila al la «substreki» franca, kiu havas nuancon tute alian).

Ni observu, do, kiamaniere la esprimilo alilokiĝas malsuprenirante de unu al alia lando, pasante de unu lingvo al alia. La esprimobildo estas *optika* ĉe ni; *palpa* aŭ *akustika* en la lando franca; kaj jam *senta* kaj preskaŭ *morala* ĉe la angloj. La esprimobildo evoluadas de tiuj pensantaj per la okuloj ĝis tiuj kiuj pensas per la koro... (Pensi per la koro, kio ĝuste ne signifas pensi «sindone», sed pensi per tiuj «rezonoj ne komprenataj de la racio»).

La moralo de tiu-ĉi malgranda studo pri vortoj, diferencoj kaj nuancoj, kuŝas en tio : humile konfesi kiom estas malfacile ke anglo plene komprenu nin, kaj kiom malfacile estas ke ni tute komprenu anglon.

Pasian laŭdon al la franca lingvo, kies *preteco* donas faritaj al la francaj verkantoj la plej riĉajn esprimojn, enhavas la glosa «Verki artikolojn». Ĝi esence estas fiera konstato pri la «klareco latina», kiun oni sentas ankaŭ en la spirito de nia kara Esperanta lingvo. Tiu-ĉi glosa ne estas flataĵo, sed sincera esprimo de la penso de ĝia aŭtoro.

VERKI ARTIKOLOJN

Franca artikolo de Revuo estas estetika produkto perfekta kaj definitiva, kiel estas tiaj greka templo aŭ plado de arĝentisto el Firenze. Mi hieraŭ pensis pri tio, legante kaj relegante ĉi-tiun artikolon de Maurice Blondel, jam dufoje aluditan en mia Glosaro. Pri tio mi povus esti pensinta antaŭ cent aliaj artikoloj aperintaj la saman tagon sur cent aliaj ĵurnaloj.

La mirindaĵo de bona franca artikolo estas ĉiam ĝia *senerara* konstruo; kaj, en la konstruo, la profunda senco de kontinueco kiu kaŭzas, ke ĉiu

parto inter du partoj, ĉiu paragrafo inter du paraĝrafoj, ŝajnas milde postulataj de la antaŭaj, kaj samtempe delikate influataj de la sekvontaj. Unika fluo de trankvila movo, samtempe majesta kaj viva, pasas de unu al alia paraĝrafo, de unu al alia parto, kaj kunligas ĉion en admirinda ekonomio. La intelekta spektaklo havas valoron unikan por tiu kiu scias rigardi. Oni sentas plezure ravitaj siajn sentkapablon kaj racion; el la racio, tiun parton kiu jam estas sentema; el la sentkapablo, tiujn elementojn kiuj jam estas raciemiaj.

Verkistoj germanaj aŭ anglaj neniam povos konkuri, en tiu-ĉi ĉapitro de literatura arto : neniam ili scios kun tia perfekteco konstrui artikolon. Unuj kaj aliaj kutimas kunigi tiujn partojn aŭ paraĝrafojn, pri kiuj ni parolis, per nura *akumulado*, kio estas la ago plej kontraŭa al la *kunmetado* kiu povas ekzisti. La angloj, pro senorda kontinueco. La germanoj pro samtempa disvolvado de pluraj elementoj aŭ *temoj*, kiuj kunpuŝiĝas, ofte tre malgracie.

Tiel, la artikoloj kiujn ni kutimas legi sur revuoj anglaj aŭ germanaj, vekas deziron refari ilin. Tiuj de la francaj revuoj, ne nur invitas ne tuŝi ilin, sed eĉ senkuraĝigas iomete verki mem artikolojn.

Alispeca laŭdo estas la sekvanta glosa, per kiu «Xenius» elegante komentariis la aktualajon de la tago: la aperon de unua volumo de nova katalunlingva «Biblioteko». Simila laŭdo al la *volo pri scio* estas oftege farita de Eugeni d'Ors. En tiu-ĉi glosa ankaŭ estas kuraĝigata la kreskanta pliedukigo de la kataluna laboristaro.

«DES GENS BIEN»

Masonisto laboradis ĉe la rekonstruaj laboroj de la supra parto de la Instituto. Je la sesa kutime li finis la laboron. Tiam li volis destini unu horon al legado en la publika legoĉambro de la Biblioteko. Sed li ne malsupreniris tien tuj post finiĝo de l' laboro. Kun ŝatinda ĝentileco, kun instinkto de admirinda aristokrateco, nia homo unue iradis hejmen, li lavis sin, ŝanĝis sian vestaĵon kaj reiris tiel al la dezirata legado, en pura vesto kaj dece.

Ni ĝoju la dignon kaj la elegantecon de tiu bona laboristo de Katalunujo. Kaj, egale kiel ni ĝojas la ecojn de tiu laboristo, pro tio ke li radiis puran vizaĝon, ni ĝoju ankaŭ tiujn de alia laboristo, amiko mia, pro tio ke li hieraŭ montris vizaĝon ne tiom puran. — Hieraŭ estis jaŭdo, kaj mia amiko laboristo estis forgesinta pasi ĉe la razisto. Sed li portis en la mano, kaj tute senpacience foliumadis, la malgrandan verkon pri «Oceanografio» el la kolekto «Minerva»... Kaj unu volumo el la kolekto «Minerva» kostas tridek kvin centimojn... Ĉu vi komprenas?

Pro la fakto ne esti pasinta ĉe la razisto la jaŭdon, neniu ploras la dimanĉon. Pro tio ke oni ne iras tien hodiaŭ, neniu plendos dum la horo de

l' morto. Male, povas esti bone ĉe la morthoro trovi sin iomete informita pri Oceanografio. — Sokrato, en mallibereco kaj atendante la cikuton, provadis flutan melodion. — Ho, Sokrato! — ekkriis disciplo lia; — por kio utilos nun lerni tiun flutan melodion? — Tio utilos al mi — respondis Sokrato — por ke mi havu ĝin lernita kiam mi mortos.

Kaj ni vidu alian, lastan specimenon de la ĉarma prozo de Eugeni d'Ors.

Ĝi estas tiu titolita

PRI ESPERANTO

La esperantistoj sin movis multe en Barcelono dum la lasta tempo Ili estas simpatia kaj utila aro, la esperantistoj: kiam ili moviĝas, laboras. Se pri ĉiuj oni povus diri tion, estus tre bone.

Mi devas konfesi, ke, kelkan tempon, Esperanto estis al mi malplaĉa. — Ne pro malsato, principe, al la ideo pri lingvo konvencia kaj universala. Ĝuste tiu-ĉi ideo kunligiĝas plene kun kelkaj el la plej karaj por mi. — Sed, konkrete, kontraŭ la sistemo elpensita de Doktoro Zamenhof, mi havis iajn antaŭjuĝojn, eble devenantajn precipe de iaj optikaj impresoj... — Aliflanke, min suspektigis kontraŭ ĝi la ofte farataj laŭdoj al ĝia simpleco. Mi ĉiam havis la konvinkon, ke bona universala lingvo ne devas troviĝi en la neceso esti simpla: ĉar sufiĉe utila rezultus ĝia kono, kaj sufiĉe ĝi ŝparus aliajn laborojn, por ke valoru la penon venki kelkajn malfacilaĵojn plie en la lernado, kun bono por la plej granda perfekteco en la rezultato.

Sed ĉian antaŭjuĝon, ĉian skrupulon restantan en mi forigis jam Esperanto... — Kiel? Per ĝia efektiva triumfo super la gentoj. Ĝi konvinkis min per la unika maniero laŭ kiu io kiel ĝi povas konvinki: *venkante*... — En tio-ĉi ja la plej bona moralo estas tiu de la sukceso... — Jen lingva sistemo kiu prezentigas kun pretendoj fariĝi universala helplingvo... — Tre bone. Nu: kiu estas ĝia rajto?... — La plej forta, la definitiva: esti en la antaŭtago de sia plena universaligo!

Esperanto, ŝajnas al mi, prezentigas jam en tiu situacio. Ĝia triumfo rilate al kvanto, en malmultaj jaroj, estas ja admirinda. La esperantistoj (atentitaj la decaj proporcioj) povus hodiaŭ diri, kiel iam la kristanaj kredantoj: «Ni estas de hieraŭ kaj jam ni plenigas ĉion: la domojn, la placojn, la tendarojn...» Bona estas, do, Esperanto; kiel estas bonaj fizikaj principoj, laŭ Poincaré, la fizikaj principoj «kiuj montriĝas bonaj, kiuj havas sukceson...»

Klopodi ke Esperanto «bone sukcesu» jam estas, eble, ĝenerala homa devo. Se malgraŭ tio jam atingita hodiaŭ per la peno de la unuaj fervoruloj, ĝi morgaŭ malsukcesus, ĉiuj, *kiuj pro manko de fido aŭ pro manko de agoj estus malhelpintaj ĝian triumfon, tiuj devus senti la pezon de granda respondeco, granda konscienci-proĉo.*

Tiu favora sinteno antaŭ nia movado igas por ni ankoraŭ pli simpatia la figuron de «Xenius». Homo kiel li, ne povus alimaniere paroli pri Esperanto.

Mi kredas, ke la kelkaj Glosoj prezentitaj pravas la talenton de Eugeni d'Ors kiel verkisto, sola aspekto en kiu mi volis prezenti lin. Vi vidis, ke li, eĉ tra miaj tradukoj, estas plene klara kaj komprenebla. Multon ankoraŭ oni povus diri pri li kiel aŭtoro de artikoloj filozofiaj aŭ pedagogiaj. Sed mi ne plu volas ĝeni vian afablan atenton. Mi restos tre kontenta, se mi sukcesis instigi iun el vi al pli profunda konatiĝo kun la verko de nia fama «Xenius».

JAUME GRAU CASAS



Fajreroj


La Universala Kongreso de Esperanto okazos nunjare en Ĝenevo, 1-8 aŭgusto, kaj konsistos el praktikaj uzoj de Esperanto por Universitataj kursoj, kaj kunvenoj de teknikistoj kaj idealistoj pri ĉiuj movadoj kaj aferoj. Ne mankos tre interesaj vizitoj kaj ekskursoj tra la ĉarma Svislando, lagoj kaj montoj, kaj la influo de granda ĉeestantaro esperantista certe efikos ĉe la Ligo de Nacioj, kies sidejo estas Ĝenevo. Petu detalojn pri aliĝo kaj ĉeesto al la Komitato de Universala Kongreso, 12 Boul. du Théâtre, Genève, Svislando.

La nova aliĝo de Grupoj al K. E. F. — Ĉar nia reorganizo estis unuanime dezirata, ĝi estis en la eksterordinara Kunveno unuanime aprokata. Ĉiuj grupoj ĝis nun prezentintaj la aferon al siaj grupanoj atingis sukcesan aprobon. — Laŭ la grupaj kaj ceteraj cirkonstancoj la aprobo fariĝas ĉu kun pligrandigo de la grupana kotizo po dek centimoj ĉiumonate, ĉu kun rezolucio pagi la Grupo el sia kaso la kolektivan aliĝon al K. E. F. — Eĉ por Grupo kiu havas cent membrojn la ĉiumonata pago al K. E. F. estas nur 10'—ptoj. por ke ĉiuj ĝiaj membroj estu K. E. F.-anoj. La K. E. F.-aneco rajtigas al niaj Kongresoj senpage — por ne K. E. F.-anoj la Kongresa kotizo kostas kvin ptoj. — kaj al individua voĉdono. Grupoj kaj Federacio, nia tuta movado, bele unuiĝos kaj interhelpos sin per la nova organizo.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la miitista cenzuro.


PALMA DE MALLORCA

(BALEARA ĈEFURBO)



Promenejo Sagrera, kie oni vidas la Borson kaj la antikvan Maraferan Konsulejon, kiu nun estas Lernejo por Instruistinoj.

PALMA DE MALLORCA

SCENURBO DE LA FESTO DE LA XI^A INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Antikva Arko en la strato Almudaina

PALMA DE MALLORCA


(KONGRESURBO DE NIA XII^a)



Kapitola pordo de la Katedralo

PALMA DE MALLORCA

ĈEFURBO DE PLEJ BELA MEDITERANEA INSULO



Restaĵo de antikvaj arabaj banejoj. — La malamo de la kristanoj, kiuj forprenis de la araboj tiujn posedaĵojn detruis eĉ la ŝtonojn, kiuj povis memori tiun epokon.

La marafera Konsulejo, sur antaŭa paĝo, memorigas pri la majstra verko, «Consolat de Mar», pri maraj aferoj, kiu estas verkita en la XIII^a jarcento katalunlingve, kaj estas ankoraŭ la ĉefa kodo en la mondo de la maristoj.

Pago por lernantoj = Pàgina per a alumnes

Dialogo inter Jozefo kaj Jozefino, aŭ, inter Paŭlo kaj Paŭlino:

Diàleg entre Josep i Josefina, o, entre Pau i Paulina:

— Kio estas en la klaso, en la lernejo, en la domo? — Pordoj,
 — Què hi ha a la classe, a l' escola, a la casa? — Portes,
 muroj, fenestroj, plafonoj, tabloj kaj aliaj. — Kio estas sur la
 parets, finestres, sostres, taules etcetera. — Què hi ha sobre la
 tablo, en la klaso, sur la muroj? — Sur la tablo estas
 taula, a la classe, a les parets? — Damunt la taula hi ha
 inkujo, libroj, paperoj, kajeroj, plumoj k. a. — Kio estas
 un tinter, llibres, papers, quaderns, plomes etc. — Què és
 tio kio kuŝas en la mezo de la tablo? — Tio, kio kuŝas en la
 allò que hi ha al mig de la taula? — Allò que hi ha al
 mezo de la tablo estas sorba papero. — Mi estas junulo, fraŭlo;
 mig de la taula és paper xupó. — Jo soc un jove, un solter;
 vi estas junulino, fraŭlino. — Mi staras apud la
 vostè és una jove, una senyoreta. — Jo estic dret aprop la
 fenestro kaj vi sidas apud la tablo. La infano kiu dormas kuŝas
 finestra i vostè sèu aprop la taula. L' infant que dorm jeu
 en lito en dormoĉambro. Ĉu vi skribas, Paŭlino? Ne,
 en un llit en un dormitori. (Es que) vostè escriu, Paulina? No,
 Paŭlo; mi legas. — Ĉu via patrino estas sana? Jes; ŝi loĝas
 Pau; jo llegeixo. — La vostra mare està bona? Si; (ella) viu
 nun en Palma, kaj fartas tre bone. Dankon! — Ĉu via
 ara a Palma, i està molt bé. Gràcies! — (Es que) el vostre
 patro estas nomata Petro? Ne, li estas nomata Johano kaj mia
 pare es diu Pere? No, ell es diu Joan i la meva
 patrino estas nomata Johanino. — Kiu estas tiu sinjoro? Li
 mare es diu Joana. — Qui és aquell senyor? Ell
 estas mia onklo, kaj li ne fartas tre bone. Mi, vi, li,
 és el meu oncle, i no està molt bé. Jo, vostè, ell,
 ŝi, ni, vi, ili, estas la personaj pronomoj.
 ella, nosaltres, vosaltres, ells, són els pronoms personals.
 Kiu, tiu, tiu-ĉi, neniu, ĉiu estas vortoj pronomaj
 Qui, aquell, aquest, ningú, cadascun són paraules pronominals
 por persono. Pronomaj vortoj por afero estas kio, tio,
 per a persona. Paraules pronominals per a cosa són què, allò,
 ĉi-tio, nenio, ĉio.
 això, no-res, tot.

Bulgaraj Popolaj Kutimoj

Pasko

En Okcidenta Eŭropo la plej granda festo estas la Kristnasko. Ĉe la ortodoksaj slavoj, precipe ĉe la bulgaroj, la plej granda festo estas la Pasko au bulgare *Velikden* (laŭvorte : Granda-tago).

Jam antaŭ ĝi, sabate je Lazar-tago, la plej malgrandaj knabinetoj iras kun korbetoj en la manoj kolekti ovojn. Enirinte en iun domon, ili nenion parolas, sed restas starantaj. Kiam la domomastrino ilin vidas, ŝi donas al ili po unu ovo, post kio ili eliras, dirante nenian vorton (La silento ja estas oro). Tio ĉi daŭras ĝis tagmezo. La saman tagon, antaŭvespere ili kunvenas kaj priparolas la vicon, laŭ kiu ili vizitos je la Palmofesto la vilaĝon. Je tiu tago, enirinte en la domon, ili haltas en la mezo de la korto kaj kantas po unu kanto por la domo kaj por ĉiu ĝia membro aparte. Post tio la gedomomastroj donacas al ili monerojn aŭ ovojn.

Baldaŭ komenciĝos la Sankta Semajno. Oni sin preparas por la granda tago de Pasko. Estas laborego ĉirkaŭ kaj en la domoj : ĉiu domomastriro tutkore purigas sian loĝejon ĝis la plej lasta anguleto. Ĉio devas esti finita jaŭde. Tiam oni kuiras kaj kolorigos la ovojn kaj faros la tradiciajn Paskajn kukojn, la t. n. *kuzinaci*. La bakistoj ne scias plu kien meti a kapon. Ĉiu familio preparas almenaŭ po dekduo da tiaj kaj ĉiu kuko pezas de tri ĝis kvar kilogramoj. Tio ĉi estas la plej imponanta ceremonio dum la jaro. La tuta popolo ĝojas kaj partoprenas tiun antikvan festenon de la rostita ŝafido kiel en la tempo de Abrahamo! La tradicioj tute ne ŝanĝiĝis. Por tiu ĉi tago ĉiu devas havi novajn vestojn, ŝuojn, ĉapelon... sin vesti plej bone, solene. Je Pasko mem, kiu daŭras tri tagojn, oni sin salutas ne plu per «Bonan tagon», tamen per «Kristo reviviĝis!» kaj «Vere Li reviviĝis!» kaj manĝas paskan kukon kaj kolorigitajn ovojn, kiujn oni rompas per reciproka frapeto.

Strangaj kutimoj estas ankoraŭ praktikataj ĉe la bulgaroj. Unu el la plej belaj kaj memorindaj estas la t. n. *Proŝtopalnik* aŭ kuko okaze de la unuaj paŝoj de malgrandaj infanetoj, ĉirkaŭita de diversaj objektoj, laŭ kiuj oni antaŭdiras la estontecon de la infano.

Kiam la infaneto komencas stariĝi kaj provas paŝeti, ekregas granda granda ĝojo ĉe la familio. Baldaŭ okazos festo kaj la tuta kvartalo — parencoj kaj konatuloj — estas invitataj por la ceremonio. La malgrandul (in) o estas vestita per la plej belaj vestoj. Ornamita per ĉiuspecaj aferoj, oni enkondukas ĝin en la ĉambron, kie estas kunvenintaj la gastoj. Meze de l'ĉambro troviĝas malalta tablo sur kiu estas lokitaj diversaj objektoj : krajono, moneroj, ludiloj, libro, fadenbobeno, ktp. La infano, iom timigita meze de tiom da nekonataj figuroj, estas portata apud la tablon. Tie, post kiam ĝi ekzamenis dum kelkaj minutoj ĉiujn elmetitajn objektojn, ĝi eten-

das la maneton — ĉies spiro haltas — kaj prenas iun objekton... ekz. krajonon. Ĝojkrio trairas la ĉeestantaron. Efektive la krajono estas simbolo, la malgrandulo volas sin instrui, fariĝos scienculo! Kia elreviĝo por la patrino, se la infano estus preninta ludilon aŭ spegulon... Certe, ĝia «kismet» aŭ ĝia estonteco dependos de la elekto, kiun ĝi faros inter ĉiuj strangeĝaj objektoj. Ekzemple ormonero(j) signifas komerciston, kruco — pastron, tranĉilo aŭ sabreto — buĉiston aŭ oficiron, ordeno — oficiston, kukoj — frandemulon, glaso da vino — gajulon aŭ drinkulon, florbukedeto — kavaleron aŭ virinamanton, libro — poeton, verkiston, ktp.

Poste sekvas la donacoj, kiujn la gastoj disdonas al la etulo. Fine oni proponas refreŝaĵojn al ĉiuj, konfitaĵon de rozoj kaj turkan kafon en malgrandaj tasoj, laŭ bulgara kutimo, atendante la fotografiston, kiu devas senmortigi tiun scenon, al kiu oni alligas tiel grandan gravecon.

Eble, kredas la popolo, iu mistera volo miksiĝas en la hazardojn de tiu ĉi kutimo. Ne arbitre kaj blinde la infano kaptas tiun aŭ alian objekton, sed laŭ la forto de iu interna puŝo — la blinda sento, instinkto, prudento, magnetismo gvidas la unuan movon de ĝia maneto... Eble tie ĉi manifestiĝas ankaŭ atavismo.

(f i n o)

IVAN H. KRESTANOFF

(Premiita ĉe la X^aj Internaciaj Floraj Ludoj)

XI^aj Internaciaj Floraj Ludoj

Listo de verkoj ricevitaĵ (daŭrigo).

11. Vivo: flora ĝardeno, ŝtona krutaĵo. — 12. Don Dinero. — 13. Kial plendi se estas amo?. — 14. La poesia non muore. — 15. Omne trinum est perfectum. — 16. Pax Vobis. — 17. Marrigardejo. — 18. Libri oracula pandunt. — 19. Suno leviĝas, la mondo viviĝas. — 20. Bona lex vera lux. — 21. Vita brevis, ars longa. — 22. Se amor non ĉ, ch'è dunque. — 23. Amo venkos malpacon. — 24. Isano. — 25. Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos. — 26. Se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo tre riĉa. — 27. Plumo ne sentas, papero silentas. — 28. Vora el barranc dels Alcadins hi ha uns tarongers de tan dolç flaire que per a omplir d'aroma l'aire no té el món mil·lors jardins. — 29. La vero-mistero. — 30. Kiu okazon forŝovas ĝin jam ne retrovas. — 31. Tapuaĥ. — 32. Felicity. — 33. Migrado, jes, migrado. — 34. Ni vidas, nenion ni scii povas. — 35. Polyhymnia.

Eraroj. Kelkaj eraroj malbeligis la lastan numeron. Oni korektu en ĝi: la premio XIII de "Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares" estas 100 pesetoj anstataŭ 50. — La temo de premio XXXVI anstataŭ laŭvola estas "Esperanto kaj Katolikismo"

Plenumo de l' Devo

Estas malvarmega vintrotago. La suno sin kaŝas malantaŭ densaj, neĝpezaj nuboj. *Piedalte* kuŝas la neĝo sur stratoj, placoj kaj tegmentoj, kaj eĉ la palisoj estas ricevintaj dikajn neĝoĉapojn. Malmultajn homojn nur oni vidas sur la stratoj. Ĉiuj estas envolvitaj en varmigaj peltaj. Ili rapidas, por baldaŭ atingi la varman ĉambron.

Jen viro trapaŝas la stratojn, kies ĉapo ekkonebligas lin kiel fervojiston. Seriozaj, malgajaj estas liaj trajtoj. Longa, varma mantelo vestas liajn fortajn membrojn, varmaj botoj ŝirmas liajn piedojn pro la malvarmeco. En la mano li portas malgrandan, eluzitan kofron.

«Ho bonan tagon, Ernesto, kien vi volas iri dum tiu ĉi terura vetero?» Tiel ĵus renkontanta amiko alvokas lin. «Oficon!» Nur tiun ĉi unu vorton li respondas kaj neekhaltante li preterpasas la amikon. «Ne demandu, ho ne demandu!» Li dume pensas. Ho ĉiuj, tiuj preterirantaj homoj do ne scias kiel terura la ofico povas esti. Ili ja ne scias, kiel li hodiaŭ korpremite foriris el sia hejmo, kie nun lia edzino plorante en profunda doloro sole gardas apud la liteto de l' malgranda Franĉjo.

Lia ofico devigis lin, forlasi sian fileton, la sunlumon de liaj tagoj en mortiga malsaneco. «Baldaŭ, kara mia paĉjo, revenu!» Li diris, ĉirkaŭbrakante lin, «mi ja nur estas gaja, kaj mi ja nur forgesas miajn dolorojn, se vi, paĉjo estas ĉe mi. Paĉjo, kara paĉjo, baldaŭ sane revenu!»

Kaj se li revenus, kaj la febranta korpo de lia karuleto estus malvarmiginta, mortinta! Ho, ne elpensebla doloro! — Kaŝite rulas larmo en lian barbon, kaj liaj paŝoj pli kaj pli malrapidiĝas. —

Jen li vidas la domojn de l' stacio. Li rektigas sian korpon kaj rapide alpaŝas la lokomotivejon. Kun movo de l' mano, kvazaŭ forŝovanta ĉiujn ĝis nun lian koron premantajn hejmajn zorgojn li eniras tra la portalo, levigante la kapon. — Ofico. —

Negas, neĝadas, senĉese neĝadas! Terura ventego trablovas la tutan regionon, ventego, kiel similan eĉ la plej maljunaj homoj ne rememoras. Jam krepuskas. Malklare, duone nur oni povas rigardi la ĉirkaŭaĵon en la komenciganta vespero.

Fantome la lumo, brilanta el la fenestro de la rapidvagonaro kiu per rapidegeco traveturas stacion post stacio, preterflugas arbojn, vilaĝojn kaj kampojn, fantome kaj tuj ilin lasante en ilia malheleco kaj malgajeco.

Sed en la vagonaro regas ĝojo. Hele la lampoj lumas. Gajaj homoj sidas en la kupeoj, parte babilantaj, parte legantaj, kelkaj ankaŭ dormantaj, ĉiuj samaj, kvazaŭ ne ekzistus zorgoj.

Nur unu el tiuj homoj en la rapidvagonaro ne estas senzorga, ne povas, ne rajtas dormi. Estas la maŝinisto sur la lokomotivo. Streĉe li trarigardas la mallumon antaŭ sia maŝino, nur iomete eklumigitan per la lanternoj de la lokomotivo. Per rapideco de 70 kilometro po horo la vagonaro ton-

dradas sur la neĝkovritaj reloj. Kiel ombroj nur venas kaj malaperas la lumigitaj signaĵoj apud la reloj, pene observataj de l' maŝinisto.

Ĵus ekleviĝas lumo kaj ĝiaj radioj, iomete nur penetrante la neĝopezajn nubojn, ĉirkaŭvagas kiel koboldoj de reloj al arboj, de arboj ree al reloj.

Kelkajn horojn jam la maŝinisto Ernesto gvidas la lokomotivon. Preskaŭ ĉiam per sama rapideco la vagonaro traflugas la relvojn, takte, enuige sonas ĝia bruo.

Neniam en lia vivo la vojo ŝajnis al li tiel longa, kiel hodiaŭ la sama vojo, kiun li jam centfoje traveturis. «Nur hejmen, hejmen!» Io vokas en lia cerbo. Ĉu estas la malvarmega ventego, kiu incitegas liajn nervojn, aŭ ĉu estas lia malsana infaneto, kiu vokas lin? Li ne plu vidas la relvojn, li sole nur vidas sian fileton sin turnadantan en febro. «Ho, Franĉjo, kara mia Franĉjo, mi venas, mi ja venas!»

Akra ventpuŝo lin retiregas al la realeco. Li rektigas sin, ektimegas pri sia devorompo. Tuj li streĉas sian tutan atenton ree al la relvojo. La vojaĝantoj malantaŭ li ja ne konas la dangeron, en kiu ili troviĝas en ĉiu minuto. Ili ja ne pripensas, ke nur unu momento de malatento de l' maŝinisto jam povas kaŭzi teruran malfeliĉon, povas porti profundan malĝojon kaj funebnon en multajn familiojn de l' tuta lando, ĝis nun kontentajn kaj gajajn. — Sed li konas sian devon. —

Kaj per nemalpliigita rapideco traveturas la vagonaro la neĝoventegon. Freneze ĉirkaŭflirtadas la neĝeroj. Iom post iom disiĝas la nebulo, kaj la siluetoj de la lumsignaloj pliheliĝas. Jam oni traveturas la unuajn reŝanĝilojn de l' stacio kaj takte bruas la vagonaro, kvazaŭ kriante: «Kiel li fartas, la bona knabo, kiel li fartas la bona knabo, kiel li far — »!!

«Ekhaltu!» subite laŭte krias la hejtisto en la orelon de Ernesto. «Ekhaltu! Ĉu vi ne vidas jen antaŭ ni lumojn de l' vagonaro?» Nur unu rigardon antaŭen, tiron de l' haltigilo, kaj la vagonaro malpliigas sian rapidecon. «Signalu, mi returnen veturos!» krias Ernesto kaj la hejtisto saltas de sur la lokomotivo kaj renkontenrapidegas al la alveturanta vagonaro, svingante sian lampeton. Subite, fulme eklumas penso en la cerbo de Ernesto: «Kiel, se vi ankaŭ desaltas! Tiam vi estos certe savita! Memoru Franĉjon! Kion valoras al vi la vojaĝantoj malantaŭ vi? Sed ili konfidas al mi! For, for logiloj de l' infero! La danĝero min trovu sur mia loko!» Pene li rigardas tra la fenestreto kaj la vagonaro malrapide komencas veturi returnen.

Sur la lokomotivo de l' alia vagonaro oni jam same ekkonis la dangeron, ekvidinte la lampeton de l' hejtisto. Oni tiris la haltigilon. Sed tamen — laŭta krakado — centvoĉa ekkrio kaj tiam momento de terura silento. Ambaŭ lokomotivoj estas karambulintaj. Dank' al Dio la frapo ne plu estis sufiĉe forta por detrui la vagonarojn, nur la lokomotivo de l' rapidvagonaro estas difektita kaj elreliĝinta.

La pordoj de la vagonoj estas malfermataj. Parte ankoraŭ time, parte jam trankviliĝinte eliras el ili la vojaĝantoj. Laŭte babilante ili ĉirkaŭvagas la lokon de l' katastrofo, kiu nur malhele estas lumigita per la lam-

petoj de l' fervojistoj. Sed baldaŭ unu post la alia foriras al la proksima varma stacidomo. Kaj sur la loko kondukista de la lokomotivo kuŝas solece Ernesto, mortinta, dispremita inter la maŝino kaj tendro. Ofero de la plenumo de l' devo.—

Apud la lito de l' Franĉjo sidas la patrino. «Trankviliĝu, kara fileto! Dormu, dormu! Baldaŭ via kara paĉjo revenos, baldaŭ, baldaŭ—!»

Devo.—

CURT LE

(Premiita ĉe la X^a Internaciaj Floraj Ludoj)

Fajreroj

Voĉdono pri uzo de landnomoj. — Unu komitatano pro peto de Prof. Cart kaj alia propramove proponis ke la Centra Oficejo revenu al uzo de -ujo en landnomoj. Per 12 voĉoj kontraŭ 4 la komitato malakceptis tiun vidpunkton kaj konfirmis, ke la Centra Oficejo fidele aplikas la rekomen-don de la Viena kongreso, ke oni konfirmiĝu al la Fundamento, se ĝi sekvas la principon esprimitan en la Klasika Libro de l' Akademio: «La finaĵo -io (ne sufikso), kiam internacia en landnomo, ne estas kontraŭfundamenta (Germanio apud Germanujo, kiel evolucio apud evoluo, Fundamento * 15) En dubaj okazoj la Centra Oficejo uzos la formon en -lando ankaŭ perme-seblan laŭ la fundamento. La komisiono unuanime instrukiis la Centran Oficejon daŭre sekvi tiun principon senescepte.

La sistemo de D-ro Zamenhof pri Landnomoj. — Tie ĉi mi deziras sim-ple klarigi por tiuj, kiuj ĝin ne bone komprenis la sistemon de nia Majstro pri la Landnomoj: — 1.^a Koncerne la landojn de la Malnova Mondo (Eŭro-po, Azio), la «indigena» popolo donas sian nomon al la lando: Germano-Germanujo, Ĉeĥo-Ĉeĥujo; Slovako-Slovakujo; kunmetitaj, Ĉeĥoslovakujo k. t. p. — Tamen la landnomojn, kiuj finiĝas per... lando, D-ro Zamenhof konservas sensanĝe: Holando (Regnano: Holandano). (*) 2.^a Koncerne la la landojn de la Nova Mondo (Ameriko, Afriko, Aŭstralio) kie la «enmigran-toj» fakte malaperigis la indigenan popolon, li alprenas la nomon mem de la lando, esperantigante ĝin, kiam eble. — Ĉu ne klara, ĉu anarkia tia siste-mo? Ne — Neniu sistemo, (pri la Landnomoj), skribis Prof. Grosjean-Mau-pin, la Akademia Raportinto pri la demando (1922), estas plene rekomen-dinda «el teoria vidpunkto; pro tiu motivo ni devas konsideri nur la *prakti-kan* vidpunkton, el kiu la fideleco al la ĝisnuna tradicio (la Zamenhofa) estas pli sendanĝera ol ia ajn provo». ** — Th. Cart — Prez. de la L. K.

(*) Skotujo (Skoto), (Fin(n)ujo) (Fin(n)o) estas cetere korektaj for-moj, sed malpli ofte uzataj ol Skotlando, k. t. p. ** Raporto aprobita de la Akademio kaj de la L. Komitato (Nov. 1922).

Murafiŝoj pri nia Kongreso en Palma. — Grandaj, belaj, artaj estas eldonitaj de la Organiza Komitato de nia XII^a okazonta en Mallorca. — Ĉiuj grupoj aŭ samideanoj, kies cirkonstancoj permesas al ili lokigi tre videble, tre publike kaj fiere afiŝojn esperantistajn, bonvolu peti de ni ekzemplerojn.

La Somera Universitato. — La ĉefa novaĵo por la esperantistaro en 1925 estos la Somera Universitato en nia lingvo. Jam antaŭ la milito D-o Privat projektis tiun aferon kaj de la 1 ĝis 7 aŭgusto 1925 li intencas ĝin realigi unuafoje laŭ la jena programo, se sufiĉa nombro da partoprenontoj enskribiĝos: Vendredon, 31 julio, vespere, la somer-kursoj en Esperanto solene malfermiĝos per ceremonio ĉe la Ĝeneva Universitato sub prezido de ties Rektoro. — Sabaton, 1 aŭgusto, la prelegoj komencos kaj okazos regule ĉiumatene. La somer-universitato enhavos kredeble kvar sekciojn, unu pri pedagogio kaj psikologio, unu pri lingvo-scienco, unu pri fizika scienco kaj unu pri internacia juro. — La unua sekcio estos aranĝata rekte de la universitata lernejo de pedagogiaj sciencoj (Instituto J. J. Rousseau) sub persona gvidado de la konata Prof. Pierre Bovet. Krom la prelegoj pri psikanalizo kaj novaj pedagogiaj metodoj, la sekcianoj kunvenos en la instituto kun Profesoroj Bovet, Baudoin, Flügel, de la Londona Universitato k. a. por interparoli pri tiuj temoj kaj kune vizitos interesajn lernejojn, eksperimentaĵojn, ktp. Tiu fako interesos antaŭ ĉio la ĝeinstruistojn kaj edukistojn. — La dua sekcio estos aranĝata de la Internacia Instituto de Esperanto. Prof. Collinson, de la Liverpoola Universitato, kaj aliaj diverslandaj lingvistoj prelegos tie pri la historio, literaturo kaj sintakso de nia lingvo kaj pri lingvoscienco ĝenerale. Ĝi interesos ĉefe tiujn, kiuj deziras pliperfektigi sian konon de Esperanto kaj kapabliĝi por instrui ĝin. — La tria sekcio dediĉos prelegojn al scienco kaj tekniko de radio, celante aŭdigi en nia lingvo klaran instruadon pri tiu temo per kompetentaj scienculoj el diversaj nacioj. — La kvara sekcio estos aranĝata kun helpo de la Ligo de Nacioj, de la Internacia Labora Oficejo, de la Universala Poŝta Unio, de la Universala Telegrafa Unio kaj de la Internacia Komitato de la Ruĝa-Kruco.

Por aliĝo petu detalojn de Universala Kongreso, 12, Bd. du Théâtre, Genève, Svislando.

La unuaj sciigoj pri la 3-a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj. — Loko: La kongreso okazos en Córdoba (Andaluzio). Tempo: 10 ĝis 12 majo 1925. Kotizo: 5 (kvin) pesetoj, blinduloj senpage. Loka Kongresa Komitato: Honora Prez.: s-ro Pablo Linares Rapet. Prez.: s-ro Francisco Serrano Olmo. Kas.: s-o Juan Serrano Olmo. Sekr.: s-o Joseph Berger. Voĉdonantoj: s-oj Francisco Azorin, Rogelio Luque, Pantaleón Marivela. Por blindulaj aferoj: f-lino Anita Mejías. Kongreslibro estos eldonata multilustrite kaj servos samtempe kiel valoro gvidilo tra la sunbrila, ĉarmplena regiono andaluza. — Komunikoj pri la kongreso aperos ankaŭ en «La Suno Hispana». — Adresoj: por monsendo: Juan Serrano Olmo, calle Reloj, 1. Por kores-

pondaĵoj : Joseph Berger, Claudio Marcelo, 18. — La L. K. K. petas la tutmondan esperantistaron helpi laŭpove per seriozaj proponoj kaj multnombra aligo.

Esperanto en Barcelona Radiotelefonio.—Klopodoj diversflanke faritaj de niaj karaj samideanoj Paluzie, Bartomeu, Valdepeñas, Bregon, Serrat kaj aliaj atingis akcepton de nia lingvo en la Radio stacio de nia urbo. La 8an de Marto okazis parolado de nia Prezidanto en Esperanto pri la en Majo okazonta Kongreso de nia Federacio en Palma de Mallorca. Poste, kantos, deklamos aŭ parolos en Esperanto PalmiraCastellvi, Jaume Grau, Dro. Bregon, Joan Gili, Marian Solà kaj aliaj gesamideanoj en Barcelona.

Bonyveninta estu nia kara Prezidinto kamarado Joan Gili Norta, kies kunesto inter ni estos helpa kaj efika al nia Movado. Bedaŭrinde li nur antaŭ kelkaj tagoj revenis de transmario kaj post kelkaj monatoj refoveturos transmaren. — Sed certe ke ĉie li laŭ eble laboras por defendo de nia afero, malpezigas nian bedaŭron pro lia foresto — ĉar li samideanece neniam forestas.


Novaj Komitatoj en Palma de Mallorca. — Pro la elektoj en la lasta Ĝenerala Kunsido okazinta ĉe «Esperantista Klubo Palma», la direktanta Komitato de tiu-ĉi Grupo konsistas el la jenaj gesamideanoj : Prezidanto : S-ro J. Rosselló; Vicprezidanto : S-ro B. Font; Sekretario : S-ro N. Terrassa; Vicsekretario : S-ro J. Juan; Bibliotekisto : S-ro J. Molinos; Voĉdonantinoj : F-inoj. C. Muntaner, T. Bauzá kaj J. Oliver. — La membroj de Universala Esperanto Asocio en tiu-ĉi urbo elektis S-ron N. Terrassa, Delegito, kaj S-ron Salom, Vicdelegito.



Nekrologo

S-rino Felicidad Zamora de García, lerta kaj fervora esperantistino el Manila, kiu, en halto de traveturado loĝis en nia urbo kun ŝiaj fratinoj kaj filineto, mortis la 12^{an} de februaro. Multaj samideanoj kiuj havis gojon kaj honoron interkonatiĝi kun tiuj ŝatindaj orientaj samideaninoj, kiuj tuj varbis al si nian amikecon kaj fratecon, partoprenas la ĉagrenon de familioj en Barcelona, Zamora kaj García, kiujn ni petas kredi nian ĝisinceran kondolencon.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU:



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre mal-veran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A

=====

en 1925. .

Aliĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Aliĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ
la Delegito en Barcelona:
S-ro Delfi Dalmau, Carrer València, 245

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono 6 svisaj frankoj aŭ egalvaloro efektivigebla en Barcelona

Adr.: Carrer València, 245. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represii nian anoncon rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston publikigotan en nia gazeto.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

LA SOLUCIÓ JUSTA

Eus tornem esperantistes. Comprenem cada vegada més la necessitat d'una forma de llenguatge que, sense perjudici de les diversitats nacionals i regionals, serveixi perquè tots els homes s'entenguin. A cada moment sentim a dir que convé expressar-se de manera que ho compreguin el més gran nombre possible d'homes. Partint d'aquest principi, s'arriba lògicament a la solució que presenta una parla internacional.

Cap dels idiomes d'avui, ni els grans ni els petits, ni els gloriosos ni els humils, ni els antics ni els nous, ni formosos ni lletjos, posseeix el do de la universalitat. Els uns tenen una major àrea que els altres. N'hi ha de reclosos dins els límits propis, i n'hi ha que saltant per damunt d'aquests límits són coneguts per altres homes de divers llenguatge nadiu. Però sempre hi haurà milers i milions d'homes que davant d'un text escrit en una llengua particular i fins en dues o tres o quatre llengües, es quedaran sense saber el que allò diu.

Si realment és desitjable i fins necessari que un text determinat sigui entès per tothom, en aquest cas no és lògic d'aturar-se en la solució eclèctica que representa l'ús dels idiomes de major àrea territorial. Més val anar a la solució completa, perfecta i definitiva, que consisteix a posar al costat de cada llengua materna una llengua auxiliar igual per a tots.

Tal hauria d'ésser la tesi de tots els que es presenten com a universalistes lingüístics. Els que ara propugnen, per a resoldre el problema, l'adopció d'algun dels tres o quatre idiomes que avui tenen una difusió més gran, haurien d'avenir-se per arribar a la solució única, que no pot ésser la d'un llenguatge dels que ara són parlats. La defensa de llurs deficientes solucions podria confondre's amb l'esperit de privilegi idiomàtic. Es podria creure que volen, no solament facilitar les relacions lingüístiques entre els pobles, sinó afavorir unes llengües a costa d'unes altres.

Cal que l'universalisme lingüístic sigui desinteressat, és a dir, que no beneficiï particularment a cap llengua. Si es cau en aquest escull, ha de venir forçosament la competència entre els llenguatges que ocupen els primers llocs en les estadístiques d'idiomes. Al contrari, un llenguatge verament universal que serveixi, no per a l'ús interior dels pobles, sinó simplement per a la comunicació amb els que tenen una altra parla, no ofereix cap dels inconvenients al·ludits.

A. ROVIRA I VIRGILI

La Kaso de K. E. F. en la nova jaro

de la 1^a Januaro ĝis la 31^a Marto 1925

ENSPEZOJ

Saldo la 31 Decembro 1924	179'60 ptoj.
Donacoj	527'90 »
Vendo de K. E. pere de librejoj	3'15 »
Kvitancoj (kotizaĵoj kaj abonoj, enspezitaj).	925' — »
	1.635'65 ptoj.

ELSPEZOJ

Preso de «Kataluna Esperantisto»	813'80 ptoj.
Aliaj presaĵoj (cirkuleroj k. a.)	47' — »
Poŝtmarkoj, por sendo de K. E. kaj korespondaĵoj	95'10 »
Ĝeneralaj elspezoj	19'10 »
	975' — ptoj.

RESUMO

Enspezoj	1.635'65 ptoj.
Elspezoj	975' — »
Saldo la 31 Marto 1925.	660'65 ptoj.

Atentu, samideanoj, K. E. F-anoj. Ni devas ankoraŭ pagi al la Konstanta Reprezentantaro por niaj 400 membroj, naŭ numerojn plu de nia gazeto 1925, kaj aliajn. — Pagu vian kotizon, abonon, kaj helpmonon por ebligo de nia laboro por Esperanto.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Radiotelefonia Parolado en Barcelona Stacio, pri la XII^a Kongreso kaj la XI^a Internaciaj Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio.

(daŭrigo)

Ni ankoraŭ devas prezentigi amase ĉien, por montri al ĉiuj ke Esperanto postvivis la krizegon, pli ĝuste, eble, la krimegon, de la granda milito. Ni montru ke nia idealo de komuna lingvo plej firme daŭras en nia cerbo, en nia koro, en nia lango kaj en niaj oreloj. Plej ofte ni aŭdigu kaj vidigu ke hieraŭa utopio fariĝis brila fakto, ĝojiga realo, logika afero dank' al genio Zamenhof.

En Majo proksima ni ĉiuj iru al Palma, kie atendas nin la balearaj fra-toj, kiuj volas pruvi ke ili deziris organizi kaj sukcesigi la XII^{an}. Kongreson de la Kataluna Esperantista Federacio kontraŭ ĉiuj baretoj kaj baregoj de timoj kaj ĵaluzoj, de trompoj kaj malkomprenoj. Sub la heroa kapitaneco de nia vera samideano Narciso Bofill grupiĝis kaj laboras la Palmaj Esperantistoj por sukcesigo de nia Kongreso, de la Internaciaj Floraj Ludoj, de ekskursoj plej allogaj, de festeno plej fratiga kaj de esperantismo plej sincera.

Dum la Kongreso estos ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco de Esperanto, por aljuĝo de la respektiva atesto aŭ diplomo al tiuj kiuj estos pruvintaj ke ili ĝin meritas. La instruintoj de Esperanto kiuj faras la

L'Esperanto és un idioma precis com el francès, harmoniós com l'italià i capaç com el grec.

Charles RICHET

kursojn ĉefe kaj ĝenerale nur pro fervoro esperantisma vidos premion kaj dankon ĉe la sukceso de siaj instruoj tra ekzamenoj; kaj la lernintoj de nia lingvo montros intereson pruvi ke ili estis fervoraj lernantoj, kaj ke ili deziras supreniri la ŝtuparon pruvan de kono elementa, meza aŭ supera pri la lingvo internacia. La suprenirintoj atingos la ĝojon bonvenigi kunulojn en atestitan lernintekon, kapablon aŭ profesorecon. Ekzamenoj de Esperanto estas do, ankaŭ festo en niaj Kongresoj.

La K. E. Fanoj plue devas interesiĝi pri niaj laborkunsidoj en kiuj la organizo de K. E. F. devas esti laŭeble plibonigata por certigi daŭrigon kaj sukceson de nia batalado, kaj nian helpon kaj kunlaboron al la Centraj Institucioj de nia Movado. La esperantistoj, kiuj konscias bonon kaj bezonon de Esperanto por la Homaro sentas la devon labori por la fina venko, kaj sentas plezuron plenumi sian devon, kaj tial fariĝas ankaŭ festo la laborkunsidoj de nia Federacio.

Aliflanke ĉiuj samideanoj en la mondo kiuj havis la ŝancon ĉeesti la Van. Universalan Kongreso de Esperanto en Barcelona, bone memoras la ĉarmon kaj solenon de Festo de Floraj Ludoj, kun bela reĝino kiu akceptas ĉe sia trono en prezida altaro inter belaj korteganinoj kaj la urbaj aŭtoritatoj la premiitajn verkistojn, kiuj iras ricevi de siaj moŝtaj manoj la premiojn kaj legi la plej belajn literaturajn pecojn.

Se vi deziras senti noblan emocion, ĉeestu feston de Floraj Ludoj. Se vi deziras ĝui ĝojan kunvenon, ĉeestu festenon de Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Se vi deziras admiri ravajn naturojn de tero kaj maro, veturu ekskursi al grotoj kaj kavernoj en Mallorca. Se interesas vin la historiaj postsignoj de la araba, greka, kaj romepoka civilizacioj vizitu la urbojn de la Mallorca insulo. Se vi ŝatas aŭdi la plej dolĉan akcenton de la kataluna lingvo aŭskultu porolojn de balearaj fraŭlinoj, de *belles atlotes*.

Ŝajnas nur festaro tio, kion mi pridiras rilate al Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Ŝajnas festaro kaj estas festaro gajiga, ĝojiga; sed ĝi estas rezulto de grandaj klopodoj, de verkoj, verkigoj, lernigoj kaj lernoj, enspezoj, elspezoj, esperoj kaj eĉ malesperoj de redaktoroj de nia gazeto, komitatanoj de nia Federacio, organizantoj de la Kongreso, tio estas, de multaj samideanoj, kiuj, silente, konstante, en ombro dum tagoj, semajnoj, monatoj, bafalas kontraŭ ĉiuspecaj batoj de l' sorto kaj moko de l' homoj, por oferi al Esperanto kaj esperantistoj festaron, Kongreson, por gloro kaj beno al nia Majstro kaj al liaj unuaj disciploj, kiuj ne havis la ŝancon vidi tiel proksima kiel ni la finan venkon de nia movado.

Memoru samideanoj, kaj pretiĝu veturi al Palma por restado feliĉa en lando de paco, insulo de ripozo, *Illa de la Calma*, kaj orita insulo, *Illa Daurada*. Ĝis la feliĉa renkontiĝo en Majo en Palma.

Kontribuaĵoj al Esperanta Etimologio

La etimologia literaturo de Esperanto bedaŭrinde ne estas vasta; krom la bona *Naŭlingva etimologia leksikono* de L. Bastien, Parizo 1907 (kiu cetere pli ol montri devenon kaj pradevenon de ĉiu vorto, celas montri la internaciecon de la Esp. radikoj), oni havas nur tie aŭ tie ĉi gazetartikolojn.

En tiu ĉi verketo ni volas resume studi specialan ĉapitron de la Esperanta etimologio, kiu ĝis nun estas neniel pritraktita t. e. la komunaj (apelativaj) nomoj kiuj devenas de propraj nomoj.

La studado de tiuj ĉi vortoj havas tute apartan intereson por la problememo mem de la tiel dirata «arbitra» pliriĉigado de la naciaj lingvoj. Jam la fama lingvistikisto H. Schuchardt, en sia raporto pri Internacia Lingvo ĉe la Viena Scienc-Akademio.

«Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung» *Almanach der Wiener Akademie der Wissenschaften*, 1904, kaj, antaŭ nemulte, lia konata kolego s-ro. Setälä en sia parolado pri «La mondlingva problemo».

Legita ĉe Helsinka kongreso kaj publikigita en Ĝeneva ESPERANTO spt. 1922, altiris la atenton de la mondlingvanoj pri la libervola (t. e. arbitra) kreado de kelkaj vortoj (gaso k. simile) kaj ilia enkonduko en la tiel nomatajn «naturajn» lingvojn.

La serio de nomoj kiujn ni citas estas iom simila: ĉiu el ili naskiĝis pro metaforo aŭ metonimio, kiu estas certe unuafoje uzita de iu persono difinita (kvankam malofte, laŭ niaj konrimedoj, difinebla), kaj kiu nur poste, pli malpli rapide, etendiĝis al tuta lingvo aŭ, ofte, al ĉiuj Eŭropaj lingvoj.

Ili estas do iu rimedo por mezuri la influon de individua agado sur tiu kolektiva afero kiu estas lingvo, kaj tial iu pruvo ke la lingvo ne estas, kiel kredis la Romantiko, senkonscia kreaĵo de la Popolo, sed, almenaŭ parte, ĝi konsistas el kreaĵoj de izolaj individuoj, poste akceptitaj de la parolantaro.

Kompilante tiun ĉi liston ni intence evitis multoblan citadon de lingvistikaj verkoj; sed ni zorge konsultis la fundamentajn etimologiajn librojn.

Diez, Körtin, Meyer-Lübke por la latinidaj lingvoj, (kaj speciale Halzfeld-Darmesteter-Thomas por franca); Walde por latina, Boisacq por greka; plue Skeat, Murray por angla, Kluge por Germana, Berneker por slavaj lingvoj, kaj la specialajn verkojn pri tiu ĉi temo en la Eŭropaj lingvoj.

G. Krüger, *Eigennamen als Gattungsnamen*, Berlino 1891. J. Reinius *On transferred Appellations of human beings*, Götteborg, 1903. J. Baudisch *Über Eigennamen als Gattungsnamen im Französischen*, Vieno 1905-1906. A. Kölbel, *Eigennamen als Gattungsnamen*, Leipzig 1907. K. Nyrop «Noms propres» en *Grammaire historique de la langue française* Kopenhavn' 1913

Ni konsideras nur la vortojn enhavatajn en la Fundamenta Vortaro aŭ en la 3 Oficialaj Aldonoj.

Aliaj kompreneble ĝestus troveblaj en bonaj vortaroj aŭ uzeblaj laŭ la 15^a Fundamenta Regulo: *Alensono, Nestoro, Vandalismo* k. t. p. kiuj devenas de nomoj propraj: personaj, lokaj aŭ gentaj.

Ankaŭ diaj kaj heroaj (mitol.)

Nestuditaj estas la vortoj, kiuj ne havis evoluon de propra al komuna nomo, sed kies signifo estas aŭ estis duba inter propra kaj komuna: ekz. *Dio* (kaj *adiaŭ; teismo, teisto, ateismo, ateisto*), *Madono, demono, satano, diablo, anĝelo, kerubo, serafo; ciklopo, titano; muzo*, (k. *muzeo, muziko, mozaiko*); *iriso, hiacinto, narciso; cinika, stoika; Edeno, Paradizo, Infero; biblio, korano, talmudo* ktp.

En la naturaj lingvoj estas cititaj nur la formoj kiuj plej bone helpas resupreniri ĝis la etimologio.

La mallongigoj uzitaj estas la kutimaj: *fr.* = franca; *lat.* = latina ktp. *scienclat.* = scienca Latino, moderna Latino de scienculoj (botan., zool. ktp); Asterisko (*) montras vortojn supozeblajn, sed ne dokumenteblajn.

akademio: lat. *Academia*, gr. *Ἀκαδημία* skolejo de Platono, en loko dediĉita en Ateno al greka heroo *Akademio*.

alabastro: lat. *alabastrum*, laŭ egipta urbo *Alabastron* (Plinio)?

amoniako: scienclat. *ammoniaca*, laŭ adjektivo *ammonicus* «rilatanta al templo de *Jupitero Ammono*» en Libio.

arabesko: «ornamaĵo... laŭ la *araba* gusto» (Kabe)

ardezo: it. *ardseia*, de irlanda urbo *Ardes*? (Diez)

arlekeno: fr. *arlequin* de it. *Arlecchino*, itala masko aperinta unuafoje en Parizo, kies nomo estas prenita de antikva franca *Hellequin*, iu diablo aŭ koboldo de mezepoka folkloro kaj literaturo (M. Rühlmann, *Etymologie des wortes Harlequin und verwandter Wörter*. Halle 1912).

Aŭgusto: lat. *augustus*, laŭ la nomo de la imperiestro *Augusto* (antaŭe *sextilis*).

Avelo: lat. *nux avellana*, laŭ *Avella* aŭ *Abella*. suditala urbeto.

Bajoneto: fr. *baionnette*, laŭ franca urbo Bayonne, kie la armilo estas unue fabrikita.

baldakeno: fr. *baldaquin*, de it. *baldacchino*, antikve adjektivo laŭ *Baldacco*, t. e. *Bagdad*.

batisto: fr. *batiste*, laŭ la nomo de la unua fabrikinto (Cambrai, XIII jar.c.)?

bronzo: it. *bronzo*, verŝajne de ant. lat. *Brundusium* nomo de suditala urbo *Brindisi*.

caro: rus. *царь* (car), de lat. *Caesar*, titolo fariĝinta, jam de la komenco de la Roma imperio, sinonimo de «imperiestro», pro sinsekvaj adoptadoj de la tronheredontoj en la familion de Cezaroj.

ceremonio: lat. *caerimonia*, laŭ etruska urbo *Caere*?

cidonio: lat. *cydonia*, laŭ kreta iama urbo *Cidonio*.

ĉampano: fr. *champagne*, laŭ franca regiono *Champagne*.

ĉerizo: fr. *cerise*, de lat. * *ceresea*, *cerasea*; *cerasus*, gr. *κεράσος*, verŝajne laŭ urbo *Kerazunto* sur Nigra maro, konkirita de Lukulo en 73 p. Kr.

dahlio: scienciat, *dahlia*, laŭ nomo de sveda botanikisto Dahl, importinta ĝin de Meksiko en 1789.

damasko: it. *damasco*, laŭ Siria urbo *Damasko*.

dando: angl. *dandy*, laŭ skola formo de la nomo *Andrew* (*Andreo*)?

dolaro: v. *talero*.

ermeno: fr. *hermine*, scienciat, *putorius herminea*, laŭ devenregiono *Armenio*.

fajenco: fr. *faïence*, laŭ itala urbo *Faenza*.

fazano: lat. *phasianus*, laŭ rivero *Phasis* en Kolkido sur Nigra Maro.

fiakro: fr. *fiacre*, ĉar la unuaj tiaspecaj veturiloj estas luitaj (1640) en Pariza *Hôtel St. Fiacre*, domo kie estis religia bildo de Sankta Fiakro.

franko: fr. *franc*, laŭ la vortoj N. N. Rex Franc. (rex Francorum = reĝo de la Frankoj aŭ de la Francoj), legeblaj sur antikvaj francaj moneroj.

gardenio: scienciat. *gardenia* (Linné), laŭ skota botanikisto Garden (XVIII jarc.)

gazo: fr. *gaze*, laŭ Palestino urbo Gaza?

gilotino: fr. *guillotine*, laŭ la eltrovinto, d-ro. Guillotin (1789)

grog: angl. *grog*, laŭ la eltrovinto admiralo Vernon, alnomita *Old Grog* (1745)

ĝeni: fr. *gêner* (antikve signifanta «turmentegi»), verŝajne laŭ *Geenna*, valo apud Jeruzalemo, ofte citata en la Biblio, kien oni ĵetis la kadavrojn de la kulpuloj.

ĝino: v. *junipero*

hermafrodito: de mitologia ambaŭseksulo *Hermaphroditus*, naskiĝinta de Merkuro (gr. *Ερμής*) kaj de Venuso (gr. *Αφροδίτη*).

hortensio: scienciat. *hortensia*, laŭ sinjorino Hortense Lepante (XVIII jarc.)

jako, *ĵaketo*: fr. *jaque*, *jaquette* laŭ fr. nomo *Jacques*, tre ofta inter kamparanoj?

januaro: lat. *januarius*, laŭ la nomo de dio *Januso*.

juglando: lat. *juglans*, t. e. *Jovis glans* «glano de Jupitero»

julio, lat. *julius*, laŭ la nomo de *Julio Cezaro* (antaŭe *quintilis*)

junio: lat. *junius*, laŭ la nomo de diino *Junono*.

junipero: lat. *juniperus*, ĉu de * *Junonipiros* «Junonfrukto»? Tra angla gin, *junipero* fariĝis ankaŭ *ĝino*, «junipera brando» (Kabe).

ĵaŭdo: fr. *jeudi*, lat. *Jovis dies*, «tago de Jupitero».

kalikoto: fr. *calicot*, laŭ hinda (Malabara) urbo *Calicut*.

kamelio: scienciat. *camellia*, laŭ Moravia Jezuito *Camelius* (*Kamel*) (XVII jarc.).

kanario: hisp. *canario* «birdo de Kanariaj Insuloj»

kanibalo: hisp. *canibal*, alia formo de la nomo de *Karaiboj*, gento de Antiloj.

kastoro: lat. *castor*, gr. κάστωρ Iu sekrecio de la besto estis uzata por virinmalsanoj, kaj tiuj ĉi estis sub protekto de *Kastoro*, unu el la du *Dioskuroj*: pro tio la nomo de la besto devenas de tiu de la dio.

kolofono: lat. *colophonia*, de greka urbo *Kolofono*.

kravato: fr. *cravate*, importita en Francujon de regimento de *Kroatoj*, dum tridekjara milito.

kupro: lat. *cuprum*, ankaŭ *aes cyprium*: «Cipra bronzo».

labirinto: gr. Λαβύρινθος, konstruaĵo en Kreto kie loĝis legenda Minotaŭro.

lundo: fr. *lundi*, lat. *lunae dies* «tago de la luno» aŭ, pli bone, «de Luno».

magneto: lat. *magnes*, *lapis Magnes*, gr. Μάγνητ «Magnezia ŝtono» de urbo *Magnezio*, sur rivero Meandro.

makadamo: fr. *macadam*, angl. *macadamise*, laŭ eltrovinto, la skota inĝeniero John Macadam (1819).

majoliko: it. *maiolica*, laŭ la malnova formo de la nomo de insulo *Majorko*.

mansardo: fr. *mansarde*, laŭ franca arkitekto François Mansard (XVII jarĉ).

mardo: fr. *mardi*, lat. *Martis dies* «tago de dio Marso»

marioneto: fr. *marionette* «pupo», antikve «bildo de la Madono» t. e. *Mario*)

marokeno: fr. *maroquin*, laŭ Maroko.

marto: lat. *Martius* (mensis) «monato de dio Marso»

maŭzoleo: lat. *Mausoleum*, gr. Μαυσώλειον, tombejo dediĉita de la edzino al Karia reĝo *Maŭzolo*; ĝi estis unu el la sep mirindaĵoj de la mondo.

mazurko: pol. *mazurka*, balo laŭ Mazuriaj moroj.

meduzo: scienclat. *medusa*, (Linné), laŭ la kapo — simile aspektanta — de mitologia *Meduzo*.

mentoro: fr. *mentor*, laŭ la nomo de *Mentoro*, la fidela konsilanto de Telemako en Odiseo kaj precipe en *Aventures de Télémaque* de Fénelon (1699).

merkredo: fr. *mercredi*, lat. *mercuri dies* «tago de dio Merkuro».

mirabelo: fr. *mirabelle*, laŭ sudfranca urbeto *Mirabel*.

mono: angl. *money*, lat. *moneta*, laŭ latina alnomo de Junono (*Juno Moneta*), ĉar monfabrikejo en antikva Romo estis apud ŝia templo.

muslina: fr. *mousseline*, laŭ Mezopotamia urbo *Mosul* .

nankeno: fr. *nankin*, laŭ ĉina urbo *Nankiŝ* .

nikelo: nomo donita al la metalo de Svedo Cronstedt (1754), laŭ *Nick* *Nick*, nordmitologia koboldo, kies antikva nomo verŝajne miksiĝis kun derivaĵoj de *Nikolao*.

nikotino: scienclat. *nicotina*, laŭ Johano Nicot, franca ambasadoro en Lisbono, kiu portis unufoje tabakon al sia reĝino en 1560.

nizo: scienclat. *nisus*, laŭ nomo de Megara reĝo *Nizo* (*Nisus*) transformita, laŭ la mitologio, en la nomita birdo.

palinuro: scienclat. *palinurus*, laŭ nomo de *Palinuro*, piloto de *Eneo*.

pamfleto: angl. *pamphlet* (aperanta en XIV jarĉ.), verŝajne ĝeneraligita uzado de nomo de mezepoka verketo *Pamfilo aŭ pri Amo* (treege konata dum XIII-XIV jarĉ.).

pantalono: fr. *pantalon*, vestaĵo de itala masko *Pantalono* (XVI jarĉ.), maljunulo saĝa kaj iom avara. Unue la masko estis simbolo de Venecianoj, ĉe kiuj la nomo *Pantalono* estis tre ofta.

paskvilo: germ. *Pasquill*, de itala *pasquillo* (poste *pasquinata*), satiro afiŝata al statuoj de Pasquino en Romo (XVI jarĉ.).

peonio: scienclat. *paeonia*, laŭ *Paeon*, gr. Παίων, alnomo de Apolono, pro ĝiaj supozitaj medicinaj kvalitoj.

pergameno: lat. *pergamena*, t. e. skribmembrano el Pergamo ĉefurbo de Mizio (en Malgrandazio), kie pergameno estis eltrovata.

persiko: lat. *persica*, *persicum malum*, «persa frukto», pro ĝia devenloko.

pigmeo: lat. *Pygmaeus*, gr. Πυγμαίος, laŭ Etiopia legenda popolo de tre malgranda kresko.

pistolo: it. *pistola* revolvero (antikve ponardo) fabrikita en Toskana urbo «*Pistoia*»

polko: pol. *polka* «pola balo» (kp. *mazurko*).

pulĉinelo: it. *pulcinella*, laŭ nomo de masko *Pulcinella*.

punca: fr. *ponceau*, laŭ **punicellus*? (lat. *punicus* ruĝkolora; ĉar Fenicoj kaj Kartaganoj — *Poeni*, *Punici* — produktis kaj importis purpuron en Romon).

rabarbo: lat. *rhabarbarum*, laŭ antikva skita nomo de rivero *Volga* (Rha. gr. Ρῶς)

romano, *romanco*, *romantiko*, diversaj produktaĵoj de latinida (t. e. novromana) literaturo kaj vivo: v. precipe G. Paris en *Romania* I 1-22; P. Voelker en *Zeitschr. für rom Philologie* X 485-525.

sardelo: it. *sardella*, lat. *sardina*, gr. σαρδίνη «sardinia fiŝo»

sifiliso: scienclat. *syphilis*. laŭ latina poemo *Syphilis, sive Morbus Gallicus* (1530) de itala kuracisto G. Fralastoro: la protagonisto *Syphilus* suferas je la nomita malsano.

silueto: fr. *silhouette*, laŭ la nomo de franca financkontrolisto E. de *Silhouette* (1759), ĉu pro tio ke li eltrovis tiun bildmanieron, ĉu pro lia granda ŝparemo (aplikita al malmultekostaj bildoj), ĉu pro lia efemera ministreco.

sklavo: mezep. lat. *slavus*, *sclavus* t. e. «Slavo». Slavoj estis ofte vendita kiel sklavoj en Okcidento je la fino de la unua jarmilo p. K.

ŝovinismo: fr. *chauvinisme*, laŭ *Nicholas Chauvin*, soldato dum la Revolucio kaj la unua Imperio, prezentata en komedio de Scribe.

ŝovinisto: fr. *chauviniste*, v. supre.

ŝrapnelo: angl. *shrapnell*. laŭ nomo de angla artilerigeneralo samnoma (1825).

talero: germ. *T(h)aler* (kaj *dolaro*, angl. *dollar*), de *Joachimstaler*, monero presita en *Joachimstal* en Bohemio (1519).

tarantelo: it. *tarantella*, danco iom similanta, pro ĝiaj rapidaj movoj, la konvulsiojn de homoj morditaj de *tarantulo* (v.).

tarantulo: scienclat. *lycosa tarantula*, laŭ suditala urbo *Taranto*.

turkiso: germ. *Türkis*, it. *turchese*, «Turka ŝtono.»

uragano: it. *uragano*, hisp. *huracán*, laŭ Amerika diaĵo *Huracan*.

utopio: laŭ fantazia insulo *Utopio* (*Utopia*: gr. *ού νε: τόπος* loko), priskribita de angla verkisto kaj ministro T. More (1518).

vendredo: fr. *vendredi*, lat. *Veneris dies* «tago de diino *Venuso*».

veneno: lat. *venenum*, antikve «magia trinkaĵo», laŭ nomo de diino *Venuso*, «amtrinkaĵo».

verdigro: fr. *vert-de-gris*, antikve *vert-de Grice*, t. e. «Greklanda verdaĵo.»

vulkano: it. *vulcano*, laŭ nomo de insuleto *Vulcano*, kiun la antikvuloj kredis restadejo de dio *Vulcano*.

zuavo: fr. *zouave*, laŭ kabila gento, kiu donis la unuajn soldatojn al la franca tianoma korpuso.

BRUNO MIGLIORINI

Premiita ĉe la Xaj. Internaciaj Floraj Ludoj

Fajreroj


Internacia Konferenco por Uzo de Esperanto en Komerco kaj Industrio okazos la 14-17an de Majo 1925 dum la Foiro de Paris kiu unuafoje estos internacia. La Konferenco estas protektata kaj monhelpata de la Paris-a Komerca Ĉambro, de la foiro de Paris kaj de gravaj komercaj firmaoj kaj personoj. Ĉiuj Komercaj Ĉambroj kaj Foiroj estis invitataj kaj multaj jam aligis kaj sendos delegitojn. Ĉiuj komercaj grupoj kaj personoj rajtas peti inviti ojn. Kiel praktika eksperimento, en la Foiro de Paris, la Halo de la Moderna Oficejo (Hall du Bureau Moderne) enhavos plurajn ekspoziciojn en kiuj deĵoros oficistoj parolantaj Esperante. Estas dezirinde ke ĉiuj Esperantistoj kiuj vizitos Paris-on dum Majo iru al la Halo de la Moderna Oficejo en la Foiro de Paris kaj petu informojn Esperanto. — ESPERANTO ET COMMERCE, 20 r de l'Arc-de-Triomphe, PARIS 17 e

Barcelona Radiotelefonia Esperanta Sukceso. — La inteligenta inĝeniero kaj membro de la direktanta komitato de «Radio Barcelono» sinjoro Guillén, ĉeestis, kiel oficiala reprezentanto de Hispana Registaro, en la «2.^a Eŭropa Konferenco internacia pri Radioaŭdigado», kiu okazos la 3^{an}. de aprilo en Ĝenevo, alvokita de la Sekretario de la Societo de Nacioj. La esperantaj provoj faritaj en la Barcelona Stacio varbis S-ron. Guillén al nia kara lingvo, kaj certe li voĉdonos favore ĉiujn demandojn, kiuj rilatos Esperanton. — Ĉe la unua konferenco, okazinta en la pasinta jaro, oni aprobis kelkajn konkludojn, publikigitajn en franca lingvo kaj tradukitajn al Esperanto; per unu el tiuj konkludoj oni petas la radioaŭdigantajn staciojn, ke ili bonvolu aŭdiĝi regule paroladojn kaj kursojn de Esperanto. — «Radio Barcelona» helpe de K. E. F. kaj de S-ro. Guillén, plenumas tiun peton, ĉar komence de la 1^a de aprilo, ĉiumerkrede je la naŭa vespere, laŭ ni diras en alia fajrero, S-ro. Domènech gvidos esperantan kurson por komencantoj: sinsekve klarigos alian prahikan kurson de Esperanto S-ro. Dalmau, kaj poste S-ro Grau, fraŭlino Castellví k. a. ankaŭ partoprenos en tiu radia propagando.

PALMA DE MALLORCA



Urbodomo de Palma



Korto de la Domo de la Marquizo de Vivot

Programo de la XII^a Kongreso de K. E. F.

21-24 de Majo de 1925 — Palma de Mallorca

UNUA TAGO

Matene: Alveno de la gekongresanoj — Prezento de la akceptejo por la disdonado de la gvidlibro kaj Kongresinsigno. — Vizito al la Aŭtoritatuloj. — Solena Meso kun esperanta prediko. — Malferma kunsido de la Kongreso.

Posttagmeze: Labora kunsido de la Kongreso. — Ekzamenoj.

DUA TAGO

Matene: Ferma kunsido de la Kongreso. — Festo nomita «Floraj Ludoj»

Posttagmeze: Oficiala Festeno. — Koncerto.

Vespere: Kantaŭdaĵo de *Orfeo Mallorquí*.

TRIA TAGO

Matene: Vizito al la urbo, al ĝiaj monumentoj, muzeoj k. c.

Posttagmeze: Vizito al la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

KVARA TAGO

Ekskurso al la famaj kavernoj Manacor.

Post la Kongreso oni povas efektiviĝi diversajn tre allogajn ekskursojn, nome: Al Sóller; al Valldemossa, Miramar, Deyá kaj Sóller; al Torento de Pareis; al la Monaĥejo de Lluch; al Pollensa; al Andraitx, Estallenchs, Banyalbufar kaj Esporlas. Ĉiun el tiuj ĉi ekskursoj oni povas efektiviĝi en unu tago.

Kondiĉoj de «Empresa Soler» por la kongresanoj:

Prezoj por nur irrevena marveturo Barcelona-Palma:

En 1 ^a klaso	. ptoj. 95'—	2 ^a klaso	. ptoj. 60'—
» 3 ^a »	. » 33'—	4 ^a »	. » 19'50

Prezoj por irreveno, dumkongresaj loĝado kaj ekskursoj:

1 ^a klaso	. ptoj. 195'—	2 ^a klaso	. ptoj. 125'—
3 ^a »	. » 85'—	4 ^a »	. » 70'—

Tiuj specialaj prezoj estas por limigita nombro da: 30 enskribiĝintoj por 1^a klaso; 30 por 2^a, kaj 40 por 3^a; escepte por 4^a klaso kies nombro estas senlima kaj la veturo sur la ferdeko.

Ni atentigas, do, ke ĉiuj volantaj profiti la specialajn kondiĉojn de la tri limigitaj klasoj rapidu enskribiĝi sin.

Por enskribiĝo sendu plej baldaŭ minimume 10 ptojn. kiel garantion al la jena adreso: Liceu Dalmau, carrer València, 245, Barcelona. La monon sendu per poŝtmandato aŭ bankbiletoj.

Forvetura enŝipiĝo en Barcelona: la 21 Majo je la 8'30 vespere.

Revena enŝipiĝo en Palma, la 24-5 Majo je la 8'30 vespere.

Alveno la morgaŭan tagon je la 7^a matene.

Kongresaj sciigoj

Grupaj Standardoj. — La O. K. insiste petas al la Grupoj, ke ili kunportu siajn standardojn. Ju pli multaj standardoj flagros tra la urbo, des pli efikos la Kongreso ĉe la Palmano.

Salutado de delegitoj. — Kiel kutime, delegito de ĉiu esperanta societo salutos la Kongreson dum la Malferma Kunsido, tuj post la parolado de la prezidanto.

Ekzamenoj. — Por faciligi ilian aranĝon, la ekzamenotoj bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ al la O. K. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de *kapableco* kaj *profesoreco*.

Kongreskarto. — La O. K. presigis specialan karton por la kongresanoj. Por ricevi ĝin estas nepre necese ke ĉiuj partoprenontoj sendu tujan aliĝon al la prezidanto de la O. K., Sro. Narciso Bofill, Sindikato 188, Palma de Mallorca, kiu estas senpaga por K. E. Fanoj, kaj kostas nur 5 ptojn. por aliaj samideanoj.

Kongreslibro kaj insigno. — Ĉiu kongresano ricevos ĉe la Akceptejo la kongreslibron kaj insignon kontraŭ prezento de la ĝustatempe petita kongreskarto.

Labora Kunsido. — Ĝi okazos laŭ la jena tagordo: sekretaria raporto, aprobo de bilanco, disku tode prezentitaj proponoj, elekto de komitatanoj kaj akcepto de kongresurbo por 1926. — Ĉiu federaciano portu kun si la kvitancon 1925 por eventuala voĉdonado. La diversaj grupoj aliĝintaj kaj pagintaj la federacian kotizaĵon ricevos ĝustatempe la diversajn kvitancojn.

Oficiala Festeno. — Ĉeestontoj enskribiĝu antaŭ la 15 de majo. Oni sendu la enskribon al Sro. Bofill.

Antaŭvido. — Tiuj feliĉaj kamaradoj kiuj povos veturi al Palma por ĉeesto pli longa ol la oficiale kvartaga Kongreso estas petataj por faciligo de veturo kaj loĝado iri al Palma antaŭ la 21 de Majo.

PALMA DE MALLORCA



Korto de la Domo Oleo



Haveno de Palma

XI^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Listo de verkoj ricevitaj (fino)

36. Laŭ la maniero de Rubén Darío. — 37. Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero ol filozofio klarigas. — 38. Majfloro. — 39. Maltrankvilo. — 40. Quare fremuerunt gentes...?. — 41. Fjodor. — 42. Fundamento kaj fideleco. — 43. Natura. — 44. Noktmeza batalo. — 45. Ami... ami... ami!! — 46. La patrujo super ĉio. — 47. Komuna sorto. — 48. Larmiginta ĝojo. — 49. Se la polvohomo meditas. — 50. Ĉiela graco-hora paco. — 51. Se socio pekas; amo krimas. — 52. Rememoroj. — 53. Malofta temo. — 54. Fata Morgana. — 55. Mimemo. — 56. Sankta vesper', paca vesper'. — 57. Supren la kapon! — 58. Arbara silento. — 59. Vi estas prava, etulo. — 60. Laboro de l'mano - de l' koro la sano. — 61. Beninda malsato. — 62. Obstupescite cœli.! — 63. Ŝanĝemeco. — 64. Vojo, Vereco kaj Vivo. — 65. Lori. — 66. Ŝajni kaj esti, jen diferenco. — 67. Fortuno favoras kuraĝulon. — 68. Kio komenciĝas devas nepre finiĝi. — 69. Pekoj de patro persekutas idon. — 70. La bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en Paradizo. — 71. La vivo estas songo, kaj la amo la suno de eterna maja tago. — 72. Vian ĉielon kovru, Zeŭs!. — 73. Plaĉi al ĉiuj neniu sukcesis. — 74. Tra l'mondo sonoru la vortoj de Hafis. — 75. Kiom da kapoj tiom da ĉapoĵ. — 76. Ex abundantia cordis... — 77. Kiel ĵusnasko al glor'Morinto. — 78. Al ruĝa kruco. — 79. Priskribaj sonetoj. — 80. Kisu sed kore. — 81. Al senmakula Mario. — 82. Du ĵaroj pasigitaj en pensiulejo estas la plej bona bazo de la edukiteco. — 83. Parolantaj ŝtonoj. — 84. Ridanta vizaĝo. — 85. Libere spiri ne signifas vivi. — 86. Trosevereco estas fiereco. — 87. Turbano kaj duonluno. — 88. Eĉ la naturo parolas esperante. — 89. Canigó. — 90. Rondalla del Vallespir. — 91. Silento estas oro. — 92. Amor omnia vincit. — 93. Sóc al país dels tarongers florits. — 94. De quan les bèsties paraven. 95. Vindicamus hereditatem patrum nostrorum. — 96. Konsolo. — 97. Valoraj pensoj. — 98. Amo diverse komprenita. — 99. Mi amas frenezulojn. — 100. Malamikete de las nacjes Kadó, kadó, jam temp'está... — 101. Ad pédem litteram. — 102. Per esperanto al repaciĝo kaj konkordo. — 103. Hundo kiu bojas ne... — 104. Herooj sen patrujo. — 105. La Fianĉino de la Morto. — 106. Konstantinopolo. — 107. Asonancoj. — 108. Els ulls són l'espill de l'ànima. — 109. No hi fa res que m'enganyis. — 110. Patrino kaj infano. — 111. Amo - plej supera rajto.

VERDIKTO. Nia maja numero publikigos la verdikton.

DANKON sinceran al la diversaj gazetoj, kiuj bonvolis represigi la Alvokon al la XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Antaŭparolo al lernolibro*)

La problemo pri internacia lingvo ne estas pure «lingvistika», sed ankaŭ, kaj eble precipe, «socia». La perfekteco tie ci sidas malpli en la lingvo mem, ol en la plena akordo de tiuj, kiuj ĝin uzas.

Krei universalan lingvon *a priori*, postulus unue — se tia kreado estas io alia ol simpla ludo — detalan, zorgan, precizegan klasifikadon de la homaj scioj, kies esprimilo estus tia lingvo. Sed tiu ĉi klasifikado malproksimiĝas des pli, ju pli vastiĝas la kampo de la scienco, ju pli multiĝas sur tiu ĉi kampo novaj vojoj, kiuj siavice disdividiĝas en disvojoj, ĉu inter si paralelaj, ĉu interplektitaj

Unu el la meritoj de D-ro Zamenhof estas, ke li tute alimaniere komprenis la problemon kaj ke ĝian solvon li serĉis *a posteriori*. Li ne kreis lingvon: li eliris la elementojn de sia lingvo el la jam ekzistantaj lingvoj, kies sintezo ĝi estas. Se ni komparas la lingvojn kun fortoj, lia lingvo estas la «rezultanto» de tiuj ĉi fortoj.

Sed, kial li tiamaniere konsideris la demandon? Tial ke, anstataŭ serĉi ian lingvon por la plezuro ĝin kombini pli malpli sukcese, li serĉis antaŭ ĉio, super ĉio, aŭ pli ĝuste, li serĉis *nur* traduki senpere la ideojn, kiuj plenigis lian animon, tiel ke lin komprenu la plej eble granda nombro da homoj, liaj «fratoj». El la koro venas la altaj pensajoj. Tiujn ĉi grandanimajn pensajojn, tiun ĉi profundan amon al la homaro, tiun ĉi ardan deziron alproksimigi la regnon de la paco, ĉion tion ĉi li volis, per ĉiuj siaj fortoj, konigi, komuniki al ĉiuj, kiaj ajn estus iliaj diversaj lingvaĵoj. Por li la lingvo estas *nur ilo*; sed precize el tio konsistas la intima originaleco, la eksterordinara indeco de la lingvo, tiel ke — ilo forĝita por difinita celo: praktika utiligado — ĝi tuj kaj plene taŭgas. La perfekteco de ia ajn instrumento kuŝas ja en la perfekta adaptado al ĝia funkciado, kiun ĉiam celas la bona verkisto!

Komprenigi al multnombraj homoj tion, kio ŝprucis el lia koro, *traduki ideojn*, ne simple vortojn, jen la tasko, kiun prenis sur sin D-ro Zamenhof en la ĝojo kaj doloro de la kreado. Ĉar tiel li komprenis sian taskon, li povis nur forĵeti ĉian sistemon *a priori*, kiu malproksimigus lin de la celo; l plie — ne nur sperta gramatikisto kaj poligloto, sed «apostolo» — devis eltrovi ion tute alian, ol simple lertan kombinaĵon de vortoj kaj de gramatikaj formuloj, ion tute alian, t. e. lingvon, idon de ideo, posedantan propran ekziston, propran animon, *vivantan lingvon*.

Jen, kvankam la lingvo estas rimarkinda laŭ aliaj ecoj, la vera fonto de ĝia tuta forto, jen kial kontraŭ ĉia alia sistemo ĝi konservis kaj konservas sian superecon.

Sed ĉu el la konstato de tiu ĉi fakto rezultas, ke, por la Esperantistoj, estas nepra devo akcepti de tiu, kiun ili nomas: «Majstro», ion alian ol la

lingvon mem, kiun li donis al ili? Ne, tute ne! D-ro Zamenhof deklaris insiste, ke «Esperantistoj estas ĉiuj, kiuj scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj ili ĝin uzas». Se, laŭ deveno, Esperanto ne estis neŭtrala lingvo, t. e. lingvo indiferenta al ĉia ajn socia politika aŭ religia koncepto, tia ĝi fariĝis fakte kaj laŭ la konsento mem de ĝia aŭtoro. Eĉ, se la animo ŝanĝiĝus aŭ ŝanĝiĝis, tio nenion forprenis el la forto de la lingvo: *la vivon ĝi konservas*, kiun ĝi ricevis je sia naskiĝo.

Cetere laŭ alia vidpunkto ankaŭ Esperanto estas tre vivanta lingvo. Ĝi estas nun legata, skribata, eĉ parolata de multe pli da homoj, ol kelkaj aliaj vivantaj lingvoj aŭ dialektoj; ĉiuj kiuj ĝin uzas, malgraŭ la diverseco de la naciaj lingvaĵoj, uzas ĝin same.

Oni riproĉis al Esperanto, ke ĝi estas *artefarita lingvo*! Sed ĉiuj niaj civilizitaj lingvoj estas en tre alta grado artefaritaj kaj fariĝas tiaj ĉiam pli kaj pli sub la potenca influo de la inteligenta volo. *Inter Esperanto kaj la tiel nomataj «naturaj» lingvoj la diferenco estas ne je naturo, sed nur je grado.*

Esperanto estas komuna lingvo, kiel estas ĉiu literatura lingvo aŭ, pli ĝuste, la lingvo uzata de la kulturitaj klasoj interne de la landoj, kiuj uzas saman lingvon; sed Esperanto estas komuna inter popoloj, kies lingvoj estas tre diversaj. Tie kuŝas certe la sola vera danĝero por internacia lingvo, kiu riskas, sub la nacilingvaj influoj, difektiĝi kaj disfali en dialektojn. Sed, ĉar Esperanto estas lingvo precipe legata kaj skribata, lingvo por *ĉiu la dua*, sekve lernita, ne tre verŝajna estas la naskiĝo de dialektoj. Cetere la Esperantistoj antaŭvidis la danĝeron kaj ĝin kontraŭstaris per la kreo de Lingva Komitato kaj Akademio, kies ĉefa, se ne sola tasko estas: konservi la unuecon, komunecon, purecon de la lingvo, akceptante novan vorton, novan esprimmanieron nur, kiam ne kontraŭfundamenta, ĝi estas jam internacie komprenata kaj sufiĉe ĝenerale uzata.

La Esperantistoj estas konvinkitaj, ke ili venkos ĉiujn mokojn de la nesciuloj kaj ĉiajn malfacilaĵojn, kiujn ili survoje renkontas. Ili posedas multajn gazetojn kaj revuojn; ili havas malantaŭ si jam tre riĉan, tre diversan literaturon, kiun ili severe konservas al sia fundamenta libro, la «Fundamento», kie D-ro Zamenhof, por tiel diri, koncentrigis sian lingvon: *tradicion* ili do jam havas. — Multaj internaciaj kongresoj pruvis plie la praktikan taŭgecon de ilia lingvo, kiel parolata lingvo, kiel oratora lingvo.

La esperantistoj ne diskutas pri sia lingvo; ĝin ili uzas. Ili ne dubas, ke fine ĝi enpenetros en la ĝis nun plej malfavorajn mediojn, tial ke utila al ĉiuj, ĝi estas al neniuj malutila. Respektante la naciajn lingvojn, kies purecon ĝi fakte ŝirmas, Esperanto ofendas neniun respektindan senton.

La firmeco de ilia konvinko, de ilia sintenado estas forto kaj garantio de l' fina sukceso.

Th. Cart,
Profesoro ĉe la Alta Lernejo
pri Politikaj Sciencoj

*) 2 Cours Pratique d'Esperanto, préface de M. Th. Cart, Librairie Centrale Esperantiste, 51, rue de Cluchy, Paris. La lernolibro nun estas presata. Red.

Paĝo por lernantoj = Pàgina per a alumnes

La personoj, animaloj kaj aferoj, kies nomoj estas, Les persones, animals i coses, de les quals els noms són substantivoj, kaj estas montrataj en esperanto per finiĝo *o* substantius, i són indicats en esperanto per la terminació *o* en ununombro kaj *oj* en plurnombro, *estas*: staras, sidas, en singular i *oj* en plural *són*: estan drets, seuen, kuŝas, ŝajnas, aspektas, ripozas, dormas, falas, scias, jeuen, semblen, semblen, reposen, dormen, cauen, saben, konas, volas, sentas, pensas, ĝuas, suferas, ridas, coneixen, volen, senten, pensen, gaudeixen, sofreixen, riuen, ploras, vivas, mortas k. c. La personoj, animaloj kaj aferoj ploren, viuen, moren et cetera. Les persones, animals i coses ankaŭ *agas*: venas, iras, laboras, supreniras, malsupreniras, també *obren*: vénen, van, treballen, pugen, baixen, eniras, eliras, parolas, skribas, legas k. c. Kiam homo entren, surten, parlen, escriuen, llegeixen et cetera. Quan un home manĝas, estas manĝanta; io: viando, fiŝo, frukto estas menja, està menjant; quelcom: carn, peix, fruita és manĝata. Mi trinkas akvon: akvo estas trinkata de mi. menjat. Jo bec aigua: aigua és beguda per mi. Hieriaŭ mi diris multajn aferojn. Mi estas dirinta aferojn: aferoj Ahir jo vaig dir moltes coses. Jo he dit coses: coses estas diritaj. Morgaŭ mi vidos vin: mi estas vidonta vin: vi són dites. Demà jo veuré a V.: jo he de veure a V.: V. estas vidota de mi. Edzo amas edzinon kaj edziha d'esser vist per mi. Un marit estima la muller i una muno amas edzon. Ambaŭ estas amantaj kaj amataj. Ni lernas Esperanton: esperanto estas studata de ni. ller estima el marit. Ambdós són amants i amats. Nosaltres aprenem Esperanto: esperanto és estudiat per nosaltres. Mi deziras peti, paroli, komenci, ekzerci, diri, vivi, Jo desitjo demanar, parlar, començar, exercir, dir, viure, vidi, aŭdi, havi, esti. Ĉiuj verboj en esperanto estas regulaj veure, oïr, haver, ésser. Tots verbs en esperanto són regulars kaj finiĝas en infinitivo per *i*, por pasinta tempo per *is*, pasanta i acaben a l'infinitiu en *i*, per passat temps en *is*, present per *as* kaj pasonta per *os*. Nun mi studas, hieraŭ mi studis, en *as* i futur en *os*. Ara jo estudio, ahir jo estudiava, morgaŭ mi studos. demà jo estudiaré.

Fajreroj

Radio-Genève estas fondita. — En la gazeto Esperanto de U. E. A. estas informite ke la radiostacio en Genève funkcias. Ĉar ĝi estas regiona stacio, la komitato sin turnis nur al la svisaj samideanoj, kiuj promesis aĉeti akciojn. Por ke la stacio povu esti bone prizorgata kaj oni baldaŭ estu kapabla mendi pli potencan stacion, la eksterlandaj promesintoj tamen estas petataj jam nun subteni la gravan entreprenon. — Ni vere gratulas U. E. A. por tiu nova kaj grava sukceso de Esperanto, kaj rekomendas al ĉiuj samideanoj ke ili helpu plej malavare por subteno kaj pligravigo de la Esperanto-Radiostacio kiu certe estos baldaŭ la Internacia Radiostacio de Eŭropo.

Averto al K. E. F.-grupoj. — Ni petis letere de ĉiuj ke ili bonvolu sendi al ni plej baldaŭ la plenan liston de la respektivaj geanoj por publikigo en en la Kongreslibro de Palma. Ni tre bedaŭras ke ankoraŭ kelkaj ne plenumis nian peton, kaj tiel ili prokrastigas la presigon de la Kongreslibro. Tiuj Grupoj, kiuj ne estos sendintaj al ni sian liston antaŭ la 25 de aprilo, ne povos aperi en la Kongreslibro, kaj tio malfavoros ilin kaj nian movadon.

Charles Richet. — Antaŭ kelkaj tagoj nia fama samideano honoris Barcelona per sia ĉeesto. Li invitis nian prezidanton partopreni la Konferencon, en kies organizo li efike laboras en Parizo.

Estas tre agrable al ni sciigi ke kelkaj s-anoj fondis en Barcelona «RADIO TELEFONIA ESPERANTA RONDO», kies sidejo estas ĈAN MORITZ (Placo Sepúlveda). La kunvenojn ordinare ĉeestas niaj konataj fervoraj samcelanoj kaj amikoj Dro. Bartomeu, Dro. Bremon, Sroj. Grau, Domènech, Dalmau, Paluzie, Valdepeñas kaj aliaj ne malpli entuziasmaj ol tiuj. Oni bonakceptos esperantistojn dezirantajn la sukcesigon de Esperanto en Radio-sfero.

Ni informas ke «Esperanto-Servo» fondigis en urbo České Budejovice, Zizkova str. 6, Ĉeĥoslovakujo. Ĝi donas informojn senpage ĉiun Esperantiston pri komercaj, negocaj, industriaj, socialaj, k. t. p. demandoj, koncertoj al dirita lando; vendas Esp. librojn de tutmonda literaturo, Esp. gazetojn; liveras unuakvalitajn emajl-kuirvazarajn kaj propagandajn Esp. kraĵonojn kaj cetere. La priservado estos efektivigita ĉiam ĝuste, precize kaj tre kontentige.

Pretigu la Flagojn. — Ni rememorigas al esperantistoj kiuj kongresos en Palma ke ili ne forgesu kunporti la respektivan esp. flagon de sia grupo, okaze de tiea manifestacio. Ni devas forte impresi la Palman publikon.

Experimental Wireless. — La tiel fama radio-gazeto, dezirante montri sian praktikan intereson pri Esperanto, publikigas en siaj paĝoj artikolojn en aŭ pri nia lingvo. Ĝi intencas, se ĝi ricevos sufiĉan subtenon, rezervi unu aŭ pli da paĝoj en ĉiu eldono por teknikaj artikoloj en Esperanto, tiel ke, la gazeto, kvankam presita preskaŭ tute anglalingve, interesos senfaden-amantojn ĉiulandajn. «Experimental Wireless» aperas je komenco de ĉiu monato, kaj estas legata de seriozaj eksperimentistoj. Oni opinias, ke ĝi estas la plej bona radio-gazeto eldonita.

Ni ricevis la februaran numeron, kiu enhavas 5-paĝan Esperantan-Anglan Radio-Vortaron. Tiun artikolon kaj la antaŭe aperintajn kontribuis S-ro Harry A. Epton, Honora Sekretario de la Internacia Radio-Asocio.

La eterne reformema Antido. — Jen la reformo akiris la nomon Esperantido. Post kelka tempo oni nomis ĝin Esperantida kaj nun oni baptis ĝin denove kaj fariĝis Nov-Esperanto. Ni solene promesas ke ni alprenos la reformon de Antido, kiam ni serioze povos pripensi, ke la reformo kaj nomo estas la lasta. Ni estu certaj, ke ni neniam ĵurrompos kaj samtempe povos esti fidelaj fundamentanoj.

Unua laborista olimpiado Frankfurt am Main. — 24-28 julio 1925. Depost multaj jaroj la «Unio internacia por fizika eduko» (2-a. kongreso) estas akceptinta nian lingvon kiel sian internacian korespondlingvon kaj decidis praktike uzi ĝin dum la unua laborista olimpiado okazonta en Frankfurt am Main.

Niaj samideanoj en la nomita urbo alvokas la diverslandajn esperantistajn olimpianojn por ke ili anoncu sian partoprenon al la Esperanto-Fako, Eckenheimerlandstrasse 97, Frankfurt am Main (Germanujo).

Ĉielarko. — Lastatempe ni fanfaronis, ke ni estas flavaj, ruĝaj, k. t. p. Jen alia esperantisto skribis al ni, ke ni estas *separatistoj*, ke ni prezentas Katalunujon subpremita nacio. Ĉu oni baldaŭ kulpigos nin, ke ni vendas batalilojn al la maŭroj? Ni tremas kaj tremas, neniam laciĝas pri ĉi tiuj saĝuloj (?) ĉieaj pensante.

Travestio. — Ĉu vi pagis vian kotizajon al K. E. F.? Se jes, dormu trankvile, se ne, ni certe dormiĝos kaj poste kun larmoj disreviĝos. Kion vi povas hodiaŭ fari, faru kaj la vojon al ni ne baru. (Ni malpermesas la represigon de la ĵusbakita nova proverbo).

Radiotelefonia kaj ĵurnalaj kursoj de Esperanto estas gvidataj de niaj kamaradoj Artur Domènec kaj S. A. T-anoj, en «Radio Barcelona» kaj «Acción Social Obrera» el St. Feliu de Guixols. Vere grava por nia Movado estas la tasko de niaj amikoj.

Nia malnova grupo «Paco kaj Amo» vige laboras, pruvo estas, la multnombra ĉeesto en la kursoj kiujn ĝi subtenas sub la gvido de S-noj J. Albreich kaj L. Domènec, kaj la paroladoj; pasintan monaton paroladis sinjoroj

Delfi Dalmau kaj Jaume Grau, la unua pri Esperanto kaj Radio kaj la lasta pri Esperanto kaj Literaturo; certe tiuj paroladoj inokulis entuziasmon al la novaj lernantoj ĉar ili majstre disvolvis tiujn temojn.

La potenca radia stacio W C C O (Duobla Vo, Co, Co, O), ĉe Minneapoliso kaj Sankta Paŭlo, Usono, dissendos Esperantan Programon de la 23a ĝis la 24a horo, centra tempo (90a meridiano), vendredon, la 24an de Aprilo. Sur la meridiano de Greenwich estos de la 5a ĝis la 6a horo, sabaton, la 25an de Aprilo. La potenco estos kvin kilovatoj kaj la ondlongeco 417 metroj. La programo estos koncerto kun anoncoj esperantaj, parolado esperanta kaj esperantaj kantoj. — Ĉiun esperantiston, kiu legas tiun ĉi avizon, oni uĝe petas plenumi tri devojn. — Unue: ke li penu, aŭ per sia ricevaparato aŭ per ricevaparato de amiko, ricevi la programon, kaj nepre skribu al Gold Medal Station WCCO, Minneapolis, Minn., Usono, pri sia sukceso aŭ malsukceso, priskribante la tipon de ricevilo; — Due: ke li petegu al la Lokaj kaj landaj ĵurnaloj esperantaj ke ili represu tiun ĉi avizon; — Trie: ke li influu la ĵurnalojn kaj precipe la radiajn ĵurnalojn ke ili donu kiel eble la plej grandan publikecon al la tutmonda penado. — Ni montru kia vasta estas Esperantujo.

La pagoj por K. E. F. — Por faciligo ni pretigis akceptejon de pagoj de ĵarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ egalvaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendataj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, kaj, «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. kostas 50 pesetajn centimojn. — Petu ankaŭ esperanto-librojn kaj ĵurnalojn en tiuj Librejoj por ke ili interesiĝu pri esperantaĵoj.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Palma de Mallorca. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por aljuĝo de atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingi de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramática» (curs mitjà)

de Pompeu Fabra, kaj de la «Ekzercaro» de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de kapablo estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de profesoreco estas ankaŭ necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bonaj helpaj libroj estas la vortaroj «Esperanto-Català» kaj «Català-Esperanto» kaj la «Gramàtica Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallès, la vortaro Kabe kaj la «Oficiala Klasika Libro de Esperanto, kolekto de la Akademio, eldonita de Esp. Centra Librejo, 51, Rue Clichy, Paris (9e.).



Libera Rubriko

Al la gvidantoj de U. E. A.

En la lasta numero de «Kataluna Esperantisto» unufoje aperis reklamo pri U. E. A. En tiu sama numero aperis ankaŭ sciigo pri la decido de la Komitato de U. E. A. daŭrigi la sisteman neuzon de la sufikso *uj* por landnomoj, malgraŭ la peto de la Prezidanto de la Lingva Akademio reveni al la uzado, laŭ la Zamenhofa tradicio, de la sufikso *uj*, samtempe kun la formo *lando* kaj la internacia finaĵo *io*.

Nu, mi devas diri ke por mi la tuta forto de la reklamo pri U. E. A., sur la kovriloj de «Kat. Esp.», estis nuligata de la samtempa sciigo ke U. E. A. ALMENAŬ malatentas la konsilojn de la Prezidanto de la Akademio.

Mi volas atentigi la gvidantojn de U. E. A. pri tio, ke la *celo* de ilia asocio estas nur *praktika*; do ili devas labori por Esperanto nur en la *praktikaj* aferoj kaj ne devas preni sur sin la taskon plibonigi aŭ reformi la lingvon. Estas vero, ke ĉiu esperantisto individue povas kontribui al la evoluigo de la lingvo, sed pri tio ne devas zorgi *oficiala asocio* kiu jam havas sian difinitan *praktikan* celon. U. E. A. laboru en sia propra kampo (kie estas jam sufiĉa laboro) kaj lasu al la lingvaj institucioj kaj al la lingvistoj kaj literaturistoj ĝenerale la prilingvajn zorgojn. Pri praktikaj aplikoj de Esperanto, U. E. A. havu plenan liberecon; sed ĝi ne tuŝu la lingvajn demandojn, por kiuj ne estas sufiĉe preparitaj la gvidantoj de U. E. A. — simple praktikistoj kaj organizantoj.

La nunaj gvidantoj de U. E. A., malgraŭ siaj meritoj en aliaj aspektoj, estas kulpaj pri lingva maldisciplino, ĉar ili persiste evitas formojn plene Fundamentajn kaj pli persiste ankoraŭ uzadas formojn malrekomenditajn de la Lingva Akademio. Se ili ne plenumas la *devon* respekti la lingvon, ili ne rajtas aljuĝi al ĉiu esperantisto la *devon* aliĝi al U. E. A.

Kiam U. E. A. ne plu miksiĝos en lingvajn aferojn, ĝi ne bezonos fari tion da reklamoj por plikreskigi la nombron de siaj membroj.

JAUME GRAU CASAS
eks-Direktoro de «Kat. Esp.»

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (ĕ), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix a formar

el femení
heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

Mi skribas
Jo esric

IS

temps passat

skribis
escriví

OS

temps futur

skribos
escriuré

US

mode condicional

skribus
escriuria

U

mode imperatiu o subjunctiu

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU:



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FRANKOJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONO

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

Un gran mistero per als Eminents ignorants de l'Esperanto

«L' Ere Nouvelle», diari parisenc dels que pesen en el periodisme de França, país de llengua nacional de prestigi internacional, publica, ja fa mesos, en fulletó, com a novel·la d'interès literari general a França, la obra «Çu li» escrita originalment en Esperanto pel Dr. Vallienne, i traduïda de l'Esperanto al francès per Ernest Archdeacon.

Els intel·lectuals de Barcelona poden constatar aquest fet, puix que en alguna biblioteca trobaran «L' Ere Nouvelle» de Paris, i també el trobaran en alguns quioscos de les Rambles.

Les idees preconcebudes i els prejudicis són falsos si són contradits pels fets.

La Federació Catalana Esperantista ofereix totes les dades necessàries als nostres intel·lectuals que vulguin sortir de dubtes relativament a un fet de tanta transcendència científica i literària com és la solució del problema de la llengua internacional en tots els ordres per mitjà de l'Esperanto.

Fajreroj

«Sud-Ameriko». Oficiala organo de la Urugvaja Esperanto-Societo. Aperas monate. Redakcio: Calle Rio Branco 1341, Montevideo (Urugvajo). Jaro I, N-ro 1, Januaro 1925. [4 p., 19,5 × 27 cm.] Abonprezo ne indikita. Ĝia Direktoro estas nia kataluna samideano Santiago Gomis, inĝeniero, kiu de antaŭ longe loĝas en Sudameriko, kaj ĉiam laboris por nia afero.

XVII Universala Kongreso de Esperanto. — Genève, 2. — 7 Aŭgusto 1925.

Administra informilo: Adreso: XVII. Kongreso de Esperanto, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

Kotizo: 25 Fr. sv. por persono: UEA-anoj 20 Fr. sv.; Junuloj (UEA-anoj) 15 Fr. sv.

Turista bileto, entenanta la kongreskotizon, biletojn por somera universitato, teatro, balo, ŝipekskurso, unusemajna loĝado kaj mangado, kun ĉiuj trinkmonoj:

<i>Simpla:</i> 110 Fr. (ruĝa)	<i>Meza:</i> 140 Fr. (verda)	<i>Unuaranga:</i> 200 Fr. (flava)	<i>Luksa:</i> 300 Fr. (blanka)
----------------------------------	---------------------------------	--------------------------------------	-----------------------------------

Tiuj prezoj ne entenas la vojaĝkoston. — Repago okaze de neĉeesto malpli 20 fr. (kongreskotizo).

Ĉar la nombro de la turistaj biletoj estas limigita pro hotelaj kaj teatraj aranĝoj, oni mendu ilin tuj. La mendlisto estos firmata tre baldaŭ!

Vizo de pasportoj — El jenaj landoj la kongresanoj rajtas eniri Svislandon *sen vizo*, nur prezentante sian nacian pasporton: *Francujo, Liechtenstein, Belgujo, Danujo, Brita Imperio, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Hispanujo, ĉiuj ŝtatoj de Ameriko, Hinujo, Japanujo.*

Alilandaj kongresanoj devas prezenti sian pasporton al la svisa konsulejo, kie ili ricevos senpagan vizon, montrante sian kongreskarton. Kie ekzistas specialaj kondiĉoj pri vojaĝo eksterlanden, la L. K. K. faros necesajn klopodojn ĉe la koncerna registaro.

Pagmaniero: Laŭ interkonsento kun UEA ĝiaj poŝtĉekkontoj diverslandaj kun adreso de UEA povas esti uzataj.

Oomoto, la nova spirita movado. Ajabe, Japanlando [1924: Oomoto Fremdlanden-Propaganda Oficejo. [40 p., 12,5 × 18,5 cm.] 0,300 Sm.

Elektaj. -- Jen la rezultato de la voĉdonoj en la Lingvan Komitaton kaj en la Akademion: Voĉdonintoj; 92. -- Lingva Komitato: S-ro Behrendt (89) voĉoj, — S-ro de Lajarte (88), — S-ro Tellini (86), — F-ino Zschepank (81), — S-ro Kasteer (78). Ĉiuj elektitaj. — Akademio. (6 postenoj). 1. S-ro Christaller (78) voĉoj, — 2. S-ro Warden (72), — 3. S-ro Nylén (67), — 4. Isbrucker (65), — 5. S-ro Bailey (47), — 6. Migliorini (47), — S-ro Behrendt (41), — S-ro Fisher (40), — S-ro Setälä (39), — S-ro Collinson (30), — S-ro Solà (14), — S-ro Butin (12). La ses unuaj, elektitaj.

XII^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

21-25 de majo 1925 - Palma de Mallorca

PROGRAMO

UNUA TAGO. — 22-Majo 1925

Matene: Je la 7^a; Alveno de la gekongresanoj.

Je la 8^a; Prezento de la akceptejo (Esperantista Klubo Palma; Mesquida, 6) por la disdonado de la gvidlibro kaj Kongresinsigno.

Je la 9^a; Vizito al la Aŭtoritatuloj.

Je la 10³⁰; Solena Meso kun esperanta prediko de Preĝejo Sankta Francisco.

Je la 12^a; Malferma kunsido de la Kongreso, de «Associació per la Cultura de Mallorca» (str. Socors, 62).

Posttagmeze: Je la 15³⁰; Esperanta Ekspozicio de Esperantista Klubo Palma (Mesquida, 6) kaj Ekzamenoj de «Associació per la Cultura de Mallorca» (Socors, 62).

Je la 17³⁰; Labora kunsido de la Kongreso de «Associació per la Cultura de Mallorca».

DUA TAGO. — 23-Majo 1925

Matene: Je la 9^a; Ferma kunsido de la Kongreso de «Associació per la Cultura de Mallorca» (Socors, 62).

Je la 11^a; Festo nomita «Floraj Ludoj» de «Teatro Principal».

Posttagmeze: Je la 13³⁰; Oficiala Festeno de «Grand Hotel».

Je la 16³⁰; Koncerto de «Teatro Lírico».

Vespere: Je la 21^a; Kantaŭdaĵo de «Orfeo Mallorquí» de «Teatro Principal».

TRIA TAGO. — 24-Majo 1925

Matene: Vizito al la urbo, al ĝiaj monumentoj, muzeoj, k. c.

Posttagmeze: Vizito al la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

KVARA TAGO. — 25-Majo 1925

Ekskurso al la famaj kavoj el Manacor.

Post la Kongreso oni povas efektiviĝi diversajn tre allogajn ekskursojn, nome: al Sóller; al Valldemossa, Miramar, Deyà kaj Sóller; al Torento de Pareis; al la Monaĥejo de Lluch; al Pollensa; al Andraitx, Estallenchs, Banyalbufar kaj Esporles. Ĉiun el tiuj ĉi ekskursoj oni povas efektiviĝi en unu tago.

*Kataluna Esperantista Majo 1925 No. 94 Zinchen
Anschlag auf Seite 137*



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

XII^a Kongreso de Nia Federacio

22-25 Majo en Palma de Mallorca

SOLENA MOMENTO

NI AMASE KONGRESU

Nia ĝojo estas granda. Nia spiro estas profunda. Ni atingis preskaŭ la pinton de la alta kaj abrupta monto de nia Kongreso en Palma. La Komitato de K. E. F. kaj nia kuraĝega prezidanto de la loka Komitato en la Baleara ĉefurbo devis foje eĉ malesperi pri la eblo pro malnia volo.

Sed la forto de nia idealo estas tiel kuraĝiga ĉe ni ke eĉ plej altdevena baro ne timigis nin, sed, kontraŭe nin incitis al pli grandaj klopodoj kaj oferoj.

En la mondo estas ĉiam kompenso. Kaj ju pli materia estas batado kontraŭ bono des pli sentebla kaj sentiga estas bono: Atmosfero, etero, animo fortigas responde al batoj de l'sorto kaj moko de l'homoj. La bono, la vero, la belo, post krizoj kaj krimoj, militoj kaj faloj de homoj, --instrumentaj etuloj de ili, -- iom post iom certe progresas, kaj ni iras malgraŭ ĉio kaj spite de ĉiuj al regnoj pli belaj, pli kaj pli bonaj kaj veraj.

En la mondo estas solenaj momentoj kiuj sentigas nin pli pure en la vojo de progreso kaj altiĝo. Esperanto-Kongreso, kun Floraj Ludoj, en belega lando: la XII^a Kongreso de nia Federacio, en Palma de Mallorca, estas plej certa okazo por ĝuo plej nobla.

Amikoj, samideanoj, ĝis la pene kaj sopire celita renkontiĝo en Palma post kelkaj tagoj.

Klariga Noto de komprenema Samideano

Kun vera ĝojo ni legis en la aprila numero de nia preskolego "La Suno Hispana" du "Notojn de Leganto", kiuj vidigas esperigajn horizontojn por vigligo kaj organizo de la hispanlingva samideanaro.

La unua el tiuj du "notoj" estas revoko ke "hispanaj esperantistoj el ĉiuj regionoj unuiĝu".

La duan noton ni volas, ni devas represi tutan:

"Jam mi haltas ĉe la vorto, kiun mi volonte estus evitinta. Vere, nia eminenta pioniro V. O. de Allende estas prava dirante, ke «kun relativa malfacileco la hispanaj esperantistoj iras la vojon de organizado». Organizo, grupiĝo, unuiĝo -- jen kio ŝajne ne facile resonas en la koroj de niaj samideanoj. Bilbao estis grava paŝo antaŭen en tiu direkto. «Sed restas ankoraŭ io farota». Allende diras, ke konfederacia regularo estos aprokata de la Registaro nur post aprobo de la unuopaj Federaciaj statutoj. Tio supozas unue la ekziston de Federacioj en ĉiuj regionoj, kio por mi ŝajnas peza postulo. Ĉu la plej simpla organiza linio ne estas grupo -- konfederacio? Unue ni ne disigu niajn malmultajn fortojn! Federacioj ne estas nepre necesaj, sed konfederacio jes. Tiuj nun devus ludi la rolon de «teritorioj» kiel ĉe UEA, ne esti memstaraj organizaĵoj kun granda estrara aparato, aparta kotizo kaj tre duba realvaloro. La grupoj estu la ĉeloj, el kiuj konsistas la tutlanda organizaĵo kiel en abelŝtato.

Ankaŭ pri la nomo mi ne konsentas. Mia sincera penso estas: Niaj katalun-lingvaj samcelanoj jam havas sian fortan, bone funkciantan federacion, kiu por ili samtempe estas nacia asocio kiel ekz. Brita E. asocio, Germana E. asocio k. t. p. La portugaloj samideanoj fondis laŭ ricevita informo antaŭ nelonge nacian federacion, kiu reprezentos la «portugalan asocion». Do, la nomo de nia organizaĵo aŭ societo aŭ unuiĝo tute logike devas esti: Hispana Esperanto-Asocio (HEA) Ĉiu el tiuj 3 asocioj publikigos sian organon. La katalunoj «Kataluna'n Esperantisto'n», la hispanoj LA SUNO'N HISPANA'N kaj verŝajne ankaŭ la portugaloj povos eldoni naci-lingvan-esperantan gazeton.

Ĉiuj tri asocioj, tiamaniere povos labori neĝenite kaj ne enmiksante sin en nacilingvaj aŭ regionaj aferoj, ĉiu por si kaj por Esperanto. Eble -- kaj mi esperas ke baldaŭ venos la tempo, kiam super tiuj tri *naciaj* asocioj fondiĝos el ili unu *sennacia*, tiu, kiun ni hodiaŭ nomas tute malprave «Iberia Konfederacio». Sed tiu de mi imagata havas malmulte da simileco kun la nuna.

El ĉio supre dirita sekvas, ke rilate al gazeto por Hispana Esperanto-Asocio ne povas ekzisti ia dubo. Ĝi estas propagandilo por *nacia* societo, ĝi havas la taskon varbi inter nacilingvanoj, kaj tial ĝia plej taŭga, plej trafa

formo estas tiu de LA SUNO HISPANA. Se poste ia: «Iberia Konfederacio» kreos alian gazeton, tiu kompreneble ne povos aperi kun trilingva teksto kaj Esperanto sed simple en nia internacia idiomo. Ĝi tamen neniel tuŝas aŭ anstataŭas la naciajn asocian organon.

Mi konscias, ke miaj pensoj, sugestoj kaj rimarkoj ne estas neeraremaj. Malgraŭ tio mi komunikas ilin al vi, hispanaj esperantistoj, kaj mi esperas ke ili kunhelpu al la progresigo de nia sankta afero sude de la Pireneoj. Se tion mi nur iomete atingus, ne estus vane skribitaj la notoj de leganto.

JOBO"

Kiu inteligenta kompronema samideano konanta la hispanan organizan demandon de la Esperanto-Movado sin kaŝas sub la nomo "Jobo"? Ĉu eble nia kataluna Jacint Bremón? Ĉu la madridaj pioniroj Perogordo aŭ Inglada? Ĉu la valenciaj Piñó aŭ Caplliure? Ĉu la Saragosaj Gastón aŭ Maynar? Ĉu la kordovaj Azorín aŭ Serrano? Ĉu eble la militisto Mangada atente legis kaj bone komprenas la Zamenhofan principon de «Homaranismo» ke «la identigado de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretekstado de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, devas esti afero rigardata kiel restaĵo de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo»? Ĉu estas fine komprenata ke en la Iberia duoninsulo estas almenaŭ kvar gentoj: la hispanlingva, la katalunlingva, la portugallingva, kaj la basklingva?

En la regnoj kie estas malsamaj lingvoj, Esperanto estas la sola neŭtrale-homa, la sola intergenta, internacia, komuna, paciga lingvo. — Ĉu? — En la regnoj, kie estas malsamaj gentoj, la principoj de homaranismo, kaj eĉ la svisa reĝimo de respekto kaj samrajteco, estas firma bazo de paco kaj amo, ĉar nur maljusteco akriĝas interhomajn diferencojn. — Kontraŭe, en justa reĝimo, la diferencoj interhomaj estas ĉarmo kaj klarigo de vivo: ĉu estus iala vivado de homoj ĉiuj korpe samformaj kaj spirite samgradaj?

Nuntempe se iuj homoj en la mondo vere povas paci kaj interfratiĝi estas ja la esperantistoj. Bonveninta semideano «Jobo», sub via prezido klariga kaj komprenema la katalunlingvaj esperantistoj sin sentas en regno de paco kaj amo ĉie en la Iberia duoninsulo. Kuraĝu prezentiĝi kaj preni kaj teni la bridajn de nia Movado intergrupaj, interfederaciaj, internaciaj, aŭ konfederaciaj kaj estu certa pri nia konsento laŭ via noto.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Pli ŝatas mi...

(Laŭ la maniero de la Kataluno Manuel de Cabanyes)

Printempo kantigas birdetojn sur branĉoj,
 antriloj aŭdiĝas en ĉiu novnesto.
 L'animo en festo pli ŝatas mi kanton
 de cia kisado.

Somero florigas ĉe herboj, floretojn
 kaj bluajn cejanojn sur vasta kamparo.
 Sen ia komparo pli ŝatas mi bluan
 de ciaj okuloj.

Aŭtuno flavigas de l'arboj, foliojn,
 per suno tre pala orumas tagfinon.
 Mi diras l'inklinon: pli ŝatas mi oron
 de ciaj blondharoj.

La Vintro malvarma veteron frostigas
 kaj neĝo flokege blankigas la teron.
 Aŭdetu l'preferon: pli ŝatas mi palon
 de cia blankhaŭto.

Kantetoj printempaj, floretoj someraj,
 aŭtuna orumo aŭ vintra aspekto
 — de l'viv' jen logplekto — ...Pli ŝatas mi ĉarmon
 de cia amado.

CHARLES BRUNET

(Menciita de la Xaj. Floraj Ludoj).

Lastahore ni informiĝis, ke la aŭtoro de la verko premiita per la Natura Floro estas nia kara poeto S-ro Artur Domènech, kiu elektis F-inon Catalina Montaner Reĝino de la Festo. Nian saluton al la poeto kaj riverencon al la Reĝino.

Por la «Kataluna Antologio»

La Eldona Komitato de la «Kataluna Antologio», por faciligi la baldan eldonon de tia grava verko, decidis krei kvanton da 25-pesetaj akcioj ĝis la atingo de la necesa kapitalo. Multaj akcioj estas jam akiritaj de fervoraj samideanoj kaj ni esperas ke la restantaj elĉerpiĝos dum la Kongreso en Palma de Mallorca.

La materialo por la «Kataluna Antologio» estas jam komplete preparita. Ĝi konsistas el: 1. «Antaŭparolo» pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. 2. Pli ol ducent tradukaĵoj en prozo aŭ en verso el proksimume 50 aŭtoroj. 3. Listo de la verkoj de ĉiu el ili. 4. Studo pri la ĉefaj katalunaj verkistoj: Verdaguer, Maragall, Guimerà, Costa i Llobera, Carner, Guasch, Victor Català, Bertrana, Ruyra, Casellas, kaj aliaj.

La «Kataluna Antologio» (la vera «antologio») ampleksos nur la modernajn poetojn kaj prozistojn, de post Verdaguer. Nia granda poeto malfermos la verkon per fragmentoj de sia fama poemo «La Atlantido». Sed, kiel «aldono», komence de la libro, estos presataj kelkaj belaj pecoj de la Mezepokaj aŭtoroj Bernat Metge, Auziàs March, Ramon Lull, Jordi de Sant Jordi, Joan Martorell, Roïç de Corella, la reĝo Jaume I. kaj aliaj. Eble aperos ankaŭ tri aŭ kvar tradukoj el la plej antikvaj katalunaj «trobadoroj».

Apartan intereson donos al la libro 14 versaĵoj tradukoj de katalunaj popolkantoj, akompanataj de interesa studo pri la originoj kaj disvolviĝo de la popolkanto, kaj eble ankaŭ de la koncernaj 14 melodioj.

La «Kataluna Antologio» okupos 400 paĝojn kun la sama formato de «Kataluna Esperantisto» kaj pli bona papero; la libro estos tole bindita, kun orkoloraj literoj sur verda kovrilo. La prezo estos 12 pesetoj.

Se vi volas ĝui la zorge elektitajn kaj tradukitajn literaturaĵojn pretajn por la «Antologio», helpu fari tuj la eldonon per aĉetado de akcioj. Detalojn pri la financa flanko liveros la membroj de la «Eldona Komitato» S-roj Eduard Capdevila (Carders, 29), Artur Domènech (Cabanyes, 81) kaj Joan Gili Norta (Cornet i Mas, 43), ĉiuj en Barcelona. Se iu ne povas aĉeti akciojn, tiu sendu almenaŭ la sciigon ke li aĉetos unu aŭ du ekzemplerojn.

Ni esperas ke ĉiu kataluna samideano komprenos la gravecon de la projektata verko, same por la kataluna movado kiel por Esperanto, kaj ne rifuzos al ni sian malavaran helpon.

JAUME GRAU CASAS

Grava aktualasc iigo. — Samtempe kun la aliaj ĉirkaŭ 15 nacilingvaj tradukoj de la plej nova verko de Francesco Nitti (iama ministrara prezidanto itala) aperos sub la titolo «LA PACO» (aro da paroladoj faritaj en Skandinavio kaj en Svislando) speciala Esperanto-eldono. La tradukaj laboroj nuntempe estas farataj de du lertaj esperantistoj. La diplomato kaj pacifisto mem instigis la eldonejon de la Frankfurter Societäts-Druckerei, Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M., fari specialan Esperanto-tradukon por konatigi kiel eble plej rapide siajn ideojn al la tuta mondo.

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA URBESTIO DE ZALAMEA. — Dramo en tri aktoj de Calderón de la Barca, tradukita el hispana lingvo de Enrique Legrand. Eldono de la tradukinto, Montevideo, 1925, 136 paĝoj, $18 \times 11\frac{1}{2}$. Prezo ne montrita.

El la verko ni ĉerpas la jenan noton de la tradukinto: «La Urbestro de Zalamea estas verkita en la jaro 1651, kaj la saman jaron Calderón fariĝis ekleziulo. Aparte de sia merito literatura, tiu ĉi dramo estis severa kaj kuraĝa leciono kontraŭ tro oftaj ofendaĵoj de la tiutempa soldataro. Perfortaĵoj de oficiroj kontraŭ honestaj virinoj okazis ofte. El unu el tiuj veraj dramoj eltiris la granda poeto sian teatraĵon. Li maltemis, eĉ sub regado de reĝo kiel Filipo II., montri sur publika scenejo, kiel simpla kamparano punas per malnobla mortigo tian perforton, kvankam la krimulo estas kapitano de la reĝa armeo».

La konata klasika verko trovis ne tre lertan tradukanton. La vigleco de la originalo, tamen, kelkfoje trafe reflektiĝas tra la traduko. En diversaj lokoj la tradukinto uzas «kvankam» anstataŭ «se eĉ», imperativon anstataŭ indikativo, prepoziciojn *de* kaj *krom* antaŭ infinitivo. Aliaj makuletoj estas forigindaj okaze de nova eldono. — *Saljo*.

OFICIALA KLASIKA LIBRO DE ESPERANTO. — Kolekto de la Akademio. Franca, angla kaj germana partoj. Esperantista Centra Librejo, 1924, 120 paĝoj, $15\frac{1}{2} \times 10$. Prezo, 3 fr. frk.

Tiu ĉi broŝuro, laŭ noto de la kompilinto Sro. E. Grosjean-Maupin, enhavas, krom la dek-ses reguloj de la gramatiko, ĉiujn nunajn oficialajn radikojn de Esperanto.

1-e. La unua parto enhavas la francan, anglan kaj germanan zorge korektitajn kaj kompletigitajn tradukojn de tiuj oficialaj radikoj, esceptante la radikojn, kiuj estas sufiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon.

2-e. La dua parto enhavas la internaciajn radikojn, kiuj, eĉ estante netradukitaj, estas ĝenerale kompreneblaj por eŭroplingvanoj.


3-e. La tria parto enhavas la esperantlingvan difinon de la netradukitaj radikoj, kiuj ne troviĝas en la bonega Vortaro de Kabe, kiun devas posedi kaj konstante uzi ĉiu serioza Esperantisto.

4-e. La kvara parto enhavas rimarkojn koncernantajn la franca-angla kaj germanlingvanojn.

Estas ja superflue rekomendi, ke la libro estas havinda. — *Saljo*.


OOMOTO. — La nova spirita movado. Eldonita de Fremlanden-Propaganda Oficejo, Ajabe, Japanlando. 40 paĝoj. Prezo, 30 spesdekoj.

Presita sur bona papero kaj kun diversaj fotografiaĵoj. La taskston ni legis kun plezuro kaj konstatis, ke la stilo iom deflankiĝas, tamen ĝi estas komprenebla kaj ne malbela. La nova religio ne konvinkis la recenzanton pro tio, ke li malfacile kredas je tiaj superhomaj benoj kaj fortoj. — *Saljo*.



Katedrala katedro

PALMA DE MALLORCA



Kastelo Bellver: Turoj

XII^a Kongreso de K. E. F.

21-25 Majo 1925 — Palma de Mallorca

Nia lasta numero publikigis la diversajn kondiĉojn de «Empresa Soler» specialajn por kongresanoj. La enskribiĝintoj, pagintaj la koston de la elektita klaso ĝis la 15 majo, ricevos antaŭ la ensipiĝo, la necesajn biletojn por la vojaĝo, hotelo, ekskurso, k. t. p. Tiu kiu ne volos atendi la lastan momenton por ricevi la biletojn, povos ilin ricevi ĉe Liceu Dalman, València, 245, Barcelono, du tagojn antaŭ la Kongreso.

La ordinarajn biletojn por vojaĝo al Palma oni povas aĉeti en Companyia Transmediterrània, Via Layetana, n.^o 2, unu tagon antaŭ la vojaĝo aŭ la saman tagon de la 10^a ĝis la 12^a matene, sed ni konsilas ke oni aĉetu ilin plej frue.

La prezoj de la ordinaraj biletoj por la vojaĝo inter Palma kaj Barcelona estas la jenaj (iro kaj reveno):

1. ^a klaso:	105'20 ptoj.	3. ^a klaso:	37'50 »
2. ^a » :	67'70 »	je ferdeko	21'50 »

Oni povas fari vojaĝon ĉiulunde, - marde, - ĵaŭde, - sabate.

Ni volonte aĉetos por kongresanoj biletojn laŭ mendo kaj antaŭsendo de la necesa sumo. Respondecon ni ne povas akcepti.

OFICIALA FORVETURO DE BARCELONA:

Ĵaŭdon 21 de majo je la 20'30.

La vaporŝipoj de Cia. Trans^a. staras dekstre de monumento Kolumbo, je 100 metroj proksimume.

OFICIALA FORVETURO DE PALMA:

Lundon 25 de majo je la 20'30.

Kongresaj sciigoj

Sendu vian aliĝon. — La O. K. presigis oficialan karton por la kongresanoj. Por ricevi ĝin estas nepre necese ke ĉiuj partoprenontoj sendu tuj sian aliĝon al la prezidanto de la O. K. Sro. Narciso Bofill, Sindikato 188, Palma de Mallorca, kiu estas senpaga por K. E. Fanoj, kaj kostas nur 5 ptojn. por aliaj samideanoj.

Oficiala Festeno. — Se vi deziras partopreni ĝin, sendu kiel eble plej baldaŭ vian enskribiĝon al la O. K. Estas ja kompreneble, ke por la bona organizo plej multe helpas tiu, kiu ne atendas la lastan momenton por agi.



Medalinsigno por la Kongresanoj de la
XII^a Kongreso de nia Federacio

Kongreslibro kaj insigno

Al ĉiu kongresano oni donacos la kongreslibron kaj insignon, sed li nepre devas prezenti por ricevi ilin la ĝustatempe [petitan kongreskarton].


Membrokartoj. — Al la diversaj grupoj, kiuj pagis la kotizojn de la unua kvaronjaro, ni sendis la necesan nombron da kartoj disdonotaj al la grupanoj. Sur ĉiu karto oni skribu la nomon de la grupano. Rememoru ke laŭ la 9^a kondiĉo de nia regularo «Tots els esperantistes pertanyents a organismes federats, igual que els membres isolats, tindran veu i vot en les assemblees anyals, i llur vot serà delegable a un altre federat mitjançant el *membrokarto*, de presentació necessària per votar en nom propi i d'altres federats».

Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, sendu tuj la kotizojn por ricevi ĝustatempe la membrokartojn.

Membroj de K. E. F., pagu por ricevi la kvitancon de 1925.


BILANCO: De la 1 Julio 1924 ĝis la 1 Majo 1925.

ENSPEZOJ . .	Saldo, la 1 Julio 1924 . . .	374'15 ptoj.	
	Donacoj	530'40 »	
	Vendo de «K. E.», ŝlosiloj, vortaroj, k. a.	102'30 »	
	Kvitancoj (Kotizaĵoj kaj abonoj)	1.626'40 »	2.633'25 ptoj.
ELSPEZOJ . .	Diversaj elspezoj el la Vik' a Kongreso	108'50 ptoj.	
	Preso de K. E.	1.650'10 »	
	Aliaj presaĵoj	47'— »	
	Poŝtelspezoj	158'75 »	
	Ĝeneralaj elspezoj	74'05 »	2.038'40 ptoj.
SALDO: de la 1 Majo 1925.			594'85 »



Unu el la Palmaj hoteloj

PALMA DE MALLORCA



Katedrala fasada detalo

XI^a Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Ni ricevis la du jenajn premiojn por temo laŭvola:

- XLII. — Ekscelenca Deputataro de Balears: 100 pesetoj.
 XLIII. — Ekscelenca Urbestro de Palma: artobjekto.

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta Amon: Premio al la verko n-ro. 108, devizo: Els ulls són l'espill de l'ànima. Al la aŭtoro de tiu ĉi verko oni aljuĝas la Naturan Floron kaj la rajton elekti la Reĝinon de la Festo.
 II. — Originala ama verko en prozo: Premio al la verko n-ro. 34, devizo: Ni vidas, nenion ni scii povas.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la versaĵo: «La Pastoreta» Premio al la verko n-ro. 3, devizo: Versa tradukado estas re-kreado.
 II. — Traduko de la prozaĵo: «Via Blanquerna» Premio al la verko n-ro. 9, devizo: Avis Rara.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Sro. Narciso Bofill. — Duonigita inter la verkoj n-ro. 4, devizo: Kaj Dio la eternulo... kaj n-ro. 3, devizo: Versa tradukado estas re-kreado.
 II. — De S-ino. Maria Fornaris de Bofill. — Premio al la verko n-ro. 9, devizo: Avis Rara.
 III. — De F-ino. Amàlia Bofill Fornaris. — Premio al la verko n-ro. 33, devizo: Migrado, jes, migrado.
 IV. — De Sro. Antonio Rosselló. — Premio al la verko n-ro. 7, devizo: Domine da mihi pacem!
 V. — De Sro. José Salom. — Premio al la verko n-ro. 32, devizo: Felicity.
 VI. — De Sro. Pedro J. Tous. — Premio al la verko n-ro. 26, devizo: Se ne la «se» malfeliĉa, mi estus homo tre riĉa.
 VII. — De Sro. Miguel C. Oliver. — Ne konkursita.
 VIII. — De Sro. Mariano Jaquotot. — Premio al la verko n-ro 73, devizo: Placi al ĉiuj neniŭ sukcesis.

- IX. — De Sro Jaume M. Granada. — Premio al la verko n-ro 2, devizo: **En versfarado, formo estas funda.**
- X. — De Banko Fomento Agrícola de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 106, devizo: **Konstantinopolo.**
- XI. — De Banko Crédito Balear. — Premio al la verko n-ro 38, devizo: **Majfloro.**
- XII. — De Fomento del Civismo. — Premio al la verko n-ro 59, devizo: **Vi estas prava, etulo.**
- XIII. — De Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares. — Premio al la verko n-ro 43, devizo: **Natura.**
- XIV. — De Associació per la Cultura de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 27, devizo: **Plumo ne sentas, papero silentas.**
- XV. — De Banko Vitalicio de España. — Premio al la verko n-ro 44, devizo: **Noktmeza batalo.**
- XVI. — De Fervojo de Sóller. — Premio al la verko n-ro 109, devizo: **No hi fa res que m'enganyis.**
- XVII. — De Ruĝa Kruco (Santa Catalina). — Premio al la verko n-ro 39, deviza: **Maltrankvilo.**
- XVIII. — De Prezidanto de K. E. F. — Premio al la verko n-ro 93, devizo: **Sóc al país dels tarongers florits.**
- XIX. — De Sekretario de K. E. F. — Premio al la verko n-ro 16, devizo: **Pax Vobis.**
- XX. — De Episkopa Moŝto de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 37, devizo: **Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero ol filozofio klarigas.**
- XXI. — De Oficiala Ĉambro de Urbobieno. — Premio al la verko n-ro 110, devizo: **Patrino kaj infano.**
- XXII. — De Ĝenerala Societo de Elektraĵ Tramveturiloj. — Premio al la verko n-ro 70, devizo: **La bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en Paradizo.**
- XXIII. — De Esperantista Klubo Palma. — Premio al la verko n-ro 101 devizo: **Ad pedem litteram.**
- XXIV. — De Oficiala Ĉambro de Komerco, Industrio kaj Navigado de Palma. — Premio al la verko n-ro 60, devizo: **Laboro de l' mano, de l' koro la sano.**
- XXV. — De Fomento de Turismo de Palma. — Premio al la verko n-ro 5, devizo: **Lingvo sen poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo.**
- XXVI. — De Asocio de la Baleara Gazetaro. — Premio al la verko n-ro 47, devizo: **Komuna sorto.**
- XXVII. — De S-ro Fernando Ramírez. — Premio al la verko numero 87, devizo: **Turbano kaj duoniuno.**
- XXVIII. — De S-ro Miguel Guasp. — Premio al la verko n-ro 83, devizo: **Parolantaj ŝtonoj.**

- XXIX. — De S-ro Antonio Coll. — Premio al la verko n-ro 105, devizo: **La Fianĉino de la Morto.**
- XXX. — De Esp. Grupo Ĝerona Espero, Girona. — Ne konkursita. La premianto konsentas aljuĝi la duonon de la premio al la verko n-ro 111, devizo: **Amo plej supera rajto.**
- XXXI. — De S-roj Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma. — Premio al la verko n-ro 95, devizo: **Vindicamus hereditatem patrum nostrorum.**
- XXXII. — De S-ro Rafael Blanes. — Premio al la verko n-ro 41, devizo: **Fjodor.**
- XXXIII. — De Moŝta Kolegio de Prokuristoj, Palma. — Premio al la verko n-ro 67, devizo: **Fortuno favoras kuraĝulon.**
- XXXIV. — De Veloz Sport Balear. — Premio al la verko n-ro 98, devizo: **Amo diverse komprenita.**
- XXXV. — De Mallorka Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj. — Premio al la verko n-ro 71, devizo: **La vivo estas ŝongo kaj la Amo la suno de eterna maja tago.**
- XXXVI. — De S-ro Bartolomé Font. — Ne konkursita.
- XXXVII. — De La Hejmo de l' Estonteco. — Premio al la verko n-ro 25 devizo: **Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos.**
- XXXVIII. — De Moŝta Kolegio de Advokatoj. — Premio al la verko n-ro 31 devizo: **Tapuah.**
- XXXIX. — De Oficiala Kolegio de Farmaciistoj. — Premio al la verko n-ro 15, devizo: **Omne Trinum est perfectum.**
- XL. — De Oficiala Kolegio de Kuracistoj. — Premio al la verko n-ro 56, devizo: **Sankta vesper', paca vesper'.**
- XLI. — De Federación Patronal de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 12, devizo: **Don Dinero.**
- XLII. — De Ekscelenca Deputataro de Balears. — Premio al la verko n-ro 50, devizo: **iela graco — kora paco.**
- XLIII. — De Ekscelenca Urbestro de Palma. — Premio al la verko n-ro 107, devizo: **Asonancoj**

La 111 verkoj ricevitaj formas 21 grupojn. En diversaj grupoj, kelkaj verkoj ricevas premion kaj aliaj meritas mencion. Jen la listo de la grupoj kun la premiitaj kaj menciitaj verkoj. La devizon de la premiitaj verkoj vidu pli supre:

- I. — 1-a premio al la verko n-ro 108; — 2-a P. al n-ro 4; — 3-a P. al n-ro 107. 1-a Mencio al la verko n-ro 51, devizo: **Se socio pek-as, amo krimas**; 2-a. Mencio al la verko n-ro 36, devizo: **Laŭ la maniero de Rubén Darío**; 3-a Mencio al la verko n-ro 45, devizo: **Ami... ami... ami!**
- II. — Premio al la verko n-ro 34. 1-a Mencio al n-ro 35, devizo: **Poly-hymnia**; 2-a Mencio al n-ro 23, devizo: **Amo venkos malpacon.**
- III. — Premio al la verko n-ro 3.

- IV. — Premio al la verko n-ro 9. Mencio al la verko n-ro 17, devizo: **Marrigardejo.**
- V. — Premio al la verko n-ro 93. Mencio al la verko n-ro 28, devizo: **Vora el barranc...**
- VI. — Premio al la verko n-ro 16. Mencio al la verko n-ro 89, devizo: **Canigó.**
- VII. — 1-a Premio al la verko n-ro 106; dua al n-ro 33; tria al n-ro 32; kvara al n-ro 73. 1-a Mencio al la verko n-ro 91, devizo: **Silento estas oro**; dua al n-ro 6, devizo: **Finis coronat opus**; tria al n-ro 97, devizo: **Valoraj pensoj.**
- VIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 38; dua al n-ro 2. 1-a Mencio al la verko n-ro 72, devizo: **Vian ĉielon kovru, Zeus**; dua al n-ro 76, devizo: **Ex abundantia cordis**; tria al n-ro 86, devizo: **Tro-severeco estas fiereco.**
- IX. — 1-a Premio al la verko n-ro 59; dua al n-ro 27. 1-a Mencio al la verko n-ro 69, devizo: **Kulpoj de patro persekutas idon**; dua al n-ro 58, devizo: **Arbara silento.**
- X. — 1-a Premio al la verko n-ro 7; dua al n-ro 44; tria al n-ro 109. Mencio al la verko n-ro 13, devizo: **Kial plendi se estas amo?**
- XI. — Premio al la verko n-ro 39. Mencio al la verko n-ro 75, devizo: **Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj.**
- XII. — Premio al la verko n-ro 26. Mencio al la verko n-ro 54, devizo: **Fata Morgana.**
- XIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 37; dua al n-ro 70. 1-a Mencio al la verko n-ro 53, devizo: **Malofta temo**; dua al n-ro 66, devizo: **Ŝajni - kaj esti, jen diferenco**; tria al n-ro 18, devizo: **Libri oracuiā pandunt.**
- XIV. — Premio al la verko n-ro 47. Mencio al la verko n-ro 46, devizo: **La patrujo super ĉio.**
- XV. — 1-a Premio al la verko n-ro 87; dua al n-ro 83. Mencio al la verko n-ro 52, devizo: **Rememoroj.**
- XVI. — 1-a Premio al la verko n-ro 110; dua al n-ro 105; tria al n-ro 41; kvara al n-ro 67. Mencio al la verko n-ro 68, devizo: **Kio komenciĝas, devas nepre finiĝi.**
- XVII. — 1-a premio al la verko n-ro 101; dua al n-ro 98; tria al n-ro 71; kvara al n-ro 111. Mencio al la verko n-ro 92, devizo: **Amor omnia vincit.**
- XVIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 60; dua al n-ro 25. 1-a Mencio al la verko n-ro 61, devizo: **Beninda malsato**; dua al n-ro 65, devizo: **Lori**; tria al n-ro 57, devizo: **Supren la kapon!**
- XIX. — 1-a Premio al la verko n-ro 95; dua al n-ro 31, tria al n-ro 5. Mencio al la verko n-ro 94, devizo: **De quan les bèsties parlaven.**
- XX. — 1-a Premio al la verko n-ro 50; dua al n-ro 15; tria al n-ro 56; kvara al n-ro 12. 1-a Mencio al la verko n-ro 14, devizo: **La Poesia non muore**; dua al n-ro 48, devizo: **Larmiginta ĝojo**; tria al n-ro 19, devizo: **Suno leviĝas — La mondo viviĝas.**
- XXI. — Premio al la verko n-ro 43.

Laŭ la dua regulo de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro, kiu zorgos pri ilia publikigo.

Permeso por reprodukto oni petu de la Redakcio de *Kataluna Esperantisto*.

Majo de 1925. — Kolomano de KALOCSAY, *Prezidanto*; J. SCHMID; Eŭsebo ARTIĜAS; Narciso BOFILL; Frederic PUJULÀ i VALLÈS; S. ALBERICH JOFRE, *Sekretario*

Tra la Gazetaro

«*Pola Esperantisto*». — n-ro. 3 (marto). — El la marta numero ni ĉerpas la jenan alvokon: » Kion pensas pri tio ĉiulandaj esperantistoj? — En Nro. 294 (p. 32) de la ĝeneva «*Esperanto*» aperis sciigo, ke *la Centra Oficejo de U. E. A. okazigis voĉdonon pri uzo de landnomoj*. Tute sendepende de niaj opinioj pri la landnoma demando, konataj al niaj legantoj, la fakto mem ŝajnas al ni *io absolute eksterordinara*. Kio okazos kun Esperanto, se krom la Lingva Komitato voĉdonos pri lingvaj demandoj diversaj aliaj organizoj? Facile antaŭvidi. Baldaŭ ni legos en niaj kronikoj. — «*ETURBET* (10.000 loĝantoj). La Centra Oficejo de Eturbeta Esperanto Asocio, fondita hieraŭ (enskribiĝis tuj pli ol 150 anoj!), esploris zorgeme la landnoman demandon. Dezirante kunigi diversajn opiniojn, ĝi per 11 voĉoj (kontraŭ 1 sindeteno) decidis akcepti la sufikson *ej* por ĉiuj landnomoj (ekz.: *Svisejo*, *Ĉeĥoslovakejo*). La Centra Oficejo instrukiis la Asocioŝan daŭre sekvi tiun principon senescepte». Esperantistoj! Ĉu vere aŭdiĝos inter vi neniam voĉoj de protesto, de persvado? Ĝis nun *ni solaj* faris tion. Se Esperanto devas resti *unu* lingvo, venis tempo, ke helpu nin aliaj! La voĉdono de la Centra Oficejo de U. E. A. nepre estas nuligota! «Niaj polaj samideanoj ne estas solaj. Nia lasta numero publikigis artikolon de Sro Jaume Grau Casas per kiu oni faris saĝajn avertojn al la gvidantoj de U. E. A. Ni plene subskribas la plendon de nia kunfrato *Pola Esperantisto* kaj esperas, ke por la bono de nia afero U. E. A. forlasos la entreprenitan danĝeran vojon, kiu povus konduki nin al pereiga disiĝo de niaj fortoj.

«*Espero Katolika*». — n-ro. 8 (aprilo). — Tre interesa gazeto kun artikoloj tre gravaj pri katolikaj aferoj. Ĝia enhavo estas redaktata en fundamenta kaj imitinda Esperanto, tre malofte trovebla en aliaj bruantaj gazetoj. La X-a. Katolika Esperanto-Kongreso okazos en Paris la 13-16 aŭgusto 1925. La kongresa kotizo estas 25 fr. frk. Ĝi donas la rajton ĉeesti ĉiujn kunsidojn, religiajn ceremoniojn kaj la amuzan vesperon, kaj ricevi ĉiujn kongresajn dokumentojn kaj insignon. — Por detaloj kaj aliĝo oni turnu sin al Fino. M. Larroche, rue de Vaugirard, Paris VI.

«*La Progreso*». — n-roj. 4-5 (febr. marto). — Interesa gazeto kun regule aperantaj artikoloj pri la ĉeĥoslovaka popolo, kiun ĝenerale bone konas katalunoj. La aludita numero publikigas interesplenan artikolon pri Masaryk kaj Beneš, fondintoj de Ĉeĥoslovaka Respubliko, kaj krom aliaj valoraj artikoloj kun celo nacia en ĝi aperas kun bela enhavo la rubrikaj «Literaturo», «Por komencantoj», «El scienco», «Lingva fako» k. t. p.

«*Belga Esperantisto*». — n-ro. 1 (jan). -- Ĝi reaperas vigla kaj ĉarma post longa krizo. La presisto estas kulpa, ke ĝi ne aperadis akurate, la presisto kaj la oscedantaj proletariaj poŝtoj, kiuj ĉie bataladas kontraŭ la esperantistoj Ni deziras al nia kunbatalanto, kiu estas presata sur bona papero kaj belstila, longan vivon kaj ne malpli longan pacon kun la presisto. XIV-a. Belga Kongreso okazos en Verviers. 31 majo-1 junio.

«*Germana Esperantisto*». — n-ro. 4 (apr). — Sub la plumo de Sro. Fr. Ellersiek, la konata sprita kaj sagaca germana samideano, G. E. akiris en-
viindan reliefon ĉe la esperantista gazetaro. Ne nur por germanlingvanoj ĝi
estas vera juvelo; ĉiuj esperantistoj trovos en la abunda esperanta teksto
artikolojn, kiuj fariĝas aparte interesaj pro la stilo kaj merito de ĝiaj ver-
kintoj. Magdeburg estos dum Pentekosto la scenejo de la XIV-a. Germana
Esperanto-Kongreso. Al ĝi ni deziras grandan sukceson!

«*Le Monde Espérantiste*» — n-ro. 1 (jan. febr). — La batalema malnova
gazeto energie batalas kontraŭ la deflankiĝoj de U. E. A. kaj daŭre subte-
nas lingvan disciplinon. Tiu ĉi gazeto iafaje, eble, pro aferoj pure personaj
tro multe bruis, sed oni ne povas nei, ke ĝi estas la sola gazeto en Espe-
rantujo, kiu plej sincere ĉiam sin tenis, ne fordonante sin al fantazio kaj
troigita entuziasmo fiktiva.

«*Literatura Mondo*». — n-ro. 4 (apr). — Kiel kutime ĝia enhavo superas
la dezirojn de plej postulema literaturamanto. Verkoj de alta merito kaj de
de rafinita stilo donas al ĝi rajton por okupi la unuan lokon en ĉiu bibliote-
ko kaj rajton donas al ĝi ankaŭ por esperi, se ne postuli, pli efikan subtenon
de la tutmonda esperantistaro. Katalunaj amikoj, turnu vin por tuja abono
al la reprezentanto en Barcelona. (Vidu anoncon).

Fajreroj

Saluto de K. E. F. al Kordova Kongreso. — Nia eminenta poeto S-ro
Artur Domènech havos la ŝancon ĉeesti la proksiman Kongreson de la Ibe-
ria Konfederacio, kaj nia Kataluna Esp. Federacio havos la honoron saluti
persone de nia amiko tiun Kongreson.

Gazetoj ricevitaj. — Litova Stelo, marto. — La Taquigrafia, aprilo. —
La Progreso, febr. marto. — La Semisto, aprilo. — Sudameriko, marto. —
Marto, aprilo. — Heroldo de Esperanto, 1, 4, 8, 11 aprilo. — La Ora Epoko,
marto. — Reklamo, marto. — Espero Teozofia, januaro-marto. — Katolika
Mondo, marto. — International Language, marto. — The British Esperan-
tist, marto. — La Interligilo, febr. marto. — Pola Esperantisto, marto. —
Esperantista Junularo, aprilo. — Amerika Esperantisto, jan. febr. — Argu-
so, febr. — Hungara Esperantisto, aprilo. — Itala Esperanta Revuo, marto.
— La Suno Hispana, aprilo. — Belga Esperantisto, jan. — Arbeider Espe-
rantisten, marto. — La Espero, aprilo. — Revista del Ateneo, aprilo. — Ho-
landa Esperantisto, aprilo. — Espero Katolika, aprilo. — Le Monde Espe-
rantiste, jan. febr. — La Fervojisto, febr. marto. — Konkordo, marto. —
Germana Esperantisto, aprilo.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), ŭ, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix a formar

el femení
heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerc
(comerc)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas
Jo escrib

skribis
escrivi

skribos
escriurá

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu : present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu : present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

LITERATURA MONDO

La plej valora literatura esperanta revuo.

Rekomendita de la XVIa Universala Kongreso de Esperanto.


Ĉiu esperantisto devas ĝin aboni.

La plej bonaj stilistoj estas ĝiaj kunlaborantoj.

Turnu vin por abono:

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Duonsemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:


HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT
STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A



en 1925.

Alĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Alĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ la Delegito en Barcelona:
S-ro Delfi Dalmau, València, 245

H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn ; sed valoras
multe.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FRANKOJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONO

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

F E N T V I A

La Direcció General de Comunicacions d'Espanya ha declarat admetre l'Esperanto com a *llengua clara*, seguint l'exemple de França i els altres Estats membres de la Lliga de Nacions. Felicitem els nostres companys de la «Hispana Esperanto-Asocio» per gestions dels quals ha estat reconegut l'Esperanto oficialment en el dit Departament de l'Estat Espanyol.

Homes de Ciència dels països més avançats s'han reunit darrerament a París sota la presidència del nostre eminent amic Charles Richet i el Rector de la Sorbonne, i han convingut en la necessitat d'emprar l'Esperanto per a la Ciència.

En Conferència internacional de Fires de Mostres i altres entitats comercials, sota la presidència del Secretari de la Chambre de Commerce de Paris i sota els auspicis de son patronatge, autoritats prestigioses del món comercial, han convingut en la necessitat d'adoptar l'Esperanto per al Comerç.

Els Jocs Florals Internacionals d'èxit insospitat presenten l'ús reeixit de l'Esperanto per a la Literatura.

A la Universitat Imperial de Tokio, on fins ara la medicina era ensenyada emprant els mots tècnics en alemany, els professors han començat a substituir l'alemany per l'Esperanto.

Els cursos universitaris internacionals que seran donats en Esperanto a Ginebra l'agost vinent, sobre psicologia, pedagogia, lingüística i electrotècnica, presenten una prova més de l'ús definitiu integral de l'Esperanto com a llengua auxiliar internacional.

Invitem els nostres homes intel·lectuals a conèixer o reconèixer la veritat sobre l'esperanto. I ens plau de poder-ne citar de tan prestigiosos com Joan Arús, Rovira i Virgili, Carles Riba, Millàs Raurell, Jordana, entre els que sabem més matiners en aquesta qüestió. Els Drs. Torres Carreras, Figuerola, Bremon, Orriols, Bàrtomeu, Teresa Campaña, Jacint Barrera, Marian Solà, Gustau Galceran, figuren en les llistes dels esperantistes militants de la Federació Catalana d'Esperantistes.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

*sufix per al
femení*

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerç)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjunc-
tiu*

Mi skribas
Jo esric

skribis
escrivi

skribos
escriurè

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.

Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Raporto pri la XII^a Kongreso de K. E. F.

21-25 Majo 1925 — Palma de Mallorca

Alveno de la kongresanoj

La bela vaporŝipo «Mallorca», plena de gesamideanoj enŝipiĝintaj antaŭ 10 horoj en Barcelona, je la 6^a matene de la 22^a de Majo, alvenis la belan havenon de Ciutat de Mallorca, atendata de balearaj samideanoj sub la prezido de reprezentanto de la urbestro, Sro. Fiol, kaj de nia pioniro Narciso Bofill. La alvenantaj kaj la atendantaj gesamideanoj kun esperantistaj flagoj intersalutis sin kun ĝojo kaj amikeco. Kaj en aŭtomobiloj kaj aliaj veturiloj ĉiuj iris al respektivaj hoteloj kaj loĝejoj.

Akceptejo ĉe la Esp. Klubo

Je la 8^a ĝis la 9^a renkontiĝis ĉiuj kongresanoj en la oportuna sidejo de la Palma Esp. Klubo, kaj tie ĉiu ricevis belajn Gvidlibron kaj kongresinsignon kaj vizitis gravan Ekspozicion de esperantaĵoj.

Vizito al la Aŭtoritatuloj

Je la 9^a, promene tra la bela urbo, la gekongresanoj iris viziti la Urbodomon kie nin atendis la urbkonsilanto Sro. Fiol reprezente de la urbestro. Bonvenaj kaj dankaj intersalutaj paroloj interŝanĝiĝis, kaj gvide de la afbla urbkonsilanto ni vizitis la riĉan kaj belan Urbdomon de Palma.

Poste ni iris al la Deputitejo, kie okazis simile, ankaŭ la guberniestron kaj fine la militestron. Ĉe la antaŭlasta nia impresio estis eksterordinara

ĉar tie la vizitato Sro. Pérez, post longa atendigo alvenis kaj diris al ni ke oficiale li malkonsentas pri nia Movado, ĉar estas devo nia propagandi kaj disvastigi la hispanan lingvon, kaj tiu «dialecto mundial» — li diris rilate al Esperanto — ne devas konkuri ĝin. Tiu neatendita respondo al nia saluto kaj vizito obee al konsilo de nia amiko Bofill, vere strange impresis nin, sed pense al la politikaj cirkonstancoj kaj sendanĝerige al nia Kongreso ni ĉiuj mutemis pri tiu temo.

Solena Meso kun Esp. prediko

Multnombra publiko esperantista kaj neesperantista ĉeestis la katolikan diservon. Efektive la esperanta prediko anoncita estis altira. La preĝejo estis ornamita kiel okaze de plej solenaj festoj religiaj. Ĉi-tie komencis mirigi nin la malavaro de la organizinto de la Kongreso.

Pastro Bartomeu Font, malnova Mallorca samideano, faris elokventan predikon plurfoje eĉ kun impresaj silentoj. «La Espero», nia tuta himno, estis ankaŭ en la prediko. Ĉiuj ĉeestintoj certe longe memoros la predikon de Pastro Bartomeu.

Malferma Kunsido

En la salono de la «Associació per la Cultura de Mallorca», kun ĉeesto de multaj kongresanoj, la Direkta Komitato de K. E. F., la Organiza Komitato de la Kongreso, S-ro Kreuz reprezentanto de la Centra Komitato kaj de U. E. A., S-ro F. Fiol delegito de la Urbestro, je la deka matene okazas la Solena Malferma Kunsido.

Unue la delegito de la Urbestro kore salutas la kongresanojn kaj deziras al ili plaĉan restadon en la insulo Mallorca. S-ro Bofill, Prezidanto de la Organiza Komitato, legas paroladon tiun-ĉi:

«Attestimataj gesamideanoj:

Estu bonalvenintaj, karaj pioniroj de nia movado, fervoraj kunbatalantoj de nia sankta afero, kaj akceptu, mi petas, plej koran kaj sinceran saluton kiun mi proponas al vi nome de viaj Palmaj samcelanoj dezirantaj kunfratiĝi kun vi okaze de nia Kongreso kaj samtempe pruvi al vi sian fratan samideanecon kaj puran amikecon. Mi esprimas al vi la respektajn kaj amajn sentojn de miaj samurbanoj esperantistaj kaj kvankam mi bone scias, ke mi ne estas tute lerta por bele paroladi kaj facile konvinki vin pri tio, ke ni, viaj kamaradoj el la bela insulo Mallorca, ĝojas kaj estas kontentegaj pro la okazigo de nia esperanta festaro ĉe ni, mi plenumante mian devon, kiel Prezidanto de la Organiza Komitato de nia Kongreso, honoras min saluti ĉiujn vin, distingindaj pretermaraj disciploj de nia senmorta kaj neforgesebla Majstro.

Estu certaj, karaj samlingvanoj, ke ni el tuta nia koro akceptas vin kaj

deziregas, ke via restado en nia insulo kaj en nia Palma estu por vi tre agrabla; por atingi tion ni faros ĉion eblan por plenumi viajn dezirojn kaj estas pretaj servi vin per frata zorgo same kiel se vi estus en via hejmo. Ni estas tute viaj kaj estus tre granda plezuro por ni se vi senkomplimente petus de ni tion, kion vi deziras aŭ bezonas dum vi estos niaj gastoj, kiun okazon ni tre honore kaj fiere uzas por esprimi al vi nian puran samideanecon.

Antaŭ ĉio, mi devas elmontri al vi mianome kaj nome de miaj ĉi-tieaj gesamideanoj, nian plej sinceran kaj koran dankemon por via ĉeesto al nia Kongreso; tial mi dankegas vin ke vi estas atentintaj nian vokadon, kaj ĉar el diversaj naciaj kaj fremdaj urboj venis tien-ĉi, en nian karan Mallorca, por plenumi nian deziron, por plezurigi nin, ĉar vi estas farintaj tion akceptante nian peton, atentante nian alvokon, kiun por sukcesigi nian Kongresan solenaĵon ni sciigis al vi per nia presorgano «Kataluna Esperantisto» kaj aliaj esperantistaj gazetoj. Akceptu, do, ankoraŭ unu fojon, mi petas de via ĝentileco, nian respektplenan kaj fratan dankon por tio.

Vere estas por ni, viaj komaradoj el la insularo, la unua fojo, kiam ni ĝuas la intiman haj kunfratiĝan festaron, kiun havigas Kongreso de Esperanto, precipe, kiel okazas je la nia, se en ĝi oni povas ŝati la literaturan feston nomitan «Floraj Ludoj», kiun amuzajon pli bone oni povus nomi universala ol internacia, kiel ĝi estas de ni nomata; festo la plej solena el ĉiuj, kiuj okazas en la tuta mondo esperantista kaj kiun neniu el la diversaj hispanaj Federacioj ankoraŭ povis okazigi en siaj regionoj; ni povas certigi, ke niaj Floraj Ludoj, kiel ni bone scias, estas belega festo, gloro de nia «Kataluna Esperantista Federacio», solena kaj brila literatura okazaĵo tre grava, kaj miregaĵo de samlandanoj kaj fremduloj. Ni devas daŭrigi, per nia peno kaj per la helpo de niaj estimataj kaj kleraj verkistoj, la famon de ĝia historio, ni devas atingi, ĉiun jaron, ke ĝi estu pli grandioza, ni devas klopodi por ke la listo de la premioj aljuĝotaj al la plej bonaj literaturistoj partoprenontaj ĝin estu multenombra por tiel povi premii multajn literaturamantojn. Mi konfidas al via fervora samideaneco kaj al via amo por nia kara Esperanto, ke vi igos ĉion, kion vi povos por nia tuta sukcesego. Fide mi esperas, ke ĉiuj vi ĉeestos nian literaturan feston por pli solenigi ĝin kaj ke neniu el vi mankos por varme aplaŭdi nian ĉarman Reĝinon, por rigardadi ŝian belecon kaj por kore gratuli la aŭtorojn de la premiitaj verkoj de la aludita konkurso. Faru tion, estimindaj pioniroj de nia movado, por la progresado de nia idealo.

Antaŭ kelkaj jaroj jam iu Palma samideano pritraktis la eblecon okazigi ĉe tiu-ĉi urbo Kongreson de «Kataluna Esperantista Federacio»; por sukcesigi tion li parolis pri tiu deziro kun diversaj eminentaj esperantistoj katalunaj okaze de ĉeesto en la lastaj Kongresoj de nia Federacio en malsamaj urboj en Katalunujo, sed lia projekto ne efektiviĝis pro iaj malfacilaĵoj kaj ĉar ne estis akceptita tia propono de la tuta ĉi-tiea samideanaro aŭ almenaŭ de la plimulto el ili; sed lastatempe dank' al la fervora sindoneco de

iaj malmultaj pioniroj membroj de nia loka Grupo «Esperantista Klubo Palma», tiu bela ideo okazigi la nomitan Kongreson en nia kara Palma, ĉefurbo de la baleara insularo, efektiviĝis pro la entuziasma helpo kaj pro la ĉiuspeca subtenado de la membroj el kiuj konsistas la Organiza Komitato, kiun mi tre honore prezidas. Ni ĉiuj aranĝis nian Kongreson, ni ĉiuj klopodis por ĝia plej brila okazigo kaj ni penis ankaŭ por ke nia festaro estu plej grandioza kiel eble, kune kun la famega literatura solenaĵo nomita «Floraj Ludoj», por kiu ni atingis tre gravan liston da premioj. Ni faris ĉion eblan, kaj eĉ neeblaĵojn, por sukcesigi nian entreprenon; ni ne igis pli, ĉar ni ne plu povis kaj se ĉio tio meritas vian aprobon, kaj viaj deziro kaj espero pri nia Kongreso kaj ĝiaj amuzaj estos plenumataj, ni estos tre ĝojaj kaj kontentaj, ke nia organiza laboro kaj peza tasko havigos al vi agrablan kaj ĝuigan restadon ĉe nia insulo, dum kelkaj tagoj. Mi tre esperas, ke ĉiuj vi pasigos gajajn kaj feliĉajn tagojn en nia Mallorca kaj vere mi bedaŭras ke nia amika kunestado daŭros malmulte da tempo, nur la necesajn horojn por okazigi nian kongresan festaron.

Malgraŭ tio, mi konfide kredas, ke multaj el vi volos ekskursi tra nia bela insulo dum kelkaj tagoj por rigardadi kaj elkoni ĝiajn naturajn beleĝaĵojn. Precipe oni povas igi diversajn ekskursojn tre interesajn; vi ne devas foriri al via hejmo antaŭ ol efektiviĝi ilin. Mi petegas de vi, ke atentu mian rimarkon pri tio, ĉar mi estas certa ke vi poste dankos min pro mia konsilo daŭrigi vian restadon en tiu-ĉi insulo por tia celo. Plenumu do mian deziro kaj plezurigante min vi havigos al mi kaj al la ĉi-tieaj gesamideanoj okazon povi vigligi nian puran amikecon, kaj nia kunfratiĝo plidaŭros, kiel ni el tuta nia koro deziras.

Al la kunestantaj personoj ankaŭ mi devas altiri ilian atenton pri tio, ke en nia urbo staras antikvaj konstruaĵoj, privataj kaj publikaj, kiuj meritas esti vizitataj de vi, se efektive vi ŝatas la belartojn. Nia Katedralo, nia Vendistarejo, diversaj nobelsinjoraj palacoj kaj preĝejoj, kelkaj modernaj kaj aliaj multmeritaj konstruaĵoj en Palma kaj ĉe ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas vizitindaj.

Mi ne volas fini mian paroladeton ne dirante al vi, ke kiam vi revenos ĉe vin, bonvolu diri al viaj konatuloj kaj amikoj, ke insulo Mallorca frate akceptis vin, ke la Palmaj samideanoj organizis Kongreson pli aŭ malpli bona kaj solena, ke la Floraj Ludoj kaj ceteraj festaĵoj estis pli aŭ malpli brilaj kaj grandiozaj, sed ne forgesu diri al ĉiuj kun kiuj vi parolos pri la XII^a Kongreso de nia kara «Kataluna Esperantista Federacio», kies unuan agon ni estas nun komencantaj, ke la samideanoj el Palma de Mallorca scias plenumi sian devon, ke ili dece prenis sur sin la kongresan taskon por atingi plenan sukceson je sia entrepreno kaj fine diru ĉie, mi petegas, ke ili estas fervoraj pioniroj de nia movado, ĉar ili pruvis sian puran esperantismon. Kaj se vi estas konvinkitaj pri tio, venigu niajn kamaradojn el la tuta mondo ĉeesti estontan kongreson, kiun sendube ĉu la Palmaj samideanoj ĉu tiuj el alia urbo de la baleara insularo okazigos post iaj jaroj por denove,

kiel ni igas nun, rekunfratiĝi kaj plie ĉiuj ni kune kun novaj varbitoj al nia paca kaj progresema movado disvastigi nian karegan Esperanton kaj praktike diskonigi nian Federacion en nia propra teritorio. Ni, do, devas diri, kiel diversajn fojojn jam diris: antaŭen, ĉiam antaŭen».

Korega aplaŭdado salutas je la fino de la parolado de S-ro Bofill.

Nia Prezidanto legas tuj poste la jenan paroladon:

«Estimataj kunfederacianoj:—La novaj ekonomiaj bazoj de nia Federacio pli intime kunvivigas ĉiujn esperantistojn katalunlingvajn, kaj tial plifortigis nian organizaĵon, kaj iom ĝin ekonomie plibonigis, sed nia ekonomia bazo ne estas ankoraŭ kontentiga. Ni atingis pli da enspezoj sed ni havas pli da elspezoj, kaj fine de la jaro ni ankoraŭ en 1925 havos deficiton. La malfacilo enspezi de multaj izolaj membroj kaj abonantoj, kiun ni povas nomi la nesufiĉa atentemo aŭ bonvolo de kelkaj samideanoj; la manko ĝis nun de pluraj riĉuloj fervoraj kaj riĉaj fervoruloj en niaj vicoj, kaj la ĝeneralaj krizaj cirkonstancoj nunaj, devigas nin al pli da sindonemo, kaj pli da klopodo varbi novajn abonantojn al nia gazeto.

Ni pruvus nunjare per aperigo regula de nia gazeto kiu meritas ĉies laŭdon en Esperantujo, ke ni estis agemaj, kuraĝaj kaj malavaraj. Vi subtenu nin responde al nia pruvo kaj nia afero daŭros okupi indan lokon en nia mondo. Ni devas pagi al la Konstanta Reprezentantaro. Ni devas organizi la Florajn Ludojn, respondi al grupaj demandoj, okazigi la ĉiujaran Kongreson. Nia tasko estas multa kaj grava. Ne manku al ni persona helpo de ĉiuj kiuj povas, nek subtena mono de tiuj kiuj havas; ebligu kaj largigu nian vojon kaj ni ankoraŭ multe pli faros: Eldono de lernolibroj kaj propagandiloj kaj vortaroj estas nun necesa. Jen estas nur unu urĝa afero kiu postulas monon. Estas multaj aliaj. Mono, klopodo estas ja bagateloj kompare la ĝojon de sukceso kaj plenumo de devo. Estu malavaraj. Eĉ cele de plej bona profito de plej intima gajno: sateco de bonago. Bonagu, bonfaru por nia K. E. F. kiu devas plenumi gravan taskon en la vojo al nia sankta celo, kaj fina venko».

Longa aplaŭdo montras la unuaniman konsenton de la kunvenintoj al la ideoj tiel trafe esprimitaj de nia Prezidanto.

La sekretario petas poste al la delegitoj de la diversaj grupoj aligintaj al nia Federacio doni siajn nomojn kaj saluti la Kongreson: tiel faras S-roj Joan Comadran en la nomo de «Aplech» el Sabadell; S-ro Joan Prat el «Bella Espero» el Manresa; S-ro César Gallego el «Paco kaj Amo» el Barcelono; S-ro Jaume Grau el «Barcelona Stelo» el Barcelono; S-ro Amadeu Ribas el «Nova Sento» el Barcelono; Ptro. Josep Planas el «Esperanta Nesto» el Ripollet kaj S-ro Marian Solà el «Lumon» el Terrassa. Ankaŭ salutas la kongresanojn S-ro Robert Kreuz, delegito de la Centra Komitato. Oni decidas laŭ propono de S-ro Jaume Grau sendi telegramon al S-ro Joan Barceló en Maroko kiu pro siaj okupoj ne povas esti kun ni dum la tagoj de nia Kongreso.

Aliĝis al la Kongreso per telegramoj kaj leteroj la S-roj kaj Grupoj: S-ro Valenti Bruch el Selva del Camp. Johano Flaquer el Capdepera; Miquel Moll el Capdepera; F-ino Louise Briggs el Armley; «Hela Lumo» el Ateneu Cultural Obrer el Vich; Henriko Ruedl el Bozen; D-ro Jascinte Bremon el Barcelono; «Nova Patro» el Mataró; P-tro Ribas, Mulist, Farres, Noguera, Benet Pomades, Geedzoj Comella el Vich; Josep Grau Casas el Barcelono; «Esperanta Idealo» el Santa Coloma de Farnés; S-ro Maynar el Zaragoza; «Suno Hispana», «Federación Levantina», «Valencia Grupo» el Valencia; Joan Barceló el Ceuta; Grupo Lumradio» el Cheste; «Juneco» el Girona; «Gêrona Espero» el Girona; F-ino Palmira Castellví el Barcelono; S-ino Dolors Magre el Santa Coloma de Farnés; Valenti Alavedra el Terrassa; Rodolfo Horner el Genève; Pere Domènech el Vilassar de Mar; «Frateco» el Vendrell, Engelmann el Rosny sous Bois, D-ro Privat, k. a.

La Prezidanto rekomendas al ĉiuj akuratan viziton al la laborkunsido vespere okazonta, kaj fermas la Malferman Kunsidon.

Esp. Ekspozicio kaj Ekzamenoj.

Posttagmeze, dum multaj gesamideanoj vizitis la Esperantajaron en la Klubo Palma, ĉe la «Associació per la Cultura de Mallorca» okazis ekzamenoj, ĉe kiuj rimarkigis nia estimata plurfoje premiita germanlingva samideano el Ĉekoslovakujo, S-ro Josep Berger, kiu kandidatis por la Diplomo pri Profesoreco de Esperanto, kaj ĝin atingis kun laŭdoj.

Laboraj Kunsidoj

En la salono de «Associació per la Cultura de Mallorca» je la sesa vespere la Prezidanto malfermas la kunsidon.

Unue parolas S-ro Berger el Córdoba pri la nova projekto de Hispana Esperantista Federacio kaj raportas pri la taskoj efektivigitaj en la Cordoba Kongreso. S-ro Dalmau respondas al li kaj montras sian konsenton al tiuj ideoj. S-ro Solà diras ke la hispanaj esperantistoj ne devas esperi amasan ĉeeston de katalunoj al hispana kongreso ĉar por esperantisto estas ĉiam pli alloga la ĉeesto al universala kongreso kiu tre ofte estas pli proksima al nia lando kaj la vojaĝo eĉ pli malmultekosta.

La Sekretario S-ro Solà legas la raporton pri la tutjara agado de la Komitato:

«Karaj Kunfederacianoj:

Venas la momento kiam la Direkta Komitato de la K. E. F. devas al vi raportoj pri sia agado dum la tempo kiam ĝi havis sur si la taskon gvidi nian societon. La tasko farita, bedaŭrinde ne atingas la vastecon kiun ni estus dezirintaj, kiam ni prenis sur nin la ŝarĝon de la direktado, sed mi esperas ke ĉiu rekonos ke ni faris ĉion eblan laŭ permeso de la specialaj cirkonstancoj.

Nia unua klopodo, laŭ sperto efektive sukcesinta, estis la restarigo de nia oficiala gazeto «KATALUNA ESPERANTISTO» en ĝia kutima aspekto kaj preskaŭ tute redaktita en Esperanto: tio estis certe tre ŝatata de niaj kunfederaciaĵoj kaj mi esperas ke la zorgoj kiujn la redaktantoj havis por la tekstoj kaj enhavo estas ankaŭ ĝuste estimataj de la kutimaj legantoj.

Multe da laboro okazigis al ni la organizado de la Kongreso hodiaŭ okazanta kaj nur dank'al la bona volo kaj entuziasmo de S-ro Bofill kaj de nia Prezidanto vi ŝuldas la okazigon de la bela Festo de nia Kongreso. Ni devis por tio kalkuli kun la kontraŭstaro de erarinta hispana sindiranta samideano kiu ne hezitis eĉ per artikoloj en la gazetoj de tiu ĉi gastama urbo kaj per denuncoj apud la lokaj kaj regnaj aŭtoritatoj diskreditigi nian kongreson kaj se eble neebli ĝian okazigon: vi ĉiuj scias la motivon sur kiu li bazas sian argumentadon kaj vi scias ĉiuj kiel ajn vi private pensas, ke neniu povas rajte riproĉi al niaj kongresoj ian politikan sintenon, sed ke ĉiuj rimarkigis nur pro sia esperantisteco kaj ke en neniuj el la urboj de ni iam vizititaj la aŭtoritatoj, el kiu ajn koloro ili estis, havis por ni riproĉon kaŭze de iu aŭ alia tendenco, kiu ĉiam estis for de nia agado kiel esperantistoj.

Vi estas certe informitaj per nia gazeto kaj per la ceteraj esperantaj ĵurnaloj pri la organizo de la esperanta novado aprobita en la Kongreso de Helsinki kaj kompletigita en la Kongresoj de Nürnberg kaj Vieno: en tiu lasta oni aprobis la nuligon de la Konstanta Kongresa Komitato kaj la ŝargon organizi la Internaciajn Kongresojn oni transdonis al la Centra Komitato, organismo elektita interkonsente de la Naciaj Societoj kaj de U. E. A. La Delegito de la K. E. F. en la Kongreso en Vieno voĉdonis favore al tiu ĉi propono, kiu estis aprobita kun la konsento de ĉiuj naciaj societoj esperantistaj.

En la Kongreso en Vieno, mi portis la reprezenton de la K. E. F. kaj ĉeestis la kunsidojn de la Konstanta Reprezentantaro; interese estas diri ke el la Hispana Preskaŭinsulo sole la K. E. F. pagis sian kotizaĵon al la Centra Komitato kaj sekve rajtis voĉdoni en la Kunveno: pri la aferoj diskutitaj kaj aprobitaj en tiuj kunvenoj mi jam faris raporton en K. E. kaj sekve ĉiu siatempe estis pri tio informita.

Estas mia devo hodiaŭ protesti antaŭ vi kontraŭ la agado de S-ro Mangada kiu tute senrajte alprenis sur sin la taskon alparoli la Kongreson en la Solena Malferma Kunsido en la nomo de la kataluna esperantistaro kaj kiu en kunveno de la grupo en Salzburg malpermesis sub minaco de skandalo kaj uzante sian aŭtoritaton kiel regna delegito, ke iu kataluno parolu tie: vi scias pri tiu afero ke ni sendis proteston al la Centra Komitato kaj vi havis jam okazon legi en nia oficiala organo la kontentigan respondon ricevitan.

La Direkta Komitato de K. E. F. kredis necesa por la plej bona efektivo de sia tasko la reformon de nia regularo. Por tio ni publikigis en nia gazeto la proponon de la Komitato kaj kunvokis Eksterordinaran Kunvenon, kiu okazis en Barcelono la 21an de Decembro de la lasta jaro; tie la projekto, kun kelkaj ŝanĝoj kiujn oni kredis necesaj, estis aprobita kaj la nova re-

gularo aprobita de la provincestro estis diversfoje presita sur la kovertoj de nia gazeto kaj certe de vi ĉiuj jam konata.

En la sama kunveno oni diskutis kaj aprobis nian sintenon kontraŭ la Iberia Esperantista Federacio, sinteno kiu permesas al ni interkonsenti ĉiam pri kuna laboro sen la devigo de materia aligo kiun ni ne konsideras necesa nek konvena.

En la kunveno oni kompletigis nian Direktan Komitaton, laŭ la ĵus aprobita regularo, per la saĝa elekto de niaj fervoraj amikoj S-roj Isidre Torrents kaj Lluís Domènech.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en Córdoba la Hispana Kongreso al kiu nia amiko S-ro Artur Domènech veturis kaj salutis en la nomo de la katalunaj samideanoj. Okazis ankaŭ antaŭ semajno Kunveno de Konstanta Reprezentataro kaj Konferenco por la Uzo de Esperanto en Komerco kaj Scienco; tiuj okazintaĵoj estas partoprenitaj de nia reprezentanto S-ro Gili.

Krom nia kutima laboro en la administrado kaj zorgado de la Federacio ni okazigis ankaŭ publikajn paroladojn kaj helpis per paroladistoj la grupojn kiuj tion petis okaze de lokaj propagandaj festoj. Ankaŭ multon ni faris en la propagando en la gazetoj kaj certe ĉiuj vi estas rimarkintaj ke ĉiam pli kaj pli ofte notoj pri la esperanta movado aperas en la ĵurnaloj en Barcelono. Ni klopodis ankaŭ kaj helpis en la propagando de Esperanto en la Radio-Studio en Barcelono, propagando kiu certe donos vastan fruktadon, ĉar ĝi permesas al ni atingi mediojn kiuj restis al ni fermitaj kaj alparoli personojn alimaniere neatingeblajn.

Jen estas la raporto de la tasko efektivigita dum unu jaro, cetere ne-kontentiga por ni kiuj pli multon celis; tamen mi esperas ke nia bona volo estos almenaŭ de vi ŝatata kaj estimata».

Kun aplaudoj ĝi estas aprobita.

S-ro Gili raportas pri la Konferencoj por Esperanto ĵus okazintaj en Parizo kaj kiujn li ĉeestis kiel reprezentanto de nia K. E. F. Oni aprobas lian agadon kaj oni esprimas dankon por la tasko.

S-ro Solà parolas pri la sistemo de voĉdono en Konstanta Reprezentataro, afero aludita de S-ro Gili en sia parolado, kaj miras ke en Parizo oni sumis al la anoj de la Naciaj Societoj tiujn de U. E. A. S-ro Grau ankaŭ petas klarigojn pri tio kaj oni decidas daŭrigi tiun diskutadon kiam S-ro Kreuz estos alveninta.

Nia kasisto legas la bilancon publikigitan en la lasta numero de nia gazeto kiu estas unuanime aprobita.

S-ro Alberich raportas pri la dekreto de la provincestro kiu devigas sendi la insignojn kaj stampilojn por aprobo. S-ro Jaume Grau pledas por ke nia malnova stampilo estu konservata; en la diskutado kiu fariĝas longa intervenas S-roj Gili kaj Dalmau. Tiu lasta proponas ke la afero estu pristudata de la Komitato. Fine ĉar neeble estas momente interkonsenti oni decidas prokrasti la diskuton.

Je la oka vespere la Prezidanto fermas la kunsidon.

II^a LABORKUNSIDO

La duan tagon de la Kongreso, matene je la naŭa en la sama sal-ono estas malfermita la Ferma Kunsido.

S-ro. Kreuz donas la klarigojn atendatajn pri la sistemo de voĉdonado en Konstanta Reprezentantaro kaj konsilas peti pri tio respondon de la Centra Komitato.

Oni transiras al la elekto de la novaj komitatanoj. Post kelkaj diversaj proponoj pri nomoj de taŭgaj kunfederacioj la jena Direkta Komitato estas unuanime elektita: Prezidanto: Delfi Dalmau; Vicprezidanto: Marian Solà; Sekretario: Eduard Capdevila; Vicsekretario: Conrad Domènech; Kasisito: Jaume Herp; Administristo: Josep Alberich; Kalkulisto: Ramon Marsà; Voĉdonantoj: Lluís Domènech, Isidre Torrents, Joan Prat, Josep Ventura.

La Prezidanto anoncas ke neniŭ urbo sin proponis por organizi la venontan Kongreson kaj la Feston de la Floraj Ludoj. S-ro. Gili proponas ke oni okazigu la venontan en Sabadell. S-ro. Comadran, Prezidanto de la grupo en Sabadell, rezignas pri tio pro lokaj kaŭzoj. S-ro. Jaume Grau proponas okazigi ĝin en Barcelono. S-ro. Dalmau respondas ke li ne kredas tion oportuna kaj ke oni intencas, se iam okazos Internacia Kongreso en Madrido, aranĝi Antaŭkongreson en Barcelono kaj tiam ankaŭ nian Katalunan Kongreson. Fine oni decidas lasi al la Komitato la taskon elekti taŭgan urbon por nia venonta Kunveno.

S-ro. Comadran petas ke la Komitato zorgu pri la eldono de lernolibroj kaj ke oni klopodu aranĝi propagandon en Lleyda kaj Tarragona. S-ro Dalmau respondas ke la intencoj de la Komitato iras ja tiun direkton, sed oni ne povas multe fari pro manko de mono kaj la propagando en tiuj provincoj estas afero ne de manko de propagandistoj sed de manko de bonvolemaj personoj por instrui la lingvon.

Oni decidas esprimi dankon al la «Associació per la Cultura de Mallorca» por la atabla gastigo de nia kunveno kaj, sendi telegramon al D-ro Privat dankante lin por lia senlaca laborado por Esperanto.

S-ro. Gili parolas pri la presado de la Kataluna Antologio kaj petas ke oni subskribu akciojn, kion faras la plimulto de la ĉeestantoj. S-ro. Kreuz petas al ĉiuj esperantistoj aliĝi al U. E. A.

S-ro. Bofill dankas por la ĉeesto al ĉiuj kongresanoj.

S-ro. Dalmau deziras en la nomo de ĉiuj kunfederacioj montri sian dankon kaj estimon al organizanto de la Kongreso, S-ro. Narcís Bofill, kaj por tio proponas ke li estu elektata Honora Membro de la K. E. F. Longaj aplaŭdoj subtenas la proponon.

La Prezidanto fermas la kunsidon je la dekunua matene.

Pretiĝu por la Universala Kongreso 31 julio—9 aŭgusto en Genève.—Kaj por la XIII^a K. E. F-a en Santa Coloma de Farnés en majo-junio 1926,

XI^{-aj} Internaciaj Floraj Ludoj

23 majo 1925.

«Teatro Principal», la plej bela teatro en Palma de Mallorca, vestis sin feste por akcepti la eksterordinaran solenaĵon. Ĉe la fasado de la teatro pendis multaj girlandoj, kiuj donis plian reliefon al la beleco de la konstruaĵo. La interno estis kvazaŭ ĝardeno kaj la scenejo, kun la majstra aranĝo de floroj, arbetoj, flagoj, k. t. p., rave altiris la rigardon de la multnombra ĉeestantaro.

La naturo ankaŭ volis esprimi sian aliĝon al la Festo, kaj ni ĝuis helan majan tagon, kiu sorĉe revigis nin pri amo kaj feliĉo.

Je la 11-a, la reprezentanto de la urbestro kune kun la prezidanto de la O. K. la Juĝintaro kaj urbaj eminentuloj eniris kaj sidigis ĉe la scenejo, kaj kiam silente la ĉeestantaro kun emocio atendas la komencon de la Festo, la reprezentanto de la urbestro elparolas: «Oni komencas la feston.»

La sekretario, S-ro. S. Alberich Jofrè, starigas kaj alpaŝinte al tribuno, dekstre de la scenejo, eklegas:

«Gesinjoroj:

En septembro de 1909 por la unua fojo la katalunaj esperantistoj koniĝis al la tutmonda samideanaro la ĉarmon kaj dolĉecon de Floraj Ludoj. Post tiu glora unua ŝtono al la monumento Poezio, kies plej altan lokon okupis Sino. Marie Hankel kiel reĝino, diversfoje la rigardo de multaj poetoj kaj verkistoj turniĝis al nia lando sopirante al la Festo, en kiu kuniĝas Poezio kun Belo pere de la Reĝino, simbolo de Amo kaj Pureco.

Rigardante la amason da verkoj, kiuj okaze de ĉiu Festo venas el tiel diversaj landoj, oni tuj konstatas kiel trafe divenis la unuaj organizintoj de niaj festoj. Se la Floraj Ludoj sukcesis en Katalunujo revivigi la iam velkantan katalunan lingvon kaj sukcesis ankoraŭ doni al ĝi vigecon kaj kapablon, kiu naskas envion ĉe aliaj eŭropaj lingvoj, por Esperanto ĝi estis nova puŝo antaŭen por pliriĉigi la jam multnombrian verkaron kaj por aŭdigi tra la mondo la reliefan belecon de nia internacia Poezio.

Legante la valorajn verkojn la penso flugas renkonte al la landoj, kiuj donis inspiron al la verkintoj. Se en Katalunujo la poetoj ĉerpas inspiron el Montserrat kaj Montseny, el la bluo de la maro kaj el la bluo de la ĉielo, kiu tie malproksime kuniĝas kun la unua formante harmonian tuton, ankaŭ ekster la limoj starigitaj de la homoj por disigi nin laŭ raso, lingvoj kaj moroj, la bluaj horizontoj desegniĝas, la montopintoj fiere altiĝas kaj la verdo de la kampoj senfine etendiĝas por ame akcepti la poetojn kaj doni al ili inspiron, sian ĉarmon, sian virgecon, siajn florojn.

La floroj, kiuj diverskolore desegniĝas en nia bukedo, havas parfumon plej allogan, plej ĉastan. Ĉiu floro travivis en sia patrujo ventojn aŭ ventegojn, neĝon aŭ sunvarmon, sed ĉiu el ili venkis la barojn kaj fiere sin for-

donis al la Reĝino de la Floraj Ludoj por plireliefigi ŝian belecon, por pliharmoniigi la kanton al ŝia senmakuleco kaj pura amo.

Por nacia lingvo nia festo estas signo de spirita forto kaj patrujamo: por Esperanto ĝi estas pruvo de ĝia literatura potenco, kiu ĉiujare fariĝas pli riĉa kaj grava. Por nia sankta afero la Internaciaj Floraj Ludoj estas fonto de bonodora travidebla akvo, kiu saturas kaj surverŝas la kampon de floro-poezio kaj revivigas ĉiujare la liron de la poetoj, kiuj genufleksante oferas ĉe la trono de nia amata Reĝino la frukton de amsopiroj kaj revoj.

Tiel longe kiel la homo vivos sur la tero, la liroj de l' poetoj aŭdiĝos por kanti la Belon kaj la Amon. Ni de longe estos atingintaj la eternan dormon kaj ankoraŭ tra la aero flugos la murmuro de la deklamantoj kaj la dolĉa rideto de ĉiam juna Reĝino prezidos la Florajn Ludojn.

Kaj jen la destino donis al Poezio la plej bonan esprimilon dank'al la genio de Zamenhof, kiu tiel feliĉe kunligis la sonojn por krei artefaritan lingvon, kies artefariteco superas ja la naturecon de multaj naturaj lingvoj. La infana pretendo de kelkaj naturaj lingvoj fariĝi internaciaj estas ja vere ridinda, ne nur pro la granda gramatika ĥaoso reganta en ĉiu el ili, sed pro la simpla fiero, kiun sentas ĉiu popolo por sia lingvo, por sia vera trezoro, la sola, kiun ne povas renversi la envio, la netoleremo, la subpremado de unu gento super alia, kaj kiun eĉ la logiko kaj rezonado ne povus forigi.

Ni aldonu ankoraŭ ke la nunaj Floraj Ludoj havas kiel scenejon la plej belan lokon, kiun oni povus trovi por inde akcepti la grandan feston de Poezio, kaj ni konstatos kia feliĉo estas por ni, kiuj povas ĝui propraokule la ĉarmon kaj belon de la XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj.

Sinjorinoj, Sinjoroj: Kun emocio mi aŭdiĝas mian voĉon por diskonigi la nomon de la poeto, kiu meritis la plej altan premion. Sro. **Artur Domènech Mas** estas la gajninto de la Natura Floro.

Mia brusto ne plu povas enteni la batantan koron, mia spiro preskaŭ haltas proklamante F-inon. **Catarina Montaner** Reĝino de la Festo. Dankon al la poeto, ke li donis al ni esperantistan Reĝinon. Ni akceptu ŝin kun amo kaj respekto, ni klinu la kapon kaj riverence ŝin levu al la alta trono ĉe kies piedoj ni juras eternan fidelecon."

Sro. Joan Gili Norta, reprezentanto de la laŭreata poeto, kiu bedaŭrinde ne povas ĝui persone la varman aplaŭdon de la publiko, akceptas de manoj de la prezidanto la Naturan Floron kaj kune kun akompanantaro forlasas la scenejon kaj iras renkonte al Ŝia Reĝina Moŝto por proponi la prezidan tronon.

Fariĝas silento, kiun subite ŝiras varmega aplaŭdado kaj murmuro de admiro: la beleco de nia Reĝino kaj Kortego de Amo, kiu konsistas el fraŭlinoj Teresa Bauzá, Josefa Brignon, Conchita Alou, Pilar Sánchez, Rosa Brignon, Jerónima Oliver kaj infaninoj Francisca Sampol kaj Josefina Mayol, altiras ĉies rigardojn, kiam ili eniras brakon ĉe brako kun la poeto kaj akompanantoj.

Ŝia Reĝina Moŝto sidigas ĉe la trono kaj la Korteganinoj ĉirkaŭ ŝi, formante belegan bukedon.

La sekretario reprenas la legadon de sia raporto:

«Reĝina Moŝto.

Reĝina Kortego:

La lingvo de mi uzata por saluti vin, amata Reĝino, estas riĉa kaj fleksebla, sed mi humile devas konfesi, ke mi ne majstras ĝin laŭ merito de via beleco por interplekti el ĝi bukedon kaj ĝin proponi al vi, kiel pruvon de mia admiro, amo kaj submetiĝo. Al vi, belaj korteganinoj, kiuj havas la feliĉon servi tiel altan Reĝinon, mian respektoplenan saluton.

Ekscelencaj aŭtoritatuloj.

Sinjorinoj.

Sinjoroj:

La nunjaraj Floraj Ludoj ne nur superis la antaŭajn laŭ la nombro da premioj — 43 por eksterordinaraj temoj — sed ankaŭ laŭ la merito de multaj ricevitaj verkoj. El la 111 verkoj ricevitaj ni certe povus citi kelkajn, kiuj efektive ja montras grandan kuraĝon de la sendintoj, sed, kaj tio ne estas alie farebla, ni nepre devas akcepti la laboron de komencanto, kiu eble post konstanta ekzerciĝado sukcesos altiri la atenton de la juĝantoj, ne per la rimarkinda mallerteco, sed per la alta beleco de la verko. Tra la kribriĵo de la Juĝantaro kelkaj manuskriptoj, feliĉe nur kelkaj, per si mem glitis kaj multaj belaj verkoj restis sur ĝi por pliriĉigi la ekzistantan literaturon.

Plenuminte la kutiman antaŭparolon al la raporto pri la premiitaj verkoj mi transiras al la detala priskribo kaj kritikado de la plej valoraj kaj al la disdonado de la premioj al iliaj aŭtoroj:

Originala versaĵo kantanta Amon.

Por tiu ĉi temo ni ricevis 14 verkojn. Tri el ili estas aparte interesaj kaj belaj. La Juĝantaro, kiu ne opiniis unuanime pri la elekto de la plej supera verko, decidis aljuĝi la Naturan Floron al la verko n-ro. 108, devizo «Els ulls són l'espill de l'ànima». Eble la poemo estas tro longa por sia temo kaj tial estiĝas spirmankoj de inspiro, kion eble pleje montras la tria strofo. Ĝi havas tamen, ĉarmajn tre belajn partojn, precipe rimarkindajn en la dua kaj lasta strofoj. La aŭtoro estas Sro. **Artur Domènech Mas** el Barcelona.

Brua aplaŭdo eksonas, kiam la reprezentanto de nia fama kataluna poeto starigas kaj alpaŝas la scenejon por deklami la premiitan verkon. Sro. Joan Gili Norta eklegas klare kaj belsone:

Sendu vian paĝon al K. E. F., tuj!

VIAJ OKULOJ

Se estas la rigardo, de l'animo
vera reflektó,
l' okuloj viaj estas la esprimo
de plenperfekto.
Ho, kiel estas pura l' anim' via,
ho kiel bela,
laŭ via rigard' milda, senpasia,
naiva, karesema kaj angela!

L' okuloj viaj de ĉielkoloro,
de helo brila,
sub la gracia brovarkaj' el oro,
velursimila,
du bluaj elŝiraĵoj ŝajne estas
de la lazuro;
du pecoj de ĉielo kiuj restas,
por ŝirm', en juveluj' el orveluro.

Kiele je l' tagiĝ' rosgut' perlumas
pro l' sunrebrilo,
pro senpekeco tiel milde lumas
via pupilo;
kiele ne l' sablaron en kvieto
marondoj frizas,
tiele de la vivo l' malkvieto,
pasante kontraŭ ĝi ne l' frunton ĉizas,

Kaj, kiel en lazur' modesta stelo
kaŝe fajrumas,
sed trans la blua fundo de l' ĉielo
tamen ĝi lumas,
jen tiel, trans la blua fund' de via
rigardo bela,
kaŝeme, sed serena, plenradia,
fajrumas modestec' kun brilo stela.

En via pupil' regas tiu ĉarma
kaj miroplena
de ensorĉita virgulin', senvarma
rigard' serena.
Ho, kiom da ĉastec', kiom da mildo
sur min direktas
l'okuloj viaj kiam mia bildo
en ili, mirekstaze, sin reflektas!

Jen tiam mia lir', de siaj kordoj
la tutan gamon
aŭdigas, kaj per versoj kaj akordoj
ĝi kantas amon;
kaj alten, alten, sian kanton levas
la liro mia,
dum, forportata de l' feliĉ', mi revas
en la reviga lum' de l' rigard' via.

Sed kiam vi ne min rigardas, muta
 la liro restas,
 kaj por unu rigard', deziro tuta
 de l'anim' estas
 eĉ de poet' la nomon oferdoni
 en mortsoĥiro,
 kaj en la fund' de ĝia bluo droni
 kun miaj versoj kaj kun mia liro.

ARTUR DOMĔNECH MAS

Ĝenerala ovacio premias la verkinton de tiel bela versaĵo kaj la sekretario daŭrigas:

«Al la verko n-ro 4, devizo «Kaj Dio la Eternulo...» oni aljuĝas kiel duan premion la duonon de la premio 1 de S-ro Narciso Bofill. La poemo estas bone ritmita kaj rimita, la stilo estas agrabla, kaj flua kvazaŭ bona prozo, sed en ĝi mankas originalaj pensoj. La aŭtoro estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

La verko n-ro 107 kun devizo «Asonancoj» havas kelkajn ĉarmajn versojn, frapantajn pensojn. En ĝi asonancas la tri lastaj vokaloj de unua kaj tria versoj. Tio ĉi estas formo ne ankoraŭ uzata en esperanta versfarado, ĉar ĝis nun oni uzis nur la hispanan asonancon konsistantan el sameco de vokaloj, kalkulante de tiu lasteakcentita. En la tuta poemo oni povas trovi eĉ ne unu substantivon kun apostrofo. Al ĝi oni aljuĝas kiel trian premion la premion XLIII, de Ekscelenca Urbestro de Palma. La aŭtoro estas S-ro. **Artur Domènech Mas** el Barcelona.

Oni aljuĝas I-an mencion al la verko n-ro 51, devizo «Se socio pekas, amo krimas» verkita de S-ro. Julio Baghy el Budapeŝt.

II-an mencion meritas la verko n-ro 36, devizo «Laŭ la maniero de Rubén Darío» kies aŭtoro estas S-ro. Jaume Grau Casas el Barcelona.

III-an mencion oni aljuĝas al la verko n-ro 45, devizo «Ami... ami... ami!» verkita de S-ro. Julio Baghy el Budapeŝt.

Originala ama verko en prozo

Kvar verkoj estis ricevitaĵ por tiu ĉi grupo. Al la verko n-ro 34, devizo «Ni vidas, nenion ni scii povas» oni aljuĝas la premion. La aŭtoro de la belstila, tragedia noveleto, estas S-ro **Josep Berger** el Córdoba.

La sama aŭtoro ricevas I-an mencion por la verko 35, devizo «Polyhymnia».

Dua mencio estas aljuĝita al n-ro 23, kun devizo «Amo venkos malpacon», verko de F-ino. Hilde Scholze el Reichenberg (Ĉeĥoslovakujo).

Traduko de la versaĵo La Pastoreta de M. Costa i Llobera

Unu sola traduko estas ricevita. Estas bedaŭrinde, ke niaj enlandaj poetoj ne volis interesiĝi por doni al la kataluna versaĵo plej trafilan tradu-

kon. La ricevita verko n-ro 3 kun devizo «Versa tradukado estas re-kreado» feliĉe elpruvus tra la traduko la gracie trajton de la originalo. Al ĝi oni aljuĝas la reston de la premio 1 de S-ro. Narciso Bofill. La tradukinto estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona, kiu ĝin majstre legas:

La Paŝtistineteto

Aspektis la knabino,
zorgata kun atent',
valora perl' garnita
per oro kaj argent'.

Ŝi, blanka kiel perlo
kaj blonda kvazaŭ or',
burĝon' el alta branĉo,
de kie estis flor'?

Ho ve! ke nun ŝi havas
la teron por kusen',
post kiam patro iris
militon, sen reven'.

Duonpatrin' malbona
ŝafpaŝti igas ŝin:
ŝi paŝtas la ŝafidojn
kun ŝafa mol-inklin'.

Ŝi ekster la vilaĝon
la ŝafojn pelas for;
dum ŝpinas ŝi, per kantoj
gojiĝas ŝia kor'.

Ĉe l' gaja sunleviĝo
jam kantas ŝi en val':
je ŝia voĉo sentas
envion najtingal'.

Ŝin aŭdis ja la grafo,
ŝin aŭdis la nobel'
ĉagrene nedormanta
interne de l' kastel'.

— Kia kanzono nova
hodiaŭ ravas min?

— Ĉi tie trapasante
ĝin kantas paŝtistin'.

— Vi iru, do, ŝin peti
kantadi antaŭ mi. —
Post tio, tuj pagio
direktas sin al ŝi.

— Ĉu vi, la paŝtistino,
min sekvus al Kastel'?

— Mi kion faros tie,
vestita kun malbel'?

— Ne gravas, paŝtistino,
vest' luksa aŭ ĉifon':
vi grafon kontentigos
per nur via kanzon'. —

Timeme ŝi eniras,
konfuza la vizaĝ'...
La graf' ja ŝin invitas,
ŝi restas sen kuraĝ'.

— Se vi, la paŝtistino,
kantadus nun por mi,
vi tiun ringon havus,
el oro, por premi'.

— Sinjor', por mi ne estas
pri via ring' neces'...
Mi iru paŝti ŝafojn
denove, kun permes'.

— Al vi, se vi kantados,
donacos veston mi.

— Eĉ plena de flikaĵoj,
sufiĉas tiu-ĉi.

— Por mia viv', nu, kantu:
ne estos ia don'.

Sinjoro, vi min aŭdis:
jen nun mia kanzon'. —

Ŝi kantis: ŝin aŭskultis
eĉ l' arbara popol',
kaj venis sur balkonon
kardelo kaj pirol'.

Kiele ŝin aŭskultis
la ĉagrenita graf'!
Ĉagren' de li foriris
kaj venis dolĉa rav'.

Je ŝia kant' unua,
sur ŝin jam falis flor';
je ŝia kanto tria,
de l' graf' flugis la kor'.

— Ho vi, paŝtistinetu,
komplezi volu min;
akceptu... mian manon,
vi estos la grafin'! —

El la kataluna lingvo tradukis.

JAUME GRAU CASAS

Entuziasma aplaŭdo de la aŭdantaro premias la leginton.

Traduko de la prozaĵo Via Blanquerna de Llorenç Riber

Kvar verkoj estas ricevitaj. Aparte rimarkindaj estas du el ili, sed ĉar tiu kun n-ro 9 kaj devizo «Avis Rara» pli bone alĝustigas al la originalo kaj enhavas tre detalan biografion pri Ramon Llull, aŭtoro de la granda verko «Blanquerna», oni aljuĝas al ĝi la premion II de S-ino. Maria Fornaris de Bofill. La aŭtoro estas S-ro. **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

Mencion meritas la verko n-ro 17 kun devizo «Marrigardejo», kies aŭtoro estas S-ro. **Josep M.^a Terricabras** el Vich.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

La abundeco de premioj por temo laŭvola estis tiel granda, ke la Juĝantaro decidis grupigi la verkojn laŭ simileco de ilia senco kaj celo, kaj en ĉiu grupo doni kelkajn premiojn al la plej meritaj verkoj. Kelkaj grupoj enviciĝis tiom multajn verkojn, ke oni decidis fari duan kaj trian grupon. Entute ni faris la kutimajn por la Ordinaraĵoj kaj 17 por la Eksterordinaraĵoj.

Jen la rezultato de nia tasko:

Temo XVIII. — Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj. Premio de S-ro. Prezidanto de K. E. F.

El la du ricevitaj verkoj reliefigas pro sia merito tiu kun n.º 93 kaj devi-

zo «Sóc al país dels tarongers florits». Ĝi enhavas ĝustan tradukon de la versaĵoj unuaj strofoj de Fantasiaj de Auzias March kaj «La Batalo de flo-roj en Valencio» de Miquel Duran i Törtajada. En prozo ĝi enhavas «Pri kiel la sanktuloj volis manĝi fragojn» de E. M. Ferrando. La aŭtoro de tiu ĉi verko, kiu ricevas la premion, estas S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Mencion meritas la verko n° 28, devizo «Vora el barranc...», bela traduko de «La Dimanĉo de la rozoj» de Eduard L. Chavarri, kies tradukinto estas S-ro. Josep Ventura Freixas el Terrassa.

Temo XIX. — Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusiljonaj aŭtoroj. Premio de S-ro. Sekretario de K. E. F.

Du verkaĵoj estas ricevitaj. La premion oni aljuĝas al n° 16, devizo «Pax Vobis» Ĝi estas traduko de la bela prozaĵo «La Perdita Ŝlosilo» de Esteve Casadeponce. La traduko havas kelkajn makuletojn, kiujn nur tre malfacile oni povus eviti pro la originaleco de kelkaj esprimoj en la kataluna teksto. Aŭtoro S-ro. **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

Mencion ricevas la verko n° 89, Devizo «Canigó», konsistanta el du versaĵoj tradukoj kaj studo. Verkinto S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Tradukitaj versaĵoj

Nau tradukoj estas ricevitaj. Unu el ili estas aparte meritoplana pro la ĉarma flueco de la versaĵoj kaj ĝia korekteco. Ĝi estas tiu kun n° 38, devizo «Majfloro» al kiu oni aljuĝas la premion XI de Banko Crédito Balear. La majstra traduko estas farita de F-ino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Duan premion, la IX de S-ro Jaume M. Granada, indas la verko n° 2, devizo «En versfarado formo estas funda» kolekto de ok katalunaj sonetoj, tradukitaj de S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Unuan mencion ricevas la verko n° 72 kun devizo «Vian ĉielon kovru Zeus». Tri poemoj el Goethe, tradukitaj de S-ro. Wilh. Solzbacher el Honnef (Germanujo). Duan mencion ricevas n° 76 «Ex abundantia cordis», ses tradukitaj poezioj el kataluna lingvo de S-ro. Jaume Grau Casas el Barcelona. Trian ricevas n° 86, devizo «Trosevereco estas fiereco». Du sonetoj el hispana lingvo tradukitaj de S-ro. Josep Berger el Kordovo.

Tradukitaj prozaĵoj. (1-a. Grupo)

Nau verkaĵojn ni envicigis en tiun ĉi grupon. Tre peza tasko estis por la Juĝantaro la analizado de multaj tre ampleksaj verkaĵoj kaj ankoraŭ pli peza kaj malfacila estis ilia laŭgrada envicigado. En tiu ĉi grupo distingiĝis unue la verko n° 106, devizo «Konstantinopolo», romano pri la modernaj turkaj haremoj, kiu enhavas multajn paĝojn en nesupereble bela stilo. Ĝi ricevas la premion X de Banko Fomento Agrícola de Mallorca. Tradukis el franca lingvo S-ro. **Marian Solà** el Terrassa.

Duavice ni havas tri verkaĵojn, kies kvalitoj estas preskaŭ la samaj. En ili

la lingvo estas korekta, flua kaj gracia, kaj nur post tre profunda sondado oni decidis aljuĝi tri premiojn laŭ la ĵena ordo: al la verko n^o 33, devizo «Migrado, jes migrado» bela rakonto el la germana lingvo, oni aljuĝas la premion III de F-ino. Amàlia Bofill Fornaris. Aŭtoro estas nia ĉeĥoslovaka samideano S-ro. **Joseph Berger** el Kordovo.

La verko n^o 32 kun devizo «Felicity» ricevas la premion V de S-ro. Josep Salom. La belan tradukon ni ŝuldas al la facila plumo de F-ino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Lasta premio estas aljuĝita al n^o 73, devizo «Plaĉi al ĉiuj neniu sukcesis», ĥina legendo tradukita de S-ro. **Wilmh. Solzbacher** el Honnef (Germanujo). La premio aljuĝita estas la VIII de S-ro. Marian Jaquotot.

Unuan mencion meritas pro sia plena korekteco la verko n^o 91, devizo «Silento estas oro», traduko de S-ro. E. Wiesenfeld el Varsovio (Polujo). Dua mencio estas ricevita de la verko n^o 6 kun devizo «Finis coronat opus» kies tradukinto estas S-ro. Josep Ventura Freixas el Terrassa, kaj trian ricevas n^o 97, devizo «Valoraj pensoj», tradukita de S-ro. Otto Ginz el Praha (Ĉeĥoslovakujo).

Originalaj Versaĵoj (1-a Grupo)

Tiu ĉi grupo enhavas kvar verkojn. Tri el ili estas premiindaj laŭ la ĵena ordo de merito:

La premion IV de S-ro. Antonio Rosselló oni aljuĝas al la manuskripto n^o 7, devizo «Domine da mihi pacem», poemo de amo kaj doloro, kiu enhavas proksimume 500 versojn. Ĝi estas kolosa laboro de la verkinto, kiu en multaj paĝoj dolĉe sonorigas la liron, dum en aliaj, kelkaj makuletoj forprenas ĉarmon kaj gracion. Aŭtoro S-ro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Al la verko n^o 44 kun devizo «Noktmeza Batalo» pro la belaj pensoj kaj ĝusta ritmo de la versoj oni aljuĝas kiel duan premion tiun de Banko Vitalicio de España. Aŭtoro estas la konata poeto **Julio Baghy** el Budapest (Hungarujo).

La VXi premion, donitan de Fervojo de Söller, oni donas al la verko n^o 109 kun devizo «No hi fa res que m'enganyis», tre amuza versaĵo de nia poeto **Artur Domènech Mas** el Barcelona.

Mencion meritas n^o 13, devizo «Kial plendi se estas amo?», verkita de S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Originalaj prozaĵoj (1-a Grupo)

La nunaj Floraj Ludoj, laŭ mia opinio, distingiĝas per la kolekto de originalaj prozaĵoj ricevitaĵ. La 19 ricevitaĵajn verkojn ni disdividis laŭ tri grupoj por pli bone premii la meritplenajn verkintojn. En la unua grupo troviĝas ses manuskriptoj.

Al la verko n^o 59, devizita «Vi estas prava, etulo», estas aljuĝita la

premio XII de Fomento del Civismo. La rakonto enhavas tre belajn paĝojn per kiuj la aŭtoro priskribas frapantajn scenojn inter avo kaj nepineto. Aŭtoro estos Sro. **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo).

Duan premion — XIV de Asociació per la Cultura de Mallorca — oni donas al n.^o 27, devizo «Plumo ne sentas, papero silentas». Kun granda plezuro oni legas la noveleton, verkitan laŭ stilo kaj korekteco, kiujn ni vidis nur en la aŭtoro S-ro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

Unuan mencion oni aljuĝas al la verko n.^o 69 kun devizo «Kulpoj de patro persekutas idon», kies aŭtoro estas Fino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo). Duan mencion meritas la verko n.^o 58, devizo «Arbara silento». Aŭtoro S-ro. **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo).

Tradukitaj teatraĵoj

El la du envicigitaj verkoj meritas premion tiu kun n.^o 39 kaj devizo «Maltrankvilo» al kiu oni aljuĝas la premion XVII de Ruĝa Kruco (Santa Catalina). La tradukinto pravas denove sian lertecon. Tiu estas Fino. **L. Briggs** el Armley (Anglujo).

Mencion meritas la dua verko n.^o 75, devizo «Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj», kiun ni ŝuldas al la rimarkinda kapablo de Sro. Josep Ventura Freixas el Terrassa.

Originalaj versaĵoj kantantaj la patrujon

La du ricevitaj verkoj estas majstraj, korektaj, belsonaj, sed ĉar tiu kun n.^o 47 kaj devizo «Komuna sorto» ritmas kaj rimas pli dolĉe oni aljuĝas al ĝi la premion XXVI de Asocio de la Baleara Gazetaro. La aŭtoro estas la potenca poeto **Julio Baghy** el Budapest (Hungarujo).

Mencion oni faras al la dua verko, n.^o 46, devizo «La patrujo super ĉio» kies aŭtoro estas ankaŭ Sro. Julio Baghy el Budapest.

Pacifismo

El la tri envicigitaj verkoj atingas reliefon, kiun ne egalas iu alia verko en tiu ĉi konkurso, tiu kun n.^o 26, devizo «Se ne la "se" malfeliĉa, mi estus homo tre riĉa». La stilo kaj originaleco de tiu ĉi verko donas ideon pri la granda talento de la verkinto Sro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo), al kiu oni aljuĝas la premion VI de Sro. Pere Tous.

Mencion meritas la manuskripto 54, devizo «Fata Morgana», verkita de Sro. J. Krámer el Enkhuizen (Nederlando).

Studoj diversaj

La kvin verkoj enhavataj de tiu ĉi grupo estas per si mem pruvo pri la sukceso de niaj Floraj Ludoj. Ili ĉiuj estas de granda merito kaj kun granda atento devis la Juĝantaro ilin studi por trate disdoni la premiojn.

La premion XX de Episkopa Moŝto de Mallorca oni donas al la manuŝkripto n.º 37 kun devizo «Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero, ol filozofio klarigas». La verko konsistas el profunda studo pri la verkaro de Shakespeare.

Duan premion — XXII de Ĝenerala Societo de Elektraĵ Tramveturiloj — oni cedas al n.º 70, devizo «La Bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en paradizo». Per tiu ĉi verko oni faras trafan defendadon de la hebreaĵoj kaj profundan priskribon pri iliaj ecoj. Aŭtoro de la du premiitaj verkoj estas Sino. **Emma L. Osmond** el London (Anglujo).

Unuan mencion meritas la verko n.º 53, «Malofta temo» de Sro. Otto Ginz el Praha (Ĉeĥoslovakujo). Duan indas tiu kun n.º 66, devizo «Ŝajni — kaj esti, jen diferenco», verko de Fino. Helena Hempel el Lwow (Polujo). Trian oni aljuĝas al n.º 18 kun devizo «Libri oracula pandunt», kies aŭtoro estas Sro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Popolkantoj kaj moroj

El la kvar grupigitaj manuskriptoj ricevas unuan premion — XXXI de Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma — la verko n.º 95 kun devizo «Vindicamus hereditatem patrum nostrorum». Ĝi konsistas el ĝusta studo pri la kataluna popolkanto kun 14 versaj tradukoj kaj melodioj. Aŭtoro Sro. **Joan Amades** el Barcelona.

Duan premion atingas la verko n.º 31, devizo «Tapuah», al kiu oni aljuĝas la XXXVIII de Moŝta Kolegio de Advokatoj, pro la imitinda flueco kaj korekteco. Aŭtoro Sro. **J. D. Applebaum** el Liverpool (Anglujo).

Trian premion — XXV de Fomento de Turismo de Palma — meritas la verko n.º 5 kun devizo «Lingvo sen poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo», kiu kun korekteco priskribas la Balearajn Insulojn, skizas poeton Miquel Costa i Llobera kaj tradukas tri versaĵojn. Aŭtoro Sro. **Jaume Grau Casas** el Barcelona.

Mencion ricevas la verko n.º 94 kun devizo «De quan les bèsties par-laven», kies aŭtoro estas Sro. Joan Amades el Barcelona.

Travivaĵoj originale verkitaj

Tiu ĉi grupo enhavas kvin verkojn, kiuj priskribas vojaĝojn, travivitajn scenojn k. t. p. Du verkoj staras super la aliaj kaj el tiuj ĉi du verkoj, kvankam ilia merito estas preskaŭ la sama, meritas unuan premion tiu kun num. 87, devizo «Turbano kaj duonluno». Ĝi per korekta lingvaĵo disvolvas interesan vojaĝon al Maroko. La premio aljuĝita estas la XXVII, de Sro. Fernando Ramirez, kaj la aŭtoro Sro. **Joseph Berger** el Kordovo.

Duan premion indas la verko n.º 83, devizo «Parolantaj ŝtonoj». Ĝi priskribas scenojn el infaneco, kiujn oni legas kun plezuro. Bedaŭrinde enŝoviĝis iu erareto, kiu restigas la verkon en dua vico. La premio aljuĝita

estas la XXVIII, de Sro. Miquel Guasp. Aŭtoro Sino. **Maria Elworthy-Possenaer** el Mariaburg (Belgujo).

Mencion oni donas al la verko n.^o 52 devizo «Rememoroj», kies aŭtoro estas Fino. Maria Paz Zamora el Manila (Filipinaj Insuloj).

Originalaj prozaĵoj (2-a. Grupo)

Envicigitaj estas kvin verkoj. La Juĝantaro troviĝis en embaraso por ĝuste difini la meriton de ĉiu verko ĉar ĉiu estas korekta kaj interesa. La definitiva verdikto donis la jenan rezultaton:

Al la verko n.^o 110, devizo «Patrino kaj infano» oni aljuĝas la premion XXI de Oficiala Ĉambro de Urbobieno. La aŭtoro kun stilo tre bela faras patetikan priskribon de suferado de edzo post la morto de amata edzino. Ĝi estas kortuŝa kaj frapanta rakonteto. La aŭtoro estas Sro. **Christian Thoma** el Köln-Kalk (Germanujo).

Duan premion trafas la verko n.^o 105, devizo «La Fianĉino de la Morto». La fantazio de la aŭtoro facile disvolvas interesajn scenojn de gentoj, kiuj faras por siaj fetiĉoj barbarajn krimojn. La premio aljuĝita estas la XXIX de Sro. Antonio Coll kaj la verkinto Sro. **Antoni Durà** el Barcelona.

Trian premion — la XXXII de Sro. Rafael Blanes — oni cedas al la verko n.^o 41 kun devizo «Fjodor». Tre korekta rakonto, kies enhavo allogas la leganton per la mistero, kiu ĉirkaŭas ĝin kaj kiu je la fino malaperas por doni traŝan solvon al la aventuro. Aŭtoro estas Sro. **Theodor Kilian** el Kounice (Ĉeĥoslovakujo).

La premion XXXIII de Moŝta Kolegio de Prokuristoj de Palma oni donas kiel kvaran en tiu ĉi grupo al la verko n.^o 67 kun devizo «Fortuno favoras kuraĝulon», kiu konsistas el ama noveleto kun ŝercoj kaj belaj scenoj. Aŭtoro S-ino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Mencion ricevas la verko n.^o 68, devizo «Kio komenciĝas, devas nepre finiĝi» kies aŭtoro estas S-ino. **Helena Hempel** el Lwow (Polujo).

Tradukitaj prozaĵoj (2-a Grupo)

Ok manuskriptoj konsistigas la grupon. La jenaj premioj estas aljuĝitaj:

1-a. Al la verko n.^o 101 kun devizo «Ad pedem litteram» oni aljuĝas la premion XXIII de Esperantista Klubo Palma. Ĝi estas traduko tre ĝusta kaj bela el kataluna lingvo kaj ĝia aŭtoro estas **Josep Ventura Freixas** el Terrassa.

2-a. La premio XXXIV de Veloz Sport Balear al la manuskripto n.^o 98, devizo «Amo diverse komprenita». Belstila kaj tre korekta traduko de S-ro. **E. Wiesenfeld** el Varsovio (Polujo).

3-an, premion — XXXV de Mallorka Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj — meritas la verko n.^o 71 kun devizo «La vivo estas sonĝo, kaj la amo la suno de eterna maja tago». Traduko el kroata lingvo farita de la facila mano de Sro. **Fran Janjić** el Vinkovci (Jugoslavujo).

4-an. oni donas al la verko n.^o 111 kun devizo «Amo, plej supera rajto». Ĉar la temo XXX de Esp. Grupo Ĝerona Espero ne estas konkursita, kun permeso de la donacinto oni aljuĝas la duonon de la premio al tiu ĉi manuskripto, kies aŭtoro estas S-ro. **E. Wiesenfeld** el Varsovio. (Polujo).

Mencion rajtas la verko n.^o 92, devizo «Amor omnia vincit», traduko de S-ro. Ed. Wiesenfeld el Varsovio (Polujo).

Originalaj versaĵoj (2-a. Grupo)

Dek-tri verkojn enhavas tiu ĉi grupo.

Al la verko n.^o 50 kun devizo «Ĉiela graco — kora paco» oni aljuĝas la premion XLII de Ekscelenca Deputataro de Balears. Ĝi estas nova brilanto de la talenta poeto S-ro. **Julio Baghy** el Budapeŝto (Hungarujo).

Duan premion — XXXIX de Oficiala Kolegio de Farmaciistoj — meritas la verko n.^o 15 kun devizo «Omne trinum est perfectum». Ĝi bele rimas kaj agrable sonas. Aŭtoro estas S-ro. **Francesco Pizzi** el Venezia (Italujo).

Estas inda je tria premio — XL de Oficiala Kolegio de Kuracistoj — la verko n.^o 56, devizo «Sankta vesper', paca vesper'», kies sentimentalaj strofoj ĝuste ritmas kaj fariĝas aparte interesa pro la korekteco de la enhavo. Ĝia aŭtoro estas S-ro. **Christian Thoma** el Köln-kalk (Germanujo).

Al la verko n.^o 12, devizo «Don Dinero» oni aljuĝas kiel kvaran premion tiun de Federacío Patronal de Mallorca (XLI). La aŭtoro estas S-ro. **Jan van Schoor** el Antwerpen (Belgujo).


Unuan mencion ricevas la verko n.^o 14 kun devizo «La poezia non muore», kies aŭtoro estas S-ro. Jan van Schoor el Antwerpen (Belgujo). Duan meritas n.^o 48 devizo «Larmiĝinta ĝojo», kies aŭtoro estas S-ro. Julio Baghy el Budapeŝto (Hungarujo). Trian mencion indas la verko n.^o 19, devizo «Suno levigas — la mondo reviviĝas», verkita de S-ro. Antono Javorskij el Ostrón (Polujo).

Originalaj prozaĵoj (3-a. Grupo)

El ok verkoj konsistas la grupo. Super ĉiuj brilas tiu kun n.^o 60 kaj devizo «Laboro de l' mano, de l' koro la sano». Belega kaj korekta rakonto per kiu la aŭtoro kantas la belecon de Katalunujo kaj la ĉarmon de mallorkanino. La verkinto, S-ro. **Ed. Jung** el Strasbourg (Francujo), en sia verko rakontas kiom liaj nepoj amas la birdojn, kiujn li mem elfaris por la kristnaska arbo. Iam, antaŭ la mirigitaj infanoj, la avo faris pakajon kaj sendis la birdojn al la Reĝino de nia Festo kiel pruvon de amo. — Akceptu ilin, amata Reĝino, ĉar la donaco fluigis larmojn el dolĉaj okuloj de infanoj, kiuj vundis la koron de vin amanta maljunulo. La premio aljuĝita estas la XXIV de Oficiala Ĉambro de Komerco.

Al la verko n.^o 25, devizo «Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos» oni aljuĝas duan premion — XXXVII de la Hejmo de l' Estonteco —. Novelo majstre ĉizita de S-ro. **I. Ŝirjaev** el Baklanka (Rusujo).

K. E. F-a. KONGRESO EN PALMA



Gekongresanoj elire de la Akceptejo.



Grupo de Kongresanoj inter kiuj vidiĝas niaj konataj Bofill, Kreuz, Hrbácková, Fikrle, Osmond, Berger, k. a.


XII^a KONGRESO DE K. E. F.

Detalo de Esperanta Ekspozicio ĉe Esperanta Klubo Palma.



Alia detalo de la Esp. Ekspozicio ĉe la Esp. Klubo Palma.

KORTEGO DE AMO DE LA I. F. L. EN PALMA



Reĝino kaj Korteganinoj. De maldekstre al dekstre: F-inoj T. Bauzá, J. Brignon, C. Alou, C. Montaner, T. Sánchez, R. Brignon, J. Oliver, kaj infaninoj. F. Sampol. J. Mayol.



Narciso Bofill

Jen nomo kiun ni devas skribi hodiaŭ per plej helaj literoj. Jen animo, jen kolono, jen volo kaj kuraĝo, jen ekzemplo por ebligo de Esperanta sukceso kontraŭ ĉiaj baroj.



Narciso Bofill, heroo de nia Kongreso en Palma de Mallorca.

Dank' al Narciso Bofill nia Kongreso en Palma estis ebla kontraŭ ĉies opinio konanta la specialajn cirkonstancojn en tiu bela katalunlingva urbo, ĉefurbo fama de la baleara insularo, mediteranea perlaro, definitive konkerita de la Kataluna Reĝo Jakó I la Konkerulo, en la komenco de la XIII^a jarcento. Se tiu fama Reĝo konkeris Balearon por la Katalunaj lingvo kaj kulturo, Narciso Bofill konkeris tiun insularon por Esperanto.

Narciso Bofill, ĉarma civitano el Mallorca, inĝeniero, posedanto de minoj, pioniro de nia Movado pruvis al plej skeptikaj samideanoj, ke unu sola energia, malavara, fervora esperantisto en plej malfavoraj cirkonstancoj povas sukcesigi Kongreson

de nia Federacio kaj varbadon por Esperanto.

En la Historio de nia Movado, la nomo de nia amiko brilos plej hele, kaj lia ekzemplo montros al ĉiuj la efikon de energio kaj sindonemo por Idealo.

En nia memoro neniam malaperos la nomo de Narciso Bofill, nomo de pioniro, de samideano, de amiko kaj de Honora Membro de nia Federacio.

Ĉia sukceso, atingita


Malgraŭ denuncoj faritaj kontraŭ ni al ĉiuj Palmaj Aŭtoritatuloj, dank' al la lerteco de la Prezidanto de la Organiza Komitato, ne nur ili sin detenis de malhelpo al nia Kongreso, sed kontraŭe, la urbestro S-ro Llopart kaj la Prezidanto de la Deputitaro donis premiojn por la Floraj Ludoj kaj akceptis la honoran membrecon de la Kongreso, kaj en ĉiuj festoj estis inter ni reprezente de la urbestro, la urbkonsilanto S-ro Fiol, kies afablecon ni plezure kaj danke memoras. Ankaŭ akceptis la honoran membrecon de nia Kongreso lia Episkopa Moŝto de Palma, kaj nian Festenon ĉeestis la Prezidanto de la Aŭdienco. Ili ĉiuj povis konstati ke K. E. F. estas speciala organizaĵo pure esperantisma por la katalunlingvaj teritorioj, kaj eĉ, post la Kongreso, la urbkonsilantaro en ĝenerala kunsido voĉdonis akte esprimi plezuron pri la Kongreso de nia Federacio tiel sukcese okazinta en Palma.

La bela lando, la Floraj Ludoj, la fervoro de la katalunoj, nia Federacio, la famo de niaj kongresoj, la speciala intereso pro la malfacilaĵoj starigitaj kontraŭ la tasko de la organizinto de la XII^a altiris grandan atenton kaj scivolemon pri nia Kongreso en Palma. Kaj tial ni havis la ĝojon saluti alilandajn samideanojn ekz. S-ron Fikrle el Bratislava, S-inon A. Hrbáčková el Zlin, S-ron Josep Berger, sekretario de la Iberia Kongreso en Kordovo, la konatan verkistinon Emma L. Osmond, kaj Drinon. Grogan el Anglujo, kaj la Sekretario de la Centra Komitato, kaj de la proksima Universala Kongreso de Esperanto en Genève, S-ron Robert Kreuz. Bedaŭrinde aliaj, kiel nia klera hungara samideano Jozefo Major, ne povis veni pro malfacilaĵoj ĉe hispanaj konsuloj.


Cetere la sukceso de nia Kongreso en la bela Mallorca estis tiel eksterordinara, ke de ĝia okazo ĝis nun aliĝis al la Esperanta Klubo Palma pli ol 50 novaj membroj, kaj nia samideanino Catarina Montaner, la Reĝino de la lastokazintaj Floraj Ludoj, gvidas kurson de Esperanto en tiu Klubo kun vera sukceso. Fine ni diru ke ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj el Palma publikigis tre favorajn impresojn pri nia Movado, kaj merititajn laŭdojn al la heroo de la Kongreso, Narciso Bofill.

La Komitato de K. E. F. publike esprimas sian grandan ĝojon pri la paŝo antaŭen al nia venko, kiun signifas la XII^a Kongreso, la Palma, la glora Kongreso.

Ekskursa Vizito
de la
K. E. F-aj
Kongresanoj
en
Mallorca



Kavernoj ĉe Manacor. — Teatro de la Feinoj.



Kavernoj de Manacor — Loko nomita «La Kapelo».


Kongreso
de K. E. F.
en Palma
en
Majo de 1925



Artur Domènech, poeto premiita je la Natura Floro en XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



Fino Catalina Montaner, Reĝino de la XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



Grupo de gekongresanoj ĉe la Granda Hotelo en Palma.

La Proksima Kongreso de K. E. F.

Nia XIII^a Kongreso okazos en Santa Coloma de Farnés, kiu estas el la plej belaj lokoj en Katalunujo: ĝi estas apud la fama montaro kaj ekskursejo Montseny, kaj tie estas la granda Banejo Termes Orion kun granda hotelo kaj amuzejo, kiu ebligos plaĉegan loĝadon de centoj da kongresanoj.

Niaj samideanoj en Santa Coloma pretiĝas okazi-
gi la XIII-an Kongreson de K. E. F. inda je la antaŭaj
kaj je la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj, kies prezido
estas proponita al nia eminenta pioniro D-ro Edmond
Privat.

La jenaj mencioj estas aljuĝitaj:

Unua al la verko n.^o 61, devizo «Beninda malsato», aŭtoro S-ro. Ed. Jung el Strasbourg (Francujo), kiu bele priskribas la Balearajn Insulojn. Dua al n.^o 65 kun devizo «Lori», korekte verkita de S-ro. Christian Thoma el Köln — Kalk (Germanujo) Tria al n.^o 57, devizo «Supren la kapon», kies aŭtoro estas S-ro. Ed. Jung el Strasbourg (Francujo).

Por la temo «Lernolibro por katalunlingvanoj» ni ricevis unu solan verkon. Ĝi portas devizon «Natura» kaj n-ran. 43. Kvankam ĝi tre kredeble ne donus sufiĉe kontentigan rezulton praktikan, ĝi meritas premion — XIII de Caja de Ahorros y Monte de Piedad de Belears — pro la korekteco kaj granda laboro de la verkinto, S-ro. **Josep Rosselló** el Palma.

Krom la pli supre aludita temo de Esp. Grupo Ĝerona Espero estis ne konkursitaj la temo VII, premio de S-ro. Miguel C. Oliver, kaj la XXXVI de S-ro Bartolomé Font.

Post la datolimo por la akcepto de verkoj estis ricevita citinda versaĵo, kies aŭtoro estas S-ro. Saito Ĉikara el Tokio (Japanujo).

— Jen, estimataj gesinjoroj, la rezultato de la XI Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj, kiel mi diris ĉe la komenco, havas la feliĉan ŝancon okazi en la plej bela loko de nia lando, kaj vi, aŭskultantoj, povas atesti ke la kvalito de la deklamitaj poezioj estas inda je la loko.

La peza tasko de la Juĝantaro, kiu en la daŭro de mallonga tempo devas pesi tiom multajn verkojn — oni rememoru ke ĉiujare la manuskriptoj devas vojaĝi al eksterlando kaj ke tio forprenas multajn tagojn — disvolvigis sen baroj kaj ĝustatenupe oni povis publikigi la verdikton. Sed ĉar en la rapido ne ĉiam oni ĝuste povas doni sian opinion, estus konsilinde ke en la estontaj Ludoj oni donu al la Juĝantaro pli longan tempon por la plenumo de ĝia tasko aŭ, se tio ne estas ebla, oni limigu la amplekson de la akceptotaj verkoj. Inter la 111 manuskriptoj ricevitaĵoj por la nunaj Floraj Ludoj troviĝas kelkaj verkoj, kiuj postulas kelkajn horojn por fari profundan juĝadon.

Pro tio, pro la granda laboro, kiu pezas sur ĉiu juĝanto, ni devas danki plej multe S-rojn. J. Schmid el Bern kaj Kolomano de Kalocsay el Budapeŝto, kiuj konsciante la respondecon de la posteno, faris tre atentan kaj meritplenan verdikton.

Al la multaj verkistoj, kiuj ricevis premion aŭ mencion, ni ankaŭ dankas por la honoro, kiun ili donas al la ĉiam kreskanta internacia literaturo. Dankon kaj kuraĝigon al tiuj, kies nomoj ne sonis en la Poezia Festo. La tro severa, tamen saĝa opinio de S-ro Schmid, kiu en sia raporto diris ke multaj konkursantoj ne konas la gramatikajn elementojn, ne koncernas vin, poeto ne konita, ĝi povas nur koncerni du aŭ tri konkursintojn, kiuj vere ne konas la A. B. C. de nia gramatiko.

Ĉiuj rajtas partopreni nian feston, tiom pli ke la Internaciaj Floraj Ludoj ne fermas la pordojn al kompetentuloj, t. e. L. K. kaj Akademianoj, kiuj ja facile povas renversi la ceterajn konkursantojn.

Dankon al vi, sinjoroj ĉeestantoj, kies aplaŭdoj kaj gratuloj huraĝigas

la premiitojn kaj la organizantojn, kaj fine dankojn, plej korajn dankojn al vi, amata Reĝino kaj altrangaj korteganinoj; via regado en la Templo de Poezio estas mallonga, sed ni, viaj adorantoj, ĉiam gardos vin en la plej profunda loko de nia koro kaj kun nostalgio sopirados al tiu ĉi feliĉa momento, dum kiu ni ĉiuj estas ravataj de la dolĉaj radioj de viaj okuloj».

La diversaj premiitaj aŭtoroj aŭ iliaj reprezentantoj supreniris la scenejon kaj ricevis de la Reĝino la aljuĝitajn premiojn. Diversaj versaĵoj estis deklamataj kaj aŭskultataj kun granda atento de la multaj geesperantistoj, kiuj plenigis la tutan parteron de la teatro. Apartan ovacion ricevis S-ro. Robert Kreuz, kiu reprezentis S-ron. Christian Thoma.

Aplaŭdon meritis ankaŭ la sekretario post la legado de la raporto.

S-ro. Dalmau en la nomo de la prezidanto de la XI Internaciaj Floraj Ludoj stariĝas kaj legas lian paroladon el kiu li katalune klarigas kelkajn fragmentojn por la multaj ne esperantistoj, kiuj ĉeestas la Feston:

Kara festa kunveno

Nia amata cindrulino, la Esperanta poezio, kiu estas de multaj flankoj rifuzata, rigardata kiel ĥimero, ĉiun jaron unufoje estas savata el sia cindrulina sorto. Ĉiun jaron unufoje malfermiĝas anfaŭ ŝi la pordoj de revolando, kie ĉiuj koroj por ŝi batas, ĉiuj okuloj por ŝi ĝojlarmas. Kaj ŝi, enkorpiĝinte en la ĉarma reĝino de Floraj Ludoj, ĉirkaŭate de brila kortego fraŭlina, festate de poetoj ĉeestantaj kaj foraj, admirate de entuziasmaj aplaŭdantoj, ĉirkaŭrigardas inter siaj adeptoj kaj ĝoje diras: Mi estas de nove en Katalunujo, mi hejmenvenis.

Ĉar vere ĉi tie ŝi estas hejme, ĉar nenie ŝi havas tiom da fidelaj koroj kiel tie ĉi. Kaj korojn ŝi bezonas por vivi, korojn kiuj ŝin amas, kiuj por ŝi oferas. La fido, la entuziasmo ŝin nutras, la malfido, la skeptikeco velkigas la rozojn de ŝiaj vangoj. Kaj oni devas ŝin ŝirmi kaj gardi, ĉar ŝi ne estas ankoraŭ forta kaj riĉa. Sed, mirinde, ĉiu nova koro, kiu petas de ŝi donacon de Belo, pligrandigas ŝian riĉecon. Jen, kiel riĉa ŝi fariĝis nun pro la multaj koroj, kiuj petante aliras ŝian tronon. Reĝino ŝi estas, vere reĝino, ni klinu nin antaŭ ŝi jubilante, kun respekto kaj admiro.

Kaj ĉi tiu respekto kaj admiro, kiuj radias el la feste brilantaj okuloj, muzikas el la jubile batantaj koroj, ne estas vane malŝparataj. Ĉar se la Esperanta poezio bezonas niajn korojn, tiom pli bezonas niaj koroj ŝin, kiu en nia benata batalo portas por ni magian armilon, la potencan inspiran forton de l' Belo. Miraklon ŝi faras por nia bono: el grizaj vortoj, enuaj gramatikaj reguloj, el sekaj senvivaj skemoj, per la tuŝo de ŝia magia bastono, estiĝas vibre vivanta estaĵo, en kiu oni mire rimarkas la pulsbaton de l' Koro. La lingvo, kiu ĝis tiam konsistis kvazaŭ nur el sekaj formuloj, taŭgaj nur por sekaj konstatoj pri la *eksterhoma* mondo, akiras subite kolorojn riĉajn, nuancojn freŝajn, tonojn profundajn, penetras en la mallumojn de tiu mondo, eĉ al ni mem nekonata, kiun ni portas en ni. Kaj kiam nian animon

unue vibrigas sentoj per ĝi inspiritaj, aŭ kiam ĝi unue donas vortojn por niaj duonklaraj sentoj, tiam kun kortuŝa surprizo ni rekonas en ĝi kvazaŭ la dolĉecon de nia lingvo patrina, ian neklarigeblan, korkaresan ĉarmon. Ni scias Esperanton, kiam ni finis ĝian lernolibron, sed ni posedas ĝin nur kiam la unuan poemon ni elĝuis. Kaj de tiam ankaŭ Esperanto posedas nin neforsireble.

Unu el la geniaj trovaĵoj de la Majstro estis ke Esperanton antaŭ ĉio li fianĉigis al la poezio. Per ĉi tio li spiris la vivon en la argilfiguron de la verko. Kaj per ĉi tio li turnis sin ne al la *menso* de la homoj, kiu en sia sintido ofte fuŝas kaj detruas, sed al la sola bona en ili: al ilia *sento*. Kaj vere, la homa menso faris ĉirkaŭ Esperanto nur malsaĝajn mokojn, malhelpajn atakojn, fuŝajn reformprojektojn. La *sento* ŝirmis Esperanton, la sento, esprimata per poezio, donis al Esperanto tian kuntenantan forton, kian al la patrujideo donas la komunaj rememoroj, doloroj, ĝojoj, aspiroj, entuziasmoj. Lingvo kaj sento: jen estas Esperanto. La lingvo vivas en sia literaturo, la sento parolas per la poezio. Sen poezio, sen literaturo Esperanto estus muta kaj morta.

Sed ĉu Esperanto estas taŭga por poezio? Al vi, kiuj vivas nun en la entuziasmo de ĉi tiuj belegaj tagoj, tiu ĉi demando ŝajnas ridinda. Alie mi devas fari la demandon: Kiamaniere estas eble ke la artefarita Esperanto estas taŭga por poezio?

Komence estis la sento — tiel oni devus komenci la historion de Esperanto. Kaj tiam okazis neklarigebla mistero, kiun ne povas koni kaj tial ne povas kredi tiuj, kiuj staras ekster la lingvo. La sento penetris la gramatikon, la vortaron. La dolĉa alterno de sonoj, la molaj j-literoj, la sonoraj ĉ-literoj, la akcento pulsanta kvazaŭ korbato kaj aliaj neklarigeblaj nur senteblaj detaloj en la lingvostrukturo faras jam unuavide impreson de ĉarmo, de hejmeco. Aliaj projektoj segas per sekaj so, tedas per monotonaĵ *no*, ĝemas per multegaj pinglopikaj *i*; en Esperanto estas ne nur harmonio, sed ankaŭ varma senpereco, kara aromo, afabla humoro, ĉarma senprettendeco. La ceteraj projektoj sonas apud ĝi kvazaŭ matematika formulo apud soneto.

Sed la sono ne estas sufiĉa, oni povus diri. Anatole France tute rifuzis la rajton de Esperanto pri poezio. Al la vortoj de la naciaj lingvoj ligiĝas rememoroj, asociacioj, kiuj kolorigas ilin, donas al ili kaŝitan energion, tiel ke la preciza traduko de la respektiva vorto ne povas havi la saman efekton ĉar tute aliaj rememoroj estas al ĝi ligitaj. Kaj en artefarita lingvo la vortoj tute ne vekas asociaciojn, ili estas sennuancaj, abstraktaj, do traduko en kia ajn artefarita lingvo povas esti nur fuŝo de la originalo. Esperanto restu ĉe la komerco.

Same, kvankam pli bonvole, opinias ankaŭ la granda estona verkisto Friedebert Tuglas.

Nu, ĉi tiu rezonado, konsekvence, kondukas al la kondamno de ĉiu traduko. En ĉiuj lingvoj estas vortoj tiel riĉenhavaj, tiel plenigitaj de asocia-

cioj, ke ilin neniu alia lingvo povas perfekte reprodukti. Per sola vorto oni povas aperigi tutan epokon de historio, per arkaismo oni povas vekti jen impreson de pieco, jen tonon ŝercan aŭ mokan. Mirinda materialo ja estas la lingvo! Kaj ĉu tiujn ĉi efektojn povas nepre ĝui tiu, por kiu la respektiva lingvo ne estas lingvo gepatra? La vorto por li ja estos simpla vorto, sen la riĉaj asociacioj, nur kun sia nuda senco. Do, konsekvence, ne nur ĉiu traduko fuŝas la verkon, sed ankaŭ ĉiu lego de fremdlingvulo. Sekve - ĉiuj antikvaj verkoj estas fuŝitaj, ĉar ili apenaŭ havas plu kompetentajn legantojn. Nu, kiel la alilingva, tiel ankaŭ la Esperanta tradukanto devas fari kompromisojn ofte tre dolorajn. Sed, ekzemploj tion montras, Esperanto estas multe pli kapabla ol oni kredus teorie. En lertaj manoj ĝi povas disvolvi fortajn kaj delikatajn efektojn, vekti sincerajn sentojn, kaj — jen la plej granda afero — tute forgesigi sian artefaritecon.

Ĉar la Esperantaj vortoj ne estas tiel abstraktaj, pendantaj en aero, kiel oni opinias sen la kono de la lingvo. Unue, la Esperantaj vortoj estas prenitaj el vivanta materialo, por ke ni diru komparon, ili ne estas floroj faritaj el papero, sed floroj plantitaj en vazon. Ili daŭrigas tie sian antaŭan vivon kaj ju pli multa fariĝas ilia tero, (la Esperanta literaturo), des pli ili disbranĉos kun riĉaj asociacioj kaj rememoroj.

Ĉar ĉi tiuj vortoj estas prenitaj el internacia materialo, jam dekomence ili enhavas ĉiujn asociaciojn internaciajn. La biblio, la antikva mondo, la ĝenerala moderna kulturo provizas multajn vortojn per nuancoj ĉie senteblaj. En lerta mano ĉi tiuj nuancoj povas havi surprizajn efektojn.

Kaj, kio donis la asociaciojn al la nacilingvaj vortoj? La historio, la moroj, sed precipe la literaturo. La sama efiko de la samaj faktoroj estas ja atendebla ankaŭ en Esperanto. La historio de nia movado, la komunaj aspiroj kaj esperoj, niaj kongresoj, nia publika vivo iom post iom riĉigis kaj riĉigos multajn vortojn per speciale Esperanta kromenhavo. Kaj la efiko de la verkistoj devas same manifestiĝi, kiel en la naciaj lingvoj. La tradukoj kvazaŭ perforte trudas al la lingvo konstantan penon: esprimi la ĝis tiam neesprimeblan. Kvazaŭ transfluigata sango en anemiulon, fluas per ili en ĝin novaj esprimformoj, novaj nuancoj, novaj asociacioj. Originalaj poetoj kantas, kaj iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble aperantaj rememoroj. Komunaj klopodoj kaj ekfloranta literaturo, jen la du rimedoj, per kiuj la lingvo akiras egalrajtecon al la vivantaj lingvoj kaj tratabante la ŝiman ĉambron de la nepra seka logikeco, turnas sin al la suno de l' Vivo por kreski, flori kaj frukti!

Du specoj de stilo ŝajnas maleblaj en Esperanto: la lingvaĵo arkaika kaj la lingvaĵo popola.

Sed ankaŭ tiuj ĉi malebloj ne estas nepraj.

Esperanto evoluas. Vortoj, stilmanieroj elmodiĝas. Tio ĉi okazas malrapide, sed certe. Legante verkojn el la unua epoko de Esperanto, ekzemple la unuan lernolibron aŭ la Krestomation, oni trovas tie formojn ne plu uzatajn en la moderna Esperanto. *Elrigardi* anstataŭ *aspekti*, *dome* anst. *hejme*,

laboremeco anst. *laboremo*, *tian* anst. *tiam*, *kiel se* anst. *kvazaŭ*, *rifuŝi* anst. *reŝigni* ktp. — jen formoj, kiuj povus jam nun vekti impreson de arkaikeco, se... — Sed pri ĉi tio poste.

Ankaŭ la lingvaĵo popola ne estas tute malebla. Pri ĝi jam okazis kelkaj provoj kaj ne tute malsukcesaj. Verbotempo nuntempa anstataŭ estinttempa en rakontado, ofta uzo de *ke* kaj *kaj*, inversoj de vortordo *iras mi*, *vidas li* ktp. povas doni al la stilo ian popolan aromon. Krome uzo de ne plene konvenaj vortoj, *draŝi* anst. *bafi*, *oreli* anst. *aŭskulti*, *piedi* anst. *iri*, *heni* anst. *ridegi*, *plenbuŝi* anst. *avide manĝi* ktp. La «Proverbaro» de Zamenhof donas ĉi rilate jam belan materialon. Sed certe tre bonvena estus kolekto de tiaj esprimoj, kunmetita de internacia kunlaborantaro.

Vi vidas ke la Esperanta stilo havas riĉajn perspektivojn. Nun ĝi estas ankoraŭ en ĝerma stato, sed per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la vivantaj lingvoj, ĝia kresko kaj riĉa branĉornamo nepre devas veni. Pli aŭ malpli frue certe ankaŭ niaj lingvaj institucioj venkos la malhelpojn, kiuj nun malebligas la pli intensan laboron, kaj esprimvortaroj, proverbaroj, kritikaj lingvaj studoj pri famaj Esperantaj verkoj ebligos, ke ĉio jam farita kaj trovita ne estu enterigita en disaj, ampleksaj volumoj, sed estu facile alirebla al ĉiuj. Kaj nur tiam oni surprize rekonos, kian riĉan trezoron de esprimformoj kaj nuancoj posedas Esperanto jam ankaŭ nun.

Sed al la dezirata evoluo de la Esperanta stilo oni bezonas ankoraŭ ion, kio estas la plej grava afero laŭ mia opinio. Ĝi estas la *unueco de la stilo*. Tre grave estas emfaze akcenti ĉi tion, ĉar multaj eminentaj Esperantistoj ne rekonis ankoraŭ sufiĉe ĝian esencan gravecon. Ofte mi legis el bonaj plumoj, ke traduko el iu nacia lingvo konservu specialaĵojn de la respektiva lingvo, ke iu traduko estas ĉarma, ĉar ĝi montras al ni interesajn idiotismojn nacilingvaj. Ĉi tiuj opinioj estas ne nur eraraj, sed ankaŭ danĝeraj por la Esperanta stilo. Esperanto havas sian propran spiriton, ĉiu deflankiĝo de ĉi tiu spirito estas simple eraro, same kondamninda, kiel fremdaj naciismoj en iu nacia lingvo. La rumana lingvo, ekzemple, ne havas participojn, ĉu tradukante el ĝi ni esprimu ĉiun partupon per aparta frazo? Per ĉi tio ni tute ne akiros la saman efekton, ĉar tia frazkonstruo en la originalo estas tute *natura*, dum en Esperanto ĝi estas *ne kutima*, *peza*. Kie do estas la limo de ĉi tiu permeso pri la naciaj apartaĵoj?

Pripensu, ni volas havi stilefektejn! Por tio ĉi ni bezonas simplan, ĝeneralan stilon, *kanvason*, sur kiu oni povas brodi. Tia stilo jam ekzistas, estas trovebla en la verkoj de la plej bonaj Esperantaj stilistoj: *Zamenhof*, *Kabe*, *Grabowski*, ktp. Ilia stilo havas propran spiriton, kaj ĉi tiu spirito de la lingvo malfermiĝas por ĉiu, kiu zorge okupiĝas pri bonaj verkoj. Kun iom da sperto oni bone povas konstati, kiom diferencas ĉi tiu spirito de la spirito de lia nacia lingvo, kaj tiam oni estos vere ĝenata, rimarkante, ke en iun lingvaĵon enŝtelis sin fremdlingva spirito. Kiu ne havas ankoraŭ la certan senton pri Esperanto, tiu ekzercu sin per simplaj tekstoj, partoprenu

superajn kursojn, legu kaj legu kaj legu, sed literaturajn ĉefverkojn li lasu en trankvilo. Ĉar nek la originalo, nek nia lingvo dankos al li lian penon.

Do ekzistas propra spirito, ĝenerala, ĉiutaga stilo. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo. Ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankigon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankigo, ĝi *devas signifi ion!* Ne tion, ke la tradukinto estas anglo aŭ japano, nek tion ke li estas komencanto, aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun *ano de ĉiu ajn nacio* esprimus Esperante per la sama stilapartaĵo. Nur tiamaniere ni povas atingi, ke ian *intencan* nekutiman esprimformon la leganto ne rigardu kiel nacilingvan idiotismon aŭ lingvan kapricon de la *tradukinto*, sed li eksentu ĝin kiel arkaikan aŭ popolan aromon, aŭ kiel stilapartaĵon de la *aŭtoro*.

Tia ĝenerala stilo ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj nur havante ĝin povas Esperanto kun ili konkuri en la kampo de l' stilo, t.e. en la literaturo kaj poezio.

Kompreneble ĉi tio ne signifas ke la naciaj lingvoj, el kiuj devenas kaj riĉigas Esperanto, ne povas ĝin efiki, evoluigi per novaj esprimformoj. Sed ĉiu tia nova esprimo estas bona nur, se ĝi povas kaj devas fariĝi ĝenerala, do ĝi konformas al la internacia pensmaniero, al la spirito de Esperanto kaj donas solvon por mankanta esprimo de nuanco. Esperanto estas vivanta korpo, do same kiel la homa organismo, ĝi ne povas toleri en si fremdan elementon, ĝi ĝenas, dolorigas, malsanigas ĝin. La eksterajn efikojn ĝi devas dismeti kaj sintezi, konformigi al si, kiel la homa korpo asimilas la nutraĵon; nur tiel ili fariĝos vere vivantaj partoj de la lingvo.

Tiamaniere mi imagas la konstantan fekundigon de la lingva spirito, la senĉesan evoluon de nia lingvo, per la *tradukoj*. Sed apud tiuj trezoroj, kiujn la lingvo ricevas tiel kvazaŭ prunte, ni ne devas ignori tiujn riĉaĵojn, kiujn ĝi akiras senpere el la koroj de siaj entuziasmuloj, per la verkoj *originalaj*.

Oni aŭdis jam opiniojn, kiuj kondamnas la originalan verkadon en Esperanto kaj koncedas nur tradukojn. Sed estas evidente ke tia malpermeso estas absurda. Estas ja ne eble ke iu, kiu multe uzis Esperanton por interpreti fremdajn sentojn kaj rekonis en ĝi ĉiel taŭgan, mirinde flekseblan, perfekte kapablan instrumenton de esprimo, ne uzu ĝin, se li havas poezian kapablon kaj inspiron, ankaŭ por la interpreto de siaj sentoj propraj. Estas vere, ke Esperanto estas nenies gepatra lingvo. Sed oni ja vidis jam ekzemplojn pri poeziaj ekskursoj en fremdan nacian lingvon kaj okazis eĉ, ke tia ekskurso produktis majstroverkon. Ĉu tio, kio okazis en tute fremda lingvo, ne povus okazi en la lingvo *gefrata*?

Kaj, se la aŭtoro vere havas ion por diri, se li povas lumigi neesploritajn profundojn de la homa animo, se li havas la misteran donacon: esprimi klare ĝis tiam neesprimitan kaj neesprimeblan — lia originala verkado estos pli fruktodona por la lingvo eĉ ol la plej perfekta traduko. Ĉar tie ĉi inter la inspiroj, kiuj tuŝis lian koron, havos parton ankaŭ la lingvo mem,

ĝiaj eblaĵoj ekfloros spontanee, sento kaj esprimo, penso kaj manifestiĝo, ideo kaj formo fandiĝos en tian harmonion, kian povas doni nur la senpera enkorpiĝo de la poezia inspiro. Kaj se iam genian spiriton inspiros nia lingvo por admirata majstroverko, tio estos por Esperanto la triumfo de triumfoj, tiam nia reĝino Poezio neniam plu devos forlasi sian tronon, regante la korojn per la beno de Ĉarmo, Sento kaj Ideo.

Kaj tial mi, fidela batalanto de nia kara tronpretendantino, varmege salutas kaj adiaŭas vin en ĉi tiu belega festo de nia bona kaj rajta konspiro. La Ĉarmo de nia reĝino, la sento de entuziasmo, la ideo de nia Afero ravas vin en tiu ĉi momento. Konservu tiun ĉi magian varmon ĉirkaŭ via koro kaj, per vorto kaj ago kiel ĝis nun, disdonu donace el ĝi ĉien kien atingas la radioj de la verda stelo. Ĉar varmajn korojn bezonas nia poezio por vivi, korojn kiuj ŝin amas, kiuj por ŝi oferas. Kaj per koroj, per viaj koroj ŝi venkos. Kaj tiam la Clio de nia poezio donos al la bela Katalunujo la nevelkeman Naturan Floron.

Kolomano de KALOCSAY

La tre interesan kaj valoran verkon de la Prezidanto la ĉeestantaro longe aplaŭdas, kaj post tio al la diversaj grupaj standardoj, kiuj ornamas la scenejon, la Reĝino donas belan rubandon el silko sur kiu estas broditaj la blazono de la kongresurbo kaj aludo pri la kongreso.

La orkestro ekludas nian himnon kaj la Reĝino kaj la kortego de Amo forlasas la teatron dum la publiko stariĝas kaj aplaŭdas la belan Feston, kiun oni longe rememoros.

Oficiala festeno

Post la solenaj Floraj Ludoj, la Prezidanto de la loka Komitato de la Kongreso regalis la kongresanojn kaj aŭtoritatulojn per riĉa Festeno, kunfratiga festo de niaj Kongresoj. En la Granda Hotelo de Palma, en salonego bele pretigita, ĉe tabloj malavare ornamitaj per riveroj da floroj, kunsidis pli ol ducent personoj sub prezido de la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj korteganinoj kaj inter ili estis la urbaj kaj kongresaj aŭtoritatuloj. Anstataŭ la havanaj cigaroj, al viroj disdonitaj, luksajn kaj plenajn bonbonujojn al virinoj oni donacis. Satiga, fratiga, ĝojiga, gajiga, dankemiga al la nesuperebla organizinto de la Kongreso, estis tiu neforgesebla Festeno.

Kiam alvenis la ĉampanmomento, kvazaŭ antaŭkonsentite, ĉesis bruo, sonoro kaj zumo de manĝiloj kaj babiloj, fariĝis silento profunde emociiga, kaj nia kara venkinto Narciso Bofill dediĉis la Festenon al ĉiuj kongresanoj kaj aŭtoritatuloj, kaj diris klarigojn pri nia movado kaj celo laŭde kaj fervorige por Esperanto kaj la Kataluna Esperantista Federacio. Aplauĝo de ĉiuj festenanoj montris ĉies simpatian kaj dankemon al la glora organizinto de nia Kongreso en Palma.

La bela Reĝino legis ĝentilan saluton.

La urbkonsilanto S-ro Fiol en reprezento de la urbestro diris elokventan saluton al la kongresanoj, kaj esprimis simpatian al nia movado kaj idealo.

La Prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio diris en Esperanto ke li salutas plurlingve por ke la nekompreneco pro diverseco de lingvoj vidiĝu la neceso de Esperanto, komuna lingvo. En kataluna lingvo, gepatra natura lingvo, komuna de katalunoj, balearanoj, valencianoj, andoranoj kaj rusiĵonanoj, tial de la Reĝino kaj de la Organizinto de la Kongreso, kiuj estas el Mallorca, paroladis laŭde al la beleco de la unua kaj al la heroeco de la dua. Poste en hispana, angla kaj germana lingvoj salutis la respektivajn ĉeestantojn el tiuj lingvoj, kaj bedaŭris, reparolante Esperanton, ke li ne povis en ilia natura lingvo ankaŭ saluti S-inon Hrbáčková kaj S-ron Fikrlé alvenintaj el Zlín kaj Bratislava. Daŭre en Esperanto li diris al samideano Josep Berger, sekretario de la Iberia Kongreso okazinta en Kordovo, ke li rimarku, ke individuo, kiu veturis al tiu malproksima andaluza urbo, por diri post la esperanta saluto de nia reprezentanto en la Iberia Kongreso, ke li deziris saluti en la nomo de la «veremaj» kaj «verecaj» katalunoj, kaj tion faris per paroloj nek katalunaj nek esperantaj, ne ĉeestas la Kongreson de la katalunlingvanoj. Tial la prezidanto atentigas S-ron Berger kaj la hispanlingvajn samideanojn ke ili atentu la faktojn, kiuj estas veraj pruvoj. La hispanlingvaj samideanoj ne estu trompeblaj je malplenaj, kiel ajn flataj vortoj.

Katalunlingveco inter samlingvanoj kaj esperantisteco inter diverslingvanoj estas *fakta* pruvo de veremo, sincero kaj vereco de esperantistaj katalunlingvanoj, kiuj tiel estas profunde esperantistaj ĉar ili akceptas nek trudon al si nek al aliaj de nesia nacia lingvo, ĉar ili akceptas nur Esperanton kiel komunan helpan lingvon.

En la nomo de la lernantoj de esperantaj kursoj gvidataj de S-ro Bofill en Palma, S-ro Nadal liveras al li donacon kiel pruvon de estimo kaj dankemo de ĉiuj kursanoj.

La Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato, S-ro Robert Kreuz, sendito de U. E. A. diris la jenan toston:

Reĝina moŝto,
Honorindaj civitanoj de Palma de Mallorca,
Karaj geamikoj katalunaj kaj eksterlandaj,

Emociĝe mi staras en via rondo sub la impresoj de la Floraj Ludoj. Kortuŝite mi ĉeestas tiun ĉi grandiozan manifestadon en tiu ĉi pentrinda salono. Ĉirkaŭ mi, mi vidas la ondojn de l' entuziasmo de l' senlaca fidelularo.

Se mi reflektas la okazintaĵojn de la lastaj 3 tagoj, dum kiuj estis en via amika rondo, mi havas la grandan honoron, mi ree venas al la konkludo, jam kelkfoje de mi aludita en miaj diversaj alparoloj, ke regas vin kaj nin ĉiujn unu granda idealo, unu granda komuna penso, la interna ideo de l'Esperantismo. Dank' al ĝi estas kaj kreskas nia afero.

Volu do vi, ho karestiminda Reĝino de l' Floraj Ludoj, simbolo de l' beleco kaj majesto, animi nin por nia granda celado;volu vi, ho floroj katalunaj de l' Floraj Ludoj emblemo de pureco kaj amikeco, fortigi nin por nia granda tasko, konservadi en ni tiun valoran ideon internan de l' komuna sento, kiu gvidas nin ĉiujn kaj helpas al la grandegaj sukcesoj de Esperanto. Helpu al tio, ke baldaŭ la tuta homaro komprenu la necesecon de help-lingvo internacia, alproksimigilo paca inter la popoloj kaj la grandecon de tiu tasko, por ke baldaŭ kaj fine efektiviĝu nia granda homama celo. Jen la profunda deziro de mia tosto, je kies realigo mi levas mian glason.

Nia angla samideanino Emma L. Osmond, kiu plurfoje konkursis en la Internaciaj Floraj Ludoj kaj meritis premiojn, en la nuna jaro venis persone ricevi ilin, kaj faris ankaŭ salutan paroladon en la nomo de siaj samlandanoj.

S-ro. Josep Berger, salutis, kaj, responde al la Prezidanto de K. E. F., promesis klarigi al la hispanlingvaj samideanoj la *faktojn*, kaj aldonis ke li esperas de la nova organizo Hispana Esperanto—Asocio, ke nia Movado en la duoninsulo definitive envojiĝos por efika progreso harmonie de ĉiuj.

S-ro. Marian Solà, Sekretario de K. E. F. diris finan saluton kaj rimarkigis la duoblan komunecon inter balearaj kaj katalunaj esperantistoj, kiu nin double kunfratigis: komuna gepatra lingvo kaj samideaneeco.

Ĉiuj paroladoj estas varme aplaŭditaj.

Muzikaj Festoj

Postfestene, bonega orkestro ĉe «Teatro Lírico» ludis plenan kaj belan simfonian koncerton en kies programo rimarkiĝis Mallorka kaj Kataluna rap-sodoj. Okaze de tiu festo multaj gekongresanoj renkontigis en tiu Teatro, kaj ĝoje interparolis la sukceson de nia Kongreso, kiu montrigis pli granda ol espereble, en la soleno kaj poezieco de la Floraj Ludoj, kaj en kunfratiĝo kaj animeco ĉe la Festeno, ĵus okazintaj.

Postvespermange, ĉe la «Teatre Principal» okazis kantaŭdaĵo de l' «Orfeó Mallorquí». Ĉiuj gekongresanoj kaj amaso da Palmaj loĝantoj tute plenis la grandan teatron. Post la aŭdaĵo ni bone komprenis kial tiom da personoj ĉeestis. La kialo estas ke tiu «Orfeó», samskola je la fama «Orfeó Català» en Barcelona, bele, bonege kantas la balearajn kaj katalunajn kantojn.

Jen la interesa programo majstre aŭdigita de l' «Orfeó Mallorquí»:

I

Himne Esperantista,	vortoj de Zamenhof	Muziko de F. de Menil
Himne de l' Orfeó,	» de E. Oliver	» de A. Gelabert
L'Hereu Riera,	» Canço Popular	» de Cumellas Ribó
El Remers del Volga,	»	Canço russa
Sant Josep i Sant Joan,	Canço Popular	» de A. Pérez Moya

II

Les fulles seques	vortoj de A. Guimerà	Muziko de E. Morera
La Nina i el Moliner	Cançó popular	» A. Pérez Moya
Jovenívola,	» de Ll. Millet,	» Ll. Millet
Vou-veri-vou	» de M. Binimelis	» B. Binimelis
Reculliment	» de M. Costa Llobera	» J. Canyelles

III

Fill d'ànima	vortoj de J. Alcover	Muziko de A. Noguera
Cant dels ocells	Cançó popular	» Ll. Millet
Cançoneta	« N. Riera	» A. Coll
La lluna la bruna	Cançó popular	» M. Binimelis
Himne Esperantiste	» Zamenhof	» F. de Mènil

En ambaŭ muzikaj festoj varmaj aplaŭdoj montris la ŝaton de la aŭdantoj al la ludintoj, kaj la fervoron, kiun sentigas al la esperantistoj la aŭdo de nia himno «La Espero», kiu estas bonege aŭdigita orkestre en la unua koncerto kaj ĥore en la dua.

Kelkaj el la muzikaĵoj tiel entuziasmigis la publikon ke la aplaŭdoj ne ĉesis ĝis dua aŭdigo.

Tiuj du festoj denove pruvis la bonan elekton kaj organizon de la kongresa festaro. Sincere ni gratulas la organizintojn kaj la ludintojn.

Dimanĉo 24

La kongresanoj akurate plenumis la programon difinitan por tiu ĉi tago kaj rompante la kutiman malfruemon, ĉe tagiĝo diversaj aŭtomobiloj forkondukis ilin tra la plej belaj lokoj en la insulo. Valldemossa, Sòller, Pollensa, Andraitx kaj ceteraj mallorkaj naturbelaĵoj altiris multajn kongresanojn, kiuj kun larĝe malfermitaj okuloj dum la tuta tago rigardadis kaj laŭdadis la nesupereblan belecon de tiu kvieta insulo, en kiu iel nekompreneble amasiĝis unu apud alia perlo kaj safiro, diamanto kaj rubeno, topazo kaj brilanto, k. t. p., tiel ke la tuta lando estas juvelujo, kies enhavataj valoraj ŝtonoj estas la plej granda trezoro en la mondo.

Se vi, kara leganto, neniam vidis ĉe tagiĝo la silueton de la mallorkaj montoj, kiam via ŝipo alproksimiĝas al la palma haveno, ne atendu morgaŭ por fari la ekskurson. Se viaj okuloj por eterne fermiĝos ne turninte rigardon al la orita insulo, dum la tuta eterna dormo vi bedaŭros la forgeson kaj ne dormos trankvile.

La raportanto ne aliĝis al la aŭtomobilaj karavanoj kaj restis en la urbo. Je la 9-a matene en la sidejo de Esperantista Klubo Palma renkontiĝis trideko da gesamideanoj kun la celo promeni tra la urbo kaj viziti la diversajn monumentojn, kiujn ĝi enhavas.

Mi ne kuraĝas priskribi kiom da belo antaŭ niaj okuloj desegniĝis tiun tagon. Nur tiu, kiu povis konstati propraokule la belecon de antikvaj kortoj en multaj palmaj domoj, povas kredi ke en unu sola urbo povas amasiĝi tiom multaj vidindaĵoj. La Katedralo, Reĝa Palaco, Mara Konsulejo, Araba Banejo, Episkopa Palaco, k. t. p., pri kiuj la kongreslibro donas diversajn detalojn, naskis en ĉiu vizitanto neforgeseblan impreson.

Posttagmeze oni faris promenadon tra la ĉirkaŭaĵoj de la urbo kaj ĉie la sama impona beleco kaj la sento, ke neniam antaŭe oni ĝuis tiajn panoramojn.

S-ro. Bofill kaj Rosselló klarigis en ĉiu okazo pri la epoko de la monumentoj kaj pri la stilo de la diversaj antikvaĵoj.

Lundo 25

Ĉirkaŭ 70 kongresanoj partoprenis la ekskurson al Manacor kaj kavernoj «Del Drac». Vagonaro kondukis la ekskursantojn ĝis Manacor kaj de tie per tri aŭtobusoj oni veturis ĝis Porto Cristo.

La tuta vojaĝo estas rimarkinda, precipe la muelejoj en la ĉirkaŭaĵoj de Manacor altiras la atenton de la vojaĝanto kaj rememorigas al li batalon de Don Kihoto kontraŭ la flugiloj de ventmuelilo. Super la tegmento de la turoformaj muelejoj malrapide turniĝas la flugiloj, kiuj donas reliefan belecon al la pejzaĝo.

La haveno de Porto Cristo havas tiajn mirindajn kolorojn, ke oni demandas al si ĉu efektive tio estas verko de la naturo aŭ ia fabela paĝo. Sed ĉio restas pala, ĉio submetiĝas, kiam vi eniras la faŭkon de Kaverno del Drac kaj sub la tero vi troviĝas en grandega ekstazo rigardante kiom povis ellabori la konstanta falado de guto. Neniu sukcesus priskribi la ĉarmon de tiu subtera labirinto. Neniu povus prezenti al si en fantazio kiom impresas lago Martel, kies purega travidebla akvo vidigas la misteran fundon de la lago.

Post la tagmanĝo S-ro. Bofill regalis la ĉeestantojn per improvizita prezentado de la regiona danco «Bolero», kiun dancis diversaj vilaĝaj paroj. Multe oni aplaudis la organizinton kaj la bonajn dancintojn.

Ĉe la fino de la festo al ĉiu partoprenanto oni donacis ekzempleron de la verko «Homaranismo», eldono de S-ro. Julio Mangada, kiu ŝajne estas la sola homo, kiu ne legis tiel altan verkon.

La omnibusoj kaj vagonaro rekondukis nin al Palma kaj momenton post la alveno al la kongresurbo, aŭtomobiloj rapidis al la haveno. Ĝustatempe ni atingis la ŝipon kaj jen alvenis la bedaŭrinda

Adiaŭo

Manpremoj, bondeziroj, reciproka dankado...

Sur la kajo staras multaj palmaj geesperantistoj; antaŭ ili nia bravega

Bofill, la homo, la frato, kiu sian vivon estus doninta por sukcesigi nian XII.

Sur la ferdeko grupiĝas ĉiuj kaj potenca ESPERO sonas tra la aero.

Iom post iom nevidebliĝas nia amata Reĝino, nia elokventa Rosselló, nia neforgesebla Bofill, kies lasta aŭdebla adiaŭo estas; vivu K. E. F.

Nia ŝipo estas jam malproksime de Palma kaj nia penso estas ankoraŭ kun la ĵusadiaŭitoj. Mallorca, bela inter la plej belaj insuloj, vi havas trezorojn aliloke ne troveblajn, sed super tiuj grandegaj trezoroj staras ne atingeble pli alte nia Bofill, la vera kaj obstina defendanto de la Zamenhofaj doktrinoj.

—

La vojaĝo ne estis tiel ĉarma kaj trankvila ĉe la reveno. La planko balanciĝis sufiĉe multe por ni, maristoj de dolĉa akvo, kaj baldaŭ sur la ferdeko restis nur kuraĝuloj kaj tiuj, kiuj ne povis havigi por si kajuton.

Pluva tago atendis nin en Barcelona. Rapida adiaŭado kaj ĝenerala saluto: ĝis la XIII-a.



Pri la «Kataluna Antologio»

En nia lasta numero ni sciigis pri la projekto krei 25-pesetajn akciojn por atingi la kapitalon necesan por eldoni la «Katalunan Antologion». Hodiaŭ ni ĝojas komuniki al niaj legantoj ke estas jam subskribita la necesa nombro de akcioj. Iliaj posedantoj kunvenis la 7^{an} de Junio kaj elektis la jenan Administran Komitaton: Prezidanto: S-ro. Artur Domènech; Sekretario: S-ro. S. Alberich Jofrè; Kasisto: S-ro. Eduard Capdevila; Teknika Direktoro: S-ro. Jaume Grau Casas, kompilinto de la «Antologio».

Do la presado de tiu grava verko baldaŭ komenciĝos. La tuta eldono (500 ekzempleroj) estos «bibliofila», ĉar ĝi estos zorge presata sur bona kaj altkvalita papero Guarro. La konata fabrikisto pruvis sian simpatian al Esperanto, farante gravan rabaton en la prezo de la aĉetita papero.

De kelkaj katalunaj literaturistoj jam estas ricevita la permeso por reprodukto de iliaj verkoj. Ni devas menciigi kun danko ke unu el ili, la eminenta kaj tre delikata poeto Joan Arús, el Sabadell, ne nur donis sian permeson kaj kuraĝigis la entreprenon, sed ankaŭ aperigis artikolon pri ĝi, tre favoran al Esperanto, sur la kataluna ĵurnalo «La Veu de Sabadell» (2 Junio 1925). Kelkaj paraĝrafoj de tiu artikolo ŝajnas verkitaj de malnova samideano.

Petante permeson al la katalunaj aŭtoroj por eldoni la esperantajn tradukojn, ni profitas la okazon por fari efikan propagandon. Ni informos pri ĝiaj rezultatoj.

Fine, sed ne laste, ni esprimas koran dankon al la fervora samideano Joan Gili Norta, kies agemo kaj malavareco ebligis la baldaŭan starigon de la akcia societo kaj plenan sukceson de la kuraĝa entrepreno.

La Konferencoj en Parizo

14-17 Majo 1925^a

(Raporto de nia Re prezentinto)

Al multaj sukcesoj kiujn ni, la tutmonda esperantistaro, ŝuldas al la Francaj samideanoj, ni devas ankoraŭ aldoni du novajn kaj gravajn.

Sendube vi, kara leganto, konscios ke se eminentaj sciencistoj el la Mondmetropolo kaj la Pariza Komerca Ĉambro invitis partopreni la Konferencojn por la enkonduko de Esperanto en iliaj sciencaj kaj komercaj kampoj, estas ja fakto pri kies graveco mi ne devas paroli. Ambaŭ konferencoj estas nova venko por nia idealo kaj ili estas novaj ŝtupoj kiujn ni supreniris por rapide atingi la altaĵon: la fina venko.

Kiel reprezentanto de *KEF* kaj de nia organo *Kataluna Esperantisto*, mi partoprenis la taskojn de la Parizaj Konferencoj. Bedaŭrinde mi ne povos raportiti detale pri la Sciencista Konferenco, ĉar mi estis absolute akaparita de la komercistaj taskoj kie mi min sentis pli inklinita kaj eĉ pli sperta. Alia cirkonstanco kiu malpermesas al mi fari detalan raporton pri la Scienca Konferenco estas ke ĉiam koïncidis, kaj ne en sama ejo, la taskoj de ambaŭ kunsidoj, kompreneble mi ne poviĝi ĉeesti ambaŭ.

Pri la Komercaj taskoj mi detale raportos. Pri la Sciencaj mi nur povas diri kion mi aŭdis: Ĝi bone sukcesis kaj ni baldaŭ povos konstati la atingitajn rezultatojn.

Kurioza fakto, kiun mi volas noti, estas tiu ke laŭ la diro de la partoprenintoj en la sciencaj kunsidoj, tie kie estis eminentaj paroladistoj kaj polemikistoj, oni malmulte parolis nek diskutis. Aliflanke inter la komercistoj kie estis, laŭ la diro de kelkaj, nur praktikaj homoj, oni longe parolis, diskutis, temis, raportis, kaj fine en la ferma kunsido ni estis devigataj rapide aprobi la konkludojn kaj deziresprimojn, horloĝo en mano, rapidegigante ĉiujn babilemulojn kaj restis kelkaj malkontentaj kaj ne plene ĉerpitaj en siaj terure lacigaj diskutoj.

Faritaj tiuj ĉi, mi nomu ilin «enkondukajn vortojn» kaj sciante ke mi ne povas tro longe raportiti pro la cirkonstanco ke la nuna numero de *KE* devas enhavi aliajn raportojn, mi klopodos koncize doni la ĉefajn detalojn pri tio kion mi vidis kaj travivis:

ĴAŬDO 15

Malfermo de la Komerca Konferenco ĉe la Komerca Ĉambro.

Tie, ĉe la belega domo kie sidas la Pariza Komerca Ĉambro, antaŭ la komenco de la kunsido mi salutis multajn konatulojn, mi denove vidis la vizagojn kaj premis la manojn de fervoruloj ĉiulandaj. Ĉiuj koroj batis same memocie, pro ĝuo, pro simpatio, pro amikeco kaj samideaneco al tiuj kiujn fervoro instigis vojaĝi al la Konferencoj. Bonvenintaj estu!

Jen la ĝenerala saluto al ĉiuj.

La kunsidon inaŭguris la Prezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro S-ro. Kemf. Apud li sidis kiel prezidanto de la Kunsido S-ro. Leonard reprezentante la Ministron Chaumet.

Post salutoj de diversaj delegitoj de Ministerioj, Komercaj Ĉambroj kaj Foiroj oni elektis la estraron de la Konferenco kies Prezidanto fariĝis S-ro André Baudet, Trezorestro de la Komerca Ĉambro de Paris.

Oni disdonis al la ĉeestintoj la listojn de la aliĝintaj komercaj ĉambroj, komercaj entreprenoj kaj foiroj, kies ne komleta cifero (ĉar post la presado de la listo alvenis ankoraŭ novaj aliĝoj) estas 266.

Oficiala malfermo de la Konferencoj ĉe la «Sorbonne»

Vespere de tiu sama tago ĉe la belega amfiteatro de la «Sorbonne» sub la Prezido de S-ro. Charles Richet, la eminenta membro de la Franca Instituto, kaj apude sidantaj multaj sciencistoj, oficialaj delegitoj de Ministerioj k. t. p. oni malfermis la kunsidon.

Paroladis france Sroj. Daniel Berthelot, membro de la Instituto; Pierre Corret vicprezidanto de la Franca Societo de T. S. F.; André Baudet, de la Komerca Ĉambro.

Mi ne povas doni ĝustan opinion pri la plej bona parolado el tiuj tri. Ĉiuj estis elokventegaj kaj ĉiu en sia respektiva rolo parolante pri Esperanto en la Scienco, en la Senfadena Telegrafo kaj Telefono kaj en la Komercio, eldiris tiom da argumentoj kaj donis tiom da pruvoj favore al nia celo ke mi nur povas certigi ke ili bonege impresis la grandamase ĉeestantan publikon, plejparte neesperantistan. Laŭtakse de iuj ĉeestis la kunsidon pli ol 2000 personoj. Post la francaj paroladoj stariĝis kaj esperantlingve paroladis nia eminenta pioniro S-ro. Edmond Privat. Tiuj, kiuj iam havis la plezuron aŭdi la elokventon de tiu nelacigebla Prezidanto de Centra Komitato, povas kompreni ke mi ne troigas dirante ke D-ro. Privat, kiel kutime, elvokis la aplaŭdadon de ĉiuj ĉeestantoj. Li klopodis kaj trovis la sistemon eldiri sian paroladon serĉinte plej oportunajn esprimojn kaj nuancojn por esti facile komprenata de la franca ĉeestantaro; kaj ke li plene atingis sian celon estas la pruvo, ke preskaŭ ĉiuj komprenis ĉion kion li parolis.

Ĉiuj paroladoj estis disaŭdigataj pere de la Senfadena Telefonio.

Belaj aktokonzertoj en franca kaj esperanta lingvoj agrablis la finon de la malferma kunsido pri kies sukceso ĉiuj ĉeestintoj konservas plej agrablan rememoron.

VENDREDO 16

Unua Kunsido de la Komerca Konferenco

Ĉe la granda salono de la Pariza Foiro, matene, dum terura balaado kaj meze de polvoplena atmosfero, sub la Prezido de S-ro. Baudet oni komencis la laborojn de la Konferenco.

Paroladis : S-ro Hromada, el Ĉeĥoslovakujo,
 S-ro Kreuz, nome de la Foiroj uzantaj Esperanton,
 S-ro Ellersiek, el Germanujo,
 S-ro Gabriels, el Nederlando,
 S-ro Piñó, nome de la Valenciaj Foiro kaj Komerca Ĉambro.
 S-ro Gili Norta, nome de la Barcelona Foiro kaj K. E. F.
 S-ro Volg, el Stutgart (Germanujo)
 S-ro Grenkam, el Polujo, kaj reprezentanto el Litovujo, kies
 nomon mi ne povis noti.

Oni aprobis deziresprimon petantan al ĉiulandaj esperantistoj la reel-
 donon de la Ĉefeĉaj Ŝlosiloj.

Dua Kunsido de la Komerca Koferenco

Posttagmeze ĉe la sama ejo. Paroladis S-ro Grosjean Maupin. Poste es-
 tis legataj la raportoj pri la internacia instruado de Esperanto inter la ko-
 mercistoj. Mi aŭdis interesajn raportojn de la delegitoj de Anglujo, Ger-
 manujo, Francujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Svisujo kaj Neder-
 lando. Mi ege bedaŭris ke en Katalunujo la eksperimento ne estis farita kaj
 tial mi estis devigata silenti. La raportintoj pri la eksperimento en Berlin
 kaj Antwerpen prezentis al la Kunsido la gajnintojn de la premio (vojaĝo
 al Parizo okaze de la Konferenco) kiuj post kvarmonata lernado pruvis es-
 ti kapablaj ne nur komerce korespondadi sed eĉ paroli sufiĉe korekte. La
 lernantoj salutis la Konferencon; ili estas : S-ro Otto Scheurmann el Berlin
 kaj F-ino Rosa Spira al Antwerpen.

Supozata estos la fakto ke oni aplaŭde dankis la raportintojn, la lernan-
 tojn kaj ĉiujn kiuj parolis kaj laŭdis la laborojn de la komitatoj en la di-
 versaj landoj.

Akcepto de la Konferencanoj ĉe la ĵurnalo «Les Échos»

Post la posttagmeza laborkunsido ĉiuj konferencanoj estis petataj vi-
 ziti la komercan ĵurnalon «Les Échos».

Tie paroladis france la ĉefdirektoro de la ĵurnalo kaj poste per bonega
 parolado nialingve dankis kaj proponis, nome de la redaktoroj de la ĵurnalo,
 ĉampanglasojn D-ro Paul Fructier.

Kelkaj ĉeestintoj dankis la favoran akcepton kaj helpon de «Les Échos».
 Inter aliaj paroladis S-ro Kenn, la simpatia ĉina samideano konata de mul-
 taj katalunaj esperantistoj, kiu per siaj tipaj kaj moviĝantaj mienoj tre bone
 kaj sprite dankis la apogon de la ĵurnalredaktoroj al nia movado.

Festo de la Pariza Grupo kun partopreno de la «Verda Kato»

Ĉe la granda salono de la ĵurnalo «Le Petit Journal» la parizaj espe-
 rantistoj regalis la partoprenintojn de la Konferencoj per esperanta festo.

Oni ludis tute korekte la teatraĵon «Angla Lingvo sen Profesoro».

Oni ludis belegajn muzikpecojn kaj F-ino Marga Rineta gracie kantis kelkajn parizajn kanzonojn esperanten tradukitajn. Ŝi rikoltis grandajn aplaŭdojn kaj denove mi profitas la okazon sendi al ŝi miajn plej sincerajn.

Entute belega noktofesto pri kiu ĉiuj ĉeestintoj gardos plej agrablan rememoron.

SABATO 17

Ferma Kunsido de la Komerca Konferenco

D-ro Cart prezentis provizoran liston de komercaj vortoj kiu estis disdonita al la ĉeestantoj, petante ke oni sendu al li la rimarkojn kiuj laŭ la opinioj de la diverslandaj ĉeestantoj estas aprobeblaj. Poste oni oficialigos la vortojn de Lingvo Komitato.

Oni aprobis kelkajn rezoluciojn kiujn oni legos en la Oficiala Protokolo aperanta en «Esperanto», kiujn mi ne povas detale priskribi pro manko de loko.

Kunsido de Centra Komitato kaj Konstanta Reprezentantaro.

Ĉe la Oceanografia Instituto kunsidis C. K. kaj K. R. Pri tiu ĉi kunsido mi malmulte parolos. Ĝi estis la unua en kiu mi partoprenis kaj mi ne el-tiris tiun bonegan impreson kiun mi ja deziris. Mi spertis troan influon kaj superregadon de U. E. A. Espereble en venontaj kunsidoj oni aranĝos la aferon tiamaniere ke K. R. estu pli libera, plej memstara, laŭ deziro esprimataj de la franca kaj belga reprezentantoj al kiuj mi donis mian tutkoran apogon. Ili ja vidis ke mi ĉiam voĉdonis kun ili.

Dum la kunsido oni komplimentis S-ron Generalon Sébert, donacante al li arĝentan sukerujon, havigitan per monkollekto de ĉiuj ĉeestantaj naciaj societoj. S-ro Privat paroladis proponante la donacon kaj dankante lin nome de la tutmonda samideanaro, pro la laboroj faritaj de Generalo Sébert.

Generalo Sébert emocie dankis la ĉeestantaron. Poste Profesoro Richet kiu ankaŭ partoprenis la intiman (eble tro intima laŭ mia percepto) festeton, nome de la sciencistaro franca ankaŭ dankis la meritplenan laboranton kaj per varma kiso sigelis la sindonemecon de Generalo Sébert.

Verkante tiun ĉi raporton venas en mian cerbon ideo kiun mi havis dum mia ĉeesto al tiu rapide aranĝita danko kunsido: Ĉu oni elektis sukerujon kiel simbolon por «dolĉigi» iomete la malagrablaĵojn kaŭzigitajn al Generalo Sébert de la ĉiamaj malamikoj de Centra Oficejo en Paris?

La taskoj faritaj de Generalo Sébert restos ĉiam en la memoro de la antaŭmilitaj esperantistoj, kiuj bone konas la laboron kaj ŝuldon de la esperantistaro al tiu eminenta pioniro kiu kredeble pro troa elspezemo kaj sindonemeco ricevis tiom da atakoj, tiom da malagrablaĵoj.

Generalo Sébert meritis, laŭ mia opinio, pli grandan, pli aman demonstracion ol tiu kiun ni kvazaŭ kaŝite kaj timeme faris.

Oficiala Festeno

Ĉe la Restoracio de la Pariza Foiro oni festis per granda bankedo la lastan oficialan kunvenon. En ĝi regis plej amika kaj gaja kuneestado. Ĉe la toastoj paroladis diversaj reprezentantoj kaj fine tion faris la Ministeria Reprezentanto S-ro Léonard, kiu esperantlingve informis ke la Ministro ĵus alprenis la decidon «Rekoni Esperanton kiel klaran lingvon por internaj telegrafaj rilatoj». Kompreneble tiu sciigo estis tondre aplaŭdata kaj meritis laŭdojn ĉiuj.

DIMANĈO 18

Vizito al la Ekspozicio de la Dekorativaj Artoj

Interesa parto de la programo estis la vizito al la ankoraŭ ne finita Ekspozicio de Dekorativaj Artoj. Ni estis oficiale invititaj kaj la eniro kostis neniom al ni. Se la Ekspozicio estas ja vizitinda kaj belega, por ni ĝi havis specialan intereson ĉar ni estis lerte gvidataj de unu el la arkitektoj kiuj ĝin direktis. Li estas S-ro Agache, malnova samideano kiu laŭ sia diro de antaŭ pli ol dek jaroj eĉ unu vorton ne estis dirinta en nia lingvo, kaj malgraŭ tio mi povas ja certigi ke li efektive malmulte forgesis.

Kiel mi jam notis la Ekspozicio estis nur duone preta, kaj nur kelkaj domoj estis plene aranĝitaj. Post du aŭ tri monatoj mi ne dubas ke ĉio estos jam finita kaj tiam, mi certigas ke tiuj kiuj povos ĝin viziti, certe eliros tre bonan impreson.

La varmo dum la vizito estis vere «tropika». Tial mi ne forgesas ke danke al la invito de la gvidantoj ni ricevis freŝan trinkaĵon kiu estis kore akceptata.

Lasta vorto

Jen do, karaj legantoj, kelkaj impresoj pri mia ĉeesto ĉe la Konferenco en Parizo. Mi denove danku la samideanojn de la mondmetropolo pro la laboroj de ili faritaj. Estu certaj ke se interne ni ne faris multan laboron ni propagandis, ni atingis ke nia afero estu legata sur la parizaj ĵurnaloj, ke multaj personoj sin okupis pri ni. Krom tio mi ne dubas ke internacia kunveno ĉiam estas, por tiuj kiuj ĝin partoprenas, nova injekto de entuziasmo, nova pruvo pri la internacieco de nia lingvo.

JOAN GILI NORTA

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

III^a Iberia Kongreso Esperantista

Kordovo, 10-12^a de Majo 1925

Ĉi tiu raporto pretendas esti nenio alia ol tre konciza resumo de l' supre nomita kongreso. La organiza komitato estas eldononta poste pli detalan protokolon. Statistiko de aliĝintoj: 107 (inter ili 5 eksterlandanoj); de ĉeestintoj: 46 = 43 % (1 belgino, 2 ĉeĥoslovakoj, 1 franco, 1 anglo)

Sabato 9.^a de Majo: Posttagmeze dum pluvema vetero, promeno de la jam alvenintoj tra la urbo; vespere alveno de la sevilĵana karavano; poste gaja kunesto.

Dimanĉo 10^a de Majo: Je la 11^a h. okazis la solena malfermo en la ĉef-salono de l' urbestrejo; ĉeestis la civila guberniestro, kiu prezidis; la urbestro, la ĉefo de la Akademio de Belaj Sciencoj kaj Noblaj Artoj, kaj aliaj aŭtoritatuloj. Oficialaj reprezentantoj de Belgio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio-Germanio, K. E. F. kaj diversaj hispanaj grupoj kaj federacioj. La salanon plenigis tute la esperantistaro kaj esperantema publiko.

La paroladoj de la aŭtoritatuloj montris grandan komprenemon por nia lingva idealo, kaj la guberniestro promesis sianome proponi la decidojn de l' kongreso al la Registaro.

La solenaĵo postlasis en ĉiuj tre esperigajn impresojn.

Posttagm. Ĉar la vetero aspektis dubeta, oni anstataŭ ol iri kamparen, faris la por lundo projektitan viziton al la Moskeo kaj Muzeo. La misteran ĉarmon kaŭzitan de la nekomparebla arĥitektura monumento kun ĝia vasta kolorarbaro neniu forgesos unufoje vidinte ĝin. Sub lerta gvidado de komisiito oni povis admiri ankaŭ la trezorejon, ordinare nealireblan.

En la Muzeo, la frato de l' fama Romeo de Torres mem montris kaj klarigis al la vizitantoj la artajn valoraĵojn kaj permesis eĉ enrigardon en la laborejon de sia granda frato-pentrto.

Kun koroj saturitaj de belajoj oni revenis al la kongresejo, ampleksa, palacsimila kazino, dumvoje admirante en la tipaj stratetoj la tipajn florpelenajn pentrindaĵn kortojn.

Vespere. Prepara labora kunsido; elekto de l' kongresa estraro. Prez: Fr. Azorín; sekr.: J. Berger kaj F. Serrano.

Lundo, 11^a de Majo, matene 10^a h. 1^a laborkunsido. Viglega diskutado pri la temo: iberia konfederacio aŭ nacia asocio. En ĝi almenaŭ klarigis tiom la afero, ke oni vespere reveninte de la *ekskurso al la «Bieno de l' Artoj»* povis ĝin daŭrigi kaj per laŭnoma voĉdono decidi, ĉu nia organiza formo restos la «Iberia Konfederacio» aŭ ŝanĝigos en «Hispana Esperanto-Asocio». El 19 rajtigitoj por voĉdoni la formo «iberia» ricevis 1, la formo «hispana» 14 voĉojn; 4 sin detenis. Do, per tio estas aprobita definitive Hispana Es-

peranto-Asocio (H. E. A.); samtempe oni ankaŭ plene, SED PROVIZORE AKCEPTIS LA DE LA MADRIDA GRUPO proponitan regularon dissendotan por studado al ĉiuj hispanaj federacioj, grupoj ktp. Oni fiksis la kotizon por HEA kun gazeto (La Suno Hispana) je 6. — ptoj. jare, nomis kiel venontjaran kongresurbon Madrido kaj donos al tiu kongreso la numeron 6^a, por fine deklari kongresoj Udkeilon de Barcelono kaj Dudkeilo'n de Zaragozo, kiuj pro la tie farita laboro valora nepre meritas tiun titolon.

Post la vespermanĝo propaganda kunveno en kafejo.

Marto, 12^a de Majo matene, 10 h. 3^a *laborkunsido*. Diskutado pri la alvenintaj proponoj (Suno Hisp. 96, lastpaĝo), kiuj ĉiuj estis aprobitaj. Oni decidis telegrafe saluti la Sciencan kaj Komercean Konferencojn en Parizo kaj fine formulis jenajn resoluciojn:

Peti al la registaro la laŭgradan enkondukon oficialan de Esperanto en mezajn, porinstruistajn kaj komercajn lernejojn (kun cito de jamaj R. O.).

Peti ke Hispanujo iniciatu en la vivo internacia la oficialigon de Esperanto kunvokante laŭeble interŝtatan konferencon por tiu celo.

Rememorigi al la Registaro la devon realigi la decidon de L. de N. — kies ano estas Hispanujo — ke Esperanto povas esti uzata telegrafe kiel *klara lingvo*.

Esprimante la esperon pri forta progreso sub la nova organiza formo la prezidanto je tagmezo fermis la kongreson.

Poste oni tagmanĝis kune ĉe alesto de la gazetaraj reprezentantoj; sekvis fotografado, kaj la posttagmezon uzis multaj por vagado tra la pentrin-daj anguloj de la urbo.

Merkredo, 13^a de Majo unuigis aliafoje ĉiujn kongresanojn kies nombron tre konsiderinde pligrandigis la tuta sevilja esp-aro, en la ĉarmega frat-urbo Seviljo. Timante ke mi, ĉerpante el la plenego de tre belaj rememoroj, povus troampleksigi ĉi tiun simplan raporton, mi silentas. Unu fakto nur: Ni estis regalitaj per grandioza «lunĉo» en iu el la palacoj por la ekspozicio iber-amerika. Kaj pri unu afero mi estas certega: La postkongreso estis brilbrila fino de la 111^a (kaj lasta) Iberia. Dankon al la nelacigebla seviljano Karolo!

Mi en mia ĉi-supra raporteto ne parolis pri la Kordova Kongreslibro nek pri la granda nombro da alvenintaj salutoj, inter ili multaj telegramoj esperantlingvaj, nek pri la Ekspozicio, kiu — malfanfarone kaj maltoirge mi povas ĝin diri — estis granda sukceso kaj mirigaĵo eĉ por esperantistoj bonkonantaj nian vastan literaturon. Mi devis min limigi por sciigi nur la esencon, la kernon. Konvinku miaj malmultaj linioj tamen niajn katalunajn samcelanojn, ke ni volas labori kaj scipovas labori.

-K. E. F. ĝojegas ke la hispanlingvaj samideanoj esperantisme sukcesu!

Fajreroj

Honore al Poeto Artur Damènech. — La Esperantista Societo Nova Sento, ĉe kiu nia premiita poeto gvidas sinsekvajn sukcesajn kursojn de Esperanto, organizis lunĉon honore al nia kara amiko, por festi lian novan atingon de la Natura Floro okaze de la XI^ai Internaciaj Floraj Ludoj en Palma de Mallorca. La dato por tiu honoraĵo estis la 4 Julio, vespere. — Certe ĉi tiu okazo elokvente montriĝis la simpatio, kiun de tiom da lernintoj kaj samideanoj meritas la fervora kaj klera esperantisto, kies meritoj kaj klopodoj konsistigas fortan kolonon de la kataluna esperantismo.

El la «Bulgara Esperantisto» de Majo n.º 9, ni ĉerpas la jenan sciigon. Laŭ ĵus ricevitaj informoj, ni sciigas, ke la ĉi-jara aŭstra esperanto-Kongreso okazos en Salzburg dum la unuaj tagoj de Aŭgusto, tuj post la universala Kongreso. Antaŭ kaj post la Kongreso estos aranĝitaj ekskursoj. Por pli detalaj informoj turnu vin al Esperanto-Kongreso, Elisabeth-str. 17 Salzburg.

Jen alia sciigo same ĉerpita el la nomita gazeto, kaj ankaŭ tre interesa al la esperantistoj. «La informa Servo de la Ekstera Ministerio de Finnlando petas nin informi al la tutmonda esperantistaro, ke la Ministerio sendis al la legacioj kaj Konsuletoj de Finnlando ekzemplerojn de la lukse presita ilustrita verko «Vojaĝado en Finnlando» por senpaga disdono al la personoj kiuj interesiĝas pri Finnlando. Kun plezuro ni transendas ĉi-tiun informon en la espero ke la esperantistoj baldaŭ elĉerpu la provizon nun aĉetitan de la Ministerio».

Honore al K. E. F. — En la Salonego por Festoj sur la monto Tibidabo la 5^an de julio okazis Festo de simpatio al K. E. F. Ĝi konsistis el dancoj de la «Esbart Folk-lore de Catalunya», kantoj de nia fervora esperantista muzikistino F-ino. Palmira Castellvi, kaj poezioj de nia samideano Artur Domènech, kaj de S-ro. J. M.^a Deulofeu. Kompreneble ĝi sukcesis, kaj ni estas dankegaj al la nomitaj partoprenintoj kaj al nia kara kaj fervora samideano D-ro. Bartomeu, kiu estis silenta iniciatinto kaj antaŭenpuŝinto de tiu bela Festo.

En Pola Esperantisto, sur paĝo 53 de aprila numero, S-ro. Jan Kostecki dediĉas laŭdindan artikolon al la rememoro de la perdita por ni honorinda Antoni Grabowski, unu al la plej kuraĝaj kaj entuziasmaj pioniroj de la monda esperantistaro, poeto eminenta kaj prezidinto de Pola Esperantisto. Ĉi-tiu gazeto invitas pere de S-ro. Kostecki ĉiujn amikojn enlandajn kaj eksterslandajn, fratojn en la idealo, kiuj konis lin, kaj ne forgesis lin, ne ŝparu

momenton de laboro. Ĝi malfermas vaste siajn kolonojn al ĉiu rememoro pri Antoni Grabowski, akceptante eĉ plej malgrandan memoraĵon.

Gvidlibroj de Mallorca. — Nia kara amiko organizinto de la XII^a Kongreso, krom la ekzempleroj de la «Gvidlibro de Mallorca» senpage disdonitaj al ĉiuj kongresanoj ĉeestintaj, sendis al ni 150 ekzemplerojn ankaŭ por senpaga disdono al la K. E. F.-anoj kaj kongresanoj kiuj ne povis veturi al Palma. Al tiuj kiuj ĝin petos de ni ni sendos ekzempleron de tiu bela, luksa esperantaĵo memoriga pri nia sukceso en tiu ĉarma insulo.

Forveturo de Gili al Ameriko. — Nia kara amiko kaj konata samideano Joan Gili, pro profesiaj aferoj denove forveturis al Centramerikaj landoj. Ni kiel amikoj kaj samideanoj tre bedaŭras lian foreston kaj esperas ke li baldaŭ revenu kaj definitive loĝadu kun ni en Katalunujo. Lia kunesto al ni tre efikas por sukcesigo de esperantistaj entreprenoj.

Katalunaj teknikistoj en Londona internacia Kongreso pri Radiologio. — Droj. Jacint Bremon kaj Ramon Torres i Carreres kaj S-ro. Josep Grau, kiuj estas amikoj kaj fervoraj samideanoj niaj la tri, ĉeestis tiun Kongreson okazinta en la angla ĉefurbo en junio-julio. Ili certe profitis ĉian favoran cirkonstancon propagandi, enkonkuki, tie influi por Esperanto.

Internacia agado de K. E. F. — La Internaciaj Floraj Ludoj, la tutesperanta teksto de nia gazeto, la ĉeesto de reprezentantoj niaj, Gili en la Paŝizaj Konferencoj, Domènech en la Kordova Kongreso, Bremon, Torres kaj Grau en la Londona Radiologia internacia Kongreso k. t. p. ja montras la viglon kaj la forton de la Kataluna esperantismo. Ĉiuj niaj amikoj rekonu ke ĉies helpo estas al ni necesa por subteno de nia organizaĵo kiu permesas la plezuron al ni plenumi nian devon efiki plej multe por nia sankta afero.

K. E. F. reprezentota en la XVII Universala Kongreso. — La Prezidanto de nia Federacio veturos al Ĝenevo por reprezenti ĝin en la Universala kunveno de la Esperantistaro.

En Palma de Mallorca la 12^{an} de Julio solene okazis rememorigo pri datreveno de la fondo de la nun viglega Esperantista Klubo Palma, kaj inter la festoj por tio estis kunveno honora kaj danko al nia pioniro tiea Narciso Bofill por festi la grandan sukceson de nia Kongreso tie okazinta dank' al lia kuraĝo kaj fervoro. — En nia proksima numero ni raportos pri tiuj okazintaĵoj, sed tuj ni deziras gratuli niajn Palmajn samideanojn kiuj revigligis post nia Kongreso kaj scias honori sin per homaĝo al pioniro kiu meritas netakseblan dankemon de ĉiuj samideanoj en nia komuna organizaĵo en K. E. F.

Atentu!

Ree ni devas nin turni al niaj federaciaĵoj kaj abonantoj kiuj ankoraŭ ŝuldas sian kotizaĵon kaj abonpagon, kun la peto ke ili bonvulu senprokraste efektiviĝi kvitiĝon.

Tio almenaŭ kion ni rajtas esperi el la esperantemo kaj samideaneco de niaj amikoj estas la akurata pago de iliaj abonoj por helpi la efikan funkciaĵon de nia kara Federacio kaj organo.

Niaj abonantoj povas sendi al ni la ŝuldatan monon per poŝta-ĝiro aŭ svisa, brita aŭ usona mono, adresante la korespondadon al Prezidanto de K. E. F. Carrer València, 245, Barcelona.

Rememoru:

Simpla ĵarabono kostas 6 ptojn. por Iberiaj kaj Amerikaj landoj

» » » 6 sv. fr. por aliaj landoj

Membreco al K. E. F. 3'50 ptoj

Pareu esment!

Ens veiem obligats una altra volta a suplicar als nostres federats i abonats que encara deuen quotes, que ens trametin sense ja ajornar-lo més, el pagament.

El que nosaltres almenys tenim el dret d'esperar dels nostres amics i correlativegaris és l'acurat pagament de les quotes per fer possible el desenvolupament eficaĵ de la nostra Federació i revista.

Poden enivar el diner per gir-postal o simplement per segells de correu. Adreĉeu la korespondencia al President de K. E. F., carrer València, 245, Barcelona.

Recordeu:

Abonament revista. . . . 6 pts.

Membre de K. E. F. . . . 3'50 »

Internacia Studenta Esperantista Asocio

Ni komunikas, ke dank' al interkompreniĝo kun Internacia Unio de Studentoj ni akiris por niaj membroj eblecon ricevi en Genevo pensionĉambrojn por prezo 180 - 300 sv. fk. monate (sen servopago), kiujn oni devas jam nun mendi ĉe Internacia Unio por Studentoj (Union Internationale des Étudiants) 10, rue Saint-Leger, Genevo. Samtempe ni petas ĉiujn niajn membrojn, kiuj ĝis nun ne pagis la kotizon (2 sv. fk. por membroj aktivaj kaj aspirantaj, 5 sv. fk. por membroj subtenantaj), senprokraste sendi al ni la kotizpagon. Al membroj nepagintaj ne estos sendataj membrokartoj. Informoj pri kunsidoj de ISEA dum la XVII-a aperos poste. Adreso de sekretarioj: *Lidja Zamenhof*, Krolewska 41, Varsovio, Polujo.

Antaukongreso en Bern.

1-a de aŭgusto 1925

Lasta sciigo

Nia dubo pri neokazo de la berna antaukongreso pro nesufiĉaj ĉspesoj feliĉe sin montris malprava. Do, ĝi okazos definitive la 1 aŭgusto 1925. Ni atentigas la kongresantojn ĝis nun ne sendintajn aliĝilon, ke ili ne rajtas partopreni la feston sen kongreskartoj. Kongreskartojn ni vendos en la stacidomo mem. La inaŭguro de nia belega bronza memoraĵo okazos la 1 aŭgusto, 15 h. posttagmeze. Vespere komuna vespermanĝo, vizito al la iluminata urbo kaj koncerto. Do, venu kiel eble plej multnombre, la berna esperantistaro tutkore akceptos vin.

La organizantoj:

Jules Perlet: Jakob Schmid.

Adreso: Poŝtkesto transito 560, Bern (Svisujo).

Laborista Esperantista Klubo London

Kunvenoj okazas ĉiun sabaton vespere. Esperanto-kurso komenciĝas je 6,30 - 7,45 h., paroladoj, diskutoj ktp. je 8,00 h. Ĉiuj estas kore invitataj. Klubejo estas 144 High Holborn, WC. 1. (Enirejo ĉe Silver Strato) Trinkaĵoj kaj mangajoj estas tre malmultekostaj.

Programo: Julio-Septembro 1925

Julio 4: Traduka Vespere (k-do Wood); julio 11: Propaganda Vespere en Hyde Park; julio 18: Spertoj el la Vivo (k-do Reeks); julio 25: La Ko-operativa Movado (k-do Parker); Aŭgusto 1: Interparoladetoj (la membroj); aŭgusto 8: Eroj el „The Age of Reason” (k-do Chatters); aŭgusto 15: La Esperantaj ĵurnaloj (k-do Flower); aŭgusto 22: Socialismo kaj Religio (k-do Glaser); aŭgusto 29: Rasal Problemoj (k-do Sturmer); Septembro 5: Diferenco inter SAT kaj BLES (k-do Spiller); septembro 12: La Evolucio (k-do Geary); septembro 19: Ko-operativaj Kolonioj (k-do Crocke); septembro 26: Kuracado per Aŭto-sugesto (k-dino Hyams).

Honora sekretario.

W. C. Chatters, 8, Elgin Terrace,
Maida Vale, London W. 9.

LITERATURA MONDO

La plej valora literatura esperanta revuo.

Rekomendita de la XVIa Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉiu esperantisto devas ĝin aboni.


La plej bonaj stilistoj estas ĝiaj kunlaborantoj.

Turnu vin por abono:

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Duonsemajna

Aktuala Ilustrita

Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A

en 1925.

Aliĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Aliĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ la Delegito en Barcelona:
S-ro Delfi Dalmau, València, 245

H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn.; sed valoras multe.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Isidre Torrents

La «GRAMÁTICA ESPAÑOLA» de la «REAL ACADEMIA ESPAÑOLA», lasta eldono (1924), paĝo 7, diras: «... los pueblos que hablan el catalán o alguna de sus variedades (Cataluña, Valencia y las Islas Baleares), conservan su propio lenguaje y lo cultivan literariamente...»

Esperante:


«... la popoloj kiuj parolas la katalunan lingvon aŭ iun el ĝiaj variaĵoj (Katalunujo, Valencio kaj la Balearaj Insuloj), konservas sian propran lingvaĵon kaj ĝin kulturis literature...»

Neniun vorton ni demetis aŭ almetis al la teksto de la oficiala hispanlingva gramatiko, kiun ni ĉi-tie publikigas por klarigo, sciigo kaj evito de konfuzo pri la katalunlingva teritorio. Ni simple aldonu ke en Rusiljono (Orientaj Pireneoj en la Franca Ŝtato), en la Andorra Respubliko, en Alguer kaj aliaj urboj kaj vilaĝoj ekster la Hispana Ŝtato oni ankaŭ parolas katalune.

Kiel la franca kaj la hispana lingvoj estas ofte nomataj lingvoj de Molière kaj de Cervantes, tiel la kataluna estas nomata lingvo de Ausiàs March, kiu estis granda valencia poeto.

DELFI DALMAU

Pago por Lernantoj



Regiono. Parto de lando, korpo, surfaco, karakterizata de io speciala : polusa regiono, regiono de la koro.

Nacio. Aro de homoj, loĝantaj la saman teritorion kaj havantaj komunan devenon kaj lingvon. **Nacia.** De nacio, kiu koncernas nacion: nacia karaktero, nacia ligvo. **Nacieco.** Eco, ecoj karakterizantaj nacion.

Lingvo. Tutaĵo de la vortoj kaj esprimoj, uzataj de unu nacio por kompreniĝo: la angla ligvo.

Dialekto. Variaĵo de lingvo: Esperanto ne havas dialektojn, ĉar de la komenco de sia ekzistado ĝi havas literaturon, kiu fiksas la lingvon.

(El la oficiala Vortaro de Esperanto)

La granda esperanta verko «**Kataluna Antologio**» estas aperonta je la fino de la nuna oktobro.

Pri ĉiu artikolo subskribita, la aŭtoro estas responda.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas ĝutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

La XVII^a Universala Kongreso

Genevo, Aŭgusto 1925^a

ĜENERALA IMPRESO

Plej bela urbo de paco kaj libero, en la plej bela kaj larĝanima nacio, en la plej internacia kontinento sur la Tero. Jen pri la scenejo de la XVII^a. La palacoj en Genève pretigitaj por kunvenoj kaj kunsidoj de kongresanoj, plifirmigis nian bonan impreson. Akurateco kaj lerto de la organizintoj por ĉio estis bela vero de la XVII^a. La Centra Komitato, kaj ĝenevaj pioniroj de nia Movado, akceptu nian sinceran gratulon. Certe plej ĉefa merito je la sukceso de la Kongreso, de Esperanto ĉe la ĝenevaj aŭtoritatoj kaj ĉe la internacia diplomata mondo, dankestas al nia lertega Edmond Privat. Rekono pri tio estis unuanima, kaj justa.

PARENTEZO

Mi ne faras raporton, ĉi-tie, pri la Universala Esperantista Kongreso en 1925. Mi ne povas, mi ne devas. Ĉiu detalo estas tro grava. La veraj esperantistoj devas legi la oficialan kaj detalan raporton, pli bone, raportaron, en «Esperanto» de U. E. A. La veraj esperantistoj devas legi la nacian gazeton kaj ankaŭ la internaciajn, almenaŭ la ĝeneralajn. Viziti la Grupojn, informi kaj informiĝi pri nia Movado nacia kaj internacia. Do ĉi-tie mi diros nur personan komenton pri la XVII^a, pri ĝiaj ĉefaj programeroj, kaj pri la faktoj pli rekte rilataj al K. E. F., kies reprezentanto mi estis en la Kongreso.

LA SOMERA UNIVERSITATO

Ĝi estis por mi plej alloga kongresaĵo: por la grava utiligo de Esperanto, por la vera vojo al lumo, por plej deca envojigo de la esperantistaro, ĉefe la Somera Universitato kaptis min por la Kongreso.

Mi nur timetis ke la profesoroj ne sufiĉe bone scipovos Esperanton. — Mi feliĉe trompiĝis. — Eĉ tiuj konataj nur pro ilia fama faka sciencisteco, bonege prelegis en Esperanto.

Mi ĉeestis la kursojn de Petro Stojan pri *Evoluo de la Esperanta Vortaro*; de Dro. Pierre Bovet pri la *Instinktoj de l' Infanoj*; de Dro. Charles Baudouin pri *Psikologio*; *kulturo de la spirita forto*; kaj de D-ro. Flügel pri *Psikanalizo kiel metodo kaj teorio*. Kaj mi bedaŭris ke mi ne povis ĉeesti la ceterajn pro samhoreco de ilia okazo kun la nomitaj. Tiuj kiuj ne treege interesis min ankaŭ por la temo, min interesis por la Lingvo.

Mi tre esperas ke la edimburgaj organizantoj de la XVIII^a evitos samhorecon, por ebligi ĉiujn kursojn ĉeesti. Mi ne volas dubi ke en ĉiuj okazontaj Universalaj Kongresoj Esperantistaj estos la Somera Universitato: niaj Oficialaj Institucioj devas plej interese certigi la okazigon de Universitataj kursoj de eminentaj profesoroj. La granda sukceso de la okazigitaj en Ĝenevo estas bela ordono.

La parolado de Dro. Privat en la Palaco de la Ligo de Nacioj pri la Strukturo de tiu Ligo atingis sukcesegon. Ĝi interesis la tutan kongresanaron. La granda Vitra Salono de la Palaco estis ne sufiĉa. Multaj kongresanoj devis restadi ekstere, kaj kelkaj devis eĉ rezigni la aŭdon. Efektive la parolado de nia pioniro meritas ĉi-tiun apartan citon.

NIA SALUTO AL LA KONGRESO

La fakto ke la du jarojn pasintajn sinsekve niaj reprezentiintoj kamaraĵoj Gili kaj Solà ne povis plenumi la rajton kaj devon saluti la Kongresojn en Prago kaj en Vieno pro malpermeso de la eldoninto de «Homaranismo», Sro. Julio Mangada Rosenörn, tiel interesigas la aferon, ke ni devas aparte pridiri ĝin.

Post la stranga sperto de la du antaŭaj Kongresoj la organizaj pioniroj devis informiĝi kaj prepari sin por evito de tiu kurioza malpermeso. Tiel okazis, kaj en la Solena Malfermo de la XVII^a mi uzis la unu parolminuton al ĉiu delegito permesitan, por diri la jenan saluton. «Senpacience la katalunlingvaj samideanoj esperas kaj atendas ke mi trioble fervore en ĉi-tiu Kongreso salutos vin, en la nomo de tiuj samideanoj kiuj organizis la Kvinan Universalan Kongreson en Barcelono, de tiuj kiuj nun pere de la Kataluna Esperantista Federacio kaj »Kataluna Esperantisto« organizas la Internaciajn Florajn Ludojn por stimulo al esperanta literaturo, kaj esperas ke la nuna Kongreso estos granda sukceso baldaŭiga de la fina venko de Esperanto».

Kiel mi atingis saluti la Kongreson?

Ne sen granda defendo de mia rajto, farita ne de mi, sed de aliaj naciaj delegitoj en la Kunsido de K. R. por fiksi la tagordon kaj parolvicon de la Vespera Malfermo kun Centra Komitato. Mi intence malfruis en tiu Kunsido. Mi ne devis defendi rajton en urbo, en lando, en Kongreso, kie eĉ la atmosfero defendas rajton, kiam rajto estas atakata. Do mi simple eniris post la diskutoj, kaj mi demandis al la Prezidanto, ĉu mi rajtas saluti la Kongreson. Jes, respondis li afable; sed ĉu vi konsentas saluti *por la kataluna lingvo*, por eviti pluajn diskutojn? — Mi akceptas, mi respondis.

Kial Mangada volis ke mi salutos por la lingvo de Aŭsiàs March?

Ĉar tiel li povis atingi ke mia kara valencia samideano Piñó, ankaŭ salutos por la lingvo de Aŭsiàs March — La Valencia regiono estas ankaŭ je du trionoj teritorio de la lingvo de Aŭsiàs March. — Bedaŭrinde ne ĉeestis Balearano, kaj Mangada ne povis salutigi lin ankaŭ por alia teritorio de la lingvo de Aŭsiàs March. Ne ĉar Mangada intencis dispecigi la katalunlingvan teritorion, sed, kontraŭe, ĉar li intencis kompensi al la katalunlingvaj esperantistoj dujaran malpermeson al salutrajto.

Nun bonvolu K. R. kaj C. K. ke mi faros du demandojn, kaj aludos problemon kiu postulas solvon:

Ĉu formala delegilo estas necesa kaj sufiĉa?

Ĉu simpla Mangada de nun povas nomigi salu tontojn? (Ĝis la XVII^a ni nur konstatis ke dujare Mangada povis malpermesi saluton de Delegito de nia Federacio malgraŭ formala delegilo, malgraŭ formala kaj aprobata aliĝo, malgraŭ paginteco al Konstanta Reprezentantaro, malgraŭ ke nia Federacio estas por aparta lingva teritorio, kun apartaj Lingva-Komitatanoj de antaŭ multaj jaroj, resume, malgraŭ ĉiuj formalajoj, plenumoj kaj fidelejoj, de K. E. F.).

Komprenoble ni ne devas plendi ke por nia aparta lingvo, por la lingvo de Aŭsiàs March, en la XVII^a estis du salutantoj; ni, kontraŭe, danke emociĝis pro troa komplimento. Ni ankaŭ ne plendas sed ŝatas ke estis salutanto por la baska lingvo, tute aparta kaj memstara kiel sanskrita aŭ ĥina; ni, kontraŭe, ĝojas ke tiu tre interesa lingvo aperas, ĉar tial venis Esperanto en la mondon, por malnecesigi la mortigon aŭ sklavigon de naturaj lingvoj, ĉar laŭ vortoj de la Fundamenta Krestomatio:

«Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝigante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon».

Aliflanke, laŭ diris al ni S-rino Morris en la Solena Malfermo, la fakto ke la granda Usono ne estas multlingva malfaciligas la propagandon de Esperanto. Tial ni deziras, kiel Zamenhof, ke la internacia lingvo konduku al granda fortiĝado kaj plena ekflorado de ĉiuj naciaj lingvoj.

Sed grava problemo aperas se oni ne difinas formalajojn por rajtigo

de Delegitoj, ĉar se ĝis nun estis nur unu Mangada, kiu volis malpermesi salutrajton nur al unu Delegito ĉiujare, aŭ nomigi nur du salutontojn, morgaŭ la malpermeso aŭ la nomigo povos rilati pli grandan nombron, aŭ ne nur unu Mangada, sed pluraj povos aperi, se oni konstatas la eblon kaj sukceson de Mangada privilegio. Kaj eĉ tento fariĝos al ĉiuj Delegitoj mangadiĝi.

SOLENAĴOJ KAJ GRAVAĴOJ

La Malferma Kunsido de la Somera Universitato, en kiu okazis, krom la malfermaj paroladoj de pioniroj kaj profesoroj, profunda prelego de Won Kenn pri la penso de Konfucio, kiun mi ĉeestis kiel Universitatan instruon.

La Solena Malfermo de la Kongreso en kiu impresis nin grava deklaro de la Ĝeneva ŝtatrepresentanto S-ro. Oltramare, profesoro de latina lingvo, per oficiala deklaro kunvoki internacian oficialan konferencon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn de ĉiuj landoj, tuj kiam la esperantistaro juĝos la aferon decatempe; kortuŝis nin elokventa parolado de Edmond Privat pri la vivo de Zamenhof kaj la historio de Esperanto kaj ĝia interna ideo; ĉarmis nin milda voĉo de bele aristokrata malavara por Esperanto, usona sinjorino Dave H. Morris.

La Ferma Kunsido, honore al nia Majstro, kun pioniraj paroladoj pri liaj ecoj kaj genio. S-ino. Isbrücker rimarkiĝis en ĝi kiel bona oratorino tre saĝa, tre agrabla, inteligenta kaj serioza.

ORGANIZO KAJ LABORO

Universala Esperanto-Asocio, Konstanta Reprezentantaro, Centra Komitato, Lingva Komitato kaj Akademio, niaj Oficialaj Institucioj por nia Movado kaj por nia Lingvo, pli kaj pli peciziĝas kaj fortikiĝas. Iliaj elementoj el ĉiuj landoj devas helpi, diri opiniojn, inspiri plibonigojn, decatempe, akurate, bonintence, helpeme, ofereme. Ĉefa afero estas bonfido kaj konfido. Envio kaj ĵaluzo povas esti tre danĝeraj. Dio scias ke mi estas nek kredema nek konservativa. Sed ni devas esti plej saĝaj kaj konsciaj kaj singardemaj por sanktaj aferoj kiel Esperanto kaj Esperantismo. La funkciado de niaj internaciaj, universalaj Institucioj, estas nun tiel necesa kiel malfacila. Ni estu, do, prudentaj kaj ne ĵetu ŝtonojn, sed, proponu konstruajn brikojn por ne certa sed aventuala helpo, ebla utilo. Ni ĉefe respondu akurate, pripense kaj labore la petojn kaj demandojn de niaj Oficialaj Institucioj. Iliaj gvidantoj kaj iliaj profesiaj helpantoj estas konataj de ni kiel bonaj kaj lertaj samideanoj. Ni estu bonfidaj kaj severaj tiel por ili kiel por ni.

VIZITOJ KAJ FESTOJ

Tre ĉarmaj estis la teatraĵo kaj la ŝipekskurso sur la Lemana Lago. Tre instrua la vizito al la Laboroficejo de la Ligo de Nacioj. Vere ravaj ĉiuj vidaĵoj, ĉiuj konaĵoj de la mirinda Ĝenevo. Belaj, puraj, stratoj, placoj, parkoj, promenejoj, revejoj.

La interparolado popola en Universala Kongreso estas efika por nia lingvo kaj movado. Oni mallernas erarojn kaj lernas korektaĵojn. Oni informiĝas pri la problemoj komunaj kaj privataj de pluraj popoloj. La vero pri la homa identeco super internaj popolaj apartaĵoj fariĝas pli evidenta. Kaj la interpersonaj diferencoj pro individuaj kulturo, karaktero kaj temperamento ankaŭ montriĝas super internaj popolaj apartaĵoj. La realo de apartaĵoj, ĉiuj same pravaj, pro historio, geografio, evoluo kaj revolucioj, inspiras pli profundan respekton por ĉiuj variaĵoj kaj pli sinceran fervoron por komunaj neŭtralaj helpaj solvoj kiel esperanto, kulturo, scienco, arto.

KELKAJ PERSONAJ TRAJTOJ

La personaj interkonigoj estas sennombraj por ĉiu kongresano. Sed mi nur ion diros pri kelkaj, kiuj havas esperantistaran intereson:

Ed. Privat, la hodiaŭa efektiva pioniro de nia Movado. Mi sentis min apud li libere, facile. Ĉiu sentas sin apud li tiel, ĉar li estas komprenema, bonkaraktera; liaj eminentecoj ne fierigas lin; kaj li estas grandamina kiel bona sviso.

Cart, la Prezidanto de nia Akademio, la severa gvidanto de nia lingva oficialeco, la fidela posteulo de Boirac. Estas bele kaj ĝoje ke eminentaj francoj, kies natura lingvo atingis grandan internaciecon, montras tian justemon kaj homaramon, ke ili plej firme tenas la kondukilon de lingva neŭtraleco por ĉiuj popoloj grandaj kaj malgrandaj sur la Tero.

Hans Jakob, la granda laboranto profesia Direktoro de U. E. A.; financa ministro kiu venkis plej grandajn persistajn esperantistajn monajn barojn per konstanta frapado, per admonoj aŭ komplimentoj. Feliĉa sviso kiu povas esti oficiale nomata *Hans* en svisa urbo kies natura lingvo estas franca. — Svisa feliĉo!

Robert Kreuz, kiu ŝajnas peza, estas flua, fluga laboranto, eĉ por la plej flua, fluga laboro: stenografiado. Tre sperta samideano kies fervoro submetis lin al nia movado eĉ profesie. Tre kapabla poligloto: inter la multaj lingvoj de li konataj estas la lingvo de Aŭstria Marcho, kiu havis du salutan-tojn en la Solena Malfermo de la XVII^a. — Ĉu nia amiko ĝin lernis pro antaŭvido al tiu eksterordinaraĵo?

Abato Ĉe, la simpatulo: unu el la plej belaj juna, inteligenta, ĉarma, senedza kongresanino enamiĝis je li je tri el la ses psikanalizaj enamiĝoj. Li estas ĉiam venka diplomato de Esperantujo: niaj diplomatoj devas venki per simpatio kaj pacigo. Lia oratoreco estas malrapida kaj senhezita: firma, ĝusta: tial plej bone elokventa. — Nesuperebla profesiulo por nia Movado. Ĝeneraligi la diro inter la kongresanoj, ke inter Abato Ĉe kaj Dio estas neniu diferenco, ĉar la dua estas ĉie, kaj la unua ĉie Ĉe estas.

Petro Stojan, kvazaŭ naskiĝinta cele al Esperanto: virtulo kaj fervorulo en ĉiuj vojoj al paco kaj frateco. Lingvisto pro naturo. Esperantisto pro konscio. Homarano ĉar li ne povas eviti sentadi ĉiajn homarajn idealojn ĉieligajn. Li estas la bela infano naskita el edziĝo de Okcidento kaj Orien-

to. La feliĉaj kursanoj liaj en la Somera Universitato, neniam forgesos lin, kaj ĉiam konstatos ke parolante pruvigas liaj profundaj malkaŝoj.

Mi ja volus prezenti multajn eminentulojn el Esperantujo kiujn mi ne povas forgesi: ĉiujn profesorojn de la Somera Universitato, ĉiujn membrojn de la Centra Komitato, k. a. Mi ankaŭ volus ilin priskribi precize, ĝuste, juste, sed loko mankas, tempo mankas, mil devoj tiras min al profesiaj kaj aliaj okupoj.

Mi devis almenaŭ nomi niajn du ĉefajn respondajn gvidantojn, kaj niajn kvar ĉefajn respondajn profesiulojn de niaj Oficialaj Institutioj.

Mi tamen ne povas eviti du pluajn aludojn:

Al eminenta Ĝeneva ŝtatrepresentanto, latinista profesoro Oltramare, ĉarma aŭtoritatulo kiu favorege paroladis pri nia afero, en la nomo de la Ĝeneva Ŝtato, de la Ĝeneva Respubliko en la malgranda plurŝtata, plurnacia, plurlingva Svisa Konfederacio. Bela Svisujo, nacia internacio, nacio internacia. Belega Ĝenevo, ĉefurbo kaj suno de la registarara politiko.

Kaj al Sinjorino Isbrücker. — Kiu diris ke ĉe la esperantistinaro estas nur malbelaj fraŭlinoj? — Sinjorino Isbrücker montras sintezon de ĉiaj sinjorinaj ĉarmoj. Ŝia kunesto en la Centra Komitato mildigos la diskutojn, dolĉigos la atmosferon. Komitato el nur viroj fariĝas foje akra, malmola. Virina ĉesto, sinjorina kunesto evitas akriĝojn kaj malmoligilojn. — Mia plumo ne povas halti: la nomoj de fraŭlinoj Zamenhof, sinjorino Tiard, sinjorino Dave H. Morris, Marie Hankel, Louise Briggs, Blaise, Osmond, Schepank, Gérard, Farges, Ferter, Thooris, kaj tiom da pionirinoj postulas memorigon, dankemon.

KVAR RIMARKIGAJ RIMARKETOJ

La unuaj premiojn en la Oratora Konkurso de la XVIII^a atingos Ĉe, Inglada, Isbrücker, Kenn, Olšvanger kaj Privat, se oni ilin ne konsideros superkonkursaj.

Charles Richet devas tuj esti petata prelegi en la Somera Universitato en Edinburg.

La skotoj ne estas angloj, la angloj ne estas skotoj: tial ili bone interkonsentas en Esperantujo, kaj la XVIII^a sukcesegos!

La fonetiko de Esperanto devas esti pli severe zorgata. El ĉiuj nacilingvoj estas bonaj elparolantoj. Ĉiuj, do, povas atingi decan prononcon. Eĉ plej eminentajn samideanojn ni rimarkis diftongigi ekz. *ie, ia*. — Kial?

DELFI DALMAU

El Alparolo de Prof. Cart

ĉe la Malfermo de la Somera Universitato, Genève 1925

«Permesu, gesinjoroj, ke mi proponu al vi hodiaŭ nur unu aŭ du ideojn, kiujn vi disvolvos mem, se ili ŝajnas al vi interesaj.

Esperanto estas *vivanta* lingvo, *vivanta*, ĉar ĝi estas la lingvo de malgranda popolo, kiu ĝin amas kaj ĝin konstante uzas, sed *vivanta*, verdire, ĝi estis jam de la komenco, tial ke ĝi tradukis ne simple vortojn el alia lingvo, kiel multaj antaŭaj aŭ nunaj projektoj faras, sed tial ke ĝi tradukis penson, kiu plenokupis la spiriton de ĝia elpensinto, D-ro Zamenhof. Ĝi ne estas nur kunmetado, pli malpli feliĉa, de gramatikaj reguloj kaj vortoj, ĝi estas la esprimo de ideo. La lingvo, hodiaŭ *nia* lingvo, estas filo de ideo, kaj la ideo donis al la naskiĝanta lingvo *animon*, donis al ĝi la vivan blovon, la vivan spiradon! — Se oni riproĉas nin pri nia tiel nomata mistiko, ni ne malkvietiĝu: la koncepto mem de vivo estas mistika. — Se Esperanto vivas, ĝi evoluos kaj devas evolui, kiel evoluas ĉiuj vivantaj lingvoj. Tiun ĉi evoluadon konstatas la gramatikistoj kaj vortaristoj, pli ol ili ĝin helpas. Ĝi estas la rezulto de l' popola uzado sendube; sed precipe, kaj precipe depost la naskiĝo de la presarto, — ĝi estas la rezulto de la laboro de la aŭtoroj, de la pensuloj, kiuj, dank' al siaj verkoj, pliriĉigas la lingvon, ĝin «elastigas», precizigas la sencon de la vortoj aŭ ĝin plilarĝigas. — Neniu lingvo, eĉ niaj plej malnovaj kaj plej vortoriĉaj elĉerpas, tutĉerpas la penson. La konstanta penado de la pensuloj — se al tiu vorto oni donas plej vastan signifon — estas «envortigi» plej precize ilian penson, kaj tiu penado estas unu el la ĉefaj faktoroj de la lingva evoluado. La penso, la ideo vivigas la lingvon, ĝin kreas por la plenumado de niaj plej diversaj bezonoj ĉu materialaj, ĉu spiritaĵoj. — Certe, Esperanto, lingvo tre juna, kvankam ĝi profitis kaj profitas la spertojn de siaj antaŭuloj kaj utiligas ilian vorttrezoron, havas ankoraŭ multon por akiri, sed ĝi pruvis per jam tre riĉa libraro, ke sur ĉiuj kampoj: beletristikaj, sciencaj, filozofiaj, kiel en la ĉiutaga vivo, ĝi estas kapabla traduki la homan pensadon. La *tutan* homan pensadon? Ne, certel tial ke ĉiuj niaj lingvoj penadas ankoraŭ por ĝin esprimi, sed iom post iom ĝi sukcesos, se la aŭtoroj, la scienculoj, la pensuloj — kaj ankaŭ la industriistoj, la komercistoj konsentas ĝin serioze lerni *ĝis plena posedo*, kaj penadas por esprimi per ĝi tion, kion ĝis nun ili povis esprimi nur en sia gepatra lingvo. — Al tiu ĉi kunlaborado ni invitas ilin hodiaŭ por venki ilian skeptikecon, ni organizis tiujn paroladojn kaj prelegojn ankoraŭ tre moderaĵajn kaj modestajn, sed kiuj, post pli malpli longa tempo, dank' al ilia kunhelpo povos fariĝi tre gravaj por la internacia civilizado, por la tuta homaro!

V e n ĝ o

Jenmaniere ĝi okazis.

Iutage promenante tra la urbo Rolf Torsen vidis fraŭlinon, kiu forte, preskaŭ magie altiris liajn rigardojn. Ŝian vizaĝon li ne povis ekvidi. Jam ŝi estis preterpasinta, kiam li levis siajn okulojn al ŝi, instigate de ia nekla-rigebla forto. Ŝi estis vestita per nigre-blua kostumo kaj brunleda ĉapelo, simple, sed elegante. En unu mano ŝi portis libron.

La vestmaniero, la libro, kiun li ekkonis lernolibro de la landa lingvo, eĉ ŝia iro konvinkis lin, ke ŝi ne estas italino. Kaj kun la varma deziro renkonti ŝin, por eble ekscii, ĉu ŝi estas el la sama terparto kiel li, kion li preskaŭ konjektis, li volis ŝin sekvi. Sed jam tro malfrue. Ŝi estis malaperinta ĉe la proksima stratangulo kaj supozeble tuj enirinta domon. Kaj ĉar Rolf Torsen havis urĝan komision por fari, li nur konservis la esperon ŝin renkonte revidi aliatage.

Efektive, baldaŭ poste li ree ŝin ekvidis en la publikaj ĝardenoj. Ŝi sidis tie kun tri geinfanoj. «Do, instruistino aŭ guvernantino ŝi estas», pensis Rolf. Sed ree li ne povis paroli kun ŝi, ĉar venis amiko kiu lin forakompanis kaj al kiu li ne volis montri sian intereson por la beleta fremdulino. Ĉar beleta ŝi estis, tion li povis konstati jam de malproksime.

Fine, post paso de kelko da tagoj, li estis pli bonŝanca. Elirante el koncerto li vidis ŝin iom antaŭ si, kaj post kiam li estis apud ŝi, alparolante li demandis al ŝi en germana lingvo: «Senkulpigu mian senĝenecon, fraŭlino, kiu igis min supozi ke vi estas samlandanino. Ĉu mi pravas? Mi estas germano el Ŝlesvigo, mia nomo Rolf Torsen».

Mirigite ŝi levis al li la vizaĝon, kiu esprimis nekaŝitan surprizon.

«Vere», ŝi ridetis al li, «vi povas rimarki sur mia vizaĝo mian miron kaj surprizon, renkonti ĉi tie en suda Italio germanon, duonsamlandanon. Ĉar mi estas el Ĉeĥoslovakio, sed patrinflanke el Germanlando. Mi nomiĝas Hela Kantek kaj vere multege mi ĝojas ekkoni vin. Nur de malmulta tempo mi troviĝas tie ĉi kiel guvernantino».

Kaj ŝi daŭrigis sian babiladon rakontante al li siajn ĝisnunajn travivaĵojn en fremdlando. Ŝia parolo montris al li, ke ŝi ne sentas sin feliĉa, ke la tute ŝanĝita vivmaniero al ŝi malplaĉas, ke por la neobeemaj, trodorlotitaj infanoj ŝi estas tro malforta.

Li silentema, ĝuis la «dolĉan vokon, agreeblegan sonon de l'hejma lingvo en la fremda lando». Ŝia voĉo kun iom jam da slava akcento kaj stranga metala malmoleco enlulis lin. Estis hejmaj sonoj, hejmaj vortoj! Kvantkam ne estis lia amata gepatra norda dialekto! Antaŭ lia spirita vido etendigis la larĝaj, grasteraj kampoj de lia hejmmregiono, kaj homoj iom malviglaj kun malgraciaj movoj, sed kun kredo kaj fidelo en la koro laboradas kaj kulturis ilin. Kaj malproksima la griza maro eterne ondbruanta. Sur ĝia bordo loĝas liaj karuloj; hejme, hejme!

Kaj tial li ekametis ŝin, ne pro ŝia persono cetere ankaŭ vere aminda.

sed pro ilia komuna lingvo. De nun, ili kunvenis ofte, laŭeble. La moroj de la lando ja ne permesis al ili senĝenan kunestadon; sed vespere, kiam ŝi iris por hejmen akompani la infanojn el la lernejo, li povis ŝin atendi kaj poste iri kun ŝi dum kvarona aŭ duona horeto ĝis la domo de ŝiaj gemastroj.

Baldaŭ li farigis ŝia fidinda amiko. Ŝi konfidencis al li siajn ĉagreniĝojn siajn esperojn kaj dezirojn. Danke li akceptis tiun rolon de klariganta, konsilanta, iafaje eĉ konsalanta amiko, helpis kiam ajn li povis, kaj kiel plejbelan dankon aŭdis el ŝia buŝo la karan patrolandan lingvon.

Iliaj interrilatoj havis karakteron pure amikan. Neniam li tuŝis amaferojn, neniam ŝi aludis tiun temon. Tamen al li ŝajnis ke iafaje io en ŝi brulas. Iun tagon ŝi rakontis al li, ke iu amikino ŝia pli juna fianĉiniĝis tre surprize. Kaj aldonante ŝi diris, ke ŝi havas jam dudek ok jarojn. Li ne volis tion kredi; ĝi ŝajnis al li troigita. Ŝi ne insistis lin kredigi pri ĝi, sed ankau ne daŭrigis la temon, kaj komencis paroli pri aliaj aferoj.

La postan tagon sidante sur la kutima benko en tre malgranda parko-placeto de la urbo, kie li ĉiam ŝin atendis, li pripensis la hieraŭan konversacion, kaj ia malkvieto lin atakis. Ili rilatis unu al alia ja ĉiam nur amike, tre kore, sindoneme, — jes, sed almenaŭ liaflanke ne intermiksiĝis profunda ama sento. Ne, tio estas nura imagaĵo mia», pensis li, kaj tuj tute rekvietiĝis. La loko helpis lin al tio. En la placeta mezo plaŭdetadis senlaca fontano; kaj la akveroj dispruciĝantaj briletis kaj fulmetis en la lumradioj de la subiranta suno. Rondo da palmoj kun folioj ventumilaj dolĉe susuris kaj bruetis en facila aero. Ĉirkaŭ ili grupiĝis oranĝujoj kun la belkoloraj fruktogloboj en la sature verda foliaro. Ravite la okuloj de Rolf fiksitis sin al la belega aspekto.

Ekaŭvenis lernantoj hejmen irantaj el la lernejoj. Sub la arboj ili komencis ludi piedpilkon kaj detruis per siaj krioj kaj laŭtaj alvokoj la regantan pacan idilion. Rolf rigardinte la poŝhorloĝon jam intencis foriri supozante ke lia atendado hodiaŭ estis vana, sed denove, kiel jam ofte, kvazaŭ malproksima magneto turnigis lian kapon — liaj rigardoj renkontis la ŝiajn.

«Mi estas hodiaŭ iom malfruiĝinta, ĉu ne?» ŝi demandis lin ridetante. «Nu, espereble tio ne gravas al vi», kaj en ŝia kutima detalema maniero ŝi rakontis al li la kaŭzon de la malfruiĝo kaj ceterajn okazaĵojn de l' tago.

Kaj ŝajne restis inter ili konstanta amikeco.

Venis Kristnasko. «Ho festo germana kun via kandelradianta, belornamita arbo, viaj donacoj kaj donacetoj brilegigantaj purajn infanokulojn, viaj korintimaj melodioj kaj kantoj, kio farigas el vi en fremdlando», pensis Rolf Torsen, kiam li la sanktan nokton sola kaj soleca sidis en sia ĉambreto. Profunda sopiro pri neĝo, kristnaska noktsonorado kaj infanaj ĝoj-kantoj lin turmentis. Ekstere frapadis senĉese pluvo al la vitroj. Li ne povis nek volis tion suferi pli longe, kaj tial li enlitiĝis. Nur la espero, ke la morgaŭan tagon li kunvenos kun ŝi kaj alia novalveninta samnacionano, por festeti kune Kristnaskon, lin konsolis iom. Jen, malantaŭ la ŝranko troviĝas la ĉampanbotelo, kiun li aĉetis por pligravigi la soleneton.

La morgaŭo venis. Duope Rolf kaj la alia germano iris por ŝin akompani al sia loĝejo. Hezite ŝi venis. Sed baldaŭ en la gaja societo malaperis ĉia timo ŝia pro la nekonveneco de ŝia ago en tiu lando. «Ba», ŝi diris, «mi ja ne estas enlandulino. Tiuj laŭplaĉe vivu monaĥine!». La ĉampano kreis sin-ceran gajan humoron inter la triopo kaj eble kaŭzis, ke ŝi nomis Rolf' on ia-foje per «ci». Li miregis, sed ŝajnis estis neaŭdinta ĝin.

Ĉiuj tri bedaŭris multe, ke tiom rapide pasis la du horoj disponeblaj. Certe al ĉiu el ili alportis iom da hejma kristnaska sentimento la kunesto, la komuna gepatra lingvo, la rememoroj pri pasigitaj Kristnaskoj en antaŭaj jaroj.

Venis februaro. La suda temperaturo estigis ampleksan floradon ĉie. Rapida printempo disetendis ĉiujnsiajn ĉarmojn tra la lando. Ekregis ĝojo en la tuta naturo. Sed por Rolf estis venonta abrupta ŝanĝo en liaj rilatoj al Hela.

Iun sabato vesperon li promenetis kun ŝi, kiel kutime. Ŝi estis afliktita. La vivado en fremdlando ne plu plaĉis al ŝi. La infanoj turmentis ŝin laŭdire terure per malobeemo kaj malico. Kaj ŝi estis postulinta maldungigon. Novan oficon ankoraŭ ŝi ne havis, sed esperis trovi dum ne longe. Li demandis, ĉu iel li povos helpi al ŝi. «Al mi neniu povas helpi» estis respondo.

La sekvantan dimanĉon li renkontis ŝin en la teatro. Tuj li ekrimarkis ian strangan ŝanĝon en ŝia mieno, sur ŝiaj trajtoj. Ŝi rapide, kvazaŭ pelite de interna puŝo lin adiaŭis, senkulpigante sin per malbona humoro, sed promesante al li klarigon dum la proksimvenonta promena kunesto. Ĉion ĉi li ne atentis tro multe kaj restis en kvieta atendo.

Kiom surprizita li estis, kiam li lundmatene ricevis de ŝi bileton: «S-ro Torsen! Certe vi divenis jam ĉion laŭ mia hieraŭa konduto. Bonvolu ne plu kruci miajn vojojn. Ne pensu malbone pri mi; sed estas pli bone ke ni evitu nin reciproke. H. K.».

Dum la tuta tago li estis pripensema. Kio estis okazinta? Kial ŝi agis tiel? Sed klarigon nur iomete verŝajnan li ne trovis.

Do, la sekvantan posttagmezon li serĉis ŝin en la ĝardenoj, kie ŝi kutimis promeni kun la infanoj dum unu horo. Efektive li renkontis ŝin. Sed aŭstataŭ kiel antaŭe afable saluti lin, ŝi riproĉe diris: «Ĉu vi ne ricevis mian leteron?».

«Jes, sed...» «Do, vi komprenas» — ŝi interrompis, «ke mi ne volas havi plu iajn rilatojn kun vi. Vi scias, ke mi baldaŭ foriros. Lasu min do!».

«Sed oni ne kondamnas akuziton senaŭskultite», diris li per kolera kaj ekscitita voĉo tremanta.

«Ne devigu min al ekstremo», respondis ŝi, aldonis mallongan «adiaŭ» kaj turnis al li la dorson.

Kion li povos fari? Ĉirkaŭe staris homoj ilin observantaj. Li foriris kun ŝiritaj sentoj, ĉar ŝi estis por li pli ol simpla amikino, ŝi estis por li en la fremdnacio simbolo de hejmo kaj patrujo.

Vespere li skribis al ŝi leteron, en kiun li verŝis la fluon de sia doloro pro ŝi, pro ŝia maljusteco.

«Kara fraŭlino Hela!

Mi ne plu rajtu kruci viajn vojojn — sed tiom kruela vi ne estos al mi malpermesi, ke ni skribas. Vidu, neeble estas por mi kompreni la pasintaĵon, kaj ju pli longe mi primeditas, des pli nekomprenebla ŝajnas al mi ĉio. La malĝojo pro viaj maldolĉaj vortoj enfosiĝas en mi ĉiam pli kaj pli forte. Jam ne estas mi en la aĝo elasta, kiu forgesas kaj venkas tuj ian malagrablaĵon. Depost dimanĉvespere fariĝis eklipso por mi ĉiam pli ombriganta. Diru, mi vin insiste petas, kion mi krimis? Ja mi ne flatas al mi esti homo senerara, senmanka. Sed ĝuste rilate vin mi malgraŭ ĉio ne povas min kulpiĝi iel.

Restas la sola klarigo, ke iu diris al vi terurajn mensogojn. Sed kiu, kiu? Vere, ĉio estas al mi enigmo.

Kara Hela, mi konfesas al vi, ke tia enigmo min doloras. Pensu pri nia antaŭa amikeco kora, pri niaj kunpromenoj. Vi estis al mi fonto kie mi povis ĉiam ĉerpi klaran fluantan akvon. Kaj nun mi estu kondamnita ne sciante la kialon? Riproĉu min, se mi meritis viaopinie. Bone. Kontraŭ riproĉoj oni povas sin defendi. Sed — pardonu! — tia senestima forĵeto de amiko kia mi estis al vi — kaj estas, tio ne estas la agmaniero de rektaj, sinceraj homoj.

Vian bileton ĉi-kune mi resendadas. Mi ne volas ankoraŭ kredi.

Sed se tamen ĉio estus vero? Ĉu mi povas alvoki al amikino, kiu opinias mian amikecon eĉ ne inda je kelkaj klarigaj vortetoj? Kiu min forpuŝas senkaŭze? Neniam ajn okazu al vi la samo! Via R. Torsen».

Li alportis tiun leteron persone al ŝia domo. Du horoj poste li tenis en la manoj jam la respondon. Preskaŭ certe pri trovota klarigo li malfermis la koverton. Elfalis lia propra letero, ŝia unua kaj nova bileto. Avide li superflugis ĝin perokule. Ŝi skribis:

«S-ro T., bonvolu ne ĝeni min kaj lasu min en paco. Mi havas nun aliajn interesojn kaj neniun tempon por lamentaj leteroj. — Pri via amikeco mi ne kredas plu, ĉar vi ŝajne vivis en «deliro memflategema». Jen mia lasta vorto kaj fino H. K.».

Kvazaŭ pugnobato en la vizaĝon lin trafis tiuj linioj. Ofendita, insultita de virino, por kiu li sentis neniam aliajn sentimentojn ol ŝataj, respektaj kaj amikaj! Bolis lia sango, sed fine pripensinte ĉion li pli kaj pli konvinkigis ke li fariĝis viktimo de abomena kalumnio. Sed kiu estis tia fiulo? La nova germano? Certe ne, Li ne havis interrilitojn kun ŝi. Kiu do?

Vane li meditis. Li ne povis elpensi ĝin.

Pasis preskaŭ du monatoj. Li evitis ŝin renkonti, eĉ ŝin vidi. Nur hazarde li ekciis, ke ŝi nun havas interrilitojn kun italo. Sed li malamis informi sin pli detale. Forgesi ĉion, tion li aspiris. Kaj preskaŭ li sukcesis. Nur de tempo al tempo lin trapikis subita dolorsento.

Jen venis la neatenditaĵo, iutage en aprilo, kiam leviĝanta krepusko jam signis la orpason de la luma tago.

Li sidis en sia ĉambreto skriblaborante, kiam malforta ekfrapo je la pordo lin atentigis. »Eniru!» li diris sufiĉe laŭte. Neniu respondis. «Eniru!» li ripetis, samtempe irante al la pordo por ĝin malfermi. Sed ĝi mem malfermiĝis kaj enpaŝis — Hela.

Nepriskribebla estis lia surprizo. Sed samtempe li denove eksentis la malbonon, kiun ŝi al li faris. Kaj iom malvarme li ekparolis:

«Vi? Efektive mi ne povus imagi, ke vi, ĝuste vi al mi venos. Kia estas deziro?».

Hezite, treme ŝi alpaŝis lin.

«Mi scias, ke mi estas kulpa», diris ŝi. «Sed mi scias ankaŭ, ke mi ne povas plu vivi ne kenfesinte mian kulpon. Pardonu min, ho pardonu!

«Kiel? Mi ne deziras lamentajn parolojn. Bonvolu lasi min en paco!» — rediris li.

Ŝi bone rimarkis, ke li uzis similajn vortojn kiel ŝi en ŝia lasta skribaĵo kaj dolore ŝi ekremis.

«Ne punu min tiel» ŝi petis per flatema voĉo. «Mia malfeliĉo estas granda. Morgaŭ mi foriros. Laste mi venas al vi, alie mi ne povus foriri. Estu bona al mi, estu ree mia amiko, estu kaj eksingultante ŝi kaŝis la vizaĝon en la manoj, «komkompatu, komprenu min; sciu» — ekprenante lian manon ŝi metis sur ĝin la larmplenan vizaĝon — «sen vi — mi ne povas esti — mi — amas vin».

Tiu amkonfeso preskaŭ konsternis lin. Potencaj sentoj kontraŭbatalantaj sin vekigis en lia brusto. Li memoris pri bela tempo pasinta kaj pri ŝia malnobla ago — kaj fortiris sian manon.

«Vidu, fraŭlino Hela», post longa paŭzo li komencis per devige neŝanceliĝa voĉo, «mi ne koleras vin plu. Sed via faro engravurigis en mi. Ankaŭ volonte * mi ne povas ĝin, elŝiri el mia koro. Kial vi faris tion? Eble mi povus nun esti plej feliĉa homo aŭdinte vian amkonfeson. Antaŭ tiu dimanĉvespero en la teatro — kial mi ne diru al vi? — eknaskigis en mi delikataj pensoj, sekretaj deziroj, tamen sen ke mi tro atentis ilin. Mi ja ne estas plu en la unuaj junecaj jaroj — mia tuta karaktero ankaŭ ne emas al nepripensitaĵoj. Sed kiu scias? Se ne estus falinta tiu mortiga roso sur la ankoraŭ tro subtilajn printempfloretojn — kiu scias? Sed tiam ili frue velkis, pereis».

«Ĉu ili ne povos ree ekflori? Pli bele, pli forte ol antaŭe? Mi volas ĉion eldiri, ĉion konfesi. Mia abrupta tiama ŝanĝiĝo — estis parte volita de mi. Aŭskultu. Mia sinjoro iomete denunciis vin. Ne ekscitiĝu» — ĉar li faris subitan ekmovon — «estis nenio. Ŝi ne komprenas niajn pli liberajn germanajn kutimojn. Sed tio instigis min al mia jam ofte pripensita faro. Kaj krome estis tiu italo min flateginta — mi estis freneza, mi sekvis blindigan iluzion, kiu min igis esti terure maljusta kontraŭ vi, agi abomeninde. Sed ĉefe — kredu min! — estis la amo al vi la risorto de mia ago. Mi volis vin

*) volonte = se mi volus,

devigi, pensi pri mi kaj fine sopiri je mi. Mi eraris tion farante — pekis. Absolvu min, karulo. La amo en mi flagris, brulis, ardis ĉiam pli potence. Vi rifuzis min. Kaj tial, ho pardonu! mi ĵetis min en momento, kiam mi ne estis mi mem, en la brakojn de tiu — malindulo. Jen vidu min antaŭ viaj piedoj».

Kaj ŝi ĉirkaŭprenis liajn genuojn faliginte sin teren.

Li emociĝis; sed ama resonado ne respondis en lia brusto. Tro malfrue! Kaj li decidis fini, por ne plilongigi sennecese ŝiajn kaj siajn dolorojn.

Delikate li eklevis ŝin kaj milde alparolis; «Hela, ĉio jam estas nealigebla. Rezignu. Mi konservas nenian kolersenton kontraŭ vi. Sed ami vin mi ne povas, ne povas. Forgesu min kaj ni disiru!».

Ŝi nun ŝajnis kvieta. Nur en ŝiaj okuloj fajreris.

«Do, Rolf, vi min forpuŝas? Vi min forpelas? Ho Dio! Sen vi — ne, neniam! Al mi ŝajnas ke mia amo kreskas des pli, ju pli vi rezistas. La laston mi ekprovu» kaj ŝi turnis sin al la pordo.

Rolf, por ne ŝanceliĝi lastmomente, murmuris «adiaŭ» kaj turnis sin fenestren, kie li komenci nerve tamburi sur la vitroj. Li aŭdis surdan brueton, kvazaŭ iu ĉifus vestojn, tolaĵon; sed persisteme, por ne daŭrigi la dolorigan scenon, li restis en sia pozo kun la vizaĝo kontraŭ la malvarma vitro.

Post longa tempo li returnis sin. Li estis konvinkita, ke ŝi senbrue estis elirinta. Sed — jen kio estas? Lian litan ĉirkaŭis longa kurteno. Ĝi nun ekmoviĝis, kaj tuj poste estis forte flanken tirata. Kaj eliris — subita fulmo falanta antaŭ li el sennuba, plej serena somerĉielo ne povus lin pli rigidigi — estaĵo nuda, blanka kun la molruĝa nuanco de sanfloranta karno — Hela. La brakojn ŝi tenis krucitaj super sia belformita brusto, kaj kiel diinstatuo reliefiĝis la marmoro de ŝiaj admirindaj formoj sur la malhela fono de la litkurteno. Kun deloga rideto sur la lipoj ŝi faris unu paŝon al Rolf, kiu staris rigide, senmove, senvorte, ensorĉite.

«Vi vidas min», ŝi diris per mildega tono, «kia mi estas; kia mi estis ankaŭ en viaj songoj, ĉu ne? kia mi de nun vivos ĉiam en via memoro. Mi ne konas honton antaŭ vi, unika amato. Por vi mi fordonas ĉion. Por vi mi faras ĉion. Kaj mi faris tion, ĉar nenion mi volis preterlasi, kio povus iel al mi helpi por vin gajni. Sciĝu, ke mia patro estis slavo, kaj parte slava sango fluas volupte tra miaj vejnoj. Venu, plejkarulo!».

Kaj malrapide, kvazaŭ solene sin etendis ŝiaj du alabastrekoloraj brakoj al li.

Rolf troviĝis en ekstazo de admirego kaj samtempe de malespero. Ŝi renversis lian internon, ŝi ekscitegis lin, kiel ajn nur virino scias eksciti viron, ŝi enigis lin en febredeiran staton. Li sentis, kiel lin forlasas volo kaj forto, li estis sorĉe, magie altirata, allogata de la beleganta promesanta nudeco ŝia, kaj nur la obtuza sindefendo de lia subkonscio retenis lin kaj igis lin returnpaŝi pro ŝia pli kaj pli proksimiĝanta diinfiguro. Sed ŝi lin atingis, ekprenis delikate lian manon kaj tiris lin dolĉe al la lito. Li havis nenian

volon plu; la virino nuda antaŭ li lin hinoptis per sia nudeco. Sed alire al la lito li restis pendanta per la alia maniko ĉe la porda anso. Tio fulmrapide lin rekonsciigis.

«Serpento!» kriegis li al ŝi, kaj sin ĵetis el la ĉambro.

En la matenkrepuska horo li revenis. Ŝi estis for.

* * *

La sekvintan posttagmezon li sidis en iu ĉelo de la esplorarestejo, viro anime rompita, korpe premita.

Matene oni estis eltirinta el la rivero virinan kadavron. En vestpoŝo troviĝis bileto diranta:

«Mi devas serĉi la morton en la rivero, devigate de la krueleco de sinjoro Rolf Torsen, via Santorelli 5.

Tio estis ŝia vengo.

Originale verkita Esperante de

JOSEPH BERGER

Premiita de la XIaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

La XXXVIII^{an} Datrevenon de Esperanto memorfestis la agema Barcelona Societo «Paco kaj Amo» per ekskurso tuttaga al Bosc de C  n Feu (Sabadell), kie oni amuziĝis kaj paroladis pri nia afero al gesamideanoj kaj publiko. El la Alvoko por tiu festo ni ĉerpas la trafan penson jenan: «Ni multe ĝoju ke tiun internan ideon sentis homo kapabla solvi la problemon de lingvo internacia». Ni aldonu ke la profunda sentado de tiu interna ideo rekapablighis la Majstron solvi la problemon. Kaj aldonu ni fine ke neniu samideano kiu ne povas sin kredi pli vera geniulo ol Zamenkof, povas difini pli bone ol la Majstro tiun internan ideon, laŭ kiu, Esperanto estas la *dua* lingvo de ĉiu homo, la *helpa* lingvo internacia, kiun ni ĉiuj devas lerni plej bone, sed ne konkurigi kun la natura lingvo de ĉiu popolo, se ni deziras eviti limigon de Esperantujo al nova nacio, anstataŭ celi ke Esperantistujo ampleksu la tutan homaron.

La revigliĝinta enurba societo «Barcelona Stelo» organizas, krom novaj kursoj de Esperanto, serion de paroladoj en Esperanto. Bona tasko: Praktiko estas nepre necesa por utila lerno de lingvo. La gramatiko estas pli komprenebla post la praktiko. La praktiko lernigas kaj la gramatiko komprenigas.

Ĉiuj Grupoj kaj Societoj Esperantistaj en nia teritorio pretiĝas por novaj pacaj instruaj bataloj por Esperanto. Tre rimarkinda estas la agado de la Aplec Esperanto Grupo en Sabadell. Niaj tieaj samideanoj per eldonado de «La Semisto», okazigo de paroladoj, festoj kaj kursoj, pravas efektivan fervoron por nia sankta afero.

Impresoj

Kiam mi sciigis al miaj amikoj mian intencon iri Hispanujon, granda estis ilia surprizo. Iri al Barcelona, kie, laŭ ĵurnaloj, ribeladoj estas ĉiutagaj okazoj, kie pacemaj civitanoj estas senkaŭze pafiltruataj, kaj bomboj eksplodas ĉe ĉiu stratangulo mortigante arojn da senkulpuoj.

Kiel kutime antaŭ ol viziti fremdan landon, mi serĉis informon en biblioteko, sed ho ve! priskriboj estis maloftaj kaj malnovaj, kaj tute ne kuraĝigaj. Laŭ ili, malpureco kaj insektoj kaŝiĝas en la hoteloj pretaj por la nesuspektema vojaĝanto kaj pro la samaj kaŭzoj vojaĝado nur estas ebla per la unua klaso; la oficistoj estos malĝentilaj kaj arogantaj, kaj la loĝantoj mokas la malmultajn vizitantojn, kiuj kuraĝas eniri ilian landon. Firme fermante la gvidlibron kaj surdiĝante al la amikaj avertoj, mi asertis ke Esperantistoj trovas ĉie amikojn, kaj kun gaja koro mi ensipiĝis survoje al la civito kiun la famkonata Don Kihoto nomas «la floro de la plej belaj civitoj de la mondo».

Trapasinte Parizon, la 15 de majo, mi konatiĝis kun kataluna samideano S-ro Gili Norta, kies rideto certe ĉarmus kaj ensorĉus la plej malmolkoran drakon.

Tagmeze, la 17-an. majon mia kunvojaĝantino D-rino Grogan, kaj mi malgaje starante sur la trotuaro ĉe Narbonne stacidomo, ĝoje aŭdis denove lian amikan voĉon, el la ĵus el Parizo alvenanta vagonaro. Niaj zorgoj finiĝis.

Tre ĝentile la doganistoj traktis nin kaj baldaŭ ni troviĝis en tria-klasa kupeo de hispana vagonaro, kies poluritaj lignaj benkoj kaj plankoj estis tute puraj, kaj kies flankbretoj estis pli konvenaj kaj sendanĝeraj ol la superkapaj retoj de alilandaj vagonaroj.

Kun granda intereso ni rigardis la grandiozajn Pireneojn neĝpintitajn kaj florbilokitajn. Genisto, la nacia floro, diantoj, kalendoloj, meliloto, grandaj purpuraj konvolvoloj kaj amasoj da papavoj ravis la okulojn; ankaŭ ni vidis la famajn korkarbojn. Inter la tuneloj ni estis ĉarmitaj per la maro, la Mediteraneo kiu kuŝis sube, trankvila kiel akvarela pentraĵo — blua, lazura, ultramara, verda, kun plej malgrandaj neĝblankaj ŝaŭmflokoj.

Je la 7-a. vespere la suno ankoraŭ hele brilas en mia lando, sed jam estis mallumo kiam ni alvenis en Barcelona. Granda estis mia plezuro kiam al nia vagonaro venis renkonte S-ro. Curto Basté, kun kiu mi, dum kvar jaroj, korespondis. Tuj kaptante miajn pakaĵojn, li kondukis min al la barilo, kie aro da amikaj, parolemaj samideanoj atendis por akompani min en triumfa kaj babilema procesio al Hotel Marina. Senmakulaj muroj, ŝtonaj plankoj kaj blanka tolaĵo en la litĉambroj mute antaŭdiris purecon, kaj, en la mangoĉambroj, belaj rozoj kaj marbildoj aldonis allogon al la bona mangoĵo. De la afabla estro ĝis la bonkora pordisto, ĉiu ano de la hotelstabo estis ĉiam preta min servi. Se tiuj ecoj troviĝis en ne esperantisto, ĉu estas

necese diri ke la samideanoj posedis ilin en supera grado, kaj de la unua ĝis la lasta momento ili ĉion faris por helpi, servi, kaj amuzi nin. Dekseshora vojaĝo post nur duhora dormo tiel lacigis nin, ke kun bedaŭro ni devis malakcepti invitojn por tiu vespero. La proksiman matenon, bela sunbrilo frue tentis nin kaj ni iris esplori la urbon. Vidante belan perspektivon de preĝejo, ni tuj promenis al ĝi en mallarga strato, kondukanta al malnova vendejo. Enirante la preĝejon, ni ĉirkaŭpromenis admirante la graciajn arkadojn kaj juvelsimilajn vitraĵojn. Elirante per alia pordo, ni vagadis ĝis la Doktorino timis, ke ni perdis nin, kaj deziris peti informon de preterpasanto, sed ĉar ni sciis nek la nomon de la hotelo nek de la strato aŭ placo sur kiu ĝi staris, ŝi devis sekvi min ĝis ni revenis al budo, kie mi antaŭe rimarkis la, al mi strangan, anoncon, «Estas malpermesate blasfemi». De tie mi facile retrovis la hotelon.

Dum la tri sekvantaj tagoj sub la lerta gvidado de niaj amikoj S-roj. Gili Norta, S. Alberich Jofrè, kaj Curto Basté, ni vizitis la plej interesajn vidindaĵojn, la belegan parkon de Montjuich kie mi ŝatus pasigi multajn tagojn, la famkonatan Tibidabon de kies supro vidiĝas la tuta bele blanka urbo kaj la glora maro, kaj fine la interesan katedralon.

Vespere S-ro. Capdevila kondukis nin al la grupkunveno «Paco kaj Amo», kaj al la Ateneo kie mi plezure konatiĝis kun la multaj samideanoj kies nomojn mi delonge konis. Inter ili estis S-ro Jaume Grau kies «Amaj Poemoj» multe plaĉis al mi. S-ro. Delfi Dalmau kies kunlaboro kun S-ro. Bofill tiel mirinde sukcesigis la festaraĝojn. Ankaŭ mi povis ree premi la manon de S-ro. Rodellar antaŭ tri jaroj renkontita en Londono. S-ro. Kreuz sekretario de la Esperanto-Movado priskribis la konferencojn, sciencan kaj komercan, ĵus okazintajn en Parizo. La gastoj ankaŭ enkalkulis S-ron Firkle el Bratislava, Sinon. Hrabáčková el Zlín kaj S-ron Berger el Córdoba.

Vespere la 21-an. majon, akompanata de aro da samideanoj, ni enŝipiĝis sur «Mallorca», kaj mi ĝuis mian unuan vojaĝon sur la glata, trankvila Mediteraneo. La freŝa aero estis tre bonvena post la granda varmo de la urbo, kaj kvankam la transiro daŭris ĝis la 7-a. matene, la temperaturo ne malaltiĝis kiel sur la Manĉo (maro inter Francujo kaj Anglujo). La unua ekvido de Mallorca Majorko okazis je la 4-a. matene, kaj dum tri horoj ni preterpasis rokajn bordojn kaj elstarantajn insulojn, kaj fine eniris la belan havenon de Palma, kies blankaj domoj kuŝiĝis oriente de la malnova kastelo Bellver, kaj la pitoreska Katedralo.

Babilema aro da Esperantistoj amike bonvenigis kaj helpis nin. Danke ni nin trovis en la trankvila Hotel Inglés kie tre agrabla hotelestro zorgeme studis ĉiamaniere niajn komforton kaj bonstaton. Rapide sekvis vizitoj al la urbaj eminentuloj, la urbestro, la provincestro kaj deputitaro. Ĉie ni estis afable akceptitaj kaj kondukitaj tra la belaj ĉambregoj por vidi la arĥitektadojn, bildon kaj artobjektojn.

Sekvate de scivolaj rigardoj, ni promenis laŭ antikvaj sunbrilaj stratoj, suprenirante kaj malsuprenirante la krutajn vojojn ĝis la preĝejo de S-a.

Francisko, kie la Episkopo kaj du pastroj en belaj vestaĵoj solenis la Meson, kaj poste Pastro B. Font predikis Esperante. Ne sciante ke ni ne revenos al la hotelo, mi estis sen ĉapelo pro la granda varmeco, do mi ne sciis kion fari kiam mi min trovis sur la ŝtuparo de la preĝejo. Feliĉe mi portis mallargan puntaĵon sursultre, do samideanino sugestis, ke mi metu ĝin sur la kapon, kaj tiel mi estis dece kovrita, kaj malgraŭ la avertoj de gvidlibroj, neniu eĉ ridetis pro mia stranga kapkovraĵo.

Ree, en brila sunlumo, procesis ĝis la «Kulturdomo» por la malferma kunsido de la kongreso, kaj poste al la Esperanta Ekspozicio ĉe la Palma Klubejo, kie matene ni ricevis insignon kaj bone presitan gvidlibron, enhavantan plenan informon kaj belajn ilustraĵojn.

Mi kompatis la ekzamenotojn kiuj faris sian eblon por kontentigi la ekzamenistojn en la posttagmezo de tiu varmega, plenplena tago. Glora sunbrilo heroldis la festan tagon kaj post bona ripozo, ni gaje kunigis por matenmango. Je la 9-a. la laboremuloj troviĝis en la alloge malvarmeta kunvenejo por la ferma kunsido. Poste ni rapidis tra la homamaso al la «Teatro Principal» por festi la «Floraj Ludoj'n».

Sidante sur komfortaj seĝoj, ni rigardis la eminentulojn maldekstre sur la scenejo sidantajn, kaj la juĝintaron dekstre. Bedaŭrinde la poeto, Sro. Artur Domènech, kiu gajnis la naturan floron, ne povis ĉeesti, do nia afabla amiko, Sro. Joan Gili Norta, anstataŭis lin, kaj baldaŭ ni vidis lin gracie kondukantan la ĉarman reĝinon, F-inon Catarina Montaner. Tre bele ŝi aspektis en blanka atlasa robo, kies longan trenajon portis du feinsimilaj knabinetoj. Sur ŝia or-blonda hararo brilis ĉielarke kroneto, kaj enmane ŝi portis blankan rozbukedon. Sekvis ses blankvestitaj korteganinoj kies brunaj hararo kaj okuloj plej trafe kontrastis kun la blondeco de la reĝino.

La muzikistaro ludis «La Espero» kaj ĉiu starigis ĝis la reĝino suprenirinte la estradon, sidigis sur la tronon kun la korteganinoj ambaŭflanke kaj la knabinetoj sur la ŝtupoj. La premiita ampoemo estis legata de Sro. Gili. La sekretario Sro. S. Alberich Jofrè legis la raporton de la juĝintaro kaj la sukcesintoj venis unu post la alia por ricevi la premiojn, de la reĝino, al kiu laŭvice la du knabinetoj ilin portis. Kiam venis mia vico, la distanco inter la reĝino kaj mi ŝajnis tre longa, sed la ĉeestantaro laŭte aplaudis, sciante ke mi longe vojaĝis por ĉeesti la feston, kaj tio kuraĝigis min. Iamaniere mi sukcesis riverenci al la reĝino, la eminentuloj kaj la juĝintaro, kaj eĉ aldonis alian por danki al la samideanoj, ilian varman akcepton.

Mi ĝojis aŭdi la nomojn de F-ino. Briggs, Sro. Berger, Julio Baghy, kaj aliajn bone konatajn nomojn, sed certe la plej ofta nomo estis Sro. Jaume Grau Casas kiu legis aŭ deklamis kelkajn el siaj belaj poemoj tiel simpatie kaj klare, ke ĉiu vorto estis aŭdebla.

La juĝintaro sendube havis grandan laboron, ĉar cent dek-unu verkoj konkursis por la kvardek tri premioj. Bedaŭrinde la prezidinto Dro. Kolomano de Kalocsay ne povis ĉeesti sed ni aŭdis lian profundan kaj riĉenhavan paroladon, kiun legis Sro. Dalmau.

La Floraj Ludoj fermiĝis. Ĉiu iris al la pordoj por saluti la reĝinon kaj korteganinojn, kiuj en dekoraciita kaleŝo rondiris la urbon ĝis la Grand Hotel kie la festeno okazis.

Jen belega ĉambro, belaspektaj tabloj parfumitaj per amaso da rozoj, geranioj, kaj aliaj floroj. Ĉiu prenis rozon sed la amaso ŝajnis ne malpliigita. Allogaj pladoj aperis kaj malaperis; tre plaĉis al mi la bongustaj fruktoj, kaj la specialaj kukoj de Mallorca.

Elokventaj paroladoj sekvis, sed ĉar ili precipe estis en la kataluna lingvo, mi nur komprenis la sentojn pro la aplaŭdo. Tamen subite mi aŭdis de la malproksima estrado, mian nomon. Kion fari? mi demandis proksimumon. «Respondu» ŝi diris. Trafe diris Shakespeare, «Kelkaj personoj naskiĝas famaj, kelkaj atingas famon, sur aliajn, ĝi estas altrudita». Sur min, simpla kongresano, turniĝis ĉiu okulo. Vole-nevole mi devis fari mian eblon por danki tiujn ridetantajn bonkorulojn. Estas direkto «El la abundo de la koro parolas la buŝo». Mi esperas, ke ili ne taksis la varmecon de miaj sentoj per la malmultaj vortoj kiujn mi eldiris, ĉar efektive el mia tuta koro, mi deziris danki ĉiujn, kiuj tiel amike akceptis min. Elpasante unu el la gastoj alproksimiĝante al mi, petis ke mi diru kelkajn anglajn vortojn al ŝia filino kiu tre kontente alparolus min. Granda estis mia surprizo kiam ŝi min prezentis al la reĝino. Unuavide ŝia beleco impresis min, sed konstatinte ŝian delikatan ĝentilecon kaj lingvistan kapablon, plej alte mi estimis ŝin.

La komitato ne nur zorgis pri nia korpa bonfarto sed ankaŭ aranĝis anjman festenon. Unue ni aŭskultis bonegan orkestran muzikon en la Teatro Lirico, kaj poste ni revenis al la Teatro Principal por aŭdi la ŝatindan kantprogramon de la Orfeo Mallorquí. La koncerto komenciĝis kaj finiĝis per «La Espero», kaj tiuj kiuj aŭdis la tri strofojn bele kantitajn povis konstati la meriton de tiu melodia ario.

Neniam mi travivis tiel plenplenan ĝuindan tagon, la aranĝintoj meritas grandan laŭdon, ĉar la tuta ceremonia festo iris glate kaj digne sen interrompo aŭ kontraŭaĵo.

La solena festo, la ĝaja festeno finiĝis sed la amuzado daŭris. Mi ne povas dece priskribi la mirindan veturadon al Miramar kaj Sóller, la dange-rojn de la kurbiganta, montara vojo, ĉiujn sukcese venkitajn de nia sperta veturigisto, la pretervortan belecon de la vidaĵoj ĉe Sóller, aŭ la grandan surprizon kiu atendis min tie, kiam el la manoj de la amika prezidanto, Sro. Miquel Arbona, mi ricevis donace la belajn fruktojn donitajn de la Sóller grupo. Mi kaptas la okazon por ree esprimi korajn dankojn al tiuj afablaj samideanoj.

Alia ĝojplena tago sekvis. Ĝaja karavano per vagonaro kaj aŭtomobiloj ekskursis trans la sekan, olivportantan kamparon, orienten ĝis la marbordo de Manacor, mirindaĵo el mirindaĵoj, kie ni vagadis tra unu mistera, song-simila kaverno al aliaj, fine vojaĝante multajn metrojn sub la tero, sur la plej belega imagebla lago; la magnesia lumo montris al ni centojn da longaj pendantaĵoj, ĉielarke brilantaj, strangajn formojn kaj figurojn, similajn al drakoj, feinoj, gigantoj, floroj, kaj groteskaj bestoj. Tre profunda ialoke es-

tis la akvo sed klara kaj travidebla kiel nenia surtera akvo. Scivole ni rigardis la vastan plafonon miregante pri la potenca povo de l' naturo. La tuta efekto estis nepriskribeble belega sed timiga, kaj malgraŭ ĝia grandiozezo, ni plezure revenis al la varma sunbrila tersupraĵo.

Post la tagmanĝo iom da tempo restis, kaj nia afabla kongresprezidanto, Sro. Narciso Bofill, sukcesis havigi al ni du parojn da majorkaj dancantoj. La dancoj mem estis okultrafantaj, sed kia scenejo!

Ni sidis sur benkoj ekster la restoracio, ŝirmataj kontraŭ la varmegaj sunradioj per vasta laŭbo de vinujo, figarboj, rozoj kaj lonicero. Ambaŭflanke ĉe malgranda distanco sidis kamparaninoj kun infanoj. Maljuna kamparano ludis sur gitarsimilan muzikilon kaj kantis la dancaron; malantaŭ la dancantoj estis la blanka sablaro kie fiŝistoj flikis retojn kaj virinoj lesivis tolaĵojn kaj de tie etendiĝis ĝis la horizonto, la dormanta, perlumata maro. Surtera Paradizo!. Kiam la mallorcaj dancoj finiĝis kaj la gravmienaj virinoj reprenis sian laboron, niaj amikoj prezentis al ni, la Sardanon, katalunan dancon tute malsimilan, tre gracie. La mallorcaj dancoj estas pli antikvaj ĉar ili montras la ĉasadon de virino per viro, sed la Sardano prezentas tiun feliĉan epokon, ankaŭ malnovan, kiam viroj kaj virinoj malpeze kaj gracie partoprenante la vivon, kunlaboris kaj kunludis kiel egaluloj.

Mi ne povas forgesi la novan grupon kiu gajigis la revenvojaĝon. Kun seriozaj vizaĝoj sed gajaj voĉoj la moŝta grupo da Skarabaĉoj mallongigis la veturadon per iliaj spritaj kantoj. Mi ne povas klarigi la signifon de la nomo, eble ĝi devenas de skarabo, insekto rimarkinda pro ĝiaj kruroj, kaj esprimas la ideon, ke la grupo estis trioble pli vigla ol ordinarioj, kion certe atestos tiuj, kiuj vidis ilin danci aŭ aŭdis ilin kanti. Sed la sufikso «aĉ» anstataŭ esprimi malestimon, enhavis nuancon de amemo. Longe vivu la skarabaĉaj moŝtoj!. Mallumo atingis nin survoje kaj baldaŭ la feliĉaj festintoj ariĝis surŝipe por la hejmenvojaĝo.

Interspaco montriĝis inter la kajo kaj la ŝipo. Aŭdiĝis esperanta kanto, adiaŭkrioj, salutoj, kaj la maro forportis en la nokton la vizitintojn el la sukcesplenaj Floraj Ludoj de 1925.

Kun dankema koro mi travivis tian belan sperton, mi revenis al Barcelona, bela en la matena lumo. Hejmenreveno ĝi vere estis, ĉar la afablaj samideanoj faris ĉion eblan por feliĉigi min dum mia plua restado. Kiel granda estis mia plezuro kiam mi vizitis la hejmojn de miaj amikoj, efektive partoprenante kaj komprenante la hejman vivon de Katalunujo, kiel neniu povas kiu nur rigardas ĝin el hotelaj fenestroj. Mi nur bedaŭris, ke la mallonga tempo ne permesis al mi akcepti ĉiun inviton de miaj bonkoraj amikoj. Kiam mi vizitis la plej junan sed tre vigan katalunan esperantiston, Everest Alberich, kaj la amindan Teresino Curto Marfull, mi konstatis ke la infanoj estas ĉiam saĝaj kaj scias legi kaj kompreni la koron, eĉ sen vortoj.

Adiaŭ, karaj samideanoj de Katalunujo, mi neniam forgesos viajn ĉarmajn bonkorecon kaj amikecon, kaj mi ĉiam kantos laŭdojn al via bela lando!

Emma L. OSMOND

Baleara Movado

Datreveno de la Esperantista Klubo Palma, kaj Honoro al S-ro Bofill

De post nia XII^a Kongreso, sukcese organizita de nia tiea pioniro Narciso Bofill, en tiu belega insularo, nia movado daŭre progresas.

Memore al la XIX^a datreveno de la fondo de la Palma Klubo kaj honore al nia samideano Bofill, okazis belaj festoj en Palma post nia Kongreso. Solena estis festeno okazigita en Hotel Câ's Català kiun prezidis la honorato.

Multaj Grupoj Esperantistaj el nia federacia teritorio sendis aliĝon kaj saluton, kiujn oni legis kaj aplaŭdis.

Josep Roselló, nia kara amiko Prezidanto de la Palma Klubo, elokvente paroladis pri la grandaj klopodoj kaj meritoj de la glora organizinto de la K. E. F.-a Kongreso en la Baleara ĉefurbo. Ankaŭ paroladis la Prezidanto de la Grupo en Sóller, nia estimata samideano Miquel Arbona. Joan Sancho, ŝatata Palma kunbatalanto memorigis pri nia malnova amiko Joan Barceló, kiu malfeliĉe de antaŭ jam multaj monatoj troviĝas en Maroko pro milito. S-ro Canals paroladis nome de la organizintoj de la Festeno. S-ro Massanet laŭdis la bonajn ecojn de S-ro Bofill.

Bela albumo memoriga de la Honoro estis donacata al la honorato. Kaj fine tiu-ĉi, nia neforgesebla organizinto de la K. E. F.-a Kongreso en Majorko legis longan, dankan, fervoran, emocian paroladon.

Estis multaj aplaŭdoj.

Orĥestro ludis plaĉegajn muzikaĵojn.

Belaj floroj ornamis ĉarme kaj odoris rave sur la tabloj.

Ĵurnaloj kaj gazetoj el Majorko propagande kaj laŭde raportis.

—

Post kelkaj tagoj nia senlaca Bofill paroladis pri Esperanto en la urbeto Consell, kaj atingis sukceson por nia afero.

Resume: niaj balearaj amikoj semas, semadas por Esperanto kaj meritas nian gratulon, nian simpatian, nian laŭdon.

—

BALEARA KARAVANO ĉeestonta nian proksiman Kongreson en Santa Coloma estas organizata de nia kara Bofill. La nomo de ĝia organizanto certigas pri granda sukceso.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

III^a Iberia Kongreso Esperantista en Kordovo 10-12^a Majo 1925

Ĉeestinte la 3^{an} Kongreson de Iberiaj Esperantistoj en Kordovo, kiel delegito de K. E. F., estus mia devo raporti detale pri tiu okazintaĵo por ke niaj federaciaĵoj sciigu pri ĉio en ĝi pridiskutita kaj informigu pri la ĝenerala movado en Iberlando. Sed mi ne povas fari tion detale, tial ke (mi tion bedaŭras) mia restado en Kordovo daŭris nur unu tagon. Pro tio mi nur ĉeestis la solenegan malferman kunsidon. Pri ĝi kaj pri miaj personaj impresoj, do, jen ĉi-tiuj mallongaj notoj.

Kun kora afableco kaj samideana ĝentileco mi estis akceptata, en la bela kongresurbo, de la tieaj samideanoj, ĉe Sroj. Serrano Obregón, la senlacaĵ batalantoj. Tie mi havis okazon resaluti malnovajn konatulojn, nome, Sroj. Luque kaj Azorin, ambaŭ fervoraj laboremuloj por nia afero en la andaluza lando. Vespere mi salutis la ceterajn kongresanojn dum la interkonatiga kunveno, okazinta ĉe »Círculo de la Amistad«.

Antaŭe, en Madrido, mi estis vizitinta la kastilan pioniron, komandanto Mangada, kiu frate kaj samideane brakpremis min. Post longa interparolado kun tiu entuziasma kaj homarama esperantisto, mi eliris la konvinkon ke nur reciproka malkompreno estas la kaŭzo de ĵusaj bedaŭrindaj atakoj, diskutoj kaj publikaj skandaloj inter li kaj katalunaj esperantistoj. Mi sincere opinias ke kiam kun la afero esperanta oni volas kunligi patriotajn, pli bone, ŝovinistajn idealojn, tuj neeviteble aperas la ĝermo de konkuroj kaj malamo, precipe en landoj kie la oficiala politika ŝtato ne alkonformiĝas kun la nature naciaj aspiroj kaj idealoj de ĉiuj landanoj. Intermiksi kun la propagando por Esperanto, propagandon por la unueco de la Ŝtato, en landoj kie nur trude kaj perforte, konsekvence malame, estas akceptata la oficiala politika Ŝtato, en landoj kie ne oni sentas unuecon gentan nek nacian kun la aliaj landanoj de la sama Ŝtato, en landoj kie patruja amo signifas amon al natura lando, al sammora, al samlingva lando, ne al artifika, politika kunmiksado de la landoj kun diversaj moroj, malsamaj lingvoj kaj kontraŭaj idealoj, laŭ mia opinio, estas kontraŭefika laboro, trafanta nur malsukceson. Pri tiu temo kaj sur paĝoj de K. E. F. mi promesas dediĉi al S-ro. Mangada, en venonta numero, artikolon, kun la espero ke ĝi kontribuos al repaciĝo por bono de Esperanto kaj Homaranismo. Homaranismo ja neniel akceptas altrudon, ĉu religian, ĉu patrujan, ĉu politikan ĉu lingvan.

En la malferma Kunsido, preskaŭ ĉiuj paroladoj, ĉefe tiu de S-ro. Mangada, estis elokventaj, varmaj kantoj en hispana lingvo al la gloraj pasintaĵoj de la hispana raso. Aŭdante tiajn patriotaĵojn mi min ofte demandis ĉu mi ĉeestas malferman kunsidon de esperanta kongreso aŭ simple kunvenon de varme elokventaj patriotoj.

Mia esperanta paroladeto estis simpla saluto de la K. E. F.-anoj kun esprimo de bondeziroj, laŭ jenaj vortoj:

«Karaj gesamideanoj:

«Ĉar Kataluna Esperantista Federacio ne apartenas al Iberia Konfederacio, la rolo de mi ludota en ĉi-tiu solenaĵo estas tre simpla. Jen:

«Mi portas al vi la varmajn, la korajn, la sincerajn salutojn de la anoj de K. E. F. Akceptu ilin bonkore kaj ne kredu ke nia rifuzo aparteni al Iberia Konfederacio devenas de malestimo aŭ malamo. Tute ne; ni, la K. E. F.-anoj amas ĉiujn homojn, ĉar kun esperantismo ni sentas homaranismon, kaj ni amas kun prefero la esperantistajn homojn, kia ajn estu ilia nacio, ilia lingvo, ilia religio, iliaj politikaj kredoj. — Ni estas spirite kun vi, eĉ ne apartenante al via organizaĵo; ni deziras ke viaj klopodoj por Esperanto, en la teritoria kampo de via agado, sukcesu kaj estu riĉe fruktodonaj. — Viaj sukcesoj, viaj triumfoj, ĝojigas nin kvazaŭ ili estus sukcesoj niaj, triumfoj niaj: ja ili estas sukcesoj kaj triumfoj de Esperanto.

«Ricevu, estimataj gesamideanoj, bonkore, sincere, kaj lojale miajn vortojn: sincere kaj lojale mi diras ilin. — Kataluna Esperantista Federacio estas ĉiam preta kunlabori kun iu ajn organizaĵo, por la propagando kaj disvastigo de la komuna ideo, kaj por tio ĝi ne bezonas, nek deziras ke oni invoku alian titolon ol tiun de Esperantisto».

Tial ke mi estis la unika kataluno parolinta, imagu mian surprizon, kiam lastmomente el inter la publiko sin prezentis sur la strado iu, kiu kun afektema emfazo kaj grandoratoraj gestoj, deklaris ke li alprenas la parolon je la nomo de la *aŭtentikaj kaj ne hipokritaj katalunoj*. — Jen samideanoj de K. E. F., vi, en kies nomo kaj reprezento mi estis parolinta, ĝentile salutante la Kongreson, ne estas aŭtentikaj katalunoj, sed hipokrituloj. La *aŭtentika* kataluno estas tiu, kiu por pravigi sian aŭtentikecon, atribuis al si la reprezenton, kaj uzis la nomon de estinta Barcelona organizaĵo **kiu jam ne ekzistas**. — Li deklaris la aliĝon de tiu mortintaĵo al la Kongreso. Bona akiro por Iberia Konfederacio! — Cetere, la parolado de tiu aŭtentika kataluno, konsistis el sufiĉe longa ditirambaro al la gloroj de Hispanujo, en hispana lingvo. — Oni aplaŭdis lin. Neniu el la kongresanoj malaprobis la insulton tiel klare kaj publike faritan al la esperantistoj de K. E. F. en tiu solena kunsido. Unuamomente mi intencis mem tion fari, sed post rapida pripensado mi decidis silenti por ke neniam oni povu diri ke K. E. F. sendis delegiton al la Kongreso por malhelpi ĝian sukceson. Post la malferma kunsido mi malaperis el la kongresurbo, nerimarkite kaj adiaŭinte nenium, por eviti klarigojn, kaj veturis al Seviljo, kie familiaj aferoj min postulis.

Se mi estus povinta partopreni laboran kunsidon, jen kion mi estus dirinta al la hispanaj samideanoj kun la sama lojaleco kaj kataluna klareco de mia saluto:

Ne malestimo nek malamo, sed aliaj, estas la kaŭzoj de nia sintenado rilate al la Iberia Konfederacio. Hodiaŭ estus malpermesate paroli pri tiuj kaŭzoj, pro la specialaj cirkonstancoj regantaj nune en la Hispana Ŝtato.

Se tiaj cirkonstancoj ne malhelpus nin paroli klare, mi havas la certe-

con ke vi ĉiuj konsentus pri la logikeco de nia sinteno kaj ke vi ĉiuj restus konvinkitaj pri la lojaleco de nia konduto.

Nur mi dirus ke unu el la kaŭzoj de nia rifuzo aparteni al la Iberia Konfederacio, konsistas el la sincera kredo ke tiu konfederacio estas nenecesa kaj malmanka. — Estas vero, ke antaŭtempe K. E. F. iniciatis la starigon de Hispana Konfederacio, kies nomo estis poste ŝanĝata je tiu de Iberia Konfederacio, kun plena kontentigo de la katalunoj. Estas vero ke en la unua kaj dua Kunvenoj de Esperantistoj de Iberiaj Landoj en Barcelona kaj Zaragoza, K. E. F. partoprenis la diskutojn kaj eĉ proponis plenan regularon por la starigota konfederacio. Sed mi devas atentigi vin, hispanaj samideanoj, ke ĉio ĉi-tio okazis antaŭ la Universala Kongreso en Helsinko, kie oni starigis novan organizadon de la tutmonda esperantistaro. Laŭ tiu organizado, la landaj federacioj kotizas difinitan procenton al centraj institucioj, laŭ la nombro de siaj anoj. Kataluna Esperantista Federacio, tuj aliĝis al la nova regularo, kaj de tiam ĝi kotizas sian procentaĵon. Se ni aliĝus al Iberia Konfederacio, oni devus difini kroman procenton pagotan de K. E. F. al I. K. Ni ne povas akcepti tion, ĉar tio malebligis la ekzistadon de K. E. F., de la financa vidpunkto.

Nek ni povas akcepti ke K. E. F. ĉesu sian kotizadon al K. R. kaj ke faru ĝin la Iberia Konfederacio, konsiderante ĝin kiel landan organizaĵon, ĉar ni volas konservi nian propran personecon antaŭ la tutmonda esperantistaro, kiel plena, kompleta organizaĵo de plena, kompleta lando.

Sed pli ankoraŭ mi diras. Eĉ se ni ne devus pagi al I. K., ni ankaŭ konsiderus neoportune aliĝi al ĝi. Jen la kialo: Por ke la publiko, por ke la loĝantoj de iu ajn lando sin sentu altiritaj al ia ajn doktrino, estas nepre necese ke tiu doktrino ne estu malkonforma kun la publika opinio nek kontraŭstaru la inklinojn, la sentojn, la idealojn de la plejmulto el la landanoj, kaj estas tre efike se tiu doktrino prezentas solvojn al la landaj problemoj. — Pro tio, nur pro tio, Esperanto kreskas kaj disvastiĝas tiel firme en Katalunujo, tagon post tago, nuntempe rapidege, ĉar ĝi prezentas logikan kaj justan solvon al la lingva problemo, ĉar ĝi ne kontraŭstaras la idealojn de la plejmulto el la katalunoj. Tio kio plej bone konvinkas la katalunojn estas nia devizo: *«Kun samnaciaĵoj, la propra lingvo; kun alilingvanoj, Esperanto. Esperantismo ne akceptas altrudon de lingvoj»*.

Nia sincera opinio estas, ke la federacioj ne devas esti bazitaj sur naciaj, ŝtataj, teritoriaj, politikaj, historiaj nek religiaj konsideroj. Esperanto estas lingva afero. La neceso eviti la malbonaĵojn devenantajn de la diverseco de lingvoj inspiris ja al nia Majstro la kreadon de Esperanto.

Do, ni bazu niajn federaciojn sur lingvaj bazoj: Federacio de hispanlingvanoj, Federacio de basklingvanoj, Federacio de katalunlingvanoj, k. t. p. — Kaj ĉiu federacio estu sendependa, sen alia ligilo kun la aliaj federacioj ol la komuna fervoro por Esperanto, kaj la mutua, amika kunhelpo en la laborado.

Ĉi tiujn vortojn mi estus dirinta en labora kunsido, sed mi ne havis

okazon fari tion. Tamen mi profitis oportunaĵon konigi ilin al S-ro Manga-da, la kastila pioniro, kiu aŭskultis ilin atente kaj ĝentile, sed ne esprimis sian opinion. Poste mi legis ke la Kongreso decidis ne starigi Iberian Konfederacion, sed Hispanan Asocion.

Mia persona opinio estas ke pli oportuna estus kastila Federacio, por ĉiuj kastillingvaj teritorioj de la duoninsulo, sed la kongreso ne atentis pri la lingva problemo kaj konsideris nur la oficialan politikon de la Ŝtato. Al ni, katalunoj, devas esti indiferenta la nomo ĉu kastila ĉu hispana, ĉar ni havas nian amatan «Kataluna Esperantista Federacio», kiu estas nia landa, sendependa organizaĵo.

Ni deziru, la katalunaj esperantistoj, bonan sukceson al la hispanoj.

Vivu la Hispana Asocio! — ARTUR DOMÈNECH I MAS

LES NOCES DE L'ALOSA I EL LLESSAMÍ

Glossa

«Quina taula tan parada:
estovalles de satí;
les culleres són de plata,
les forquilles són d'or fi!» (1)
Quina taula, pubilleta!
i no em diries per qui?
— L'alosa de la margedà
se'ns casa amb el llessamí.
— A quina hora feu les nocés
que jo hi voldria venir?
— El rossinyol t'ho diria
que ell els ha de beneir
perquè té la veu tan clara
i sap tant de confegir
i duu plomissó de seda
i té après un gest molt fi.
— Força em plauria trobar-t'hi;
posa't ben propet de mi:
aprendrem com fan les nocés
que el saber-ho és mig cami.
— Ahir que l'hora cercaven
no es sabien avenir:
ell volia la nit dolça
i l'alosa el dematí,
que al matí té la veu tendra
i al vespre no sap què dir.
Ell vol la nit i ben clara
perquè duu el vestit més fi
i és obert com una estrella
i el parfum sembla un sospir.

Al roser ho preguntaven:
no gosava decidir;
el rierol se n'enreia;
la menta vinga glatir,
i l'estrella tan llunyana
semblava que fos ací.
Per a fer-los companyia
els han cercat un padri:
un ametlló per l'alosa
i un estel pel llessamí;
la font els diu la doctrina
al vespre i al dematí.
Conten que volen casar-se
al rusc de sobre el moli,
perquè cada abella hi sigui
cirial i violí
i d'encensé una maduixa
que el seu foc no pot morir.
Veus com branda ses campanes
la perera del cami?
Cerca el giponet de rosa,
caputxeta i faldellí
i un brotet de tarongina
que encar sigui a mig obrir.
Que la taula ja és parada:
«estovalles de satí;
les culleres són de plata;
les forquilles són d'or fi.»
Si encara avui no en tens ganes,
prou que te'n faran venir!

MELCIOR FONT

(1) Corrandà popular,

**La XIII^a Kongreso de K. E. F.
kun la XII^a Internaciaj Floraj Ludoj
okazos en Santa Coloma, la 23-25 Majo 1925**

Loka Organiza Komitato: Prezidanto: Josep Canaleta; Konsilantoj: por ekskursoj, Joan Falgueres; por festoj, Joan Brusset; por la Floraj Ludoj, Josep Gener; Kasisto: Joan Solà; Sekretario: Josep Turon. Anstataŭantoj: Salvador Planes, Joan Peric, Lluís Duc, Pere Monràs, Emili Serra, Joan Tornabells. — Honoraj Membroj: ĉiuj lokaj Aŭtoritatoj.

Alvoko

Por la XII^a Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

Al vi, ĉiulandaj verkistoj, amantoj de esperanta beletristiko, saluton!
La Komitato de la XII^a Internaciaj Floraj Ludoj havas la honoron inviti vin partopreni la jenajn konkursojn:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la kataluna versaĵo sur paĝo 228 de ĉi-tiu numero.
- II. — Traduko de la jena prozaĵo:
«Caminar amb la Lluna» de Prudenci Bertrana el la libro (paĝoj 141-5)
«El meu amic Pellini i altres contes» eldonita de «Editorial Catalana». —
Prezo ptoj. 2'50.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ (unua listo).

- I. — Premio de la Komitato de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Interna ideo de Esperanto.
- II. — Premio de la Redakcio de «Kataluna Esperantisto»: 75 pesetoj. Temo: Fideleco al la Fundamento de Esperanto.
- III. — Premio de S-ro Narciso Bofill de Palma de Mallorca: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de S-ro Miquel Argemí de Terrassa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvolà.

V. — Premio de Universala Esperanto-Asocio: 100 pesetoj. Temo rilatanta al U. E. A.

VI. — Premio de la grupo «Barcelona Stelo»: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola.

VII. — Premio de Dro. Sekretulo: 75 ptoj. Temo: Laŭvola.

Novaj premioj estos anoncataj al la Komitato, kaj ni ilin publikigos en la proksima numero de «Kataluna Esperantisto».

(Ni petas ĉiujn societojn kaj privatulojn bonvolajn, tuj anonci al ni siajn premiojn kaj temojn por la proksimaj Floraj Ludoj).

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

D-ro. Edmond Privat, *prezidanto*. — Joseph Berger. — Josep Rosselló. — Artur Domènec. — Josep Gener. — Josep Ventura, *sekretario*.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos bele binditan ekzempleron de la verko «Kataluna Antologio». Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diploma.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinarnaj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncitaj.

IV. — La soleno de la XIIaj Floraj Ludoj okazos en Santa Coloma de Farnés dum la XIII^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio».

V. — La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevataj antaŭ la 15 februaro 1926 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj, (S-ro. Josep Ventura, Carrer Creu, 75 - Terrassa) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj konkurso.

VIII. — La Komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La verkoj premiitaj fariĝos propraĵo dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

En la proksima numero de KATALUNA ESPERANTISTO ni aperigos liston de novaj eksterordinarnaj premioj kaj temoj.

MI DANKAS

Mi dankas por Mangadaj senkulpigo kaj gratulo, kiujn vi legos tuj en ĉi-suba represa ĉapitro el raporto pri la Ĝeneva Kongreso, subskribita de J. M. R. (Julio Mangada Rosenörn) aperinta en la septembra numero de «La Suno Hispana». Jen la afabla ĉapitro.

«Same, kiel por ĉiuj Kongresoj, la vivo de la XVII^a disvolviĝadis kun malferma kaj ferma ĝeneralaj kunsidoj, la lasta tutplene je la honoro de la Majstro; kun laborkunsidoj, speciale tiuj de K. R. — C. K. kaj U. E. A. dum kies unua, Hispana Esperanto-Asocio havigis al si la rajton kiel membro de K. R., pagante sian kotizon, sufiĉe altan, kaj kaŭzante tiel bonan impreson; ĝi atingis ke ĉio estu laŭ la regularo de la Kongreso, pro kio nur H. E. A. parolis kiel sola *Nacia Asocio*, ĉar alimaniere estus okazinta starigo de politika problemo se Kataluna Esperanta Federacio estus prezentinta sin kiel Nacia Asocio; pro kio ankaŭ parolis vasko, valenciano kaj kataluno, pri saluto je la nomo de siaj lingvoj parolataj en la nacio, krom tiu, kiu parolis je la nomo de la lingvo hispana. Dum ĉi tiu kunsido, ĉar la reprezentanto de Kataluna Esperanta Federacio ne ĉeestis de la unua momento, okazis ne grava diskuto kiam li sin prezentis kaj informiĝis pri la afero kaj ke ne estis kialo por revenigi la aferon al antaŭa diskuto jam finita des pli ĉar la decido estis laŭ Regularo de la Kongresoj. Dum la dua kunveno, tute interkonsente, oni voĉdonis gravajn aferojn, kaj estis honoro al la reprezentanto de H. E. A. malaperigi malkomprenojn de S-ro. Cart okaze de letero, kiun proponis D-ro. Privat, kaj kiun S-ro. Cart, kiel Prezidanto de la Akademio, devis adresi al S-ino. Morris, kaj kies teksto estis elĉerpitaĵo fidela de nia Fundamento. Tiel interesa estis la kunveno, kaj tiel granda estis la unuanimeco ĝin reganta, ke vere ne estis apenaŭ diskutetoj, pro kio D-ro. Privat ekkriis: «Delegitoj de Naciaj Asocioj ne ĉeestantaj la kunvenojn de K. R. ne estas lojalaj al nia esperanta idealo. Ĉiuj devas surporti la respondecon same», mi senkulpigas el ĉi tio dirita de D-ro. Privat la reprezentanton de Kataluna Esperanta Federacio, kaj mi gratulas lin, ĉar, ne ĉeestinte, li elpruvis al mi sian konvinkigon pri la eraro konscii Katalunan Esperantan Federacion *Nacia Societo*, pro kio tiuj kunvenoj ne koncernis lin kaj nur la Reprezentantaron de Naciaj Societoj aŭ K. R.»

La katalunaj esperantistoj estas malriĉaj. Ĉiuj devas perlabori la ĉiutagan panon korpan kaj kulturen. La Kataluna Esperantista Federacio elspezas por Esperanto pli ol enspezas de la membroj laŭ la ordinara kotizo kaj abonoj al «Kataluna Esperantisto». Eĉ la presisto de nia gazeto estas ankaŭ tiel malriĉa ke pro manko de presmaterialo kaj monrimedoj okazigas oftajn malfacilaĵojn al apero de K. E.

Nun, ekzemple, okaze de la presado de la granda Kataluna Antologio, vere granda esperanta verko aperonta fine de oktobro, nia gazeto ne povis aperi ununumere ĉiumonate. Plie ni ne havas Ŝtaton pagantan por Delegito de K. E. F. ĉe Universalaj Kongresoj. K. E. F. ankaŭ neniom povas pagi por

tio; kontraŭe, foje niaj reprezentantoj, kiuj devas pagi mem por vojaĝoj de la reprezentado, pagas ankaŭ eksterordinaran kotizon por malaperigo de K. E. F-a defecito.

En la nuna jaro, ĉar mi devis en Ĝenevo ankaŭ labori kaj studi, mi ne povis ĉeesti la duan kunvenon de KR. kiun Infanteria Komandanto Mangada tiel bone raportas. Kaj mi bedaŭras mian foreston, des pli tial ke se estus okazinta ĉeesto mia, li estus decidiginta KR-on ke ĝiaj kunvenoj ne koncernas la Reprezentanton de K. E. F., ke K. E. F. ne estas ĉe KR. kiel la ceteraj aliĝintoj. Mi diziras helpi al Komandanto Mangada klarigi la aferon, kaj mi petas KR-on respondi pri tiu nova rajto-nerajto de K. E. F. laŭ Komandanto Mangada. Ĉiuj Oficialaj Institucioj de Esperanto povas esti certaj de K. E. F. akceptos kaj obeos bonvole ĉiujn justajn decidojn iliajn. Ankaŭ Komandanto Mangada povas esti feliĉa pro certeco pri nia akcepto kaj obeemo al niaj Oficialaj Institucioj: Akademio, Konstanta Reprezentantaro kaj Centra Komitato.

Sed kial Komandan Mangada ne vidigis al KR. ke ne koncernas la Reprezentanton de K. E. F. partopreni eĉ la voĉdonon por la Organiza Statutaro en la una Kunveno de KR. en Ĝenevo, kiun ni ambaŭ ĉeestis, kaj kie plurfoje estis aludata la voĉdono K. E. F.?

D. D.



Pro... kaj Pro...

La Hispanaj Reprezentantoj. — Por reprezenti Hispanujon ĉe la ĵus okazinta XVII^a Universala Kongreso de Esperanto, en Ĝenève, la registaro nomis S-rojn Staba Leŭt-Kolonelo, Inglada Ors kaj Infanteria Komandanto, Mangada Rosenörn.

«*Tre imitinda ekzemplo.* — La Katalunaj Radiologiistoj, laŭ la iniciato de D-ro Bremon Masgrau, el Barcelono, prezentis al la Internacia Kongreso pri Radiologio, okazinta antaŭnelonge en Londono, la jenan proponon: — «*La subskribintoj, konvinkitaj ke la interkompreno estas la ĉefa afero en internacia Kongreso, dezirus ke, en la venonta Kongreso, Esperanto estu elektata kiel helpa lingvo, plie de la naciaj lingvoj, kaj ke ĉiu dokumento, anonco, komunikaĵo, k. t. p., estu ankaŭ presata esperante.*» — Tiu teksto estis subskribita de multaj eminentuloj en Radiologio, Prof-oj Dessauer (Frankfurt), Friedrich (Friburg), Nemenov (Leningrad), Heuser (Buenos Aires), Carulla (Barcelona), D-roj Case (Battle Creek), Grossman (Leningrad), Torres Carreres kaj Grau (Barcelona), Bosch (Terrassa), k. t. p. La propono transiris al Komitato de Delegitoj: ĉu ĝi sukcesis? Eble, sed la ĉefa afero

estas ke granda parto de la Kongreso sciigis pri ĝi. D-ro Bregon Masgrau prezentis komunikon rilate al «Prostata Hipertrufio kaj ĝia kuracado per Radioterapio»; ĝi estas akceptita en *Esperanto*, kaj en Esperanto verŝajne vidos la lumon en la publikigota Kongreslibro. — Ankoraŭ pli en la fako, ol en la ĝenerala medicino, lingvo internacia estas tute necesa, kaj ni nepre konfidu al Tekanoj specialistoj por imiti la ekzemplon de D-ro Bregon Masgrau. — N. B. — Pri la radiologio, sciiginte ke D-ro Wetterer (Institut für Radium and Röntgenbehandlung, Mannheim), preparis gravan internacian verkon kvinlingvan (Index), mi skribis al li por konsili la uzon de Esperanto. Li respondis ke li nur ŝate konsideros mian peton, se multaj fremdaj radiologiistoj esprimas la saman deziron. Mi scias ke kelkaj tion faris, kaj mi invitas ĉiujn radiologiistojn same fari. — (El la gazeto «T. E. K. A.» — Ni gratulas niajn amikojn por la «Tre imitinda Ekzemplo».

Grupo «Barcelona Stelo» Marquès del Duero, 101. — *Ciklo de paroladoj*: (Je la 10^a vespere). 19 Septembro: La afableco de la Londonaj samideanoj, de Josep Grau Cases. — 10 Oktobro: La Ĝeneva Kongreso, de Delfi Dalmau. — 31 Oktobro: Pri la vivo de insektoj, de Joan Amades. — 21 Novembro: Kiam kaj kie ni devas uzi Esperanton: senkonscio de kelkaj esperantistoj, de Jaume Grau Casas. — *Kantista rondo*: Estas fondita en nia Grupo la «Kantista Rondo», kiu estos direktata de nia grupano Conrad Domènec. Li instruos popolkantojn katalunajn kaj alilandajn, tradukitajn en Esperanton, kaj aliajn esperantajn muzikaĵojn. Kunveno: ĉiumerkrede. — *Unuagrada kurso*: Ĝi okazas ĉiujn lundojn, merkredojn kaj vendredojn, de la 9^a ĝis la 10^a vespere, gvidata de samideano Eduard Capdevila.

Respubliko Supernacia. — Formigis Komitato por Propagando de la Ideo Supernacia, laŭ la ideoj de S-ro H. L. Follin. Interesatoj petu informojn de la sekretario de République Supranationale, 23 rue la Boetie, Paris 8.

Anarkiistoj. — Sub devizo «Por la anarkiismo per Esperanto» estas fondota «Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj». Informojn oni petu de la adreso: J. M. Esperanto, 9 rue Louis Blanc, Paris 10.

Libro pri kuirarto. — Mi intencas prepari libron pri kuirarto, kiu enhavu priskribojn de ĉiuj plej ĝeneralaj kaj ankaŭ naciaj manĝaĵoj. — Mi petas ĉiujn, kiuj sin speciale pri tio interesas, helpi al mi ĉu per alsendo de materialo ĉu per konsiloj. — Oni sin turnu al S-ino Edmond Privat, 2 Chemin de Roches, Genève (Svisujo).

Aŭtuna Foiro de Frankfurt A. M. — La Foirofiĉejo de Frankfurt dissendas 24-paĝan ilustritan broŝuron en Esperanto, per kiu ĝi provas doni bildon pri la historio de la Varfoiroj de Frankfurt kaj montri la ekonomian signifon, kiun posedas por nia tempo la Internaciaj Foiroj de Frankfurt. Ili sukcesis certigi al si dum mallonga tempo fruktodonan fidon de industrio kaj komerco kaj justigi tiun ĉi fidon. Ilia organizo garantias al ekspozicianoj kaj aĉetantoj ĉiujn avantaĝojn, kiujn oni deziras de moderna grandfoiro.

Ĉiujn demandojn pri partopreno al la aŭtuna foiro, okazonta de la 4-7 Oktobro, pri foira vizito kaj similaj aferoj respondas volonte la Foirofiĉejo (Messamt) de Frankfurt-M., Platz der Republik, Germanujo.

Jen Rocamora noto kiu antaŭ kelkaj tagoj aperis en hispanlingvaj ĵurnaloj en Barcelona: *Congreso de Esperantistas de Tierras Ibéricas*. — Elementos pertenecientes a «Barcelona Esperanta Grupo» han nombrado el Subcomité encargado de realizar la propaganda y los trabajos de cooperación para el «IV Congreso de Esperantistas de Tierras Ibéricas», que se celebrará en Madrid el año próximo. El Subcomité de Barcelona quedó constituido por los señores don Rómulo S. Rocamora, don Francisco Gorgues Torredelot, don José Anglada Prior, don Pedro Mayol Aymerich y don Luis Batet y Jufre. Dicho Subcomité ha fijado su residencia en la Gran Vía Layetana, número 13, entresuelo, primera. En la reunión celebrada para la designación del Subcomité se acordó también hacer constar que ni éste ni la entidad «Barcelona Esperanta Grupo» pertenecen ni tienen relación ninguna con la «Federación Catalana Esperantista».

Neniu el tiuj sinjoroj estas hispanlingvano. Hispanlingvaj samideanoj en nia teritorio, kiuj esperantiste kaj amike kunlaboras kun ni en la Kataluna Esp. Federacio, kaj eĉ niaj karaj samideanoj en la hispanlingva teritorio de la Duoninsulo bone konas nian Federacion kaj dece juĝos tiajn publikajn Rocamorajn notojn, el kiuj antaŭ kelkaj monatoj aperis alia sciiganta al la mondo, ke S-ro Rocamora forlasis la esperantistan movadon. S-ro Rocamora estas la fama homo kiu veturis de Barcelona al Córdoba por saluto en la nomo de «los catalanes auténticos y no hipócritas» rajtigita de nenioma Grupo de katalunaj esperantistoj.



Bibliografio

Ni recenzos verkojn duope ricevitajn.

LA MALAPERINTA AMIKO. Kontribuo al la pruvaro pri l' identeco de la spiritoj, verkita en franca kaj esperanta lingvoj de Jules Thiebault. Havebla ĉe la aŭtoro, Carignan (Ardennes) Francujo. 97 paĝoj, 21 × 14. Prezo aŭfrankite: 5 fr. fr.

La aŭtoro priskribas diversajn scenojn okazintajn en Mantes, kie rimarkinde enkorpiĝis kelkaj spiritoj kiuj donis novan pruvon pri la kodiaŭ ne plu neebila ekzisto de la postmorta vivo. Kiu legis la faman trilogion de Flammarion, tiu ne trovos en la verko multajn novajn detalojn pri la ecoj de la spiritoj, tamen ĝi bone servos por veki intereson ĉe multaj esperantistoj, kiuj pri la misteroj de la morto ne multe atentis.

Krom la abundaj prezeraroj oni trovas en la libro kelkajn lingvajn malperfektaĵojn.

HEJMA PROZO. — Kolekto de rakontoj esperanten tradukitaj de Dro. J. Bremon Masgrau L. K. Eldono de la trakukinto, Barcelona 1925. 64 paĝoj, $17 \times 12 \frac{1}{2}$. Prezo: afrankite 1 sv. fr. — Mendu ĉe Ferran Montserrat, Villarroel, 107. — Barcelona.

KONGRESLIBRO de la III Iberia Kongreso Esperantista, eldonita de la Organiza Komitato. Kordovo, 1925. 50 paĝoj, 21×14 .

RAPORTO de la III Iberia Kongreso Esperantista. Aldono al la pli supre nomita kongreslibro. 42 paĝoj.

Impresoj kaj raporto pri la kongreso de niaj karaj hispanlingvaj samideanoj. Ni gratulas nian karan Berger, kiu verkis la raporton, ke li tiel entuziasme laboris por la sukceso de la kongreso.

LA LASTA KRAVATO DE ALEKSY de S. Balinski. Biblioteko de Pola Esperantisto. El la pola lingvo tradukis Stanislaw Karoloczyk. Warszawa, 1925, 24 paĝoj, $16 \frac{1}{2} \times 12$. Prezo: 50 gr.

Interesa noveleto kun tre vivaj scenoj. Preskaŭ sen prezeraroj. La tradukinto bone regas la lingvon, sed mi rimarkis ke pri la adverbo «ĵus» kaj la sufikso «iĝi» li kaj aliaj esperantistoj kavas neĝustan ideon. «Ĵus estis la dimanĉo» pĝ. 17, «ĉu ĵus tio ĉi povus min tiel forte impresi» pĝ. 23. Kial anstataŭ «ĵus», kies signifo estas *antaŭ mallonga momento*, oni ne uzas «ĝuste». «Vestiĝadis» p. 19. «senkulpigadi» p. 22. anstataŭ «vesti sin», «senkulpigi sin». «Fermitajn» (p. 15, linio 7) estas predikateca kaj ne apudmetita adjektivo; sekve la akuzativo estas makulo. «Velkitaj» anst. «velkintaj» p. 23.

ILUSTRAT ABECEDARI del Lingue Medial European, de Josef ed Betti Weisbart. Nürnberg, 1925. 75 pĝ., $16 \frac{1}{2} \times 12$. Prezo: ne montrita.

Nova lingvo pli facila kaj pli bela ol ĉiuj ceteraj lingvoj. Josef kaj Betti povas trankvile «ridi» pri la estonto de la «infante». Ni antaŭvidas la morton de ĉiuj Saussure' aĵoj kaj la triumfon de la nova eŭropa fuŝaĵo.

INTERNATIONAL RADIO MANUAL de Harry A. Epton, eldono de The British Esperanto Association, London, 1925. 80 pĝ. $16 \frac{1}{2} \times 10 \frac{1}{2}$. Prezo: 6 d.

Kun envio oni legas la belegan lernolibron. Se ni povus havi similan, la sukceso de nia kurso de Radio Barcelona havus multe pli kontentigan rezultaton. Gramatiko, vortaro (radio-terminoj), bildoj de radio-simboloj, ĉio estas korekta. Verketo kiu fariĝas verkego antaŭ niaj okuloj.

LA KATALUNA POPOLKANTO. — Studo originale verkita de Joan Amades kaj Jaume Grau Cases. Barcelona 1925. 29 paĝoj, $21 \frac{1}{2} \times 15$. Aĉetebla ĉe la aŭtoro Sro. Grau, Claris, 72, Barcelona. Prezo: 1 peseto.

Krom la studo pri la popolkanto, korekta kaj interesa, la libreto enhavas naŭ versaĵn tradukojn kaj melodiojn, kiuj agrable sonas. Ni esperas ke

la esperantista mondo kun plezuro akceptos la belan verketon. Nian plej koran gratulon al la verkintoj. — SALJO

LA ANGELUSO. — Poezio de H. Lapaire esperantigita de F. de Ménil Muzikverkisto: F. Fourdrain. — Prezo: 2 fr. — Deiss Greetin, — 31 rue Meslay, Paris.

Ĝi estas majstra verko.

Kiam ni aŭskultas ĝiajn revajn notojn, nia spirito supreniras momente el la terspaco. Kaptas nian animon revo pri la sunsubiro kaj en tiuj momentoj ŝajnas ke la tuta naturo moviĝas unusone.

Estas rimarkindaj ĝiaj treege simplaj akordoj tra kies simpleco la muzikverkisto divenis la ĝustan melodion por sentigi tiel grandan emocion ĉe la aŭskultantoj. — P. C.



Tra la gazetaro

Heroldo de Esperanto. — Atentinda estas la numero de la 17^a de la lasta junio, enhavanta du notojn, unu agrablan kaj malagrablan la alian. — La unua. — *La malvera eminentulo*, bela sprita rakonto, verkita de Kristano Mallerta, pentranta la fanfaronulojn sin mem igantajn Eminentuloj. Per facila, simpla, agrabla stilo oni pentras en ĝi, ironie, la agadon de tiaj homoj kiuj sentante sin pli esperantistoj ol la ceteraj, nur laboras je la malebligado de Esperanto. Oni rekomendas al vi, amataj legantoj, ĝian tre atentan legadon kaj eltiru el ĝi la konsekvencon. — Jen la dua: Oni legas en la unua kolono de la lasta paĝo. — *La aliaj*. — «Malgraŭ la protesto de kelkaj legantoj, ni opinias utile, de tempo al tempo, raporti ankaŭ pri la aliaj mondlingvaj projektoj. Rigardante la *diversecon* de la *teoriaj* projektoj, oni des pli sentas la neceson de *unueco* en la *praktika* mondlingva movado, kiu koncentriĝos je Esperanto. Kio koncernas la *perfektecon* de *Ido*, kiu el ĉiuj projektoj faras plej grandan klopodon por krevi la *unuecon*... k. t. p....». Sinsekve de ĉi tio, oni aldonas *bibliografion* pri la diversaj gazetoj kaj revuoj de tiuj lingvo-projektoj. Bedaŭrinde, ni devas atentigi «Heroldo de Esperanto» ke en ĉio tio-ĉi kuŝas granda danĝero por nia lingvo. Per la perioda publikigo de sciigoj rilatantaj la agadon de niaj kontraŭuloj, kion gajnos Esperanto krom la disvastigado de malagrablaĵoj inter la esperantistaro kiujn ni ĉiuj devas malatenti? Des pli ĉar ŝajnas tiu metodo pligravigi ilin anstataŭ malestimi kaj kontraŭstari ilin. Dank' al Dio, ni katalunoj malatentis tiajn insidojn neniam deflankigante de la rekta vojo difinita de nia tre kara Majstro en lia Fundamento kaj Regularo, tial en nia kampo ne prosperis la ĝermo de tia malbona grajno. Kian utilon alportas al nia movado, tia afero? Nenian, do, flanken lasu ĝin. — ISTO.

Bulteno. Monata Eldono de la Antverpena por Esperanto Propaganda Komitato, de la pasinta Julio. — Okaze de la 1^a datreveno de ĝia starigo, solene oni festis per gaja kaj fratiga ekskurso al Hemixem, kaj la mem *Bulteno* por solenigi sian fondiĝdaton ankaŭ aperis tute nova, tute feste-vestita. Antaŭ tia manifestacio de reviglo, de mem konfido, de kuraĝo, ni nepre ne povas ne gratuli ĝiajn fondintojn kaj Subtenantojn; sed, ne nur pro tio antaŭe menciita, estas nia gratulo, ankaŭ pro la novaĵo aperigita en ĝin, jen tia: «*Nia Skabeno pri Publika Instruado.* — S-ro K. Huysmans, kiu estas tre fervora al nia movado kaj kiu enkondukis Esperanton en la oficialajn vesperkursojn estas vokita al la alta posteno de Ministro pri Sciencaj kaj Belaj Artoj. La A. P. P. K. gratulas lin, esprimante la deziron, ke li baldaŭ enkondukos ĝin en ĉiujn gradojn de la Publika Instruado». Ni ankaŭ partoprenas tiun ĝojon kaj gratulas korege la antverpenajn samcelanojn, ĉar, bedaŭrinde, ne en ĉiulandaj registaroj, ni esperantistoj, havas tiajn amikojn.

* * *

Por publikigo en nia gazeto, ni ricevis en nia Redakcio, du gravajn komunikaĵojn; unu el la Redakcio de «Heroldo de Esperanto» kaj el la Direktantaro de la Aŭstria Esperanto-Delegitaro, la alian. — Ambaŭ komunikaĵoj rilatiĝantaj inter si, pritrktas aferon tro delikatan por ilia publikigo en gazetoj aŭ ĵurnaloj; aferon, laŭ nia opinio, pli malhelpantan la esperantistan movadon ol plibonigantan ĝin, ĉar tia publikigo kondukos al malordo anstataŭ al la konkordo kiu devas ĉiam regi niajn agojn. Tial do, por nia sankta afero, ni ne publikigos tiajn komunikaĵojn, konsilante al la interresuloj ke ili mem pritraktu harmonie kaj amike, sed tute ne publike, tian delikatan aferon.

ISTO



H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn.; sed valoras
multe.

Angel Valdepeñas

Sastre - Tajloro

Pelayo, 6, pral

BARCELONA

Vestits i abrics de tota mena a mi-
da per a home, des de 130 ptes.,
a 175 ptes. els de millor qualitat.

Bon tracte

Bon treball

ESPERANTO UZATA

Pelayo, 6, pral.

BARCELONA

Nota. Als esperantistes, 10 per cent de
descompte.

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO

OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj dolaroj

aŭ egalvaloro efektivegebla en Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoncon, rajtos similan pri si,
por kio bonvolu sendi tekston publikigotan.

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Isidre Torrents

Les llengües internacionals “naturals”

Lord Grey en el seu llibre suara editat «Twenty Five Years (Vint-i-cinc Anys) 1892-916, dóna curiosos detalls de dificultats lingüístiques en les conferències diplomàtiques de París: Mr. Asquith, Mr. Lloyd George i ell hagueren d'anar a una d'aquelles conferències, en la qual calia emprar el francès. — Asquith no *volgué*, Lloyd George no *pogué*, ell (Grey), doncs, *hagué* de parlar en francès, malgrat del seu accent estrany, vocabulari limitat i gramàtica deficient». Quan el Consell fou acabat, i tots havien sortit, Lloyd George va dir a Lord Grey: «El vostre francès ha estat l'únic francès que he pogut comprendre».

LES UTOPIES D'AHIR

No perquè una cosa no hagi estat realitzada és utòpica. O bé caldrà dir que tot projecte d'innovació és utòpic. D'altra banda, el nom d'utopia sovint amaga la manca d'informació. Ara fa cent anys una doctíssima Acadèmica del Continent declarava impossible — per raons científiques, no per apriorismes — la tracció a vapor... quan a Anglaterra ja esbufegaven les locomotores.

LL. NICOLAU D'OLWER

De nia proksima numero,

KATALUNA ESPERANTISTO,

krom literaturaj verkaĵoj premiitaj, publikigos tre interesan kaj
profundan studon de

P. S T O J A N,

la eminenta Universitata profesoro pri Esperanto dum la
Ĝeneva Kongreso, pri la

PRINCIPOJ DE ESPERANTO

Por akuratigo de KORESPONDAĴO al nia Federacio kaj al nia
gazeto, bonvolu ĝin sendi al la jena adreso:

Carrer València, núm. 245 — Barcelona

Bonvole akceptos bonajn elkatalunajn enesperantajn verka-
ĵojn, la jenaj esperantaj gazetoj:

«**Amerika Esperantisto**», 507 Pierce Building, Copley Square,
Boston 17, (U. S. A.).

«**Belga Esperantisto**». 11 Hondstraat, *Antwerpen (Belgica).*

«**La Progreso**», Socharská, 333. *Praha VII (Txecoslovàquia).*



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas guto*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Pro... kaj Por...

MULTAJ ANEKDOTAJ ARGUMENTOJ DE PERSONOJ

Eminenta esperantisto proponas kaj eĉ ofertas por granda projekto favora al Esperanto, ĉu pri vortaro, aŭ propagando; li petas monrimedojn aŭ helplaboron: se li sukcesos, Esperanto estas kaj estos perfekta; se li ne ricevos sufiĉe da mono, kunlaboro aŭ laŭdo, iu ajn lingvistado por alia internacia lingvo prezentas pli bonan solvon ol Esperanto, ĉar pro neniu alia internacia lingvo, eĉ nur imaga, li ankoraŭ malsukcesis. Ankaŭ eminenta patrioto kiu atingis malsukceson pro sia patrujo kredas *ĝin* kulpa, ne *sin*. Kaj, kompreneble, li ne kredas kulpa alian landon en kiu aŭ pro kiu *li* ne havis okazon malsukcesi. Lingvo, lando, profesio, familio k. t. a. estas ĉiam kulpaj laŭ tiuj malgeniaj homoj kiuj volas *sin* kredi superaj. Tiel facila kaj dolĉa estas tiu kredado!

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

DU UNIVERSALAJ ARGUMENTOJ DE ESPERANTO

Praktike, lingve pruviĝis Esperanto la vera, la granda solvo, eltrovo, ellaboro, orĝinalo de Zamenhof. Dank'al la verko de la Majstro estas faritaj jam multaj lingvostudoj, el kiuj plej sprita kaj profunda estas tiu de Prof. Lingva Konsilisto Dro. log. kaj prec., Hans Wurstly-Arlequin, membro de A. Ĉ. O., A. D. O., A. Ĵ. O., A. N. O., A. R. O., Ĉ. J. O., E. B. L. O., ktp., klarigita de «La Orienta Revuo» el Tokio, aŭgusto 1925, subnomita «La Revuo Oriĝonta» por tiu numero. La granda eraro de multegaj homoj estas ke ili kulpigas aferojn anstataŭ siĝ, post malsukceso propra. La granda eraro de la aŭtoroj de tiuj lingvostudoj, estas ke ili sĝn kredas ne malpli ol geniaj kreintoj de la internacia lingvo. Kaj erarego de multaj esperantistoj estas timi ilin tiaj. Ni kaj ili povas ja vidi la universalan argumenton de Esperanto: ke praktike, lingve, la originalo de la Majstro pruviĝis la solvo.

Kaj, plie, kies lingvostudo havas la animon? La interna ideo naskiĝis kun Esperanto kaj Esperanto kun la interna ideo! Eĉ la «naturaj» lingvoj naskiĝis kun propra animo kaj dekadencas kaj mortas kiam dekadencas kaj mortas la propra animo. La interna ideo de Esperanto, t. e., la animo, la vivo, estas la alia universalaj argumento de Esperanto.

Kial ni timus?

Ĉiuj antaŭjuĝoj de lingvistoj kontraŭ Esperanto: ke la popoloj de malsamaj lingvoj komprenos kaj uzos internacian lingvon malsame, evidentiĝis senveraj, falsaj.

Ni simple bone komprenu ke ĉiuj aŭtoroj de lingvostudoj faritaj ĉu pro spontana esploreto ĉu pro iu ajn anekdoto, estas aŭtoroj de monografioj, kelkaj eĉ tre bonaj, pri internacia lingvo faritaj dank' al Esperanto. Kaj ni konsciu ankaŭ ke niaj nur Lingvaj Institucioj rajtas pridiskuti kaj voĉdoni pri iu ajn lingva temo el iu ajn deveno, rilata al la internacia lingvo. Imponaj estu la du Universalaj argumentoj de Esperanto, kontraŭ ĉiuj anekdotaj argumentoj personaj.

FONETIKO KAJ GRAMATIKO

Mi estas certa ke neniam konfuziĝos fonetike *jen* kaj *ien*, ekz. Sed pro sama rezono mi ne estas certa ke ĉiam estos fonetike samvaloraj *ie* ĉe maniero (vojo, metodo) kaj ĉe filozofio, ekz. — Kial? — Plej multaj lingvoj en kiuj estas la vorto *maniero* havas por ties *ie* nur *e*. Kaj eĉ la franca, kies estas la formo *maniero*, diftongigas tiun *ie*. La «natura» internacia influo por tiu diftongigo estas fortega. Eĉ ŝajnas al tiu kiu volas dusilabigi *ie* ĉe *mani-ero*, ke li pensigas al aŭskultanto, pri kunmeto de radikoj *mani(o)* kaj sufikso *er(o)*. Kontraŭe, sentigas klarigon pri la vera senco de *filozofio*, dusilabigo de ĝia *ie*.

Estas kelkaj fonetikaj aferoj kiel tiu, kiujn devas konsideri kaj almenaŭ prikonsili al la esperantistaro Komisiono pri Fonetiko el niaj Lingvaj Institucioj, ĉu por subteni bonan evoluon ĉu por eviti malbonan.

La precizigo kaj gvido de la *praktika* uzo de la prepozicioj ankaŭ prezentas tre interesan temon al la Komisiono pri Gramatiko.

Niaj aŭtoroj kaj oratoroj ja malvolvas la lingvon, kaj precipe ili devas tiun taskon plenumi. Niaj Lingvaj Institucioj kun fakaj Komisionoj devas subteni kaj instrui la bonan malvolvadon de Esperanto. La gramatikistoj kaj instruistoj de la internacia lingvo, ĉefe la aŭtoroj de lernolibroj, devas konscii la gravecon ke ili perfekte akordiĝu kun la decidoj de la Akademio.

TRANSLIMA PROCEDO

Ni do konsideras translima procedon de alia ajn esperantista societo aŭ korporacio decidi aŭ voĉdoni pri iu ajn lingva temo. Ĝis nun ni scias pri U. E. A. kaj S. A. T., ke ili alvenis tiun translimon. Tiu fakto kiu estas *principe* grava, efektive, ĝis nun, ne havigis al la esperantistaro gravajn rezultojn, sed oni devas pripensi la danĝerojn de tia procedo, kaj ni vidas tro riska ĝian principon en la Moralo de Esperantujo.

Ni opinias ke gazeto, precipe internacia gazeto, ne devas malakcepti ĉian vorton, en verkaĵo de responda aŭtoro, tial ke ĝi ne estas en la Oficiala Vortaro, sed ankaŭ esperanta gazeto, ĉu

nacia aŭ internacia, tute ne devas *sistemuzi* eĉ plej malgrandan reformon.

La ellaborejo por oficiala kaj sistema lingvo estu nur niaj Oficialaj Lingvaj Institucioj. Ĉiuj kleruloj alfluigu lingvan lumon kaj lingvan materialon al la komuna ellaborejo, kaj de ĝi defluu pura definitiva lingva riĉeco.

Sed dume ni ne forgesu ke ĉiam la *kreado* de lingvo elvenis ĉefe de *geniaj verkistoj*. Filologoj, lingvistoj estis ĉiam efektive reguligistoj kaj klarigistoj de lingva *kreitaĵo*. Zamenhof *estas la kreinto* de la lingvo internacia, ĉar li ĝenie sentis la lingvan internacion, kaj li estis genia verkisto.

Geniaj verkistoj kaj esperanta popolo povas ankoraŭ senfine malvolvi la verkon de la Majstro.

Devojiĝo povas sekviĝi nur propran falon aŭ pereon, kaj perdon de semo, pli ĝuste, eble, de planto.

Neniu devojiĝu! 1926 alportu forton kaj saĝon al la Esperantistaro.

DELFI DALMAU

Je l' nova jaro

La jar' malnova agonias
simila al maljuna vir':
el lia brust' baldaŭ forflugos
malforta lia lasta spir'.
Ni ĝoje enterigos lin
kun nuda nun la kalendaro; —
ĉe l' pordo ŝtelatendas jam
la nova jaro!

Ve! ofte dum l' antaŭa jaro
abunde sangis nia kor';
ni ĉiam vane luktis kontraŭ
mizero, malfeliĉ', dolor' ...
Sed ĉion ni forgesu nun
ĉe plena glaso da nektaro:
ekkantu ni honore de
la nova jaro!

Ankoraŭ vivas la mensogo
kaj estas homo ofte sklav',
ankoraŭ grumbas la militoj:
ne ekaperas jam la Sav'.
Sed kvazaŭ dia la Mesi'
alportas jen al la homaro
esperon novan je l' estont'
la nova jaro!

Samideanoj ĉiulandaj,
kunligas nin la sama cel':
la nova jaro nin retrovos
sub la standardo kun la stel'.
Antaŭen ĉiam iru ni,
nin ne haltigu tempa baro:
promesas novajn venkojn ja
la nova jaro!

JAN VAN SHOOR

Mia naskiĝurbo kaj ĝia foirplaco

Ĝis nun mi diris al vi nenion pri la urbo en kiu mi naskiĝis kaj vivadis ĝis mia deksepa jaraĝo. Mi ne donos al vi ĝian nomon, tio estas ne necesa; mi povus doni al vi multajn nomojn el la centoj, kiuj ekzistas kaj estas tre similaj al la mia pri kiu mi rakontas, sed ĝuste pro tio mi ne povas fari elekton, nek volas menciigi eĉ la mian, unu similas la alian kiel dunaskitaj infanoj. Se mi mem ne naskiĝis en ĉiuj, aliaj samsortanoj naskiĝis en ili, vivadis en ili, elkreskis kaj ricevis sian edukon en ili, edziĝis, revis, disreviĝis, ekzistadis kaj mortis en ili. Do se mi rakontos kaj priskribos unu sennoman el ili ĝi servos kiel priskribo de ĉiuj.

Mia urbo lokiĝis en la centro la (a) — permesita zono — kiu estas bone konata. En la mezo de tiu benata angulo de la tero, kie miaj fratoj la Izraelidoj estas la plimulto inter la enloĝantoj de ĉiu urbeto; tial ĝi estis konata inter la hebreoj kiel — Hebrea urbo —. Tie la hebreoj loĝas kunigitaj kaj kunpremitaj kiel sardeloj, kaj fruktiĝas kaj plimultiĝas kiel homaj estaĵoj. Ĝi kondukis kvazaŭ apartaĵo de la tuta cetera mondo kaj ekzistadis jam delonge kvazaŭ en songanta stato. Ŝajnis ke ĝi havis nenian rilaton kun la cetera mondo ĉirkaŭanta ĝin kun la bruo kaj ekscito konataj per la nomo progreso, civilizo kaj similaj antaŭenaĵoj. Estas vere ke de tempo al tempo tiu aŭ alia enloĝanto devis veturi al la apuda granda urbo por fari aĉetaĵojn por la butikoj, sed dank' al Dio, krom komercaĵoj ili enkondukis nenion alian el tiu granda urbo.

Se vi volas bone konatiĝi kun mia urbeto, malproksimiĝu de ĝi ioman distancon, tiam vi vidos ĝin entute kiel ĝi estas. De distanco mia urbeto ekaperos al vi en ĝia tuta beleco kaj ĉarmo. Montetoj ĉirkaŭas ĝin, kaj starante sur unu el tiuj vi vidos ke la domoj estas malgrandaj, malaltaj kaj malkomfortaj. Ili aspektas kiel malnovaj tomboŝtonoj sur antikva tombejo. Tomboŝtonoj malrektaj, kurbitaj kaj nigriĝintaj sur kiuj kreskas musko pro antikveco. Kiel ĉiuj aliaj similaj urbetoj ĝi enhavas la konatajn ĉefajn konstruaĵojn; kristanan preĝejon kun piroforma longa turo finiĝanta per kruco, apud la preĝejo simpla pastra domo staras kun lernejo, kaj la urbdomo troviĝas en la mezo de la foir-placo. Ĝi ankaŭ enhavis Sinagogon, Besmidraŝon (b) kaj apude la ŝvitbanejon kun la «Mikva» (c). Tiuj tri lastaj kons-

(a) «Permesita Zono.» Dum la Caraj tagoj en Rusujo kaj la Pola parto de Rusujo ekzistis distriktoj kie la Hebreoj ne estis permesataj loĝi, la aliaj distriktoj estis konataj kiel «Permesataj Zonoj.»

(b) «Besmidraŝ» Hebrea vorto por la preĝejo hebrea kiu estas uzata ne nur por preĝi en ĝi sed ankaŭ por sidi tie kaj studi la talmudon kaj la aliajn bibliajn komentariojn. En tio ĝi diferenciĝas de Sinagogo kiu estas nur por preĝoj.

(c) «Mikva» Banejo speciale aranĝita laŭ certaj leĝaj reguloj. Kutime ĝi troviĝas en la sama domo kie lokiĝas la ŝvitbanejo, sed en aparta ĉambro.

truajoj staris en la strato kiu kondukas al la hebrea tombejo, kaj je sufiĉe longa distanco de la kristana preĝejo. La ŝvitbanejo kaj la Mikva, kvankam starigitaj ekskluzive per la mono el la poŝoj de la hebreeoj, estis multe uzitaj de la nehebreaaj enloĝantoj de la urbeto.

Banĉambroj en la hejmoj de miaj samurbanoj estis afero nekonata, kaj la ŝvitbanejo kun la Mikva ludas gravan rolon ĉe la hebreaaj enloĝantoj, ne nur sekularan sed religian. La Mikva tute aparte havas rilatojn kun certaj intimaj sentoj de la familia vivo. Neniu hebredo povas esti naskita en nia urbeto sen interveno de la Mikva... Ĉiuj fianĉinoj nepre devas viziti ĝin la tagon antaŭ la edziĝo... kaj ĉiu edziniginta hebreno periode devas viziti ĝin... La «Animo-cetera» (a) de sabato kaj festotagoj ne estis sentitaj de miaj hebreaaj samurbanoj, se ili ne faris viziton al la banejo kaj la Mikva. Do la vendredaj kaj aliaj antaŭfestaj tagoj estis la plej aktivaj tagoj en tiu instituto. Tiam la hebreeoj sen escepto kutimis veni post la longa semajna laboro, por sin purigi de la semajntagaj koto kaj malpuraĵo. Ili eniris tien kiel en sian propran patrolandon, kie ĉiu povas atingi la saman ŝtupon, supreniri la plej supran benkon, kaj vivigi sian mizeran animon almenaŭ por unu horo, kaj forĵeti la pakajon da zorgoj kaj doloroj, kiuj ĉirkaŭis lin dum la semajno kaj ebenigi siajn lacajn ostojn. Tie oni ne povis rekoni la diferencon inter diversaj rangoj kaj klasoj, riĉuloj kaj senhavuloj. Ĉiuj staris antaŭ la mirinda vaporo en benata egaleco. Tiujn tagojn ankaŭ utiligis la nehebreaaj enloĝantoj por viziti la ŝvitbanejon, kaj tie interne flanke ĉe flanke ĉiuj varmigiĝis sur la benkoj, ŝvitis, sin batis per la specialaj balailoj kaj sin sapumis de kapo ĝis piedoj. Ĉiuj eliris el la ŝvitejo kontentaj, puraj kaj pretaj por la aliaj sep tagoj de laboro.

Sed mi devas reveni al mia ĝenerala priskribo de la urbeto. Enrigardante internen de la monteto sur kiu vi staras, ne serĉu en ĝi stratojn; kiam nia urbeto estis konstruita oni ne uzis arkitekturan mezurilon kaj cirklon, kaj oni lasis malmulte da spaco inter la domoj. Tio jam estis la kutimo de la prapatroj de la urbo, kie ajn oni trovis spacon oni konstruis sur ĝin. Spacoj ĉi ekzistas por okupiĝo ne por alrigardo kaj ĝuo. Spite la senordo de la stratoj tamen, la enloĝantoj facile povis trovi siajn hejmojn eĉ en la mallumo de la nokto kun siaj edzinoj kaj infanoj, kiel la birdoj kiuj trovas siajn nestojn eĉ sen strataj lampoj.

La komenco de nia urbeto estis, tiel mi ĉiam imagis, en tiu flanko de la urbeto kie sin trovis la vojo kondukanta al la fervoja stacidomo; la stacidomo mem staris ĉirkaŭ duhora piediro for de la urbeto, kaj ĉiuj aliaj flankoj estis al mi nur finiĝoj de la urbeto. Mi diras finiĝoj, ĉar dum mia vivo tie ĝi neniam kreskis eksteren, la samaj stratoj kaj la samaj dometoj restis kiel ĉiam: Enveturante en la urbon per tiu vojo, oni ekvidis unue la preĝe-

(a) «Talmudo». Antikvaj parte hebreaaj kaj parte Arameaj hebreaaj libroj. Ili enhavas grandan diversecon de herbaj legoj, feaj rakontoj, fantaziaj rakontoj, vortoj de saĝeco kaj konsilo por la ĉiutaga vivo k. t. p.

jon kun la turo kaj la kruco, iom poste la dometon kie loĝis la barbisto — ĝi estis tre videbla pro ĝia longa stango kaj la du kupraj pladoj — kaj poste la urbdomon sur la foirplaco.

LA FOIR-PLACO

Dum la nefoiraj tagoj la placo estis sufiĉe malplena, escepte la frukto kaj vegetaĵ-vendistoj, oni vidis nenion sur ĝi. Tiuj vendistoj estis maljunaj virinoj, kiuj sidis sur benketoj la tutan tagon kaj atendis la maloftajn klientojn. Antaŭ ili staris trogoj plenaj da fruktaĵo kaj vegetaĵo dum la somero, kaj dum la vintro, terpomoj, sekaj faboj kaj nuksoj.

Ĉi tiun placon oni vere povis nomi la koro de nia urbeto, ĝi estis la vivcentro kiu ekbatis subite ĉiun jaŭdon kiam estis la oficiala foira tago. Tiam oni povas vidi grandan movadon en ĝi. Amaso da popolo sin trovis tiam sur ĝi. Kamparanoj kun siaj veturiloj ĉirkaŭstaris ĉie ajn, interplektitaj kaj intermiksitaj. Hebreoj kaj hebreinoj puŝiĝis kun la ĉevaloj, la radoj kaj la direktilstangoj de la veturiloj. Ĉiuj penis aĉeti la produktojn de la kamparanoj; kokinoj, anseroj, ovoĵ, butero, bulboj kaj terpomoj. Ĉiuj pinĉis la kompatindajn anserojn kaj kokinojn, palpis la terpomojn, prenis peceton de la butero per la fingro kaj gustumis, faris ofertojn, foriris kaj revenis kaj aĉetis.

Ĉi-tie kaj tie staris budoj, tabloj kaj benkoj sur kiuj sin trovis la ŝvit-laboro de la urbaj metiistoj: Botoj, ŝuoj, pantalonoj, koloritaj tukoj kaj ŝtofoj, jakoj, surtutoj kaj ornamitaj juvelaroj. Pingloj, broĉoj, koraloj, kudriloj kaj kotonfadenoj. La placon ĉirkaŭis la domoj kun la butikoj en kiuj vendiĝis ankaŭ la suprenomitaj artikoloj, kaj la kamparanoj, post vendo de siaj produktoj, ĉirkaŭiris de unu tablo al alia, de unu budo al alia, de unu butikoj al alia, marĉandis, manfrapis, salutis, faris prezojn kaj malrapide aĉetis. Poŝtelistoj vestitaj en komparanaj vestoj sin intermiksas en la amaso, kaj de tempo al tempo oni ekaŭdis laŭtan ekkrion de iu kamparanino — «Je Dio! mi estas priŝtelita!» Kaj ve al tiu ŝtelisto kiu estis kaptita. La kamparanoj fariĝis la juĝistoj, uzis siajn pugnojn, vipojn kaj bastonojn ĝis kiam la unu sola policano en la urbo alvenis kaj savis la ŝteliston de frua morto, arestigis lin kaj ĉio fariĝis kiel antaŭe.

Tie en angulo oni vidis homon kun kesto, kiun li antaŭ momento starigis sur disfalditan dupiedon. Junuloj kaj kamparanoj pagas po malgrandaj moneroj kaj enrigardas en la truon de la kesto, kaj la homo turnas manilon kaj deklamas:

— «Tio estas la granda urbo London. Tie-ĉi preterrajdas surĉevalo lia moŝto la Papo kun Ruĝaj pantalonoj kaj ĉiuj staras antaŭ li senĉapele. Nun vi vidas kiel Napoleono kun siaj francaj soldatoj batalas kontraŭ la Prusoj kaj la Prusoj forkuras kiel ratoj — Ha, ha, ha! ekridas la enrigardantoj — Jen la turka Sultano rajdas en Kaleŝo, la kvar ĉevaloj timiĝis, suprenturnis la kaleŝon kaj la sultano elŝutiĝis el la kaleŝo. Nu sufiĉas jam por via mono! permesu ke aliaj aliru kaj vidu la mirindajn vidindaĵojn!» —

Antaŭ la butikoj staras knabinoj kaj virinoj, ili envokas la kamparanojn en la butikojn per ĉiuspecaj allogaĵoj. Kaptas ilin ĉe la manikoj kaj entiras ilin internen. Hebreaj portistoj kun pezaj ŝarĝoj sur siaj dorsoj kaj kurbitaĵ preskaŭ duone malsupren, penegas elŝoviĝi el la amaso por forpreni la pakaĵojn kaj reveni por aliaj. Hodiaŭ estas ankaŭ ilia rikolta tago.

Tiel bruas, zumas kaj bolas la foir-placo la tutan tagon de la foiro. La suno komencas subiĝi, kamparanoj aljungas siajn ĉevalojn al la veturiloj, enpakas la aĉetaĵojn, kaj unu post alia forlasas la placon kaj la urbon. Ĉio fariĝas kvieti kiel antaŭe, kaj restas tiel ĝis la proksima jaŭdo. Dumtempe la butikoj malpleniĝis, ĝiaj estroj kalkulas la monon, kontrolas la restintan provizon de la komercaĵo kaj komencas prepari por vojaĝo al la apuda granda urbo por fari novan aĉetaĵon por la proksima foira tago.

Tiun tagon de la foiro mi ĉiam antaŭrigardis kun avido. Mi ne iris al la lernejo en tiu tago, ĉar mi devis helpi al mia patrino en la butiko, faris pakajojn, kuris al la najbaroj por pruntepreni artikolojn kiuj mankis al ni por vendo, kaj plejĉefe, mi devis atente alrigardi la klientojn ke ili ne ŝtelu dum la marĉandado. Tiuj foirtagoj estis al mi tre utilaj. En ili mi lernis la lingvon de la kamparanoj, kiuj ne povis paroli la hebrean lingvon, kaj ankaŭ lernis la arton de komerco, aŭ pli bone diri de marĉando.

Du gravaj objektoj ekzistis en mia urbeto vivo. Ili estis la plej ĉefaj aferoj en la vivo de miaj samurbanoj. Unu dependis de la alia; estis la Sabata tago kaj la foira placo. De la foira placo dependis la tuta ekzistado de miaj samurbanoj, sed estis nur por la sabat-tago ke la foirplaco entute devis ekzisti.

Se iu per magia bastono, aŭ miraklo, povus forigi aŭ elviŝi la sanktan sabaton el la vivo de nia urbeto, samtempe ankaŭ estus malaperinta la graveco de la foira placo. Ĉiu hebreo en mia urbeto nur laboris la tutan semajnon por gajni tion kion li bezonis por sabato. Ĉiuhore, ĉiutage la vorto — Sabat — estis sur iliaj lipoj. «Oni ja devas perlabori por sabato» diris ĉiu hebreo, kiam li kontente rakontis al sia amiko pri iu profitiga negoco.

Oni diras pri la angla mezklasa laboristo ke li laboras la tutan jaron por havigi al si la monrimedojn, por libertempi unu aŭ du semajnojn dum somero ĉe la marbordo. La hebreoj en mia urbeto faris same dum ĉiu semajno. Ilia celo estis havigi monrimedojn por festi la sabattagon. Ili malsatis la tutan semajnon, manĝis sekan panon kun peceto de nekuirita bulbo entrempita en salo, aŭ kelkajn boligatajn bulbojn, kio ajn sufiĉis por kunteni la korpon kaj la animon. La celo estis prepari ion bongustan por sabato. Tiam oni nepre devas havi decan manĝotablon. Blankajn plektitajn panojn, fiŝon kaj viandon.

Sabattagaj himnoj promesas al la Hebreo bonegan estontecon en la venonta mondo, se ili bone manĝas en sabato kaj dividas sian manĝaĵon kun la malriĉaj hebreoj kiuj posedas nenion.

« — Per bona manĝo, bona trinko
Per multfrandaĵoj, gastameco,

Estonton bonan vi atingos,
Ĉe l' ven' de l' tag' en viv' venonta.» —

kantas la hebreo ĉiu sabattage dum la manĝo.

Tuj post la fermo de la butikoj post la foirtago, komenciĝis la sabat-preparo. Ĉiu domo en la urbo, laŭ ĝia ebleco kaj bonhavo, fariĝis bakejo kaj kuirejo. Oni bakis, kuiris, purigis la ĉambrojn, lavis la infanojn kaj la ĉolajojn. Sabato estis grandioza afero por miaj samurbanoj kaj ludis gravegan rolon en la vivo, tial oni bezonis la butikojn, la kamparanojn kaj la foiran placon.

LA FIANĈINO SABATO

«Pro honoro de Dio. Pro honoro de Liaj ordonoj.
Pro la anĉata sankta Sabato, mi bruligas la sanktigitajn kandelojn».

(El preĝo kiun diras hebrea virino ĉe
bruligo de la kandeloj vendredon vespere,
antaŭ la sunsubiĝo)

La plej agrablaj horoj en nia hejmo, kiel en ĉiu ortodoksa hebrea hejmo, ĉiam estis la dudekkvar horoj de sabato, kiu daŭras inter la sunsubiro de vendredo kaj sabato vespere. Ĉiu hebreo, laŭ tradicio, posedas du animojn. Unu estas la kutima animo ĉiutaga, la dua estas, kiun la talmudo nomas — La animo cetera —. Ĝi eniras en la hebrean korpon vendredon vespere kaj forlasas ĝin sabaton vespere post la finiĝo de sabato. Tiu animo estas unu el la plej sanigaj balzamoj, kiun oni povas donaci al iu malfeliĉulo, malsaniganta spirite, kuraĝe, poŝe aŭ humore. Mia patro, kiel ĉiu alia hebreo en nia urbo, ricevis kun la alveno de sabato ne nur novan animon, sed novan spiriton, novan vivon. Ne gravis kiom ajn estis liaj ĉagrenoj dum la semajno; kaj tiuj ne mankis al li; tuj kiam la sabato komenciĝis ĉio estis forgesita. Vera transformiĝo okazis en lia tuta sinteno je la alveno de tiu nova animo cetera. Mi oft evidis lin baraktantan kun diversaj sortoj de la ĉiutaga vivo dum la semajno, sed dum sabato li estis tute serena kaj feliĉa, kaj kun li ni, liaj infanoj. La mirinda por-sabata animo faris miraklon por la fianĉo de sabato.

La fama Germana Poeto Heine, kiu pro sia juda deveno versaĵne mem spertis en sia juneco la ekstazon de sabato, ĝuste priskribas la spiriton de tiu transformiĝo en sia poeziaĵo: —

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

PRINCINO SABATO

En araba fabel-libro
vidas mi sorĉitajn princojn,
kiuj ofte la antaŭajn
belaspektojn reakiras.

Jen la harkovrita monstro
refariĝas Reĝo-ido;
ornamriĉe brilvestita,
enamige fluton blovas.

Sed subite flugas for la
sorĉa tempo, kaj ni vidas
lian reĝan princo-moŝton,
kiel aĉigitan monstron.

Pri reĝid' de tia sorto
kantas mia kant'. Izrael
li nomiĝas. Sorĉodiro
lin al hund' aliformigis.

Hund' kun hundaj pensoj, li la
tutsemajnon sklave vagas
tra la nokt' kaj sterk' de l' vivo;
Mokobjekto de l' stratbuboj.

Sed vendred-vesperon ĉiun,
en krepuska hor', subite
iras for sorĉaj' kaj hundo
iĝas hom-estaj' denove.

Hom-estaj' kun homaj sentoj,
kun levita kap' kaj koro,
feste, pure privestita,
paŝas li en patran halon.

«Mi salutas Hal' amata!
De Reĝpatro mia. Tend' de
Jakob, viajn enirfostojn
sanktajn, buŝo mia kisas».

Kiaj benataj horoj estas tiuj dudek kvar horoj de sabato sankta por mult-miloj da viroj kaj virinoj en la hebrea mondo! Sabato sankta, la fianĉino de ĉiu hebreo!!

(a) «Leĥo daŭdi likras kalo!» —
Iru kara, vin atendas
fianĉino. Ŝi malkovras
la vizaĝon vin akcepti» —

estas parto de la vendreda vespera preĝo en la sinagogo, deklamita de ĉiu kantoro per sia plej ekstaza kaj sonora voĉo. Kiom da junaj koroj eksaltis pro ĝojo ĉe la eĥo de tiuj gajaj melodioj, kiuj kutime akompanas la suprajn kaj la sekvantajn liniojn de tiu preĝo: —

«Renkonti sabaton ĉiuj ni iru,
ĉar ŝi estas fonto de beno.

De la komenco, jam de antaŭe,
ŝi la princino estas kronita.

(a) «Leĥo daŭdi likras kalo» estas la hebreaj vortoj de la teksto, ĝia signifo sekvas en la dua linio kaj poste. Heine uzas ĝin en la originala teksto.

Forskuu la polvon, leviĝu!
Vestiĝu en roboj
de via beleco, mia popolo!»

Kiu povas taksi la valoron de tiu juvelo-Sabato-? Ĝi ornamadas la spiriton kaj la korpon de ĉiu ortodoksa hebreo. Dudek kvar horoj da trankvila kaj benata ripozo de ĉiuspeca zorgado kaj turmento kiuj ĉirkaŭas la tutsemajnan vivon de la hebreo. — «kun la alveno de Sabato alvenas trankvilo kaj ripozo» — estas talmuda maksimo, kiu enradikiĝas en la hebrean koron de ĝia juneco.

Je la sunsubiro vendredon vespere la patrino de la hejmo bruligas la sabat-kandelojn, kiuj staras sur blanka tablotuko en kupraj aŭ arĝentaj ingoj. Ŝi kovras sian vizagon per ambaŭ manoj kaj diras: —

«Benita estu vi mia Dio, Reĝo de l' mondo, kiu sanktigis min per ordonoj, kaj ordonis min bruligi la kandelojn de sabato. Pro honoro de Dio, pro honoro de liaj ordonoj, pro la amata sankta sabato, mi bruligas la sanktajn kandelojn.»—

Ŝi preĝas silente kelkan momenton por la bono de ĉiuj amataj domanoj kaj amikoj, kaj kvazaŭ neĝo degelas en unu momento ĉiuj ĉagrenaj pensoj de la semajno antaŭ la sankta fajro de tiuj sabat-kandeloj. La sankta sabato komenciĝis; oni devas ne plu pensi pri negoco aŭ kiu ajn malspirita afero ĝis la sunsubiĝo sabaton vespere.

La bruligo de la sabat-kandeloj estas laŭ hebrea tradicio grava devo por la virino. La hebrea virino havas la devon iagrade repagi al la homarion, kio estis forrabita de ĝi per la ago de ŝia pra-fratino. Evo estingis la lumon-animan de la homaro per sia instigo al Adam en paradizo, ke li manĝu de la «pomo-de-scio», kies rezulto estis ke la homo fariĝis mortemulo kaj lia animo estingiĝas je l' morto. Tial la hebreino nepre devas bruligi almenaŭ du kandelojn ĉiun vendredon vespere je la komenco de Sabato.

LA BENO DE LA SANKTA SABATO

Kiam la hebreo forlasas la sinagogon vendredon vespere por iri hejmen, du Anĝeloj akompanas lin survoje hejmen. Unu estas bona anĝelo kaj unu malbona anĝelo. Kiam la trio eniras en la domon kaj trovas la kandelojn bruligitaj kaj ĉion preparita en gaja kaj bona ordo. Sur la tablo, pura kaj blanka tablotuko, bongusta manĝaĵo, abundeco kaj serena atmosfero ĉirkaŭe, la bona anĝelo kun ĝojo eldiras; «— Proksiman sabaton estu same — »! — kaj la malbona anĝelo kontraŭvole aldonas «Amen». Se la malo regas en la hejmo, tiam la malbona anĝelo kun malico eldiras; «— Proksiman sabaton estu same!» — kaj la bona anĝelo kontraŭvole aldonas

«Amen». Tial ĉiu hebreo prizorgas ke vendredon vespere regu en la hejmo, paco, trankvilo, sereneco kaj bone preparita manĝotablo.

Eĉ la plej malriĉa hebreo penegas prepari bonajn manĝaĵojn por la sabata tago. — «Ĉu vi jam gajnis por sabato?» — estas kutima demando de unu malriĉa hebreo al alia ĉe ilia renkontiĝo dum la tuta semajno. Kvankam mia patro ne nombris sin inter la riĉuloj, tamen la sabat-manĝaĵo ĉiam estis alloga, pro la freŝaj sabat-ĥaletoj, (a) la kuiritaj fiŝoj kaj la viando kun la «cimos». (b)

«Estas nenia troigo diri, ke ni infanoj kune kun la gepatroj, ekzistadis la tutan semajnon per la antaŭĝuo de tiuj sabataj manĝaĵoj. Kiel ni ĉiuj atendis avide la revenon de la patro el la sinagogo vendredon vespere. Tute trankvile ni toleris ĉiun tiranecon de nia avino vendredon posttagmeze; la sisteman kaj perfektan purigadon de nia hararo per la malgrand-denta kaj delikata kombileto kiun ŝi uzis, kaŭzante per ĝi senfinajn dolorojn, la ĝisfundan ĉirkaŭlavon, kaj ni eĉ staris respektoplenaj kiam la avino, post la bruligo de la sabat-kandeloj, metis siajn manojn sur niajn kapojn kaj laŭ tradicio benis nin; — «Dio vin faru kiel Efraim kaj Menaŝe (c)!» —.

Belaj estis tiuj vendredaj vesperoj. La patro post veno el la sinagogo eniris kun ridetanta mieno, salutis nin per la kutima «Bonan Sabaton!», patrino en sia edziĝa jupo reciprokis per egale ridetanta vizaĝo, kaj la patro tuj komencis tiun komplimentan deklamaĵon (Proverbo Ĉap. 31) — «Virtan virinon kiu trovas, pli multe ol juveloj estas ŝia valoro» — kaj la tutan ĉapitron kiu finiĝas per — «falsa estas la gracio kaj malsaĝaĵo la beleco. Di-timanta virino estas laŭdinda, donu al ŝi la frukton de ŝia mano, kaj ŝiaj faroj estos laŭdataj en la pordegoj de l' urbo» —. Tiun ĉapitron el la proverbo kantas ĉiu hebreo antaŭ la manĝo vendredon vespere. Ĝi estas malgranda kompenso al la edzino, por ŝiaj penoj dum la semajno en la mas-trumado kaj la bona preparado de la sabat-manĝaĵo.

Kun vera ekstazo aŭskultis mia patrino al tiuj eldiroj, sentante en sia koro ke la patro ilin direktis al ŝi, kaj el la deklamo de Kiduŝ, (d) kiam la patro levis la gravuritan argentan pokalon plenan je ruĝa vino kaj eldiris per la agrabla melodio bone konata; —

(a) «Ĥaletoj» estas la hebrea vorto por plektitaj blankaj panoj kiuj ofte estas uzitaj por Sabato.

(b) «Cimos.» Estas postmanĝaĵo; kuiritaj fruktoj, plej ofte sekigita frukto miksisita el prunoj, pomoj kaj piro. La vorto «Cimos» enradikiĝis por tiu manĝaĵo.

(c) «Efraim kaj Menaŝe» estas la du filoj de Jozefo en Egiptujo, kiuj supozeble estis benitaj per beleco, saĝeco kaj ĉio kio estas bona en la mondo.

(d) «Kiduŝ» La bonvena preĝo kiun diras ĉiu hebreo je la komenciĝo de sabato, antaŭ la manĝo vendredon vespere post sia reveno el la Sinagogo.

«Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante». —

Ni infanoj ĝuis la kontentecon kiu regis en la hejmo kaj sur ĉies vizaĝo kun la sama freŝeco ĉiun vendredon vespere, kvazaŭ ĝi estus granda novaĵo.

LA MALGAJA DISIĜO

Antaŭvidante la tutan semajnon kun sopiro la alvenon de la sabato, la hebreo nature disiĝas de tiu bela tago tre malfacile kaj kun granda bedaŭro. Mia patro kutimis sidi ĉe la tablo por la tria manĝo sabaton posttagmeze ĝis tre malfrue nokte. Li ne permesis la bruligon de la lampo, signo de finiĝo de sabato, ĝis kiam oni klare povis vidi en la ĉielo multajn stelojn amasigitajn kune. En la krepusko de ĉiu sabata vespero mia patrino kutimis deklami, ĉiam per la sama melankolia melodio, kiu tamen estis agrabla al niaj oreloj; —

Dio de Abram,
Dio de Izaak,
Dio de Jakob,
Sinjor' de l' ĉiuj mondoj!

La sankta sabato foriras,
Kun ĝi nia ripozo.
Nova semajno alvenas,
Kun ĝi novaj ĉagrenoj.

Nova semajno alportas
Al viaj kompataj infanoj,
Novajn zorgojn,
Novajn timojn.

Tial, estu via volo,
Ke la nov-venant-semajno,
Pordojn de kompat' kaj beno
Por ni ĉiuj tuj malfermu.

Eliohu la profeto,
Prenas la bastonon
En la dekstran manon.
Kaj eldiras benon
Super tutan landon.

Tiel laŭte,
Tiel bele.
Diras^ĝ ĉiuj
Infanetoj;
«Amen kaj Amen»!.

Kaj ni infanoj ripetis post ŝi la vortojn — «Amen kaj Amen!». Eliohu la profeto kiu supreniris ĉielen en fajra kaleŝo trenita per fajraj ĉevaloj, havas apartan lokon en la koro de ĉiu hebreo. Li estas unu el la plej grandaj boneguloj kaj la gardanta anĝelo de ĉiu bona hebreo. Mia patro, patrino kaj mia avino, ĉiuj kredis ke Eliohu la profeto nepre prizorgas nin ĉiujn de la finiĝo de sabato ĝis la fino de la semajno. Se mia patrino iam faris bonan negocon en la butikoj kun iu kamparano nekonata al ŝi, ŝi vere kredis en sia koro ke estis Eliohu la profeto, kiu venis en alivestiĝo de kamparano por tiu celo. «Kiu scias — elĝemis ofte mia patrino — eble Eliohu la profeto venos kaj alportos ion bonan por la venonta semajno». —

Kun tiu forta espero por la nekonata venonta semajno, tamen venis malĝojo ĉe la finiĝo de sabato. Post la supra deklamo la patrino leviĝis malrapide, forprenis la blankan tablotukon kaj bruligis la vakskandelojn, simbolo de malgajo kaj bedaŭro. Baldaŭ poste la patro kun profunda ĝemo plenigis la pokalon el la restinta vino kaj diris la «Havdala» (a) la adiaŭ-preĝo al la fianĉino sabato. Li tenis en sia dekstra mano la pokalon kaj en la maldekstra mano arĝentan ujon plenan je aromajoj kaj spicoj dum la deklamo, kaj tuj post la fino de la deklamo li flaris profunde kaj kore el tiuj aromajoj, eltrinkis la vinon kaj verŝis la lastajn restintajn gutojn sur la tablon, kaj en la gutojn li trempis la brulantajn kandelojn, kiuj post kraketo estingiĝis.

Tiel malaperis la bela tago en aro da ceremonioj kaj ritoj neniam forgesblaj. Heine la fama Germana poeto esprimas la malgajecon de tiu momento kaj ĝian profundan signifon je la fino de sia poeziaĵo «Princino Sabato» jam citita antaŭe; —

Sed la bela tag' forflugas;
Kvazaŭ per ombrecaj kruroj.
Paŝas nun al li malbeno,
Hor' malbona — Princo ĝemas.

Sentas li ekprem' glacia
De sorĉfingro ĉe la koro.
Jam trafluas lin frosttremoj
De la hund-metamorfozo.

(a) «Havdala» estas la adiaŭa preĝo ĉe la finiĝo de sabato.

La princin' al princo donas
 Ujon plenan d' aromaĵo.
 Pense flaras li — ankoraŭ
 Fojon volas sin ĝojigi.

La princin' regalas princon
 Ankaŭ per adiaŭ — trinkaĵo — .
 Rapideme li eltrinkas,
 Nur malmultaj gutoj restas.

Nun la tablon li aspergas,
 Prenas tiam vaksandelon,
 Trempas ĝin en la malsekon,
 Ĝi kraketas, estingiĝas.

J. D. APPLEBAUM

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

La nova organizo de K. E. F. provita en la finiĝanta jaro, pruviĝis sukcesa. Eble unuafoje, en la funkciado plena de nia Federacio, ĝi alvenis la finon de la jaro sendeficite, eĉ doninte la tutan kvanton de nia gazeto po 16 paĝoj po unu monato; eĉ aldoninte eksterordinarajn ilustraĵojn al ĝi. La kotizoj de individuaj kaj asociaj membroj, la memstarigo de la abono por la gazeto, estas bonaj bazoj. Plie, la nova organizo de K. E. F. realigis pli vastan, pli firman ĉirkaŭprenon de nia movado en la Katalunlingva teritorio. Tamen ni ne akurate plenumis la eldonadon de «Kataluna Esperantisto», ĉiumonate, ĉiunumere; tial ni devas peti senkulpigon, malgraŭ ke la kaŭzo de tiu malreguleco estas en la flanko de la presejo, kiun ni pro kelkaj motivoj devas akcepti. Sed novaj cirkonstancoj permesas al ni vidi ke de la nova jaro «Kataluna Esperantisto» aperos regule, ĉiumonate. La elpreso de la *Kataluna Antologio*, kaj la ekonomia stabilo atingita de K. E. F. estas du el tiuj cirkonstancoj.

Mia Fianĉino

ŜI PAROLAS

Dolĉe, milde ŝi parolas
kun arĝenta voĉsonor' ;
kiam ŝia voĉ' petolas,
en ĝi laŭte tintas or' .

Estas ŝia voĉ' kaskado
de sonoroj de kristal' ,
melodia serenado
de mirinda najtingal' .

Sonu ĉiam, voĉ amika,
kun gajec' de sonoril' ,
kun reviga ĉarm' muzika,
kun purec' de birda tril' !

ŜI RIDAS

Ŝia rido ravas min
per gajeco radiantaj;
ŝia kara ĝojinklin'
montras sin per rido kanta.

Kiam sonas ŝia rid' ,
en mi estas ĝoj' intima,
je ŝi kreskas mia fid' ,
mia am' iĝas senlima.

Nu, de ŝia rid' sen ĉes'
fluu ĉiam la torento!
Nova rid' — nova promes'
pri l' feliĉ' de mia sento!

ŜI RIGARDAS

Kiam pasie ŝi rigardas,
fajron ŝi havas en okul' ;
ŝiaj pupiloj ame ardas
ĉar en kor' estas ama brul' .

Pro l' ama ard' , ŝia pupilo
pli luma estas ol ĉiel' ;

min pli ĝojigas ĝia brilo
ol de la tago la lumhel' .

Restu por ĉiam tiaj bruloj
en ŝia korp' plena de am' ...
Ĉiam en ŝiaj fajr-okuloj
brilu de l' am' la dia flam' !

ŜI KARESAS

Estas ebria la plezur'
kiam ŝi dolĉe min karesas;
pliajn feliĉojn ekpromesas
dolĉa kares' ol ama ĵur' .

De la karesoj la murmur'
en intimec' nia ne ĉesas.
Tiam la mondon ni forgesas
kaj vivas nia amo nur.

Min ebrigu la plezuro
de ama ĵuro kaj kares' ;
vibru sen ĉes' kares-murmuro,
en la plezuro de l' forges' !

ŜI AMAS

En la deziro ami ŝin
mi jam de longe min konsumas.
Ĉe ambaŭ ni l' espero lumas:
Fine ni baldaŭ havos nin.

Ŝi amas min, sed tia am'
estas pri am' nur antaŭsento...
Kiam alvenos la momento
bruligi nin en l' ama flam' ?

Nur dum ŝi amos, vivos mi
kun riĉa sent' de vivo forta:
am' ŝia faros min senmorta
kaj tiel pova kiel Di' !

JAUME GRAU CASAS

(El H. Heine)

Vi estas bela, pura,
aminda kiel flor'.
Vin vidi dolĉdoloron
estigas tra la kor'.

Benkovri vian kapon
io devigas min.
Di' gardu tiom bela,
aminda, pura vin!

Trad. E. JUNG

Ĉe Samovaro

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas,
la amikoj ekparolas.

«Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?»

La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan.
«Havi landon, sed perditan...»

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume,
ili ploras... ploras kune.

JULIO BAGHY

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Pro... kaj Por...

Interkorespondado. — Al ni alvenis multaj proponoj kaj petoj por interkorespondado kaj interŝanĝoj. Unu estas tre serioza pri pedagogio. — Kial, anstataŭ privata korespondado la proponinto ne verkas por esp. ĵurnalo aŭ gazeto, t. e. por publiko? Tio instigos aliajn ankaŭ verki pri la sama scienco laŭ la propra lando, kaj li samlabore atingos pli da efiko. Krome, estas adresaroj de interŝanĝuloj, kolektuloj, koresponduloj ktp. — Kial oni por ĉio pafas la delegitojn de U. E. A? Kompreneble la delegito de U. E. A. transdonis la proponon al esp. instruisto. — Sed ĉu tiu respondos? Do por interŝanĝado estas pli efike enskribigi sin en la koncernajn adresarojn, aŭ ilin utili kaj per ili elekti korespondanton aŭ interŝanĝanton, kiu eĉ anoncas sin kun tiu celo.

Mistera fraŭlino

Kiam mi ŝlosis pordon de mia kajuto, proksime en la koridoro ekaŭdiĝis ies paŝoj multepezaj kaj rapidemaj. Returniĝinte, mi ekvidis la vaporŝipestron, kiu rapidis ien, sulkinte la frunton kaj fiksinte antaŭen seriozan rigardon de siaj grizkoloraj okuloj.

— Bonan matenon! — mi diris, ĝuste lia granda, malvigla figuro atingis min.

— Ha! — li ekkriis, haltante por unu momento kaj etendante al mi sian dikan manon. — Ĉu vi jam vekigis? — kaj, jam daŭrigante sian vojon, li aldonis per rapida parolmaniero: — Se vi enuas tie-ĉi pro izoleco, iru supren kun mi!... — kaj malaperis sur la ŝtuparo.

Mi ekkuris post li kaj, malfacile spirante, baldaŭ leviĝis laŭ kruta fera ŝtuparo sur la supran ferdekon de la vaporŝipo, kie estis vidata grandlitera elokventa averto: «Oni malpermesas al privatuloj eniri ĉi-tien» kaj kie atendis min la vaporŝipestro.

Estis nebula printempa mateno. Akra malvarma vento blovis ĝuste renkonten al ni, disblovante niajn baskojn kaj penante malice senĉapigi nin. Pro densa nebulo nenio estis videbla eĉ je dek paŝoj. Je proksime aŭdiĝis senĉese alarmaj fajfsignaloj diversvoĉaj de du vaporŝipoj.

Ni preteriris kelkajn vaporŝipanojn, kiuj jen sin ŝovis tien kaj tien ĉi tra la ferdeko, jen staris apud rando mem de la ferdeko kun longaj stangoj en la manoj kaj pretaj tuj ion fari, ĵus alflugos al ili komandovoĉo.

— Nu, en kia stato estas la afero?,,, — la vaporŝipestro demandis afable sian helpanton, junan brigulon, kiu, vestita je leda ĵako, staris sur la komandponteto kaj fikse rigardis ien tra la nebulo.

— Ni ree ĵetis la ankrojn... Diabla nebulo!...

— Kie ni estas?

— Proksime de promontoro Varjuŝkin, ni ĵus preteriris Udaĉa'on... Faru ree alarmsignalon! — Li ekkriis al iu laŭtege kaj tuj, supersonante lian voĉon, ekaŭdiĝis akresona fajfo. Eĥo tuj ripetis la signalon kaj similaj alarmaj fajfoj ekaŭdiĝis antaŭe kaj malantaŭe de la vaporŝipo.

— Faru pli ofte la signalojn! — ordonis la vaporŝipestro kaj ekpaŝis laŭlonge de la ferdeko.

— Por kio oni faras la signalojn? — mi demandis lin sekvante post li paŝo post paŝo. — La nebulo ja estas densega kaj estas riskoplene daŭrigi la vojon.

— Jes... Tamen inter ni estas kuraĝuloj, kiuj malgraŭ malpermesoj kaj danĝero, neniam haltigas sian vaporŝipon. Jen, por eviti kunpuŝigon kun ia tia kuraĝulo, oni faras la alarmsignalojn, sciigante pri sia proksimeco...

Ree ekaŭdiĝis la signalo, ree eĥo mokimitis ĝin kaj ree, kvazaŭ responde al ĝi, ie tre proksime ekaŭdiĝis tia sama signalo de alia vaporŝipo.

La vaporŝipestro rapidege turniĝis kaj zorgatakite ree ekpaŝis al sia

helpanto deĵorinta. Sed en tiu momento la nebulo subite disiĝis kaj proksime de ni aperis de ie granda duetaĝa vaporsipo, kiu malrapide, kvazaŭ palpe, moviĝis renkonte al ni.

— Jen, vi vidas!... — mia akompananto montris ĝin per la mano, kvazaŭ jesante siajn vortojn.

Eksonis komando, ekbruis ĉengrincado kaj post unu minuto la vaporsipo ekmoviĝis. La vaporsipestro prenis min je la mano kaj ekspiris kun plifaciliĝo.

— Nu, nun ni povas esti trankvilaj! — li diris malsupreniĝante. — Ĉu vi volas teon, sinjoro? Nun ĝuste estas la horo, dum kiu mi kutime ĝuas te-trinkadon. Ni babilu...

Mi estis ĝoja je la propono de la estro, kun kiu mi konatiĝis nur antaŭtage vespere kaj kiu ŝajnis al mi tre inteligenta kaj simpatiplena viro. Apud pordo de lia kajuto jam atendis lin unu servanto kun bruanta samovaro en la manoj.

— Ankoraŭ unu glason! — li ordonis, ĵus ni eniris en la kajuton kaj la servanto metis la samovaron sur la tablon.

La kajuto estis malgranda, sed tre pura kaj bele ornamita. La mastro sidigis sur sian kutiman lokon apud fenestro kaj montris al mi apud si malaltan kunmeteblan seĝon.

— Mi aŭdis, tiu-ĉi loko estas plej danĝera en la tuta spaco de la rivero... — mi diris por rompi silenton, kiu delonge jam ĝenis nin ambaŭ.

— Jes... — ne tuj, kvazaŭ hezitante, respondis la mastro, verŝante teon en la glasojn, — precipe dum printempoj!... Tie ĉi la rivero estas tre kurbeca; en la spaco de kvin verstoj ĝi faras dudek du grandajn kaj iajoje tre subitajn kurbaĵojn. Kompreneble, ili estas sendanĝeraj, — vaporsipdirektistoj konas bonege ĉiun plej malgrandan kurbaĵon kaj kondukos kian ajn vaporsipon eĉ kun ligitaj okuloj. Tiel la afero estas dum someroj, sed dum printempoj!... La bordoj de la rivero estas malaltaj kaj superakvataj por longa tempo, la fluo estas tre rapida kaj naĝosignoj ofte estas forportataj de ĝi... Jen kiaj ĉarmaĵoj estas tie printempe kaj se en tiu ĉi spaco vaporsipo renkontas ankoraŭ nebulon, tiom kutiman printempe, nu, tiam...

— Ĉu ofte okazas katastrofoj?...

— Ĉiujare ne unufoje...

— Kaj ĉu via vaporsipo...

— Mi navigacias jam dekokan jaron, tamen Dio ĉiam gardas mian vaporsipon de katastrofoj. Iajoje okazis negrandaj aventuroj, tamen unufoje...

Li silentiĝis kaj longe rigardis min per eslorema rigardo, kvazaŭ hezitante aŭ timante ion.

— Jes, unufoje estis stranga okazo, kiun mi neniam forgesos, — li poste daŭrigis. — Mi rakontis pri ĝi ankoraŭ al neniu, tie, vi vidos, estas sekreto, mistero, kiun mi ĝis nun ne povis klarigi al mi, kvankam ĝi okazis antaŭlonge, ĝuste dum la unua mia navigacio. Mi estis tiam junulo, ĵus fininta kurson de navigacia lernejo, tute ne sperta kaj ne lerta... Vintre mi forlasis la

lernejon kaj printempe oni jam donis al mi, kiel al unu el plej bonaj lernantoj, oficon de helpanto de vaporŝipestro. Ordinare, pli frue ol ricevi tian oficon, oni devas dum unu aŭ du jaroj esti praktikanto sur la granda vaporŝipo sub gvidado de spertuloj, sed mi kiel mi jam diris al vi, tuj ricevis la oficon. Tio ĉi, kompreneble, plenigis mian animon per fiereco... Tiam estis tie ĉi malnova granda vaporŝipo «Fierulino...» jen sur ĝi mi ricevis la oficon. Ĝia estro estis maljuna, lerta, sed iom maldiligenta homo, kiu pli ŝatis sin ŝajnigi malsaneta, ol deĵori sur la komandponteto. Nu, kiel okazis tio-ĉi, mi ne memoras, sed li ekmalamis min preskaŭ de la unua tago. Li ĉiam mokis je mi, estis malĝentila al mi kaj, kiel intence, ĉiam estis malsana, kiam vetero estis malbela kaj ventega, pro kio, en tiaj okazoj, mi ĉiam devis komandi la vaporŝipon. Mi ĉion toleris pacience, esperante, ke la maljunulo baldaŭ inde taksos mian laboremon, obeemon kaj paciencon. Nu, mia tasko ofte estis tre malfacila, tamen miaj subuloj — vaporŝipdirektistoj estis senriproĉaj spertuloj kaj fidindaj konsilantoj kaj helpantoj... Jes, kara mia, tiamaniere pasis la printempo kaj la somero, komenciĝis la aŭtuno, ofte ankaŭ tre neagrabla sezono de navigacio. Dum pli ol du semajnoj, mi memoras, pluvis seninterrompe tage kaj nokte. La rivero superakvigis kaj elbordigis, kiel printempe...

Li rapide malplenigis sian jam malvarmigintan glason da teo, ektordis la lipharojn kaj daŭrigis:

— Jen unufoje nokte, kiam mia deĵorado estis finiĝanta, venis al mi deĵoranta vaporŝipano kaj raportis, ke la estro malsaniĝis kaj ordonis, ke mi anstataŭu lin ĝis la tagiĝo. Kiel intence, sur la rivero ekludis terura ventego, tia kian ankoraŭ neniam vidis niaj vaporŝipdirektistoj. Riskante ĉiuminute surteriĝi aŭ surpuŝiĝi je apudbordaj ŝtonoj, ni malrapidigis kuradon de la vaporŝipo kaj moviĝis antaŭen, kiel testudo. Antaŭ la tagiĝo la rivero iom kvietigis, sed ĝuste, ĵus ni venis en Prosj' on, tiel estas nomata tiu-ĉi plej kurbea interspaco de la rivero, falis nebulego. Kion faris?... Mi ordonis ĵeti la ankrojn. Tuj ni ĉiuj libere ekspiris kaj, antaŭĝuante neatenditan ripozon, jam starigis deĵorantojn, la nebulego malaperis. Kun ĉagreno mi devis ordoni levi la ankrojn. Ordinare por plenumi tiun-ĉi ordonon estas bezonaj nur kvin-ses minutoj, sed je tiu-ĉi fojo unu levilo rompiĝis kaj dum oni levis la obstinan ankron pasis pli ol kvaronhoro kaj dum tiu ĉi tempo la vaporŝipo moviĝis hazarde, fortirata de tre rapida fluo. Ni ne havis ankoraŭ tempon por nin orienti meze de la senborda akvebenaĵo kaj ekmovigi la maŝinon, kiam nebulo ree kovris nin. Ni ree ĵetis la ankrojn. Mi ordonis mezuri profundon ĉirkaŭe de la vaporŝipo, montriĝis, ke la fluo fortiris nin ien flanken for de la vaporŝipirvojo. Je tiu ĉi fojo ni longe atendis malaperon de la nebulo kaj priparolis nian situacion riskoplenan, kiu devis ankoraŭ plimalboniĝi dum ni levos la ankrojn. Pasis pli ol unu horo en tia atendado. Fine, ekblovigis kontraŭa vento, kiu disblovis senpostsigne la nebulon kaj sur la ĉielo por unu momento eĉ eklumis afable la suno, preskaŭ tuj ree malaperinta post nubo. Ni delonge atendis tion ĉi kaj la ankroj estis levi-

taj tre rapide kaj jam sen ĉia malhelpo. La vaporŝipo ekmoviĝis antaŭen... Senĉese mezurante la profundon kaj neniel povante trovi la perditan irvojon, oni direktis la vaporŝipon laŭ mia komando hazarde jen dekstren, jen maldekstren, jen antaŭen, jen malantaŭen, ĉiunmomente riskante surteriĝi. Post duonhoro de vana serĉado min kaj miajn subulojn atakis malespero kaj la superstiĉa timo: ne povante sin orienti meze de la senlima akva spaco, aŭ eĉ trovi je iaj signoj proksimume la perditan direkton, ni jam volis venigi la vaporŝipestron, kiam la pordo de la direktilejo brue malfermiĝis kaj de ĝi aperis juna fraŭlino... Ŝi estis neordinare ĉarma en sia mallonga blua vestaĵo kun nebutonumita mallonga drapa ĵaketo super ĝi kaj modesta ĉapelo sur bela bukla hararango. Ŝi estis maldika, gracia, mezkreska kaj aspektis deksepjara knabino, sed en sia teniĝo, gestoj kaj kuraĝa rigardo estis la memfida fiereco kaj ordonemeco. Enirinte, ŝi silente etendis al mi la manon kaj, stariĝinte apud mi, fikse ekrigardis antaŭen, ĉagrene skuante la belan kapeton kaj kvazaŭ ion konsiderante. Kun miro rigardante la nekonatan ĉarmulinon kaj penante konjekti, kiu ŝi estas kaj kial ŝi aperis tiel neĝustatempe kaj neĝustaloke, mi jam intencis proponi al ŝi ian demandon, kiam ŝi gaje ekrigardis min kaj, ordigante per la maldekstra mano belan buklon, kiu ŝirmis subite ŝian okulon, etendis la dekstran antaŭen kaj diris mallaŭte: «Vi tro deflankiĝis!... Rigardu, tiuj ĉi arbitaĵoj super la akvo estas la supraĵoj de la arboj, kiuj kreskas sur la dekstra bordo de la rivero kontraŭ la promontoro Udaĉa... Tamen, por eviti ŝtonojn, kiuj kuŝas tie survoje al Udaĉa, ni devos direkti la vaporŝipon komence iom maldekstren...» kaj sin turninte al la vaporŝi pdirektistoj, ŝi subite ekkomandis per firma kaj laŭta voĉo: «Dekstren, dekstren!... «Kiam la direktistoj ankoraŭ demande rigardis jen min, jen la komandantinon, nenion povante kompreni, ŝi aliris al la direktiltrado kaj, per facila movo de la mano tute senĝene, senhezite forigis unu direktiston. Kun lerteco de multjara direktisto ŝi prenis per la ambaŭ manoj la radon kaj, fikse rigardante antaŭen, senhezite ekmovis ĝin jen tien, jen reen, akompanante ĉiun ekmovon per laŭta komandado: «Dekstren!... Ankoraŭ iom!... Nun iom maldekstren!... Plirapidigu la maŝinon!... Maldekstren, maldekstren!» Mi, ankaŭ la direktisto, povante ankoraŭ nek konsideri ion, nek rediri al la nekonatulino mistera, staris kiel ensorĉitaj kaj apenaŭ havis tempon ĝuste plenumi ŝian komandon. «Jen estas Udaĉa!... Ĉu vi rekonas ĝin nun?...» — ŝi diris al mi malice kaj ĉarme ridetante. «Jen ni tuj ĉirkaŭiros ĝin kaj alproksimiĝos al promontoro Rusalkin... kontraŭ kiu kuŝas la sennoma iusuleto... Ĉu tiel?» — ŝi demandis jam, kvazaŭ fanfaronante per sia kono de geografio de la rivero, la direktiston, kiu kun granda konfuzo kaj miro, responde al ŝi, jese balancis per la kapo, konstatante ĝustecon de ŝiaj vortoj. «Plej rapide antaŭen!... — ŝi ree ekkomandis. — Jen antaŭ ni estas ia vaporŝipo... nun vi estas ekster de ĉia danĝero...» Kaj, dirinte tion ĉi, ŝi jam volis forlasi la direktiltradon, kiam en la direktilejo eniris la vaporŝipestro. Li demande ekrigardis la fraŭlinon per severa rigardo kaj malĝentile, severtone ekkriis: «Fraŭlino, ŝajne, vi venis ne ĝustaloken!...» Mi volis defendi

nian savintonon kaj jam faris unu paŝon antaŭen al la estro, kiam ŝi, paliĝinte kaj malestime ekrigardinte lin de la piedoj ĝis la kapo, silente forlasis la radon kaj bruferminte post si la pordon, malaperis. Mi akompanis ŝin ĝis la pordo per entuziasma rigardo. Evidente ŝi eksentis ĝin, ĉar jam apud la pordo mem ŝi haltis kaj sendis al mi ĉarman rideton...

— Kiu ŝi estis? — mi demandis.

— Ĵus la vaporŝipestro anstataŭis min, — li daŭrigis post unu momento ne atentante mian demandon, — mi malsupreniĝis kaj malgraŭ terura laceco, kiun mi sentis en ĉiuj membroj, longe marŝis tra la vaporŝipo, serĉante la misteran fraŭlinon. Nenie renkontante ŝin, mi demandis pri ŝi la servantojn de la vaporŝipo kaj pasaĝerojn, sciigante al ili versignojn de ŝi, sed neniuj vidis ŝin, ŝi kvazaŭ malaperis senpostsigne. Dum haltoj de la vaporŝipo mi plej atente observis ĉiujn forlasantaj ĝin, esperante almenaŭ tiam ekvidi ŝin, — ĉio estis vana... Kaj post unu tago, nokte, dum mia deĵorado, la vaporŝipo forbrulis pro kaŭzo neklarigebla... Neniu el pasaĝeroj aŭ vaporŝipanoj pereis, nur senpostsigne malaperis ĝia estro. Niaj direktistoj parolis, ke tio ĉi estis ŝia venĝo al la malĝentila vaporŝipestro!...

Li ree plenigis la glasojn kaj longe silentis, evitante mian rigardon.

— Ĉu vi neniam plu renkontis ŝin? — mi demandis post paŭzo, dum kiu li havis tempon tute trankviliĝi de sia emocio, elvokita de la rememoro.

— Printempe de la jaro sekvinta mi ricevis rangon de vaporŝipestro kaj jen tiun ĉi vaporŝipon, — li daŭrigis, profunde ekspirinte. — De tiam kaj ĝis hodiaŭ mi ĉiutage serĉas ŝin, plej atente observante ĉiun pasaĝerinion, mi ial firme kredas, ke mi ree vidos ŝin jam sur mia vaporŝipo, kie neniuj kuraĝos ofendi ŝin... Multfoje dum tiu ĉi tempo mia koro batis malsaneme el la brusto, ĉar ofte mi renkontis fraŭlinojn, kiuj ĉe supraĵa observo ŝajnis similaj al ŝi je sia teniĝo, fiera kaj memfida irmaniero kaj vestaĵoj, sed ĉiuforte, ĉe pli atenta esploro de la nekonatulinaj, mi devis disreviĝi... Tamen antaŭ kvin jaroj mi renkontis ŝin vintre en la urbo, kaj ŝi tuj rekonis min! La renkontiĝo havis por mi tre gravajn rezultatojn!... Ordinare ni pasigas sur vaporŝipo proksimume sep monatojn dum jaro kaj tiu ĉi tempo pasas tre nerimarkeble, rapide dum senhalta, sufiĉe interesa kaj riĉa je ĉiutagaj impresoj vojaĝado tien kaj reen tra la rivero. Ĉiutage ja ni vidas novajn pasaĝerojn, novajn pejzaĝojn... Unuvorte la vivo kuras brue, gaje... Nu, tute alian ni sentas dum vintroj, kiam ni devas pasigadi en senageco ie en urbeto, kie travintras la vaporŝipo, longajn enuigajn tagojn de senlaboreco nekutima. Dum tiu vintro la vaporŝipo devis pasigi la vintron en unu novearangita haveno malproksime de urbo, de homoj. Mi treege enuis en la izoleco kaj senlaboreco. Por mallongigi la tempon ni ofte vizitadis en la vilaĝo, kuŝinta proksime de la haveno, restoracion. Kvankam ĝi estis malgranda kaj malpura, tamen — ĉiam plena de okazaj vizitantoj, plej ofte de vilaĝanoj, kaj bruplena... Alkutimiĝinte sur la vaporŝipo al ĉiama vivoplenna bruado de pasaĝeroj, mi ŝatis en la restoracio ĝuste ĝian bruadon, kiu rememorigis al mi mian kutiman vivon someran. Ofte vizitante la restoracion,

mi baldaŭ konatigis kun la familio de la restoracimastro kaj en tiu ĉi simplanima familia rondo mi travivis multajn, se ne feliĉajn, do, almenaŭ, agrablajn minutojn en vigla babilado kaj senkulpa flirtado je du—fraŭlinoj filinoj de la mastro. Ili estis nek ĉarmaj, nek malĉarmaj, nek belaj, nek malbelaj, nek saĝaj, nek malsaĝaj... unuvorte, ili estis plej ordinaraĵoj vilaĝaj knabinoj, kiuj tre ŝatis miajn oftajn vizitojn kaj, ŝajne, havis eĉ sekretan esperon almiliti mian koron... Unufoje, vizitinte la familion, mi estis surprizita, trovinte tie unu junan fraŭlinon, kiu de unua rigardo faris grandan impreson je mi. Ŝi estis instruistino, la parenicino de la gemastroj, kaj devis gastigi tie kelkajn tagojn... Mi jam diris, ke ŝi tuj faris grandan impreson je mi, jes, tio ĉi estis ĝuste tiel, ĉar en ŝia aspekto kaj maniero de teniĝo estis io nekapteble simila al ŝi — al tiu mistera fraŭlino. Mi estis tridekjara viro kun bona ofico kaj ankaŭ bona salajro, penso pri arango de mia propra familia nesto jam ne unufoje antaŭ tiam venis en la kapon... post kelkaj tagoj mi decidis fari al ŝi edziĝopropozicion. Ŝi logis ie malproksime en urbeto, kien oni devis veturi komence per veturilo ĝis la urbo proksima kaj de tie jam per fervojo. Tiun ĉi vojon malproksiman mi bone ellernis dum tiu vintro, ĉar kvin aŭ ses fojojn mi vizitis «la fianĉinon.» Mi sentis nek amon nevenkeblan al ŝi, nek simpatian pasian, kio okazas ofte en tiaj aferoj, tamen en ŝia simileco al tiu fraŭlino treege logis min. Dum unu vizito al ŝia hejmo mi faris al ŝi edziĝopropozicion kaj ricevis konsenton. Ni interkonsentis ree intervidiĝi en komenco de februaro kaj fianĉiĝi por printempe, tuj post Pasko, antaŭ navigacio mem, geedziĝi... En februaro, kiel mi promesis al ŝi, mi entreprenis mian vojaĝon al ŝi. Trio da bonegaj ĉevaloj rapidege alveturigis min en nian urbon; de tie mi jam devis veturi pluen fervoje. Mi faris en la urbo necesajn aĉetaĵojn, mi min provizis je donacoj por la fianĉino kaj en plej bona humoro venis la stacidomon. Nur kelkajn minutojn mi devis pasigi tie, atendante la vagonaron. Starante apud la biletkaso kaj atendante mian alternon inter multenombra bruanta popolamaso, mi subite ekvidis ŝin... tiun misteran fraŭlinon, kiun mi serĉis delonge. Kvankam ŝi estis nun jam ne knabino, kia ŝi estis tiam, antaŭ kelkaj jaroj, sed plene matura fraŭlino, kvankam ŝi nun estis vintre-vestita, mi tuj rekonis ŝin. Estis la samaj teniĝoj, gestoj, irmaniero kaj kuraĝa rigardo de iom memfidaj kaj fieraj ĉarmaj okuloj... Jus niaj okuloj renkontiĝis, ŝi afable ekridetis al mi de malproksime kaj, gaje balancante per la kapo, alproksimiĝis al mi... ŝi ankaŭ rekonis min! «Ĉu vi veturis tien?...» — ŝi demandis, etendante al mi la dekstran manon kaj per la maldekstra ordigante sian belan bukleton, kiu falis de la frunto kaj ŝirmis ŝiajn okulojn. — «Ĉu vi veturos... al via Marinjo?...» — ŝi daŭrigis, amike premante mian manon kaj fikse rigardante min. — «Res-tu! Ŝanĝu vian intencon!...» — La lastaj vortoj estis dirlitaj per tia ordonema tono, ke mi tuj sen ĉia bedaŭro kaj hezitado, eĉ ne demandante ŝin pri kaŭzo de tia konsilo neatendita, decidis sekvi ĝin kaj kliniĝis por preni mian valizon, kuŝintan apud miaj piedoj, kaj sekvi kien ajn post la enigmoplana, mistera ĉarmulino... Sed kiam mi rektiĝis, tenante la valizon en la mano, ŝi

jam forestis. Mirigita mi longe serĉis ŝin per la okuloj, sed ŝi nenie estis vidata. Mi serĉante ŝin, marŝis senĉese laŭlonge kaj laŭlarĝe de la stacidomo, atente pririgardis, ŝajne, ĉiun virinon, estintan tie... ŝi ne estis. Mi revenis hejmen kun la koro premegita, povante nek eĉ por unu minuto forgesi ŝiajn ĉarmajn vizaĝotrajtojn, nek kompreni ŝian tiom enigmoplanan averton. Dum kelkaj tagoj mi nenien eliris el la ĉambro kaj kiam mi, fine, vizitis la familion de la restoracimastro, oni gratulis min, estante tute certaj pri tio, ke mi fianĉiĝis kun Marinjo. Kiam mi rakontis pri mia subita ŝanĝo de la intenco, kompreneble, prisilentinte la renkontiĝon kun ŝi, oni ĉirkaŭis min kaj kun ne kaŝata ĝojo sciigis min, ke Marinjo estas ftizulino, ke ŝi vivos ne longe, ke ŝiaj gepatroj, ankaŭ geavoj estis mortintaj en juna aĝo ankaŭ pro ftizo, ke oni bedaŭris min, kiam mi intencis edziĝi je ŝi, sed ne kuraĝis rompi mian «feliĉon...»

La vaporŝipo ellasis laŭtan daŭran fajton. La vaporŝipestro metis sur la kapon sian ĉapon kaj leviĝis. La vaporŝipo alproksimiĝis al ia albordejo, kie li devis anstataŭi sian helpanton.

— Poste mi sciigis, ke ŝi efektive mortis pro ftizo dum tiu sama printempo... — li daŭrigis, ŝlosante sian kajuton. — Mi ĝis nun restas fraŭlo kaj, kiel antaŭe, ĉiutage esperas ree renkonti tiun fraŭlinon... Ial mi supozas, ke mi nepre renkontos ŝin kaj je tiu ĉi fojo jam por ne disiĝi kun ŝi plu... Mi firme kredas, ke ŝi... estos mia edzino, — li aldonis jam flustre, premante mian manon.

La vaporŝipo albordeĝis kaj mi longe observis la vaporŝipestron, kiu staris sur rando mem de sia komandponto sur la supra ferdeko kaj fikse rigardis fraŭlinojn jen forlasantajn la vaporŝipon, jen enirantajn, esperante renkonti inter ili la misteran fraŭlinon.

Ĉu li renkontos?

I. ŜIRJAEV

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Pro... kaj Por...

Pastro Font i Giralt, laŭ «Espero Katolika», kies redaktoro Pastro Ramboux, kun «akraj trajtoj», kredas (kredo estas ja pli facila ol scio) ke la Floraj Ludoj utilas «NUR» al verkado de malĉastaj literaturajoj, diras pri nia amiko kaj kunfederaciiano: «Enkarnigita saneco, dika negranda, triontempe ridegante, triontempe preĝante, duontempe laborante, resttempe dormante, parolante Esperanton kiel gepatran lingvon, kontraŭo de pesimisto, scienca homo: Pastro Font i Giralt». — Ni dankas por la justa laŭdo al nia samlingvano, kaj responde al pastro Ramboux, al liaj «akraj trajtoj», ni demandas al li kial li ne verkis por premioj kaj temoj de katolikaj episkopoj en la Floraj Ludoj. Kaj ni maldankas lin en la nomo de la katolikaj verkistoj kiuj estas premiitaj en Floraj Ludoj.

Aŭtoritata opinio

Internacia lingvo rompos ĉiujn barojn de la skeptikaj registaroj, ne ĉar ĝi estas perfekta — tia ĉiam relativa perfekteco ilin tre malmulte interesas, — sed ĉar ĝi estas *praktika*, ĝenerale *uzata* kaj tre *disvastigita*.

Nia Esperanto pruvis *praktike* sian taŭgecon, sian plenan uzeblecon kaj jam estas *ĝenerale uzata*; nia devo estas sekve ĝin propagandi energie tian, kia ĝi estas, pliriĉigante ĝin laŭ la postuloj de la vivo.

Oni respondos: «Kelkaj reformoj, reformetoj helpas al ĝia disvastigado!»

Bedaŭrinde la plibonigistoj ne akordiĝas pri tiuj ĉi reformoj; kelkaj — precipe la uzantoj de latindevenaj lingvoj — opinias, ke bona estus lo forigo de la supersignitaj literoj, sed aliaj — precipe la Slavoj — opinias, ke grava eraro estus tia forigo; al kelkaj malplaĉas la finaĵoj: *oj, aj*, aliaj kontraŭe certigas, ke ili, dank' al sia «fluebleco», tre faciligas la elparolon de Esperanto; kelkaj malŝatas la akuzativon, kies utileco estas evidenta al aliaj, ĉar sub ŝajna komplikado ĝi forigas de la internacia lingvo multajn malfacilajn regulojn pri la konstruo de la frazoj, ktp.

Nenia aŭtoritato en Esperantujo havas la povon altrudi al la Esperantistaro tiajn reformojn: Enkonduki unu aŭ alian, eĉ malplej gravajn, estus fatale naski skismon, rompi nian ĉefan forton: nian unuecon.

Ĉiuj, eĉ niaj kontraŭuloj, devus kompreni, ke dank' al sia multjara uzado, dank' al sia jam ĝenerala disvastiĝado, nia Esperanto *sola* estas kapabla montri al ĉiuj la eblecon de internacia lingvaĵo, ke sekve, eĉ tiuj, kiuj proponas aliajn sistemojn, saĝe agus — por ke venku ia ajn internacia lingvo — batali de nun apud ni por Esperanto.

Poste?... Nu, ni relegu la antaŭparolon de nia Fundamento: «Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la ĉefaj regnoj... tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton... fari en la fundamento de la lingvo... ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, *se* tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo...*» ni konservu severe nian Zamenhofan Esperanton!

TH. CART

Prez. de la Akademio



Pro... kaj Por...

Pro malsaniĝo de nia kara profesoro Domènech, la radian kurson de Esperanto en Radio-Barcelona daŭrigis nia amiko Dro. Bartomeu. — Ni treege deziras plej baldaŭan resaniĝon de nia samideano Domènech.

XII^{aj} Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

(Sekvo de premioj kaj temoj)

VIII. — Premio de la Registara Urbestro de Sta. Coloma de Farnés: 100 ptoj. Temo: Versaĵo aŭ prozaĵo plej bone kantanta la naciajn gloriojn.

IX. — Premio de S-ro. Ramon Masgrau, Registara Delegito de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Patrujama.

X. — Premio de S-ro. Parolnestro de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: La malmoraleco ĉe la virina vesto.

XI. — Premio de ĵurnalo «La Veu de la Selva» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XII. — Premio de la firmo «Grafikaj Artoj» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIII. — Premio de «Granda Hotelo» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIV. — Premio de «Centra Hotelo» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XV. — Premio de pastro Josep Puig de Sta. Coloma de Farnés: 1 sterlinga funto. Temo: Plej bona verko priskribanta la kastelon, ermitejon, turon Planes, ktp. de Farnés.

XVI. — Premio de Banloko «Orion» de Sta. Coloma de Farnés: 100 ptoj. Temo: Graveco de la fizikaj kvalitoj de la akvoj akrato-termaj, radiaktivaj, rilate al la aktivecoj kaj efikoj de tiaj akvoj, speciale koncernante la fiziolegian kaj terapeŭtikan efikon.

XVII. — Premio de D-ro. Manuel Burch, posedanto kaj direktoro de Banloko «Orion» de Sta. Coloma de Farnés, 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

XVIII. — Premio de S-ro. Josep M.^a Iglesias de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Plej bona traduko de versaĵo de la fama kataluna poeto Joan Maragall.

XIX. — Premio de Hora Societo de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Pritraktanta la muzikverkadon kaj ĥorkreadon de la el la pasinta XIX^a jarcento kataluna muzikverkisto Clavé.

XX. — Premio de S-ro Josep Callís de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXI. — Premio de S-ro. Josep Corominas de Sta. Coloma de Farnés. 25 ptoj. Temo: Laŭvola,

XXII. — Premio de Ekscelenca S-ro. Joan Ventosa i Calvell, eksministro kaj lasta parlamenta deputito de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXIII. — Premio de la grupo «Paco kaj Amo» de Barcelona: 25 ptoj. Temo: Pri paco kaj amo.

XXIV. — Premio de la grupo «Ĝerona Espero» de Girona: 50 ptoj. Temo: Esperanto kaj Radiofonio.

XXV. — Premio de S-ro. Ivan H. Krestanoff, de Pirdop (Bulgarujo): Plena kolekto de lia verkaro valoranta proksimume 25 ptojn. Temo:

XXVI. — Premio de S-ro. Narcís Massagué, provinca registara deputito, de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXVII. — Premio de la grupo «Lumon» de Terrassa: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXVIII. — Premio de «Agrikultura Sindikato» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXIX. — Premio de D-ro Ramon Torres i Carreres de Barcelona: 100 ptoj. Temo: Originala aŭ tradukita scienca studo pri la eltrovo de la radioj X. (Roentgenologio).

XXX. — Premio de D-ro Sennomulo: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXXI. — Premio de S-ro Esteve Rossell de Barcelona: 25 ptoj. Temo: Kio estas kaj kiel efikas la spiritaj ekzercoj de Sankta Ignaco de Loyola, kaj la koncerna gvidado de Pastro Vallet de Katalunujo.

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

1. Vivanta strofo. — 2. Un sonnet sans défaut vaut seul un long poème... — 3. I aquelles grâces en son rostre juntas, cerco disperses per tants rostres d'altres! — 4. Manta sens me mal razona quar ieu non chant plus soven... — 5. Sonetoj kaj madrigaloj. — 6. Amiko fidela, trezoro plej bela. — 7. (sama devizo) (unua verso: En valo ĉe simplaj modestaj knabinoj. — 8. Zamenhof. — 9. Paco, Amo kaj Esperanto. — 10. Progreso. — 11. Kion oni volas, tion oni povas. — 12. Antaŭen! — 13. Patrino Amo.



Pro... kaj Por...

Interŝanĝo de originaloj. — Dum la Ĝeneva Kongreso, ni interparoladis kun niaj amikoj kolegoj F. Schoofs kaj Hromada pri la konveno ke la katalunoj sendu elkatalunajn originalojn al «Belga Esperantisto», 11, Hondstraet, Antwerpen (Belgujo) kaj al «La Progreso», Socharská 333, Praha VII (Ĉeĥoslovakio) obee al tio kela esperantistoj povu legi en Esperanto literaturaĵojn malfacile atingeblajn en la propra lingvo. Lastatempe «Amerika Esperantisto», 507 Pierce Building Copley Square, Boston 17, Mass (U. S. A.), skribe ankaŭ faris al ni tiun peton. La katalunaj verkistoj estas do petataj sendi al tiuj gazetoj plej bonajn elkatalunajn verkaĵojn. — Feliĉe *Kataluna Esperantisto*, pro sia organeco de la Internaciaj Floraj Ludoj de ni ĉiujare organizitaj povas ĉiam elĉiunaciajn verkaĵojn publiki, kaj laŭeble helpos al la logika peto de niaj kolegoj direktantaj tiujn ŝatindajn gazetojn.

«*Esperanta Ĵurnalista Servo*. — Sidejo: Warszawa (Varsovio), Leszno 28/13. — Ni sciigas ĉi-pere la tutmondan esperantistaron, ke ni ĵus fondis en ĉefurbo de Pollando, Warszawa, institucion «Esperanta Ĵurnalista Servo» kies celo estas meti Esperanton al la servo de diverslingva gazetaro per konstanta liverado al ĝi de ĉiuspecaj presotaĵoj, ricevotaj de niaj esperantaj kunlaborantoj (precipe ekstereŭropanoj.) La ĉiam bezonataj por ni presotaĵoj estas jenaj. 1. *Aktualaj* sciigoj, raportoj kaj artikoloj pri la socia, ekonomia kaj politika vivo. 2. *Aktualaj* fotografiaĵoj pri la diversaj okazintaĵoj (katastrofoj, konferencoj ktp.) (*Rimarko*: Ne ilustraĵoj, laŭ kiuj preskaŭ neeble estas fari bonajn preskliŝojn.) — 3. Interesaj priskriboj kaj artikoloj pri la kulturo, civilizacio, moroj, spiritaj movadoj, teatraj okazintaĵoj ktp. 4. Tradukoj de plej valoraj noveloj, rakontoj kaj ankaŭ priskriboj pri bela literaturo kaj arto. Ĉiuj ĉi supre cititaj presotaĵoj estos de ni laŭdezure pagataj aŭ interŝanĝataj per similaj de nia lando. — Ni atentigas, ke ni havas nenion komunan kun neseriozaj korespondemuloj sed, stariginte nian entreprenon sur firma financa bazo, ni volas fari el Esperanto potencaĵon ilon de gazetara servo. — Pri la seriozezo de nia entrepreno povas certigi ĉiujn la fakto, ke nin apogas D-ro *Leono Zamenhof*. — *Ĵurnalistoj, fotografistoj kaj seriozaj korespondantoj* tuj ekkomencu kunlabori kun ni. *La Gvidantaro de Esperanta Ĵurnalista Servo*, Leszno 28/13, Warszawa, Pollando».

«*Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado* — 12 Bd. du Théâtre, Genève. — Gazeta statistiko. — La viklecon de la propagando en monato oktobro pravas la gazetartikoloj, alvenintaj ĉe ni. — Ni ricevis en lingvoj: angla 43, germana (Svislando) 79, germana (Germ., Aŭstrio, Ĉeĥosl.) 21, franca (Svislando) 90, franca (Franc. kaj Belg.) 12, hispana 19, holanda 2, itala 4, kataluna 2, pola 1, rusa 1, sveda 1. Entute 275 eltranĉaĵojn en 10 lingvoj. Ni petas ĉiujn propagandistojn regule sendi al ni eltranĉaĵojn aŭ gazetojn, signante la koncernan artikolon per ruĝa krajono».

Jarlibro 1926. — Ni atentigas, ke korektoj, aldonoj, novaj tekstoj por la jarlibro 1926 devas atingi la Centran Oficejon ĝis 15 decembro 1925. Ekstereŭropanoj volu ne prokrasti tujan sendon de tiaj informoj post ricevo de la Oficiala Bulteno aŭ de la nuna gazeto. Adreso: 12 Bd. du Théâtre, Genève.

Novaj Kursoj estas organizitaj ĉe niaj viglaj societoj «Barcelona Stelo» kaj «Nova Sento.» Sukceso premias ties taskon.

Esperantista Klubo Palma. — Novaj kursoj estas komencitaj tre sukcese ĉe niaj karaj tieaj samideanoj, gvidataj de nia kompetenta pioniro S-ro N. Bofill.

Organizita de «Paco kaj Amo» festo por la datreveno de Esperanto, sukcesegis. Partoprenis ĝin pli ol 200 personoj, cifero atingita ankoraŭ en neniu el la datrevenoj organizitaj antaŭe ĉe ni. — Rimarkindaj estis la paroladoj de kunsocietanoj Roig kaj Dalmau, ĉar malgraŭ ke unu ne aŭdis la alian

pri siaj temoj, ili klarigis la internan ideon per la samaj argumentoj. Ĉi tio pruvas ke tiu societo estas bone saturita de tiu sento kiu vivigas Esperanton.

La Esperanta Societo en Barcelono «Paco kaj Amo» bele festis la malfermon de unuagrada kurso kies gvidon zorgas Ludoviko Domènech. La festo konsistis el du katalunaj komedioj: deklamado de esperantistaj versaĵoj, parolado de Kdo. S. Roig pri la «Celo de la Esperantistoj,» kaj Fino. Palmira Castellvi kiel kutime bone kantis en la Zamenhofa lingvo «La edziĝo de Figaro,» «Via rido,» «La vojo,» ktp. La salono kie okazis tiu alloga festo estas bela kaj la aspekto estis impona pro la grandnombro da ĉeestantoj. Dank' al tiu sukcesa festo la kurso tre estas ĉeestata kaj tiu antikva societo plivigligas.

«Paris: la 28an de Novembro 1925.» — Tre estimata Sinjoro (-ino). — Ni havas la plezuron sciigi al vi ke A. I. L. E. (Alliance Internationale pour les Libres Echanges — Internacia Unuiĝo por Liberaĵ Intersanĝoj) antaŭ ne longe adoptis Esperanton kiel Universalan helplingvon. — Tiu-ĉi decido estas alprenita post tre vasta enketo kiun A. I. L. E. publikigis en la monato Septembro de l' unua jaro kaj pri kiu la granda gazetaro prialudis. — Konsekvence, A. I. L. E. jam de nun estos la defendanto de Esperanto en ĉiuj rondoj penetrataj de sia Organo «La Revue de l'Univers»; ĝia agado iĝos plej efika, okazigante la praktikan uzadon de Esperanto inter ĝiaj Membroj. Ĝia organizo plene favoras por tia celo, tial ke A. I. L. E. nuntempe arigas, cele de internacia kunlaborado, proksimume 2.000 Membrojn-kolektantojn, serĉantojn, intelektulojn - kiuj apartenas al 134 landoj. — Tiuj Membroj estas grupigitaj laŭ 8 specialaj fakoj kaj iliaj nomoj, adresoj kaj deziroj pri intersanĝo estas publikigataj sesfoje ĉiujare per la «Revue de l'Univers» kiun ĉiu el ili senpage ricevas. Tiurimede, ili kapablas intersanĝi ideojn, sciigojn, kolektotaĵojn kaj ĉiujn aliajn utilajn servojn. — Esperanto do renkontas en nia Asocio medion en kiu ĝi rapide disvastiĝos per si mem, kondiĉe ke oni, de nun, enigu en tiun-ĉi medion esperantistan spiriton. — Pro tio, A. I. L. E. petas al la kunlaborado de 100 Delegitoj elektitaj inter la plej konataj de U. E. A., per senpaga enskribo dum unu jaro en sia fako D (Internacia Korespondado). — Tiel rekompencante amikajn rilatojn jam starigitajn inter A. I. L. E. kaj U. E. A., tiu reciproka kunlaborado de du gravaj Asocioj plej ege helpas al triumfo de Esperanto. — Vi estas, tre estimata Sinjoro (-ino), unu el la 100 Delegitoj al kiuj ni nin turnas por doni la esperantistan antaŭenpuŝon al nia Unuiĝo. Ni estos tre feliĉaj se vi bonvolos, ĉirkaŭ vi, ageme propagandi por nia Asocio kaj por ĝia celo: la Internacia Kooperado. Ni sendos al vi la provizon da propagandiloj en Esperanto kiun vi men mendas al ni; kaj baldaŭ, dank' al vi, Esperanto, apogante sin sur nia universala organizo, iĝos la kutima interkomprenigilo inter ĉiurasaj kolektantoj kaj serĉantoj. — Por rekompenci viajn elspezojn kaj klopodojn, A. I. L. E. konsentos al vi propagandan kompenson kies minu-

mumo estos 5 francaj frankoj po ĉiu nova Membro kiu aliĝos al A. I. L. E. per via perado. — Ni sincere antaŭdankas al vi kaj restas — Plej samideane Via, = La Administra Konsilantaro — Robert GAFFIOT, — Prezidanto» — Adreso de tiuj gravaj Unuiĝo kaj Revuo estas: Boîte Postale 49, Paris. — Ni sincere gratulas la Parizajn samideanojn, por tiu nova progreso de Esperanto, kaj rekomendas al niaj legantoj tiujn Unuiĝon kaj Revuon.



Bibliografio

(Ni recenzos verkojn duope ricevitaĵn)

HEBREA PROGRESO EN PALESTINO. Eldonita okaze de la XIV-a. Cionista Kongreso en Wien de la Centra Cionista Organizacio. 25 × 15, 15 paĝoj. Senpage havebla de la Centra Cionista Organizacio, London, W. C. 1, 77 Gt. Russel Street.

Jen tre interesa kaj per 16 bildoj bele ilustrita broŝuro, kiun la Centra Cionista Organizacio oficiale eldonis, por informi la esperantistaron pri la ĝisnunaj progresoj kaj sukcesoj de l' Cionista koloniza kulturelaboro en Palestino. Ĝi donas unue en ĝeneralaj trajtoj la historion de la Cionista movado, priparolas la jur-politikan bazon de la Cionismo, t. e. la Balfouran Deklaracion kaj priskribas la organizaĵojn per kiuj efektiviĝas la konstruo de la Hebrea lando. La broŝuro, verkita en bona Esperanto-stilo kaj kun malmultaj preseraroj, de D-ro. Emanuel Olšvanger, delegito de la Cionista Organizacio en Suda Afriko, kaj prezentita al la XVII-a Tutmonda Kongreso de Esperanto en Genève, estas laŭdinda tasko por la konstruo de la detruita hebrea popolo.

PSIKANALIZO KAJ EDUKADO, de Pierre Bovet, direktoro de Instituto J. J. Rousseau. Tradukita de rondeto de edukistoj okaze de la unua esperanta Somera Universitato. Genève, 1925. 37 paĝoj, 21 1/2 × 16. Prezo: ne montrita.

El tri ĉapitroj konsistas la scienca verketo: I Kio estas psikanalizo, II La psikanaliza metodo kaj ĝiaj procedoj, III La analiza psikologio kaj ĝiaj aplikoj en edukado.

Ĉiu ĉapitro, korekte tradukita, estas valora kaj grava paŝo en la mondo de l' plej grandaj misteroj. La studo de la subkonscio, la esploro de tiel multaj fenomenoj, pri kies deveno ni preskaŭ neniam atentis, estas kulturata de tiel malmultaj homoj, ke la verko certe vekos intereson ĉe la esperantistoj kaj estos efika kontribuo al la diskonigo de psikologio.

Kiom povas helpi psikanalizo en edukado la legantoj povos trovi en la nomita verko, kiun ni varme rekomendas al ĉiuj, precipe al edukistoj.

NOVELOJ de Henryk Sienkiewicz, el pola lingvo tradukis Lidja Zamen-

hof. XVI volumo de Internacia Mondliteraturo, ŝatinda kolekto eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1925. 64 paĝoj, $19\frac{1}{2} \times 13$. Prezo: 1.60 Rm.

Certe tiu ĉi nova volumo de Internacia Mondliteraturo superas multajn el la antaŭe aperintaj, ne nur pro la beleco de la enhavataj kvin rakontoj sed ankaŭ pro la flueco de stilo de la tradukintino. Sienkiewicz, la mondkonata aŭtoro de *Quo vadis*, donas tian vivon kaj animon al siaj paĝoj, ke ĉiam oni legas lin kun granda plezuro.

La elektitaj rakontoj estas belegaj. Oni malfacile povus diri kiu el il estas la plej ŝatinda. Sen preseraroj, gramatike korekta, la nova libro tiel zorge eldonita el Eldonejo Hirt, meritas lokon en la biblioteko de ĉiu esperantisto.

ELEMENTOS DE ESPERANTO. Gramatiko por hispanlingvanoj, verkita de Fernando Soler Valls. Valencio, 1925. 32 paĝoj, 16×11 . Prezo: 0.25 pt.

La aŭtoro celas per tiu ĉi gramatiketo helpi la disvastigon de nia afero.

La enhavo estas korekta kaj simpla: taŭga por la celo de la verkinto.

VI SOLA, ESPERANTO, POVAS FARI TIAJN MIRAKLOJN. Unuakta originala teatraĵo de Arturo Ghez, premiita ĉe la X Internaciaj Floraj Ludoj. Eldonita de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1924. 40 paĝoj, 12×8 . Prezo: 1.50 liroj.

Tre sprita komedieto, facile ludebla ĉe esperantaj festoj. Dank' al Esperanto du fuŝistoj, pentristo kaj muzikisto, trovas riĉecon. Amerika milionulo savas la du mizerulojn kaj la ceterajn rolulojn.

Se ni esceptas tri aŭ kvar gramatikajn erarojn, ni povas diri ke la aŭtoro sukcesis doni al ni belan kaj amuzan teatraĵon.

POSTMORTA VIVO. Fragmento el la Spirita Mondo de Wanisaburo Deguti, el la japana lingvo tradukita de Tadakacu Juri. Eldonejo Oomoto, Ajabe, Kioto-fu, Japanujo, 1924. 12 paĝoj, $18\frac{1}{2} \times 13$. Prezo: ne montrita.

Oomoto, la nova spirita movado en Japanujo, vekis intereson ĉe diversaj esperantistaj medioj kaj pro tio la tradukinto volis doni al ni ian instruon pri la stato de la animo trans la morto.

La elektita fragmento priskribas kie kunvenas la spiritoj post la morto de la korpo, kien ili iras post la restado en la Intera Regiono, k. t. p.

Eble la legado de la verketo estas interesa kaj instrua, sed mi nenie trovis intereson nek instruon. Ĉio ŝajnas al mi rakonto por malsprituloj, se mi sincere devas diri mian opinion.

La teksto estas sufiĉe korekta kaj facila.

EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO, Poemeto kun aldono de kelkaj katolikaj poezioj kaj psalmo de F. Pizi. Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 1925, 24 paĝoj, 22×15 . Prezo: 2 liroj.

La poemo enhavas kelkajn originalajn pensojn. La ceteraj poezioj meritas ankaŭ laŭdon, se oni juĝas ilin el lingva vidpunkto.

Zorge presita, la libreto fariĝas interesa, precipe por katolikoj.

ESPERANTA LEGOLIBRO. Originale verkita de B. kaj E. Migliorini. Eldonejo de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 1925. 144 paĝoj, 16 $\frac{1}{2}$ × 12. Prezo: 5 liroj.

La verko konsistas el tri partoj: I Tra la vivo. II Tra la lingvo. III Tra la literaturo. La aŭtoro ĉerpis la tutan enhavon de la libro el gazetoj kaj zorge ordigis ilin por doni al niaj lernantoj malkaran kaj ŝatindan legolibron.

Sur paĝo 11 «antaŭ fermi» kaj «post esti» estas forigindaj. — SALJO.

Nova Granda Libro en Esperanto. — Estas jam tute presita la «Kataluna Antologio», aperinta je la fino de Novembro. Tiu ĉi granda verko enhavas elektitajn pecojn de katalunaj poetoj kaj prozistoj, antikvaj kaj modernaj. Ĝi estas presita sur linpapero (la tuta eldono estas «bibliofila») kaj okupas pli ol 400 paĝojn kun formato 22 x 16 cm. La versaj kaj prozaj tradukoj estas faritaj de lertaj katalunaj esperantistoj sub la gvido de Jaume Grau Casas, kompilinto de la «Antologio». Ĝia stilo estas plene fundamenta. Krom la tradukitaj literaturajoj estas en la libro noto bibliografia pri ĉiu aŭtoro, kelkaj popolkantoj verse tradukitaj kun la melodioj, kaj studo pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. En tiu ĉi studo estas speciale pritraktataj la verkoj de la famaj mezepokaj trobadoroj, ĉu provencaj, ĉu katalunaj. Estas ankaŭ rimarkindaj kelkaj komparoj de la kataluna lingvo kun la hispana, la franca kaj la itala. La «Kataluna Antologio» kostas, afrankite, por ĉiuj landoj, escepte tiujn de la Iberia duoninsulo: du dolarojn, dekunu svisajn frankojn, naŭ ŝilingojn. En la Iberia duoninsulo ĝi kostas 13 pesetojn. Ĉiu ekzemplero (kiu estas solide bindita kaj pezas unu kilogramon) estos sendata en rekomendita pakajo. Petu informojn de «Komitato por Kataluna Antologio»: S-ro Eduard Capdevila, kasisto, str. Carders, 29 Barcelona.

Nekrologo

Nia aragona malnova amiko, fervora agema samideano, Emilio Gastón Ugarte, Vicdelegito de U. E. A. en Zaragoza, kie li profesie estis inteligenta advokato, kaj politika aŭtoritatulo, forlasis nian mondon. Tiu malĝojiga sciigo, kiun ni ricevas de nia samideano Valentí Alavedra el Terrassa, vere ĉagrenas nin, la katalunlingvan samideanaron, ĉar S-ro. Gastón estis unu el la malmultegaj hispanlingvaj samideanoj, kiu efektive konis nian Federacion, niajn kongresojn kaj ceteraĵojn, kaj ilin komprenis kaj estimis. Certe la aragonaj samideanoj, pranepoj el reĝoj de la estinta Katalun-Aragona Konfederacio, pli facile komprenas nin. Lia samurbano kaj kunbatalanto, advokato ankaŭ, Manuel Maynar, Delegito de U. E. A. en Zaragoza, same estimas kaj komprenas nin. Kiel tiu-ĉi, Emilio Gastón estis Honora Membro de K. E. F. Lastatempe ni vidis elokventajn pruvojn de esperanta fervoro kaj ofero de nia ĵus formortinta amiko. Lia malapero estas tre bedaŭrinda perdo por nia movado. Al lia familio ni esprimas plej sinceran kondolencon, kaj esperas fortecon elporti tian malfeliĉon.

Intershangho — Gazetoj ricevitaj

Heroldo de Esperanto. Horrem bei Köln, Germanlando.

La Revuo Orienta, Japania Esperanta Instituto, Tokio, Uŝigome, Ŝin Ogaŭamaĉi III-14.

Amikeco, Internacia Esperantista Klubo, Koblenz am Rhein, Eltzerhofstr. 5. (Germ.)

The British Esperantist. British Esperanto Association, 17, Hart Street, London W. C. 1.

La Kolportisto, Dumonata — Senpaga. — Esperanta Kolportista Asocio. 64, St. Thomas Road, London, North, 4.

Literaturo, Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London, W. C. 1. (ne plu aperos).

Bulteno, Antverpena Por-Esperanto Propaganda Komitato, Sniedersstraat, 51.

La Progreso, Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha VII. Socharská. 333.

Espero Katolika, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, F-ino M. Larroche, 55 Rue de Vaugirard, Paris (6.)

Marto, Oficiala organo de Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo. Haida — (Bohemujo).

Informoj, Esperanto-Asocio de Estonio. Tallinn, postkast 6.

Agrupación Escultista, Carrer Argentona, 3 i 5, Barcelona (Gràcia).

Katolika Mondo, Universala Organo por tutmondaj interesoj Katolikaj — Zug, Svislando.

Esperanto, Ploesti, Placo Unirei n.º 24, Rumanujo.

Espero Teozofia, Organo de Teozofia Esperanta Ligo. Krakovská 17, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.

Belga Esperantisto, Oficiala Organo de la Belga Ligo Esperantista, Kleine Hondstraat, 11. Antverpeno.

(daŭrigota)

Jam aperis

Kataluna Antologio

kompilita de

Jaume Grau Casàs

416 paĝoj 22 × 16

Ĉiu kataluno nepre devas aĉeti
kaj diskonigi la plej grandan ver-
kon de 1925

Vidu detalojn sur paĝo 268.

Angel Valdepeñas

Sastre - Tajloro

Pelayo, 6, pral

BARCELONA

Vestits i abrics de tota mena a mi-
da per a home, des de 130 ptes.,
a 175 ptes. els de millor qualitat.

Bon tracte

Bon treball

ESPERANTO UZATA

Pelayo, 6, pral.

BARCELONA

Nota. Als esperantistes, 10 per cent de
descompte.

"Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

ATENTU ESPERANTISTOJ!

Se vi deziras nur por 2.50 svisaj
fr. aŭ egalvaloro, konatiĝi kun la
vivo, moroj, kulturo, literaturo k.
t. p. de la bulgara popolo,

ABONU LA GAZETON

Bulgara Esperantisto

kiu dum sia 7.^a jaro donos dekdu
16 - paĝajn numerojn nur en
esperanto.

ELEKTITAJN ORIGINALAJN KAJ
TRADUKITAJN VERTIKOJN

vi legos en "Bulgara Esperantisto"
nur kontraŭ 2.50 sv. fr. jare.

Ĉion adresu: BULGARA ESPERANTISTO
str. Car Boris, 69 - Sofio (Bulgario)